PAUL FRUICTIER

KOMPLETA GRAMATIKO
KAJ
VORTFARADO DE ESPERANTO

reviziita kaj kompletigita

de

S. GRENKAMP-KORNFELD

ELDONEJO : ESPERANTISTA VOĈO
JASLO (POLLANDO)

UTILA ESTAS ALIĜO

AL UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Ĉar ĝi kunigas la esperantistojn pretajn por realigi la idealon de la kreinto de Esperanto.

Ĉar ĝi kreas konstante utilajn servojn & plifortigas la senton, ke esperantisto estas ano de granda familio.

Ĉar ĝi havigas ion al siaj membroj. Jarlibro, gazeto ESPERANTO, libropremio, servoj variaj k. t. p.

KAJ TAMEN POSTULAS NUR MALALTAN KOTIZON

Sekve ne hezitu

kaj demandu pri informoj aŭ de loka Delegito, aŭ de Teritoria Oficejo kaj se tiaj *ne* estas konataj al vi, rekte de la

Centra Oficejo laŭ jena adreso :

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
1, Tour de l'Ile, GENEVE (Svislando)

30 27
Esperanto • rondo
E

Kompleta Gramatiko

KAJ

Vortfarado de Esperanto

547019

ALIAJ ESPERANTAJ VERKOJ

de s-o ***Fruictier*** :

Esperanta Sintakso (elĉerpita)

La Esperanta Vortfarado (elĉerpita)

de s-o ***Grenkamp-Kornfeld*** :

aperis :

BALUCKI : **Kuzeto**

Kompletny samouczek j. Esperanto

Krioj de l'koro

Penseroj, la kajero

» IIa kajero

WYSLOUCH : **El la lando de ruinoj**

en kunlaboro :

Plena Vortaro de Esperanto

Vortoj de Prof. Cart

en preparo :

5.000.000

Ĉu vi tion legis ?

Esperanta Krestomatio

Kion homoj valoras

La pola folkloro kaj popolkanto

Scienca kaj Teknika Vortaro de Esperanto

PAUL FRUICTIER

KOMPLETA GRAMATIKO
KAJ
VORTFARADO DE ESPERANTO

reviziita kaj kompletigita

de

S. GRENKAMP-KORNFELD

KSIĄŻNICA PODLASKA im. Łukasza Górnickiego Nr 3336 FILIA Nr 14 w Białymstoku

374

Esperanto - rondo Vyškov, Školní 4

(07)

ELDONEJO : ESPERANTISTA VOĈO

JASLO (POLLANDO)

MALLONGIGOJ
(plej ofte renkontataj)

anst. = anstataŭ.
ekz. = ekzemple.
k. a. = kaj aliaj.
k. c. = kaj ceteraj.
k. s. = kaj similaj.
k. sekv. = kaj sekvantaj.
k. t. p. = kaj tiel plu.
pĝ., p. = paĝo.
t. e. = tio estas.
s. t. = sub titolo.
rim. = rimarko.
PS., ps. = postskribo.

d-ro = doktoro.
d-ino = doktorino.
f-ino = fraŭlino.
k-do = kamarado.
k-io = kompanio.
n-(r)o = numero.
p-ro, prof. = profesoro.
s-(r)o = sinjoro.
s-ino = sinjorino.
kp. = komparu.
vd. = vidu.

En serio da similaj kunmetitaj vortoj oni skribas ofte :
Rus-, Svis-, Turk-, Svedlando = Ruslando, Svislando, Turklando, Svedlando.
Rusl. = Ruslando.
El- kaj eniri = eliri kaj eniri.

Specialaj por ĉi tiu libro :

Z. = Frazoj de Zamenhof.
Haml. IV 2 = Hamleto, en akto 4-a, sceno 2-a.
L. I. = revuo « Lingvo Internacia ».

Interparentezaj nombroj montras ordajn numerojn de paragrafoj, kiujn oni konsilas legi.

Ĉiuj rajtoj de tradukado, represigado kaj adaptado rezervitaj por ĉiuj landoj inkluzive Sovetlando.

Copyright by S. Grenkamp-Kornfeld, 1930.

Antaŭparolo

Pasis jam kvarona jarcento de la tempo, kiam aperis unuafoje la ESPERANTA SINTAKSO *de D-ro Fruictier, — en la tempo, kiam ne ekzistis kompletaj esperantaj gramatikoj kaj lernolibroj. Ĝi havis grandan sukceson kaj aperis en pluraj eldonoj.*

Dek jarojn poste, pro diversaj tiutempaj prilingvaj diskutoj, D-ro Fruictier publikigis la duan libron s. t. LA ESPERANTA VORTFARADO.

Tiuj verkoj estis la bazo por ĉiuj postaj esperantaj gramatikoj kaj lernolibroj.

Delonge jam ambaŭ estas elĉerpitaj kaj mi pensis, ke ili meritas esti reeldonitaj.

Post longa primedito mi decidis unuigi ambaŭ verkojn kaj aperigi ilin kiel unu tuton sub nuna titolo : KOMPLETA GRAMATIKO KAJ VORTFARADO DE ESPERANTO.

Mi tamen konservis al la verkoj ilian originalan planon, kiu verŝajne kaŭzis parton de ilia iama sukceso. Konsekvence mi lasis la antaŭan dividon, atente reviziante la tekston de ambaŭ verkoj, jen aldonante, jen kompletigante laŭbezone.

Kelkaj novaj ĉapitroj kaj afiksoj estis de mi alverkitaj, kiel ekz. : FONETIKO, INTERPUNKCIO, VERSFARADO, END, MIS.

Antaŭ ĉio mi volas esprimi mian plej koran dankon al D-ro Fruictier, kiu permesis tiun novaranĝitan eldonon, revizion kaj kompletigon. Li eĉ donis al si la zorgon kaj penon ne nur tralegi atente la manuskripton, sed ankaŭ doni al mi multajn konsilojn.

Mi aldonu, ke ĉe la revizio kaj kompletigo mi plene sekvis la regulon de D-ro Fruictier : KONSTATI, NE PROPONI, *tiamaniere restante fidela al la observa metodo, kiu regas la lingvan sciencon, kiel ĉiujn naturajn.*

Fine mi ne volas forgesi la nomon de s-o M. C. Butler, sekretario de Brita Esperanto-Asocio, kaj de s-o Frans Schoofs, prezidanto de Belga Ligo Esperantista, kiuj bonvolis sendi al mi kelkajn valorajn rimarkojn.

S. J. GRENKAMP-KORNFELD.

Fundamenta Gramatiko de Esperanto [1]

I. — ALFABETO

La esperanta alfabeto konsistas el jenaj literoj :

A a	*B b*	*C c*	*Ĉ ĉ*	*D d*	*E e*	*F f*
G g	*Ĝ ĝ*	*H h*	*Ĥ ĥ*	*I i*	*J j*	*Ĵ ĵ*
K k	*L l*	*M m*	*N n*	*O o*	*P p*	*R r*
S s	*Ŝ ŝ*	*T t*	*U u*	*Ŭ ŭ*	*V v*	*Z z*

Oni uzas la majusklojn en komenco de frazo kaj de propraj nomoj (personoj, familioj, urboj, landoj, k. t. p.)

La nomoj de literoj estas : *a, bo, co, ĉo, do, e, fo, go, ĝo, ho, ĥo, i, jo, ĵo, ko, lo, mo, no, o, po, ro, so, ŝo, to, u, ŭo, vo, zo.*

Presejoj kiuj ne posedas la literojn *ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, ŭ,* povas anstataŭ ili uzi *ch, gh, hh, jh, sh, u.*

La vokaloj *a, e, i, o, u* estas prononcataj vaste, kiam ili troviĝas en fermita silabo, kaj malvaste en nefermita silabo.

II. — ĜENERALAJ REGULOJ

1. Artikolo. — Artikolo difina estas *la,* egala por ĉiuj genroj, kazoj kaj nombroj. Artikolo nedifina ne ekzistas.

2. Substantivo. Kazoj. — La substantivo havas la finaĵon *o.* Por formi la pluralon oni aldonas *j.* Ekzistas nur du kazoj : nominativo kaj akuzativo ; la lasta estas ricevata el la nominativo per aldono de la finaĵo *n.* La ceteraj kazoj estas esprimataj per helpo de prepozicioj : la genitivo per *de,* la dativo per *al,* la ablativo per *per* aŭ aliaj prepozicioj laŭ la senco.

3. Adjektivo. Gradoj de komparo. — Adjektivo havas la finaĵon *a ;* ĝiaj kazoj kaj nombroj estas esprimataj sammaniere kiel tiuj de l'substantivo. La komparativo estas farata per antaŭmeto de l'vorto *pli,* la superlativo per antaŭmeto de l'vorto *plej.* Post la komparativo oni uzas la konjunkcion *ol.*

4. Numeraloj. — Numeraloj fundamentaj ne estas deklinaciataj ; ili estas : *unu* 1, *du* 2, *tri* 3, *kvar* 4, *kvin* 5, *ses* 6, *sep* 7, *ok* 8, *naŭ* 9, *dek* 10, *cent* 100, *mil* 1000. La dekoj, centoj kaj miloj estas formataj per simpla kunigo de la numeraloj. Por la formado de numeraloj ordaj oni aldonas al la numeraloj fundamentaj la finaĵon *a* de l'adjektivo ; por numeraloj multobligaj oni uzas la sufikson *obl ;* por frakciaj, la sufikson *on ;* por kolektaj, la sufikson *op ;* por distribuaj, la vorton *po.* Krom tio estas uzataj numeraloj substantivaj kaj adverbaj.

(1) La ĉi-tiea teksto ne estas tiu de la *Fundamento de Esperanto,* kvankam ĝi estas perfekte laŭfundamenta. Diversaj klarigoj estas aldonitaj al la teksto de la Fundamentaj 16 reguloj, precipe laŭ la artikoloj de s-o *Behrendt.* La originalan tekston posedas ja ĉiu esperantisto.

5. Pronomoj personaj. — Pronomoj personaj difinaj estas : por la 1-a persono *mi,* por la 2-a persono *ci* (anstataŭ *ci* oni uzas ordinare *vi*), por la 3-a persono *li* (virseksa), *ŝi* (virinseksa), *ĝi* (por objektoj kaj bestoj) ; en pluralo : por la 1-a persono *ni,* por la 2-a persono *vi,* por la 3-a persono *ili* (por ambaŭ seksoj kaj objektoj).

Refleksiva pronomo por ĉiu sekso, por singularo kaj pluralo, estas *si* ; ĝi rilatas nur al subjekto de la tria persono en la sama frazo.

Nedifina persona pronomo estas *oni* por ambaŭ seksoj kaj nombroj.

La pronomoj posedaj estas formataj per aldono de la adjektiva finaĵo *a.* La akuzativo estas formata kiel ĉe la substantivoj per aldono de la finaĵo *n* kaj la pluralo per *j.*

6. Verbo. — La verbo ne estas ŝanĝata laŭ persono nek laŭ nombroj.

Simplaj formoj de l' verbo :

a) La estanto finiĝas je *-as*
b) La pasinto — *-is*
c) La estonto — *-os*
ĉ) La kondiĉa modo — *-us*
d) La ordona modo — *-u*
e) La nedifina modo — *-i*

Participoj ricevas la finaĵon *a* aŭ e laŭ tio, ĉu ili estas uzataj adjektive aŭ adverbe ; krom tio ili estas signataj per jenaj sufiksoj :

f) participo aktiva de estanteco : per *-ant-*
g) — — estinteco — *-int-*
ĝ) — — estonteco — *-ont-*
ĥ) — pasiva de estanteco — *-at-*
h) — — estinteco — *-it-*
i) — — estonteco — *-ot-*

Krom simplaj formoj de l'aktivo ekzistas nesimplaj formoj aktivaj, uzataj nur en okazo de nepra bezono ; ili estas formataj

per helpo de la responda formo de l' verbo *esti* kaj de la responda participo aktiva de la bezonata verbo.

Ĉiuj formoj de l' pasivo estas formataj per helpo de la responda formo de l' verbo *esti* kaj de la responda participo pasiva de la bezonata verbo.

Ĉe l'pasivo la prepozicio *de* montras la aganton kaj la prepozicio *per* montras la ilon aŭ rimedon uzatan de l'aganto.

7. **Adverbo.** — La adverbo derivita finiĝas per e ; komparado kiel ĉe adjektivo.

8. **Prepozicioj.** — Ĉiuj prepozicioj postulas per si mem post si la nominativon. Se ni uzas akuzativon post prepozicio, tio ne dependas de la prepozicio, sed de aliaj kaŭzoj (montro de movo al).

9. **Legado.** — Ĉiu vorto estas legata tiel, kiel ĝi estas skribita.

10. **Akcento.** — La akcento estas ĉiam sur la antaŭlasta silabo.

11. **Vortfarado.** — Vortoj kunmetitaj estas formataj per simpla kunigo de vortoj ; la ĉefa vorto staras en la fino. La gramatikaj finaĵoj estas konsideritaj ankaŭ kiel memstaraj vortoj.

12. **Neado.** — Ĉe alia nea vorto, la vorto *ne* estas forlasata.

13. **Movo al.** — Por montri direkton, oni aldonas al la koncernaj vortoj la finaĵon *n*, same kiel por la akuzativo.

14. **Forigo de prepozicioj.** — Ĉiu prepozicio havas klare difinitan kaj nepre konstantan signifon. Se estas necese uzi iun prepozicion, sed la senco ne klare montras, kiun prepozicion ni elektu, tiam ni uzas la prepozicion *je*, kiu ne havas memstaran, difinitan signifon.

Anstataŭ la prepozicio *je* kun nominativo oni povas ankaŭ uzi la akuzativon sen prepozicio, kondiĉe ke miskompreno ne povas okazi.

15. **Fremdaj vortoj.** — La tiel nomataj vortoj *fremdaj*, t. e. tiuj, kiujn la plimulto de la lingvoj prenis el la sama fonto, estas uzataj en la internacia lingvo sen ŝanĝo ; ili ricevas nur la ortografion kaj la gramatikajn finaĵojn de tiu ĉi lingvo. Sed ĉe diversaj vortoj formataj el la sama radiko, estas pli bone, uzi senŝanĝe nur la vorton fundamentan kaj el ĉi tiu formi la ceterajn laŭ la reguloj de la lingvo Esperanto.

16. **Elizio.** — La fina vokalo de la substantivo kaj de la artikolo povas esti forlasata kaj anstataŭata de apostrofo.

Gramatiko de Esperanto

I

FONETIKO

1. **Fonetiko** (aŭ sonologio) estas parto de la gramatiko, kiu priskribas kaj analizas la sonajn fenomenojn.

2. **Sono** estas la lasta simpla elemento de la ekstera sinesprimo de lingvo. Ĉiuj sonoj de nia lingvo dividiĝas en du grupojn : vokaloj kaj konsonantoj.

3. **Literoj** estas la signoj, kiuj respondas en la skribo al ĝustaj sonoj el kiuj konsistas vortoj.

Rim. Krom la ĝustaj sonoj ekzistas ankoraŭ alia speco de fonetikaj elementoj, kiuj plej parte en la skribo ne estas esprimataj, nome: 1. *La grado de prononca forto* aŭ alidire *artika energio;* 2. *la daŭro kaj tempomezuro de prononcado,* kaj 3. *la klango* (sonoro) *kaj la melodio de la prononco.* Tiuj tri faktoroj kreas la ĝeneralan modulon kaj ritmon fonetikan, kies nur certajn, tre nemultajn momentojn oni esprimas en la skribo per la interpunkcioj.

4. **Alfabeto** estas la instruo pri ekzistantaj sonoj en iu lingvo. La esperanta alfabeto konsistas el 28 jenaj literoj :

A a	*B b*	*C c*	*Ĉ ĉ*	*D d*	*E e*	*F f*
G g	*Ĝ ĝ*	*H h*	*Ĥ ĥ*	*I i*	*J j*	*Ĵ ĵ*
K k	*L l*	*M m*	*N n*	*O o*	*P p*	*R r*
S s	*Ŝ ŝ*	*T t*	*U u*	*Ŭ ŭ*	*V v*	*Z z*

5. **Vokalo** nomiĝas sono, kiu povas esti prononcata sen helpo de alia sono ; nia lingvo havas 5 vokalojn : *a, e, i, o, u,*

Rim. 1. Ĉiu vorto en Esperanto konsistas el tiom da silaboj, kiom da vokaloj ĝi havas.

2. Litero *ŭ* ne estas vokalo, sed duonkonsonanto.

Estas malfacile doni en internacia gramatiko klarigojn tute ĝustajn pri la prononco de vokaloj. Ni pro tio konsilas sekvi la naciajn lernolibrojn. Ni nur donas ĝeneralan regulon : vokalo devas ĉiam esti vaste elparolata, kiam ĝi troviĝas en fermita silabo, kaj malvaste en nefermita silabo.

6. **Diftongo** nomiĝas kuniĝo de unu vokalo kun duonkonsonanto *ŭ* aŭ *j* kaj prononcataj per unu elspiro : *aŭ, oŭ, aj, ej, oj,* k. t. p.

7. **Konsonanto** estas sono, kiu povas esti prononcata nur kun vokalo ; nia lingvo havas 22 konsonantojn : *b, c, ĉ, d, f, g, h, ĥ, j, ĵ, k, l, m, n, p, r, s, ŝ, t, v. z.*

Rim. Litero *j* estas duonkonsonanto nur ĉe la finaj silaboj de vorto (kaj kompreneble kiam ĝin antaŭas vokalo) : *kaj, plej, ĉarmoj, maj', ĝoj'*, kaj antaŭ konsonanto : *ajlo, sojlo, prujno.*

8. **Silabo** nomiĝas ĉiu sono aŭ grupo da sonoj, kiu estas prononcata aparte kaj per unu elspiro ; *a, ĉo, ism* estas **unusilaboj ;** *ĉar-ma, be-la* estas **dusilaboj ;** *in-stin-kto, pro-kras-ti* estas **trisilaboj ;** *pa-ra-gra-fo, gra-ma-ti-ko* estas **kvarsilaboj ; plursilaboj** nomiĝas vortoj, kiuj konsistas el pli ol unu silabo.

I. Prononcado de silaboj.

9. Kiam unu konsonanto troviĝas inter du vokaloj aŭ diftongo, ĝi formas silabon kun la ĝin postsekvanta vokalo :

ba-lo, nu-bo, ce-lo, sce-no, ko-lo, o-fi-ci-ro, fa-ci-la, la-ca, pa-cu-lo, ĉe-mi-zo, ĉi-ka-no, pro-ce-so, te-ni, pa-ĝo, ĝu-a-do, ha-ro, ho-ro, ĥo-le-ro, i-mi-ti, fi-lo, ve-ro, fraŭ-lo, Paŭ-li-no, laŭ-di, Eŭ-ro-po, kra-jo-no, rui-no, ĥe-mi-o. (Z.)

10. Kiam du aŭ pli da konsonantoj staras kune, la unua ĝenerale ligiĝas al la antaŭanta vokalo, kaj la ceteraj kun la postsekvanta :

pan-jo, jus-ta, san-go, foj-no, paj-lo, cen-to, den-to, plen-di, gip-so, gus-to, ĝar-de-no, lon-ga, reg-no, sig-ni, gvar-di-o, lin-gvo, hi-run-do, bir-do, prin-tem-po, ju-ris-to, ma-jes-to, gran-da, pruj-no, vej-no, jur-na-lo, em-ba-ra-so, in-ter-na-cia, foj-no, pal-pi, ar-ba-ro, sis-te-mo, tu-mul-to, ŝan-ce-li, zor-gi, nok-to, in-dig-ni, sol-vi, kon-sci-i. (Z.)

Sekve ankaŭ :

ek-ste-ra, ek-splu-a-ti, ek-spo-zi-ci-o, ek-splo-do, ek-spe-ri-men-to, ek-scen-tra, ek-za-me-no, ek-zal-ti.

Rim. Simile kiel *st, gn, ps,* k. t. p., ankaŭ *ks, kz,* estas por ni simplaj konsonantaj grupoj, prononcataj aparte aŭ kune depende de la troviĝo inter vokaloj aŭ ne. Ke en latina, greka kaj kelkaj aliaj lingvoj oni skribas *ks, kz,* per *x,* tio havas nur **grafikan** signifon, sed ne **fonetikan.**

11. Ekzistas tamen en nia lingvo dukonsonantaj grupoj, kiuj formas kiel diftongoj unu tuton kune elparolatan ; ĝenerale *r, l,* kaj *v* formas kun antaŭanta konsonanto **dukonsonanton :**

ci-tro-no, li-kvo-ro, (Z.), *pro-kras-to, pro-kla-mi, pro-ble-mo,*

po-li-glo-to, pe-tro-lo, sa-bro, pa-tri-no, a-glo, a-kla-mi, a-gro-no-mo, a-kva-re-lo.

12. Oni devas tamen memori kaj atenti, ke ĉe kunmetitaj kaj kunprefiksaj vortoj, la kunmetitaĵo aŭ prefikso silabiĝas kiel aparta vorto, do tute aparte :

eks-o-fi-ci-ro (ne **ek-so-***ficiro*), *el-aŭ-di-gi* (ne **e-laŭ-***digi*), *mal-in-flu-a (ne* **ma-lin-***flua*), *long-vo-ka-la* (ne **lon-gvo-***kala*), *bon-ak-cep-ti* (ne **bo-nak-***cepti*), *ba-nan-ar-bo* (ne **ba-na-nar-***bo*).

II

DIFINOJ DE VORTOJ

13. **Sintakso** montras kiamaniere vortoj interligiĝas por formi ĉenon de parolado.

14. **Parolado** konsistas el propozicioj.

15. **Propozicio** estas aro da vortoj, per kiu oni certigas (aŭ demandas) agon, staton aŭ econ pri persono aŭ afero. Plena propozicio konsistas el du ĉefaj partoj (aŭ terminoj) :

16. **Subjekto** pri kiu oni certigas ion ;
Predikato, afero, kiun oni certigas pri subjekto.

Rim. 1. Subjekto povas iafoje ne esti esprimata. Ekz.: *pluvas, fulmas.*
2. Iafoje propozicio estas ne kompleta, kiam mankas unu el la terminoj. Tiam mankanta termino povas facile esti divenata per ĉenigo de ideoj, ekzemple en respondoj.

17. **Subjekto** de propozicio estas ĉiam : *a) unu substantivo* (aŭ kelkaj substantivoj) ; *b*) aŭ alia vorto uzata substantive, nome : *pronomo* (mi), *adjektivo* (mia kara, mia belo estis brava, juna dano, — tri fratoj vivis amike ; unu mortis), *infinitivo* (mensogi estas honte) ; *c*) aŭ *vorto de alia klaso* uzata, kiel materia esprimo de ĝia propra formo (kiel — la vorto *kiel* estas uzata post *tiel.*)

Rim. Oni povas ankaŭ preni enhavon de tuta propozicio por subjekto de sekvanta propozicio: *estas agrable al mi, ke vi aĉetis tiun domon.* Tie ĉi *ke vi aĉetis* estas la subjekto

18. **Predikato** estas *a*) *predikateca verbo,* kiu montras per si mem en difinita maniero ian agon, ian staton, ian econ. Ekz. : *arbo kreskas, verdiĝas ;*

b) *aŭ ne predikateca verbo,* kiu ne montras per si mem difinitan agon, sed estas akompanata de adjektivo, participo aŭ substantivo predikateca (difinanta kaj priskribanta subjekton). Ekz. :*urbo estas belega ; kolombo estas birdo ;* k. t. p. Tion oni nomas **d i s i g i t a p r e d i k a t o .**

19. Predikato povas esti pli precize difinita de adverbo, aŭ de substantivo (aŭ vorto uzata substantive) regata de prepozicio. Tio utilas por montri objekton (1) de ago kaj apudajn cirkonstancojn.
Ekz. : *Cezaro venkis Pompeon en granda batalo.*

20. Substantivo povas esti difinita pli precize per aldono de alia substantivo aŭ substantivaĵo. Ekz. : *Tarkvino, reĝo de Romanoj.* Tion oni nomas *a p u d m e t o .*

21. Al ĉiu substantivo oni povas aldoni adjektivojn aŭ participojn, kiuj ankaŭ povas esti difinataj de aliaj substantivoj.
Ekz. : *Homo mortiginta sian patrinon estas granda krimulo. Homo utila je sia lando mortis.*

Rim. 1. Adjektivo, aldonita sen ia pero al substantivo, estas nomata *a p u d m e t i t a* por ĝin distingi de tiu, kiu estas aldonita per pero de verbo *e s t i* Ekz.: *homo bona* (adj. apudmetita), *homo estas bona* (adj. predikateca).
2. Al substantivo oni povas ankaŭ aldoni aliajn vortojn por ricevi ian difinon: *la, tiu, ĉiu,* k. c.

(1) *Objekto* estas tio kio ricevas agon.

III

ARTIKOLO

I. Uzado ĝenerala.

22. **Esperanta artikolo** estas vorteto, kiun oni uzas antaŭ substantivo aŭ adjektivo por pli precize ĝin difini. Formoj : *la, l'*.

23. Artikolo *la, l'* neniam povas esti en pluralo aŭ en akuzativo. Oni uzas ĝin nur por difini vortojn, t. e. por montri, ke oni parolas pri konata, preciza afero, apartajita de ĉiuj aliaj similaj aferoj.

Se oni parolas pri iu ajn ne konata, komune aŭ ne precize difinita afero, tiam oni neniam uzas la artikolon. En tiaj okazoj oni povas ofte meti antaŭ la vorto (pense aŭ efektive) unu el vortetoj *unu iu, ia, kelka,* aŭ el esprimoj *iom da, kelke da,* k. s.

La celo de la artikolo estas pli klarigi frazon, malhelpante, ke oni konfuzu priparolatan aferon kun alia simila. Tial estas preferinde ne uzi tiun vorteton, kiam ĝi efektive ne klarigas la ideon kaj kiam ni estas allogataj uzi ĝin nur pro nacia kutimo. *La sola kondiĉo estas, ke la frazo restu ĉiam plej klara :*

Venigu la kuraciston, ĉar mi estas malsana. (Z.)
Mi aĉetis por la infanoj tableton kaj kelke da seĝetoj. (Z.)

Rim. Se ni dirus: *venigu kuraciston,* oni povus kredi, ke ni volas iun ajn kuraciston. Per *la* ni montras: *venigu tiun kuraciston, kiun ni kutime vokas.* Simile: *mi aĉetis por infanoj tableton* signifus, ke tiuj infanoj estas iuj ajn infanoj, sed ne niaj aŭ tiuj, pri kiuj ni jam parolis.

II. Uzoj apartaj.

24. Ofte oni uzas *la* antaŭ komuna nomo por montri, ke oni celas la tutan genton, specon, profesion, k. t. p. aŭ en abstrakta senco :

La riĉulo havas multe da mono (Z.), t. e. ĉiuj riĉuloj.
La botisto ŝatas botojn kaj ŝuojn (Z.) t. e. ĉiu botisto.
Oni diras, ke la vero ĉiam venkas (Z.)

25. Simile antaŭ vorto en pluralo *la* povas montri *ĉiujn* estaĵojn apartenantajn al la citata klaso :

La ŝipanoj devas obei la ŝipestron (Z.), t. e. ĉiuj ŝipanoj.
La parizanoj estas gajaj homoj (Z.) t. e. en ĝenerala maniero, ĉiuj homoj loĝantaj en Parizo estas gajaj.

26. Kiam la senco restas komprenebla, oni ankaŭ povas en tiaj okazoj forigi *la :*

Vitro estas rompebla kaj travidebla. (Z.)
Verkisto verkas librojn kaj skribisto simple transskribas paperojn. (Z.)
Luteranoj kaj kalvinanoj estas kristanoj. (Z.)
Urbanoj estas ordinare pli ruzaj ol vilaĝanoj. (Z.)

III. Propraj nomoj.

27. Oni *plej ofte ne* uzas la artikolon antaŭ propra nomo. Tion oni ne faras ankaŭ por la vortoj : sinjoro, sinjorino, fraŭlino, kaj similaj, — aŭ por nomoj de profesio, rango, k. c. sekvataj de propra nomo :

Li fianĉiĝis kun fraŭlino Berto. (Z.)
Esperanto estas kreita de Doktoro Zamenhof.

28. Kiam adjektivo aŭ substantivo troviĝas antaŭ propra nomo, tiam oni povas uzi artikolon :

La tuta Eŭropo travivas ekonomian krizon post la milito.

Rim. Oni trovos grandan konfuzon ĉe la aŭtoroj, eĉ plej bonaj, pri la uzo de artikolo antaŭ propra nomo. Regulo plej simpla estas : demandi ĉu uzo de artikolo aldonas ion necesan por malhelpi miskomprenon. Oni devas konfesi, ke preskaŭ ĉiam *la* estas tute ne utila antaŭ propra nomo, ĉar neeble estas konfuzi estaĵon, aferon aŭ personon nome citatan kun alia. Ekzemple inter jenaj frazoj el *Ekzercaro* de Zamenhof : *La doktoredzino A. vizitis hodiaŭ la gedoktorojn P.* kaj *Gesinjoroj N. hodiaŭ venos al ni,* la dua ŝajnas al ni preferinda.

29. Kiam propra nomo estas uzata en senco komuna, tiam oni uzas kompreneble artikolon, kiel por aliaj komunaj nomoj :

La turko ekpafis al mi, — t. e. tiu turko, pri kiu mi parolis.
La rusoj loĝas en Rusujo, — t. e. ĉiuj rusoj.
Calderon estis la Aristofano de Hispanujo, — t. e. Calderon ludis en Hispanujo saman rolon, kian Aristofano ludis en Grekujo.

IV. Gradoj de komparo.

30. Oni uzas laŭvole artikolon *la* en gradoj de komparo kun *plej*:

El ĉiuj miaj infanoj Ernesto estas la plej juna. (Z.)
Kelkaj homoj sentas sin la plej feliĉaj, kiam ili vidas la suferojn de siaj najbaroj. (Z.)
Ke mi forte vin amas, ho plej kara mia, tion ĉi kredu al mi. (Haml. II. 2.)

Rim. 1. Kun *pli, la pli, la malpli,* oni uzas artikolon nur por montri superlativon inter du aferoj: *unu vidvino havis du filinojn; la pli maljuna...* (Z.).
2. *La* oni ordinare ne uzas antaŭ *plej, malplej,* kiam tiuj vortoj rilatas verbon: *li estas tiu, kiun mi plej admiras.*

V. Antaŭ adjektivo.

31. Kiam adjektivo difinas substantivon esprimitan, reguloj estas samaj, kiel por substantivo sola.

32. Kiam adjektivo estas sola, t. e. kiam la substantivo, kiun ĝi difinas, ne estas esprimita, tiam oni uzas ofte artikolon antaŭ la adjektivo, precipe en poezio:

Ili batis unu la alian.
La Plejpotenca, faru nian venon
Por li saniga. (Haml. II. 2.)

... Alie kiu volus elportadi
La mokojn kaj la batojn de la tempo,
La premon de l'potencaj, la ofendojn
De la fieraj, falson de la juĝoj...? (Haml. III. 1.)

33. Preskaŭ ĉiam oni uzas *la* antaŭ nombra adjektivo montranta tagon, horon, vicon, k. t. p. kiam la vorto *tago, horo,* k. t. p. ne estas esprimita (88):

Januaro estas la unua monato de la jaro, aprilo estas la kvara, novembro estas la dek-unua, decembro estas la dek-dua. (Z.)
Hodiaŭ estas la dudeksepa (tago) de marto. (Z.)

34. Iafoje artikolo *la* antaŭ adjektivo (kaj antaŭ substantivo komuna) servas por igi ĝin propra nomo:

La patro adoras nur la Nevideblan.
Preĝu al la Sankta Virgulino. (Z.)
Demandu vi la Kreanton.

VI. Sezonoj, monatoj, tagoj, festoj.

35. Antaŭ nomo de sezono, tago, festo, oni ordinare ne uzas *la*:

En somero ni trovas malvarmeton en densaj arbaroj. (Z.)
Hodiaŭ estas sabato kaj morgaŭ estos dimanĉo. (Z.)

36. Se la nomo de sezono, tago k. t. p. estas antaŭata de difina substantivo aŭ adjektivo, tiam oni uzas la artikolon:

Mi iros la plej proksiman jaŭdon.

Rim. 1. Oni trovas ofte frazojn, kiel: *mi iros la proksiman dimanĉon,* kun la signifo: *la plej proksiman dimanĉon.* Aldoni tie la vorton *plej,* estos utile por eviti konfuzon kun *mi iros proksiman dimanĉon.*
2. Ne konsilinde estas uzi *la* anstataŭ *ĉiu,* kiel ekzemple en la frazo: *En la dimanĉo mi restas hejme,* ĉar senartikolaj popoloj povus ne kompreni tiun formon. Multe pli klare oni diras: *Mi restas hejme dum ĉiu dimanĉo aŭ ĉiu-dimanĉe.*

37. Tago de festo estas nomata en Esperanto laŭ jena maniero: Paŭla festo, Paŭla tago, Tago de Sankta Petro, k. t. p.; oni do ne devas diri, kiel en kelkaj lingvoj *La Sankta Petro.*

VII. Aliaj okazoj.

38. En citado de nomoj oni povas laŭvole ripeti aŭ ne ripeti artikolon antaŭ ĉiu aparta substantivo aŭ adjektivo:

La arboj, floroj kaj kreskajoj de tiu ĝardeno estas belaj (aŭ la arboj, la floroj kaj la kreskajoj...)
La saĝa, elokventa kaj lerta advokato diris (aŭ la saĝa, la elokventa kaj la lerta...)

39. Antaŭ infinitivo oni ne uzas artikolon. Ne diru do: *la manĝi kaj la trinki estas necesaj por la vivi,* sed: *manĝi kaj trinki...,* aŭ: *la manĝado kaj la trinkado...* (167. R. 1.)

40. Post vortoj *kies, ĉiuj* oni ne uzas artikolon:

La domo, kies tegmenton vi vidas, apartenas al mia patro.
Ili arestis ĉiujn krimulojn.

VIII. Elizio.

41. Oni povas apostrofi artikolon:
a) post prepozicio, kiu finiĝas per vokalo (de, tra, pri, pro k.c.):

Tra l' densa mallumo briletas la celo. (Z.)
De l' mondo.

BIBLIOTEKA PODLASKA im. Łukasza Górnickiego Nr ..... FILIA Nr 14 w Białymstoku

b) plej ofte en poezio antaŭ vokalo :

L'espero, l'obstino kaj la pacienco. (Z.)

Rim. Estas preferinde uzi antaŭ vokalo la plenan formon *la*, kiam la apostrofita *l'* ne ligiĝas en la prononco al antaŭ ĝi staranta prepozicio kaj tio por eviti miskomprenojn: l'avo (lavo), l'amo (lamo), k. t. p.

IX. Kvanto, eco, unu, iu, ia, certa, kelka.

42. Kiam vorto estas uzata en senco parta, t. e. kiam oni celas montri iom da io, kelkajn erojn da io, oni ne uzas artikolon.

43. Antaŭ vorto uzata en tia senco oni ne uzas alian vorteton, kiam la ideo rilatas pli la naturon, la econ de l' afero, ol ĝian kvanton :

Donu al la birdoj akvon, ĉar ili volas trinki. (Z.)

44. Se kontraŭe oni celas aparte kvanton, oni tiam uzas esprimojn : *iom da, kelke da,* k. s. (kun nominativo) :

En la ĉambro sidis nur kelke da homoj. (Z.)
Mi memoris, ke mi ankaŭ faris kelke da paĵoj.

45. *Unu* estas uzata ordinare nur por kalkuli, por montri, ke estas unu, ne kelkaj estaĵoj. Iafoje tamen ĝi estis uzata, kiel nedifina artikolo, sed malofte. Pli bone estas ne imiti tiun malnoviĝintan uzon :

Unu vidvino havis du filinojn. (Z.)

Rim. Anstataŭ *unu* en tia senco, oni povas uzi: *iu, ia, certa* kaj *kelka.*

46. *Iu* simile kiel *ia* ludas ankaŭ iafoje rolon de nedifina artikolo, kiam oni volas insisti pri nedifiniteco de priparolata afero. *Iu* esprimas la nedifinitan pronoman sencon kaj *ia* la nedifinitan econ aŭ kvaliton :

Iuj sinjoroj atendas en la ĝardeno.
Iaj strangaj sonoj atingas nin... kvazaŭ iu ĝemas.

47. La vorteto *certa* havas ofte, krom sia ĉefa senco, ankoraŭ la sencon de *iu difinita :*

En certaj okazoj ni agus alie, ol vi.

48. Ankaŭ *kelka* ludas rolon de nedifina artikolo esprimante parton el tuto :

Kelkaj homoj kredas, ke la vero venkas.

TABELO

pri difino de vorto per artikolo « la ».

« LA » difinas vorton, t. e. apartigas ĝin de aliaj al ĝi similaj :

A. Rememorigante, ke oni konas ĝin aŭ ĵus parolis pri ĝi :
Mi ektrinkis : la akvo estis varma, t. e. *tiu* akvo.
Jen estas la pomo, kiun mi trovis (Z.), t. e. *tiu* pomo, kies trovon mi jam anoncis.

B. Resumante antaŭan detalan priskribon :
La najbaro fariĝis en tiu ĉi tago ne priskribeble timiga, t. e. *tiu* najbaro, pri *kiu* mi jam skribis multajn paĝojn.

C. Anoncante tujan klarigon :
La plena pentr(aĵ)o ekflamas en mia imago : ĝi estis antaŭ longe... k .t. p.

D. Montrante, ke objekto priskribata apartenas al nomita persono aŭ objekto :
Mi malfermas la okulojn, t. e. *miajn* okulojn.
La bajoneto eniris al li rekte en la koron t. e. *lian* koron.

E. Montrante tutan genton, aŭ almenaŭ la plej grandan parton :
La rusoj loĝas en Rusujo. (Z.)

F. Igante vorton komunan nomo propra, aŭ preskaŭ propra, tiel ĝi estas apartigita de aliaj :
La suno brilas (Z.)
La Plejpotenca faru nian venon al li saniga. (Z.)

IV

SUBSTANTIVO

49. Substantivo estas vorto, kiu servas por nomi personon, aĵon aŭ ideon.

Formoj: nominativo: *o, oj*, akuzativo: *on, ojn*.

I. Rilatoj kun verbo.

50. Subjekto. — Substantivo, kiu estas subjekto de verbo, povas havi nur formojn o en singularo, oj en pluralo. (Nominativo.)

Oni vidas, ke substantivo estas subjekto de ia verbo (16,17), metante *kiu, kio* antaŭ tiun verbon. La vorto, per kiu oni respondas, estas la subjekto (= kiu faras la agon, kiu, kio estas aŭ fariĝas tia) :

La riĉulo havas multe da mono. (Z.) Kiu havas multe da mono? La riĉulo. *La riĉulo* estas do subjekto.

Papero estas blanka. (Z.) Kio estas blanka? La papero.

De timo paliĝis Antono. Kiu de timo paliĝis? Antono.

Miaj fratoj batis min. Kiu batis min? Miaj fratoj.

51. Rekta komplemento. — Substantivo, kiu estas rekta komplemento de verbo (sen antaŭesto de prepozicio), povas havi nur formojn *on* en singularo kaj *ojn* en pluralo. (Akuzativo.)

Oni vidas, ke substantivo estas rekta komplemento de verbo, metante *kiun, kion* post tiu verbo. La substantivo, per kiu oni respondas, estas la rekta komplemento :

Diru al mi vian nomon. Diru kion? Vian nomon. *Vian nomon* estas do rekta komplemento.

Mi havas bovojn. Mi havas kion? Bovojn.

Lernolibron oni devas ne tralegi, sed tralerni. (Z.)
Oni devas tralerni kion? Lernolibron.

Rim. 1. Oni vidas per supraj ekzemploj, ke subjekto povas troviĝi post sia verbo, kaj komplemento antaŭ sia verbo. Ne metu do ĉiam en akuzativon la vorton, kiu estas post la verbo.

2. Rekta komplemento de verbo aktiva fariĝas subjekto, se oni metas la verbon en pasivan formon. Ekz.: *Mia patro amas min = mi estas amata de mia patro. — Mi posedas hundon = hundo estas posedata de mi.* Tial oni komprenas, kial *esti* kaj aliaj stataj verboj ne povas havi rektan komplementon, ĉar ili ne posedas pasivan formon (158)

52. Nerekta komplemento. — Vorto, kiu estas sub influo de prepozicio (nerekta komplemento), havas ĉiam nominativan formon, esceptinte se ekzistas almovo. (135, 136, 137) :

Donu al la birdoj akvon. (Z.)
De la patro mi ricevis plumon (Z.)
Venu kune kun la patro. (Z.)
Mi trinkis teon kun kuko kaj konfitaĵo. (Z.)

Rim. 1. Rimarku precipe la lastan ekzemplon. *Kuko, konfitaĵo* dependas de *kun*, prepozicio; ili do estas en nominativo (cetere kukon kaj konfitaĵon oni ne trinkas). Sed oni dirus: *mi trinkis teon kaj kafon*, ĉar *kaj* ne estas prepozicio.

2. Tiu eco de esperantaj prepozicioj (ĉiam regi nominativon) povas iafoje kaŭzi konfuzon, se oni ne zorgas pri konstruo de sia frazo. D-ro Zamenhof mem diras (Dua Libro 46): *ĝi estas trompi la landon kune kun la reĝidino.* Oni povas same bone kompreni, ke la reĝidino trompas, aŭ ke ŝi estas trompata. Se ĉirkaŭantaj frazoj ne klarigas tiun ĉi, oni do devas ĝin ŝanĝi, ekzemple tiel: *ĝi estas trompi la landon kaj kune la reĝidinon*, aŭ *ĝi estas trompi la landon kun helpo de la reĝidino.*
Tial frazoj kiel: *mi vidis vin kun via amiko* estas dube bonaj, ĉar oni demandas sin, *ĉu mi kaj via amiko vidis vin*, aŭ ĉu *mi vidis vin kaj vian amikon kun vi.* Tia konfuzo ekzistas ankaŭ en naciaj lingvoj, kiam oni ne zorgas bone konstrui sian frazon.

3. Se iu verbo havas du komplementojn, oni ne povas meti ambaŭ en la akuzativon, sed oni devas uzi prepozicion antaŭ unu el ili. Oni do ne diras: *mi instruas vin Esperanton*, sed: *mi instruas al vi Esperanton* aŭ *mi instruas vin pri Esperanto.*

53. Forigo de prepozicio. — Oni povas forigi prepozicion post verbo kaj anstataŭigi ĝin per akuzativo sola. Tiamaniere oni ne bezonas demandi, ĉu verbo postulas difinitan prepozicion (130) :

Obei al la patro aŭ *obei la patron.* (Z.)
Enui je la patrujo aŭ *enui la patrujon.* (Z.)

Rim. 1. Tion oni faras ordinare nur kiam forigo de prepozicio ne enkondukas malklaron en la frazon (t. e. *praktike*, kiam oni ne trovas jam alian akuzativon en la sama propozicio). Ekz. oni povas diri: *pardoni al la malamiko*, kaj *pardoni la malamikon*, sed oni devas diri ĉiam *pardoni al la malamiko lian kulpon* (Z.).

2. Post substantivo aŭ adjektivo oni ordinare (sed ne por tempo, daŭro, k.c.) ne forigas prepozicion, ĉar akuzativo estas tiam malfacile komprenebla por multaj personoj. (225. Rim.) Ekz.: *opinioj malaj unu al la aliaj*, ne *malaj unu la alian.* Cetere por substantivoj-participoj D-ro Z. skribis: *Defendinto la patron* mi ne konsilas uzi sed mi preferas *defendinto de la patro* (laŭ privata letero.)

54. **Almovo.** — Kiam substantivo montras aferon al kiu estas movo fizika aŭ eĉ morala, tiam oni aldonas al ĝi finaĵon *n*, eĉ se ĝi dependas de prepozicio (135, 136) :

La birdo flugis en la ĝardenon (Z.) ; ĝi estis ekster la ĝardeno kaj enflugis ĝin. Frazo *la birdo en la ĝardeno* signifus, ke la birdo estis jam en la ĝardeno antaŭ ĝia ekflugo.
Tio ĉi povas tre influi sur la sukceson de nia afero.
Sur la danan tronon mi havas rajtojn. (Haml. V. 2.)

55. **Tempo, daŭro, prezo, mezuro, pezo, aĝo, k. t. p.** — Oni tre ofte forigas prepozicion kaj uzas akuzativon solan antaŭ substantivo montranta tempon, daŭron, k. t. p. (93, 139.)

Georgo Vaŝington estis naskita la dudek-duan de februaro. (Z.)
Mi saltadis la tutan tagon de loko al loko. (Z.)
Ĉi tiu bastono estas unu metron alta.
Ĉi tiu pano pezas du kilogramojn.

II. Rilatoj kun aliaj substantivoj.

56. **Apudesto** ekzistas, kiam du (aŭ pli da) substantivoj difinas unu la alian sen pero de la prepozicio. (20)

57. Kiam la unua substantivo estas en nominativo, la dua ankaŭ devas esti en nominativo. (53. Rim. 2) :

Mi iras al mia amiko, la kuracisto.
La suno, reĝo de l' ĉielo, aperis subite.

58. Kiam la unua substantivo estas en akuzativo, la dua ne estas ĉiam en akuzativo. Zamenhof skribas :

Vi serĉas la princon Hamleton. (Haml. II. 2.)
La diablo lin prenu, la sentaŭgulon. (Haml. V. 1.)

Sed oni trovas malan uzon ĉe bonaj aŭtoroj :

Homo povas kompari la lingvon Esperanto.
La loĝantaro dividiĝas en kvar lingvajn elementojn : rusoj, poloj, germanoj, hebreoj, ĉiuj reciproke sin rigardantaj kiel malamikoj.

Tie ĉi oni povas subkompreni : la lingvon nomatan Esperanto, k. t. p.

59. Kiam oni alparolas iun, la dua substantivo restas ĉiam en formo *o, oj,* ĉar ĝi estas tie vera vokativo :

Venu, ni atendas vin, Savonto de la mondo. (Z.)

60. Prepozicion oni ne uzas inter du substantivoj, kiam oni povas meti pense inter ilin la vorton *nomata :*

Urbo Parizo ; monato septembro.

61. **Komplementoj de substantivo.** Substantivo estas komplemento de alia substantivo, kiam ĝi difinas ĝin per prepozicio.

62. Post vorto esprimanta mezuron, kvanton, pezon, nombron, k. c., unuvorte montranta, ke oni parolas pri *ia kvanto da io,* oni ĉiam uzas prepozicion *da* (kun nominativo). (222) :

Glaso da vino estas glaso plena je vino. (Z.)
Sur la arbo sin trovis multo da birdoj. (Z.)
Alportu al mi metron da nigra drapo. (Z.)
Sur la bordo de la maro staris amaso da homoj. (Z.)
La peco da ŝtof' antaŭ kiu tremadis la tero. (Haml. V. 1.)
La mallaŭdo de tia persono devas esti por vi pli grava ol la aplaŭdado de tuta teatro da aliaj personoj. (Haml. III. 2.)

Rim. Se oni uzus *de,* tio signifus ion uzatan por io, aŭ difinatan de io, sed ne montrus mezuron: *glaso de vino estas glaso, en kiu antaŭe sin trovis vino,* aŭ *kiun oni uzas por vino; metro de drapo* signifus *metron, kiu kušis sur drapo,* aŭ *kiu estas uzata por drapo* (Z.).

63. Posedo, dependo, deveno estas montrataj de prepozicio *de.* (151) :

La libro de Petro estas tiu, kiu apartenas al Petro, kiun li tenas nun, aŭ kiun li verkis.
La koloroj de tiu floro estas brilaj.
Profesoro, studento de medicino, leĝoscienco, k. c.

Rim. En kelkaj okazoj *deveno* povas esti komprenata kiel *eltiro.* Tiam oni povas uzi *el* anstataŭ *de.* Ekz.: *Donu al mi floron el* (aŭ *de*) *via ĝardeno. — Tio ĉi estas rakonto el Biblio* (*de* povus kredigi, ke ĝi estas rakonto inda esti en Biblio). Cetere por tiuj demandoj vidu ĉapitron dediĉitan al Prepozicioj, al cirkonstancaj komplementoj de verbo, kaj la *Vortfaradon.*

64 Antaŭ landnomo oni uzas diversajn prepoziciojn laŭ jenaj ekzemploj :

La loĝantoj en Parizo (aŭ : *de Parizo,* aŭ : *la parizanoj*) *estas ofte gajaj.*
La batalo apud Farsalo ŝanĝis multajn aferojn en Romo.

La kuriero estis atakita sur la vojo al Londono.
Mi ricevis leteron el Parizo.
Li venigis al si el Berlino multajn librojn.
Li venigis al si el Parizo specimenojn de ŝtofoj per sia kutima liveranto.

65. Oni uzas ĝenerale prepozicion *el* antaŭ nomo montranta substancon, materialon, el kiu oni faris aŭ tiris ion. Oni povas ankaŭ uzi adjektivon aŭ vorton kunmetitan :

Tablo el marmoro, el ligno, el fero. Konfitaĵo el pomoj ;
aŭ : *marmora, ligna, fera tablo. Poma konfitaĵo ;*
aŭ : *marmortablo, lignotablo, fertablo. Pomkonfitaĵo.* (68.)

66. Tiu permeso uzi adjektivon anstataŭ substantivo kun prepozicio estas oportuna kaj ofte praktikata. Tiel oni diras :

Longhara ĉevalo. Kvinjara infano. Ruĝhaŭta virino. Broŝuro dekses-paĝa. Poemo dekdu-kanta. Strasburga biero. Tridekjara milito, k. c.

67. Kiam substantivo devenas de verbo (aŭ adjektivo) uzanta specialan prepozicion, oni ofte uzas la saman prepozicion post la substantivo :

Li estas fiera pri (aŭ pro) sia riĉo... Fiero pro riĉo.
Timi al morto... Timo al morto... k. t. p.

Rim. Tiu regulo ne estas absoluta, sed ĝi povas alporti grandan helpon por elekti konvenan prepozicion. Tia elekto estas ja tre grava por komplemento de substantivo, ĉar prepozicio ofte servas tie ĉi por distingi terminojn similajn al subjekto kaj komplemento de verbo. Tiel oni atentos la diferencon inter : *amo* **al** *Dio, amo* **de** *Dio. Amo* **al** *Dio* estas tio, kion ni sentas, kiam ni amas Dion. *Amo* **de** *Dio* signifas, ke Dio amas la homon. Simile : *konfido* **de** *patro* **al** *filo, konfido* **de** *filo* **al** *patro; memoro* **pri** (aŭ **al**) **mia** *patro, memoro* **de** *mia patro; mordo* **de** *serpento* **al** *brako;* k. t. p. *Al* oni metas ofte antaŭ tiu substantivo, kiu estus komplemento, se la frazo estus verba; *de* oni metas antaŭ tiu, kiu estus subjekto. Kompreneble tio ĉi rilatas verbojn aktivajn, ne pasivajn.

68. Ofte oni kuligas du aŭ eĉ pli da radikoj por esprimi per unu kunmetita vorto kutiman aŭ specialan rilaton inter du aferoj :

La pordo de la ĝardeno estas rompita ; aŭ : *la ĝardenpordo...*
La kovrilo de la lito estas makulita ; aŭ : *la litkovrilo.*

69. Kiam oni faras kunmetitan vorton, oni metas ĉiam la difinantan radikon antaŭ la difinatan. (Praktike : oni metas en la komencon la vorton, kiu estus regata de prepozicio, se oni ne uzus kunmetitan vorton.) :

La ĝardenpordo, aŭ : *la pordo de l' ĝardeno ; ĝardeno* estos la unua.

Rim. Por kunmeti vorton el prepozicio aŭ adverbo, oni metas la prepozicion aŭ la adverbon en la komencon. Ekz. : *eniri, malsupreniri...* (vidu *Prepozicio.*)

70. Vortoj kunmetitaj estas kreataj per simpla kunligado de vortoj. Oni prenas ordinare la purajn radikojn, sed se la bonsoneco aŭ la klaro postulas, oni povas ankaŭ preni la tutan vorton, t. e. la radikon kun ĝia gramatika finaĵo. De tio sekvas :

1. Kiam oni ne ricevas neelparoleblan vorton per kunmeto de simplaj radikoj, pli bone estas forigi ĉiun aldonan vokalon inter ambaŭ radikoj, ĉar tiamaniere la kunmetita vorto estas malpli longa : *litkovrilo, ĝardenpordo.*

2. Kiam la renkonto de konsonantoj donas neelparoleblan aŭ tre malfacile elparoleblan vorton, oni intermetas plej ofte vokalon o : *akvofalo.*

3. Se unu el la kunmetataj radikoj estas uzata en senco nepre adjektiva aŭ adverba, tiam oni intermetas vokalon *a* aŭ *e* : ***unutaga*** = kiu daŭras unu tagon ; *unuataga* = kiu estas en la unua tago (Z.) — Simile : *Pro kio vi silentas, vi, unuenaskito mia? — Krom la supreciĵitaj paroladoj, li...*

Rim. 1. Se la kunmetita vorto estas tro longa, oni uzu apartajn vortojn : *poŝtkartkolektanto* = kolektanto de poŝtkartoj.

2. Ofte aŭtoroj intermetas vokalon *a* aŭ *e* sen iu neceso kaj ricevas vorton tro longan aŭ konfuzan. Oni uzu do en tiaj okazoj apartajn vortojn aŭ intermetu neniun vokalon : anstataŭ *Italalando* oni diru : *Itallando* aŭ *Lando Itala;* anst. *kuneligi* oni diru : *kunligi* aŭ *ligi kune* (oni kredus unuavide : *kun-eligi*) ; anst. *samamaniere* oni preferu : *sammaniere.*

3. Se en kunmeto de radikoj renkontiĝas duoblaj konsonantoj estas kelkafoje pli klare enmeti streketon : anst. *gratulletero — gratul-letero.*

4. Ofte, kiam la interrilato inter la kunmetataj radikoj ne estas tre intima aŭ por ricevi pli klaran kunmetitan vorton, oni kunligas la radikojn per kuniga streketo : *morte-vundito, pale-blanka, spirite-erarantoj.*

71. Kelkaj aŭtoroj, kiam ili kunigas vortojn kompletajn (t. e. kun gramatika finaĵo), akordigas nombre kaj kaze ambaŭ partojn. En tia okazo estas konsilinde uzi streketon por disigi ambaŭ partojn kaj igi la vorton komprenebla :

La reĝo-venĝonto atakos la landon.
Mi turnas min al miaj amikoj-esperantistoj.

72. En kelkaj vortoj, sed precipe en kunmetitaj, renkontiĝas du konsonantoj, malfacile elparolataj unu post la alia. Ofte tiam la unua emas prononciĝi kiel la dua t. e. mole aŭ malmole :

Set precipe anst. *sed precipe.*
egzemplo anst. *ekzemplo.*
bloſpaſilo anst. *blovpaſilo.*

Tio okazas, kiam laringa kaj buŝa konsonantoj renkontiĝas laŭ jena tabelo aŭ reciproke :

Laringaj	Buŝaj
b	*p*
d	*t*
g	*k*
ĝ	*ĉ*
j	*ŝ*
v	*ſ*
z	*s*

Tio ĉi estas evitebla. Per zorga prononcado kaj iom da peno oni atingas la ĝustan elparolon. Precipe tiuj, kiuj aktoras aŭ deklamas devas distingiĝi per zorga kaj ĝusta elparolo.

Oni cetere povas ofte eviti la kuniĝon de konsonantoj en kunmetitaj vortoj per intermeto de vokalo. (70. Rim.) :

anst. *ovforma — ovoforma.*
anst. *blovpaſilo — blovopaſilo.*

V

ADJEKTIVO

73. **Adjektivo** estas vorto montranta econ, staton aŭ agon (1) de substantivo.

Formoj : nominativo: *a, aj;* akuzativo: *an, ajn.*

I. Apudmetita adjektivo.

74. Apudmetita adjektivo (21, Rim. 1) akordiĝas nombre kaj kaze kun sia substantivo :

Mia patro kaj miaj ſratoj havas grandan barbon kaj nigrajn okulojn.

Esploru : *Mia patro. Patro* estas en nominativo singulara ; ankaŭ *mia.*
Miaj ſratoj. Fratoj estas en nominativo plurala ; ankaŭ *miaj.*
Grandan barbon. Barbon estas en akuzativo singulara ; ankaŭ *grandan.*
Nigrajn okulojn. Okulojn estas en akuzativo plurala ; ankaŭ *nigrajn.*

75. Kiam apudmetita adjektivo rilatas al kelkaj substantivoj en singularo, tiam oni metas la adjektivon en pluralon. (100) :

Mi havas akvon kaj panon freŝajn.

Rim. *Mi havas akvon kaj panon freŝan* povus signifi, ke nur pano estas freŝa. Simile *mi havas freŝan akvon kaj panon* povus signifi, ke nur akvo estas freŝa.

76. Kiam substantivo en pluralo estas uzata en opa senco kaj akompanata de kelkaj adjektivoj, kiuj rilatas ĉiu al unu el la

(1) Participoj-adjektivoj estas veraj adjektivoj, kies regulojn ili sekvas.

objektoj montrataj de la substantivo, tiam la adjektivoj restas en singularo :

Oni vidis en Krimeo la militistarojn anglan, francan, turkan, sardan kaj rusan.
La lingvoj angla, franca, germana kaj hispana estas multe parolataj.

77. **Lokigo de adjektivo.** — Apudmetita adjektivo estas uzata laŭvole antaŭ aŭ post ĝia substantivo en loko, kie ĝi plej bone altiras atenton.

78. Substantive oni ordinare ne uzas adjektivon. Tamen tion oni faras iafoje, kiam oni povas subkompreni al la adjektivo konkretan substantivon :

« *Tre volonte, mia bona* », *diris la bela knabino,* (Z.)
subkomprenu : *virino.*

Vidu ekzemplojn en paragrafoj 32 kaj 40.

Rim. Oni diras: *La Bono, La Belo, La Vero,* k. t. p. per substantivo, kaj ne *La Bona, La Bela, La Vera,* ĉar tie ĉi oni ne povas subkompreni konkretan substantivon.

II. Predikateca adjektivo.

79. Adjektivo uzata predikate (21. Rim. 1) akordiĝas nombre kun sia substantivo aŭ pronomo, *sed ne kaze ;* ĝi do estas neniam en akuzativo.

80. Adjektivo estas uzata predikate, kiam ĝi estas komplemento de verbo, kaj ne rekte de substantivo. Tiam ĝi montras ordinare : *a*) staton, en kiun alvenas afero ; *b*) kiel afero estas nomata, trovata, konsiderata, dirata, rigardata, k. t. p. (1)

Ambaŭ unuaj okazoj renkontiĝas kun verboj : *iĝi* (aŭ finantaj per *iĝi) ; igi* (aŭ finantaj per *igi) ;* kaj nomi, trovi, konsideri, rigardi kiel, konsideri kiel, diri, opinii, pensi, fondi, elekti, titoli, sin montri, lasi, k. c. Post tiaj verboj oni ja povas preskaŭ ĉiam meti pense *esti* inter la verbon kaj la adjektivon :

Papero estas blanka.
Birdoj estas agrablaj.
La riĉiĝo igis lin (estantan) senkompata.

(1) Predikateca adjektivo estas ĉiam komplemento de verbo *esti*, esprimata aŭ subkomprenata.

Ili trovis la manĝojn (estantajn) bonaj.
La kutimo faris lin indiferenta por tio ĉi. (Haml. V. 1.)
Kion vi intencas nun fari por vin montri inda filo. (Haml. IV. 7.)
Ili nomis lin reĝo.

81. Kiam predikateca adjektivo rilatas ne substantivon aŭ pronomon, sed infinitivon aŭ enhavon de tuta frazo, tiam ĝi prenas formon neŭtralan, t. e. ĝi fariĝas adverbo. (184, Rim. 1. kaj 2.) :

Resti kun leono estas danĝere. (Z.)
Estus bone, se li venus.
Estas dirite, ke...

Rim. Pli malofte oni trovas adjektivon en *a* : *ĉu ne estas ebla, ke ni kompreniĝadu per ia alia lingvo?* (Haml. V. 2.) — *Plej bona estos, se vi ĝin forgesos.* (Haml. I. 5.) Tia formo nun ne plu estas uzata.

82. Kiam adjektivo rilatas opan nomon, ĝi povas indiferente esti en singularo aŭ en pluralo. En praktiko tiu regulo estas malofte uzata, kaj oni preferas singularon :

Kiam oni estas riĉa (aŭ *riĉaj), oni havas multajn amikojn.* (Z.)

III. Gradoj de komparo.

Formoj : *Malegalaj komparativoj* estas: pli ... ol; malpli ... ol; ju pli ... des pli; ju malpli ... des pli; ju malpli ... des malpli; malsama ol; malsame ... ol.
Egalaj komparativoj : tiel ... kiel; tia ... kia; sama ... kia, same ... kiel.
Superlativoj absolutaj : tre; plej; kiel eble plej.
Superlativoj rilataj : plej ... el; malplej ... el. *Inter du aferoj,* ankaŭ : la pli ... ; la malpli ...

83. Dua termino de komparo estas en nominativo aŭ akuzativo laŭ tio ĉu ĝi estas subjekto aŭ komplemento de alpensota frazo :

Mi amas mian fraton pli ol mia fratino (... amas lin).
Mi amas mian fraton pli ol (mi amas) *mian fratinon.*
Li amis lin tiel varme, kiel mia frato (... amis lin).
Li amis lin tiel varme, kiel (li amis) *mian fraton.*

IV. Participoj-adjektivoj.

84. Participoj en *a* sekvas ĉiujn regulojn de aliaj adjektivoj. (184, Rim. 2.) :

Ili estas alvenintaj.
Mi vidis lin mortigantan homon.
La batoj igis lin ploranta.

85. Oni ne devas konfuzi participon adjektivan kun simpla adjektivo de sama radiko. La unua montras agon; la dua montras econ :

El la kaldrono, en kiu sin trovas bolanta akvo, eliras vaporo (Z.) ; (ago: *anta.)*
La signoj de mensogaj ŝiaj larmoj (Haml. I. 2.) ; eco : *a* simple.
La malvarmo estas tranĉa (Haml. I. 1.) ; eco.
Lernu Esperanton, helpan lingvon internacian ; eco.

V. Komplementoj de adjektivoj.

86. Adjektivo povas difini alian vorton per prepozicio (kun nominativo).

Participo sola povas havi rektan komplementon (en akuzativo). (53, Rim. 1.)

87. Prepozicioj uzataj post adjektivo estas : *a*) plej ofte *je ; b*) aŭ alia montrata de ideo esprimota aŭ de verbo, de kiu devenas la adjektivo. (67, 186) :

Plena je vino (aŭ *de*). *Longa je dek metroj.*
Simila al patro (simili al ...). *Agrabla por vidi.*

Por nombraj posedaj k c. adjektivoj, vidu la sekvantajn partojn.

VI

NUMERALOJ

88. Fundamentaj nombraj nomoj neniam ŝanĝiĝas :

Mi havas unu birdon, du ĉevalojn.

Rim. Jen estas tabelo de la fundamentaj nombroj:

0	nulo		k. t. p.	1010	mil-dek
1	unu	40	kvardek	1015	mil-dek-kvin
2	du	50	kvindek	1020	mil-dudek
3	tri	60	sesdek	1022	mil-dudek-du
4	kvar	70	sepdek	1100	mil-cent
5	kvin	80	okdek	1120	mil-cent-dudek
6	ses	90	naŭdek	1125	mil-cent-dudek-kvin
7	sep	100	cent	1200	mil-ducent
8	ok	101	cent-unu	2000	dumil
9	naŭ	102	cent-du	3000	trimil
10	dek	110	cent-dek	4000	kvarmil
11	dek-unu	111	cent-dek-unu	5000	kvinmil
12	dek-du	120	cent-dudek	6000	sesmil
13	dek-tri	121	cent-dudek-unu	7000	sepmil
14	dek-kvar	200	ducent	8000	okmil
15	dek-kvin	201	ducent-unu	9000	naŭmil
16	dek-ses	202	ducent-du	10000	dekmil
17	dek-sep	220	ducent-dudek	11000	dekunu-mil
18	dek-ok	221	ducent-dudek-unu	12000	dekdu-mil
19	dek-naŭ	300	tricent	13000	dektri-mil
20	dudek	400	kvarcent	20000	dudek-mil
21	dudek-unu	500	kvincent	100000	cent-mil
22	dudek-du	600	sescent	200.000	ducent-mil
23	dudek-tri	700	sepcent	1.000.000	unu miliono
	k. t. p.	800	okcent	2.000.000	du milionoj
30	tridek	900	naŭcent	1.000.000.000	unu miliardo
31	tridek-unu	1000	mil	1.000.000.000.000	unu biliono
32	tridek-du	1001	mil-unu		

Kiel oni vidas el la supraj ekzemploj, la fundamentaj (kardinalaj) nombroj entenas ĉiujn nombrojn de 1 ĝis 999.999.

Miliono, miliardo, biliono, k. t. p., estas ordinaraj substantivoj, kies proprajn regulojn ili sekvas, ricevante la finaĵojn de l' pluralo aŭ de l' akuzativo. Simile ankaŭ *nulo.*

89. *Unu* povas esti uzata pronome (plej ofte en rilato kun *alia).* Tiam ĝi povas ricevi la finaĵojn de l'akuzativo kaj de la pluralo :

Unuj kaj aliaj insultadis, ripročadis sin reciproke.

90. De fundamentaj nomoj devenas adjektivoj, substantivoj, adverboj, per aldono de *a, o, e.* Kiam la nombro estas kunmetita, oni aldonas tiun finaĵon nur al la lasta parto :

Unuo, unua, unue. Cent-tridek-dua.

91. Metante antaŭ *a*, *o*, *e*, specialajn sufiksojn, oni ricevas : *a*) opajn nombrojn *(op)* ; *b*) frakciajn *(on)* ; *c*) multoblajn *(obl)* — Se la nombro estas kunmetita, oni agas kiel per aldono de *a*, *o*, *e* :

Ili kvarope sin ĵetis sur min.
6 estas la tri-kvaronoj de 8.
Sepoble sep faras (aŭ estas) kvardek-naŭ.

92. Adjektivaj nombroj, kiujn oni ricevas de fundamentaj per aldono de *a*, estas uzataj por kalkuli horon, tagojn, jarojn, vicon, paĝon, k. t. p.

Plej ofte oni ne esprimas la vorton *horo, tago*, k. c. kaj uzas la adjektivan nombron solan. Kompreneble, se klaro postulas la substantivon, oni ĝin uzas. (33) :

Kioma horo estas ? La tria.
Kiun daton ni havas hodiaŭ ? Hodiaŭ estas la dudek-sepa de marto.
Henriko IV-a estis mortigita de Ravaillac.
Vidu la 32-an paĝon.

93. Nombro hora, taga, peza, kosta, vica, daŭra, mezura, k. s. estas ordinare akompanata de prepozicio konvena (je, en, sur, po...) kun nominativo, aŭ, pli ofte, de akuzativo sen prepozicio. (55, 121) :

Georgo Vaŝington estis naskita la dudek-duan de februaro (Z.), aŭ : *en la dudek-dua de februaro.*
Kiom kostas tio ĉi ? Naŭ frankojn.

Rim. 1. Kompreneble, kiam la nombro estas subjekto aŭ difinas apudmetite substantivon, kiu mem estas subjekto, tiam ĝi restas en nominativo: *Hodiaŭ estas la dudek-sepa de marto.* (Z.) — *Naŭ frankoj estas la prezo de tiu ĉi ŝtofo.*

2. Oni trovas iafoje por simpla dato nominativon solan: *Parizo, la 15-a de februaro 1930*

94. Por demandi la horon oni uzas la esprimon : *Kioma horo estas ?* La horon oni esprimas per orda numeralo kaj la minutojn per fundamenta (kardinala) numeralo. Ekzistas pluraj manieroj :

A

2 h. ..... la dua.
2 h. 10 m. ..... dek minutoj post la dua.
2 h. 15 m. ..... (unu) kvarono post la dua.
2 h. 30 m. ..... duono post la dua.
2 h. 45 m. ..... tri kvaronoj post la dua.

B

(plej ofte uzata)

2 h. 05 m. ..... la dua kaj kvin minutoj.
2 h. 10 m. ..... la dua kaj dek minutoj.
2 h. 15 m. ..... la dua kaj kvarono.
2 h. 30 m. ..... la dua kaj duono.
2 h. 45 m. ..... la dua kaj tri kvaronoj.

C

2 h. 30 m. ..... tridek minutoj (aŭ duono) antaŭ la tria.
2 h. 45 m. ..... kvarono antaŭ la tria.
2 h. 55 m. ..... kvin minutoj antaŭ la tria.

VII

PERSONAJ PRONOMOJ. POSESIVOJ.

I. Pronomoj.

95. **Pronomoj** estas vortetoj, kiuj anstataŭas substantivojn.

Formoj: *Singulare:* mi (ci) vi li (vira genro) ŝi (ina genro) ĝi (**ne**difinita genro)

Pluralo: ni, vi, ili.

Ambaŭ nombroj: si (refleksiva pronomo), oni (nedifina pronomo).

Gramatiko: Povas preni *n* akuzativan, ne *j* pluralan. — *Oni* estas neŝanĝebla vorto.

96. Persona pronomo havas la saman genron kaj la saman nombron, kian havas la substantivo, kiun ĝi anstataŭas:

Mia patro skribis, ke li alvenos morgaŭ.

Mia patrino skribis, ke ŝi alvenos morgaŭ.

Nia hundo revenis: ĝi forkuris hieraŭ.

Mi diris al mia frato: « vi estas bona ». Li respondis...

Mi diris al miaj fratoj: « vi estas bonaj ». Ili respondis...

Rim. 1. Pronomo *ĝi* estas uzata por ĉiuj objektoj, eĉ por personoj, kies genro ne estas konata aŭ indiferenta. Pronomo *li* estas uzata por viroj aŭ viraj bestoj, — pronomo *ŝi* por virinoj aŭ virinaj bestoj. Pri *ĝi* jen tio, kion diras Zamenhof en *Lingvaj Respondoj:* « Kelkaj samideanoj ne aprobas la anglan kutimon starigi infanojn sur unu ŝtupon kun bestoj kaj objektoj, kaj, parolante pri infano, uzas *li* anstataŭ *ĝi*. Kontraŭ la uzado de *li* en tiaj okazoj oni nenion povus havi; sed la kaŭzo, kial ni (kaj ankaŭ la lingvo angla) uzas en tiaj okazoj *ĝi* estas ne tia, kiel ili pensas. Nek la lingvo angla, nek Esperanto havis ian intencon malaltigi la indon de infanoj (ambaŭ lingvoj estas ja tiel ĝentilaj, ke ili diras *vi* ne sole al infanoj, sed eĉ al bestoj kaj objektoj). La kaŭzo estas tute natura sekvo de la konstruo de la ambaŭ diritaj lingvoj. En ĉiu lingvo ĉiu vorto havas (tute ne logike) difinitan sekson, kaj tial, uzante por ĝi pronomon, ni prenas tiun, kiu respondas al la gramatika sekso de la vorto (tial la franco diras pri infano *il*, la germano diras *es*), sed en la lingvoj angla kaj Esperanto la vortoj havas nur sekson *naturan*, kaj tial, parolante pri infanoj, bestoj kaj objektoj, kies naturan sekson ni ne scias, ni *vol' nevole* (sen ia ofenda intenco) uzas pronomon mezan inter *li* kaj *ŝi* — la vorton *ĝi*. Tiel same ni parolas ankaŭ pri *persono*. Cetere parolante pri infano, pri kiu ni *scias*, ke ĝi *ne* estas knabino (aŭ almenaŭ *ne* scias, ke ĝi estas *knabino*), ni povas uzi la vorton *li* »

2. La vorton *ĝi* oni ofte povas uzi anstataŭ *tio*, kies signifo kaj senco estas tre simila: *tio estas vi* aŭ *ĝi estas vi; mi faros ĝin* aŭ *mi faros tion.*

97. Oni uzas en Esperanto ĝentilan formon, sed oni diras *vi* al ĉiu aĵn persono aŭ objekto. *Ci* estas uzata ne ofte.

Rim. Pri ortografio de *vi*, Zamenhof diras en *Lingvaj Respondoj:* « Ordinare mi skribas *vi, kiam* mi parolas al unu persono familiare, kaj *Vi* kiam mi parolas al multaj personoj aŭ al unu persono kun respekto. Tiu diferenco tamen estas nebezona, kaj nur mia persona kutimo, kiu havas nenion komunan kun la gramatiko de nia lingvo. La ĉiama skribado de *vi* per malgranda litero estas ne sole tute regula, sed mi mem ankaŭ nun provos iom post iom forlasi mian ĝisnunan manieron de skribado. Ankaŭ *Estimata sinjoro, Kara amiko* estas pli regula ol *Estimata Sinjoro, Kara Amiko*, k. t. p. Sed en tiuj ĉi okazoj oni ordinare simple pro ĝentileco skribas grandan literon, kie pli regula estus litero malgranda. »

98. *Si* estas uzata por montri, ke ago reiras al subjekto de la verbo. Oni ordinare uzas ĝin nur por la tria persono kaj por ĉiuj genroj aŭ nombroj:

Mi lavas min, vi lavas vin, kaj li lavas sin.

Ŝi diris al si mem: kuraĝu!

99. *Oni* montras ĝeneralan subjekton (iu... ĉiu...); ĝi estas nur subjekto, ne komplemento, sekve ĝi estas ne ŝanĝebla vorto, ĉar ĝia komplementa natura formo estas *si:*

Oni atakis lin dum la nokto, sed li ne povis vidi la personon.

Oni ofte vundas sin per pulvaj armiloj, kiam oni ne sufiĉe atentas.

Rim. Iafoje oni uzas pasivan sensubjektan verbon anstataŭ *oni*. *Estas dirite ofte, ke hundo bojanta ne mordas* (aŭ oni diras ofte...). — *Estus dezirate, ke tiaj rondetoj estu kreataj en ĉiuj urboj* (Z.).

II. Posedaj adjektivoj (posesivoj).

Formo: Ili devenas de personaj pronomoj per aldono de *a: mia, cia, via, lia, ŝia, ĝia, nia, via, ilia, sia; onia* neuzata, anstataŭ ĝi oni uzas *sia*.

Gramatiko: Ili sekvas regulon de aliaj adjektivoj por akordo nombra kaj kaza, kaj regulojn de personaj pronomoj por akordo genra.

100. Kiam posedo adjektivo estas akompanata de kelkaj substantivoj apartenantaj al sama posedanto, oni povas ĝin uzi laŭvole nur unufoje antaŭ la unua substantivo, aŭ kontraŭe ĝin ripeti antaŭ ĉiu substantivo. En ambaŭ okazoj ĝi povas resti en singularo:

La pli juna filino estis la plena portreto de sia patro laŭ sia boneco kaj honesteco. (Z.)

Mia frato kaj fratino estas la bogefratoj de mia edzino. (Z.)

101. Poseda adjektivo uzata predikate (18, 21, Rim. 1, 79) restas ĉiam en nominativo :

Tiu ĉi bieno estas mia.
La multaj bovoj, kiujn vi vidas, tie, estas liaj.
Per sia afablo li igis nin liaj.

102. *Sia* estas ordinare uzata nur por tria persono de l' verbo (98) :

Mi lavas min en mia ĉambro kaj ŝi lavas sin en sia ĉambro.

Rim. Kelkaj aŭtoroj uzas *sia* por tri personoj de l' verbo, dirante, ke ĝi resendas agon al subjekto tiel bone por ambaŭ unuaj personoj, kiel por la tria. Tia uzo povas esti malfacile komprenebla por kelkaj neslavaj esperantistoj, kaj aliparte ne estas tre necesa pro eblo uzi pli klarajn formojn *mia, via, nia*. Zamenhof ordinare skribas laŭ la supra regulo. Tamen oni trovas en *Hamleto* (V. 2) : *Se ni povus porti ĉe sia flanko pafilegon.*

103. *Sia* montras rilaton al la subjekto de tiu verbo, kies rekta dependaĵo ĝi estas ; ĝi estas uzata por ĉiuj genroj :

La infano serĉis sian pupon (Z.), — pupon de ĝi, infano.

Ŝi rakontis al li sian tutan aventuron (Z.), — aventuron de ŝi.

Ili promenis kun sia patrino, — patrino de ili.

La homoj flatas siajn regantojn.

Rim. Car *sia* montras ion posedatan de subjekto de verbo, ĝi sekve ne estas uzata antaŭ subjekto mem en ordinaraj okazoj. Tiel ni diras : *Apenaŭ ŝia patrino ŝin rimarkis* (Z.). Ne *sia patrino,* ĉar *patrino* estas subjekto.

104. *Lia, sia, ĝia, ilia* estas uzata, kiam la afero posedata apartenas al alia persono ol la subjekto de la verbo. Ili estas ankaŭ uzataj anstataŭ *sia* por montri ion apartenantan al la subjekto de la verbo, eble pro forgeso de la regulo, eble por pligranda klaro :

Miaj fratoj havis hodiaŭ gastojn ; post la vespermanĝo niaj fratoj eliris kun la gastoj el sia domo kaj akompanis ilin ĝis ilia domo. (Z.) Kio estas subjekto ? *Frato.* Sekve : *sia* — domo de miaj fratoj; *ilia* — domo de la gastoj.

Poŝtaj markoj estas akceptataj nur por 3/4 de ilia kosto (Z.), — anstataŭ *sia.*

Sed homa lingvo kun ĝia, kiel ŝajnis al mi, senfina amaso da gramatikaj formoj... (Letero pri la deveno de Esperanto, en *Lingvaj Respondoj*).

III. Poseda genitivo.

Formo : ies, ties, kies, ĉies, nenies.
Gramatiko: Vortoj ne ŝanĝeblaj.

105. Nepersonaj pronomoj *iu, tiu, kiu, ĉiu, neniu,* liveras serion da posesivoj per ŝanĝo de *u* en *es.* Tio ĉi estas vera poseda genitivo. Oni uzas ĝin laŭ jenaj ekzemploj ;

Kies estas tiu ĉapelo ? (Al kiu ĝi apartenas ?) *Ties* (al tiu persono *aŭ* al tiuj personoj).

Ĉu ies estas tiu ombrelo ? (ĉu al iu el ĉeestantaj personoj ?)

La domo, kies tegmenton vi vidas, apartenas al mia patro.

Rim. 1. Post *kies* oni ordinare ne uzas artikolon *la* antaŭ nomo de afero posedata : *La domo, kies tegmenton vi vidas,* — ne *la tegmenton.*

2. *es* montras nur posedon. Oni do ne diras: *la afero, kies ni parolas ...* — sed *la afero, pri kiu ni parolas ...*

3. Aldono de *es* al personaj pronomoj (mies, vies, lies ... .) ne estas ordinare farata. Kiam oni demandas : *Kies estas tiu ĉapelo ?* — oni kutime ne respondas : *mies,* sed : *mia.*

VIII

PRONOMOJ-ADJEKTIVOJ KAJ ALIAJ VORTOJ

I. Montraj vortoj. (Demonstrativoj.)

Formo: tiu, tia, tiu ĉi ... jen, mem, ajn.
Gramatiko: *Tiu, tia* ... sekvas regulojn de adjektivoj (nombra, kaza akordo):
Tiu homo; tiuj homoj; mi amas tiujn personojn.
Jen, mem, ajn estas ne deklineblaj vortoj.

106. *Tiu, tiu ĉi* estas uzata iafoje antaŭ posedа adjektivo por insisti pli forte:

Tiu ĉi mia malnova amiko.
Tiuj niaj kuraĝaj soldatoj (pri kiuj ni ĵus parolis).

107. *Tiu,* k. a. oni ripetas iafoje sen neceso, por pli forte montri aferon, pri kiu oni parolas:

Tiun bandon, kiu minacis al via feliĉo, tiun detruis li!

108. Iafoje oni uzas *tio, tio ĉi, ĝi* (por ĉiuj personoj kaj nombroj) en celo ion difini pli forte:

Ĉar tio estis feino. (Z.)
Kiu frapis? Ĝi (tio) estas mi, via patro.
Tio (ĝi) estis iliaj fratoj (aŭ: *ili estis iliaj fratoj*).

109. *Jen, jen estas, venas,* k. t. p. oni uzas ankaŭ ofte en la sama maniero:

Jen estas la ĉapelo de la patro. (Z.)
Jen, ŝajnas, ili! (Haml. I, 1.)
Haltu! Jen ĝi mem aperas! (Haml. I. 1.)

Rim. *ĝi, tio ĉi,* k. c. oni ofte forigas. Tiam oni simple metas en la unuan vicon (aŭ en la plej videblan lokon) la vorton, al kiu oni volas tiri la atenton:
Mi iros morgaŭ Parizon. — Morgaŭ mi iros Parizon. — Parizon mi iros morgaŭ (anst Tio estas mi, kiu iros...).
Cu vi estas diligentaj? Tio (pli bone *tiaj*) *ni estas.*
Cu min vi serĉas? (anst. ĉu ĝi estas mi ... *aŭ* ĉu mi estas tiu, kiun ...).

110. *Mem* montras insiste aferon, precipe personon. Oni ne devas ĝin konfuzi kun *sama,* (kiu montras nur econ de identeco, plenan similecon) aŭ kun *eĉ* (kiu estas apartiga adverbo). Oni ĝin uzas apud la vorto, kiun ĝi difinas:

Li mem ekkaptis la glavon kaj la glavingon per sama mano.
Li prenis la glavon mem, ne la glavingon.
Li forgesis eĉ sian nomon.
Tio estus memmortigo (aŭ *sinmortigo*).

111. *Ajn* insistas pri la nedifiniteco. Oni ĝin uzas aldone al pronomoj, adverboj kaj konjunkcioj:

Iu ajn povos veni kaj forŝteli la monon, se vi lasos pordon neŝlosita.
Ĉiu ajn ne estas kapabla fari ĉion ajn.
Kiam ajn vi venos, mi akceptos vin.
Kiel ajn ruza li estas, li ne sukcesos.
La senpaga eniro en la muzeon estas por ĉiu ajn.
Kio ajn okazos, mi restos honesta.

II. Rilataj vortoj. (Relativoj.)

112. Rilata pronomo-adjektivo *(kiu, kia)* akordiĝas nombre kun sia rilatato. Plie oni metas ĝin en kazon postulatan de la sekvanta verbo. Kiel montraj kaj aliaj pronomoj-adjektivoj ili estas uzataj egale por personoj kaj objektoj:

Mia patro, kiun mi amas...
Iliaj fratoj, kiujn vi konas...
Niaj vestoj, kiuj malpuriĝis...
Mi ne scias, kion vi diras.

113. Kiam la rilatato estas tuta frazero, oni uzas ofte *kio:*

Jen dek frankoj, kio estas sumo ŝuldata al vi.

Rim. ... Oni povas ankaŭ diri *kiuj estas sumo* ... aŭ plej simple *la sumo ŝuldata al vi.*

114. Kiam la rilatato kaj la rilatanto ne estas en la sama nombro aŭ kazo, tiam oni uzas plej ofte *tiu, tio, tia,* antaŭ *kiu, kio, kia.* La demonstrativo tiam akordiĝas kun la unua propozicio, kaj la relativo kun la dua :

Ni ne scias tion, kio ni fariĝas (Z.)
Malsano estas tio, kion mi plej timas.
Nomu al mi tiun, kiu venis hieraŭ.

Rim. 1. *Malsano estas, kion mi plej timas* estas ankaŭ iafoje dirite; tiu formo estas eble iom malpli klara, sed pli rapida.

2. Oni plej ofte atentas uzi en similaj interrilatoj vortojn el sama klaso; t. e. oni uzas du pronomojn, aŭ du adverbojn, aŭ du adjektivojn. Ekz.: *Kia* patro, *tia* filo (adj. *a*). — *Kiu* venis, *tiu* estos punata (pronomo *u*). — Via elparolado estas *bona* sed la *mia* ne estas *tia*. — Via ago estas *sama, kia* tiu de via frato. — Vi agis *same, kiel* via frato.

III. Demandaj vortoj.

115. *Kiu, kia, kio, kial, kiel, kiom, kies, kie,* estas ofte uzataj por demandi, ĉu rekte alparolante iun, ĉu nerekte, kiel komplemento de verbo (diri, demandi, dubi, nescii... k. c.) :

Kiu venis? Kien vi iras? Kiom vi aĉetas?
Diru, kien vi iras. Mi demandas vin, kiu venis hieraŭ.

116. Kiam oni demandas rekte aŭ nerekte kaj ne estas en la frazo unu el la demandaj vortoj *kiu, kio,* k. c., tiam oni devas ĉiam uzi la vorton *ĉu :*

Ĉu vi venos morgaŭ?
Diru al mi, ĉu vi venos morgaŭ.
Ĉu vi ne venos morgaŭ?
Diru al mi, ĉu vi ne venos morgaŭ.
Mi dubas, ĉu li povos veni morgaŭ (kredeble li ne venos).
Mi ne scias, ĉu li ne povos veni morgaŭ (eble li povos veni).

Rim. Oni indiferente ŝanĝas lokon de l' pronomo, verbo, neo k. c. En la unua loko estas vorto, al kiu oni volas altiri atenton:
Ĉu venos vi morgaŭ? ĉu vi ne venos morgaŭ? ĉu ne venos vi morgaŭ? ĉu morgaŭ vi ne venos? k. t. p.

IV. Nedifinaj pronomoj.

117. Nedifinaj pronomoj *io, tio, kio, ĉio, nenio,* ne povas esti uzataj en pluralo pro ilia nedifiniteco mem :

Ĉagrenas min io, kion vi ne povas koni.

Rim. Se oni celas pluralon, oni uzas: *kelkaj aferoj, kelkaj aĵoj, iaj aĵoj,* k. t. p.

V. Pronomo aŭ adjektivo ?

118. *Tiu, kiu, ĉiu,* k. c. estas ordinare uzataj egale kiel pronomoj (solaj) aŭ kiel adjektivoj (antaŭ substantivo) :

Tiu, kiu venis, estis alta.
Kiu vidas tiun homon? Li ĉiuokaze (aŭ : ĉiuminute, ĉiumomente) *rakontas plej strangajn aventurojn.*

119. *Tia, kia, ĉia,* k. c. estas nur adjektivoj kaj esprimas ordinare apartan ideon pri eco, speco speciala :

Ĉu estas eble, ke tia homo bankrotis!
Kia viro konsentus tion fari? (Kia speco de...)
Mi ne scias ankoraŭ, ĉu mi povos veni; ĉiaokaze (kia ajn estos la okazo) *mi skribos al vi.*

120. TABELO DE KORELATIVOJ

	—	— nedifina	k demanda aŭ rilata	t montra	ĉ kolektiva	nen negativa
PRONOMO	**u** *persona*	**iu**	**kiu**	**tiu**	**ĉiu**	**neniu**
	a *kvalita*	**ia**	**kia**	**tia**	**ĉia**	**nenia**
	o *nepersona*	**io**	**kio**	**tio**	**ĉio**	**nenio**
	es *posedo*	**ies**	**kies**	**ties**	**ĉies**	**nenies**
ADVERBO	**e** *loka*	**ie**	**kie**	**tie**	**ĉie**	**nenie**
	al *kaŭza*	**ial**	**kial**	**tial**	**ĉial**	**nenial**
	am *tempa*	**iam**	**kiam**	**tiam**	**ĉiam**	**neniam**
	el *maniera*	**iel**	**kiel**	**tiel**	**ĉiel**	**neniel**
	om *kvanta*	**iom**	**kiom**	**tiom**	**ĉiom**	**neniom**

IX

VERBO

I. Subjekto (16 kaj 17).

121. Verbo havas preskaŭ ĉiam subjekton esprimitan. Tio estas necesa, ĉar oni ne povas distingi personojn per iliaj finaĵoj.

122. Oni tamen renkontas verbojn sen subjekto esprimita (en senpersonaj propozicioj) kun :

A. verboj montrantaj veteron : *neĝas, pluvas, hajlas, fulmas, tondras.*

B. diversaj verboj, (egale uzeblaj kun esprimita subjekto), pro nedifiniteco de l' subjekto : *okazas, aperas, ŝajnas,* k. s.

C. verbo *esti* uzata kun adjektivo-adverbo aŭ pasiva participo-adverbo : *necese estas forkuri ; honte estas perfidi ; estas dirite, ke...*

D. kelkaj interparolaj esprimoj : *se plaĉas al vi...*

123. Kiam subjekto estas la sama por ĉiuj verboj en la frazo, tiam oni povas esprimi ĝin nur antaŭ la unua verbo :

Mi miras, timas, tremas. (Haml. I. 1.)
Li alkuris, ekkaptis la infanon kaj tiris ĝin el la danĝero.

II. Predikato (18).

124. Kiam predikato estas substantivo, ĝi akordiĝas nombre kun la subjekto, kiel adjektivoj ; ĝi povas ankaŭ ne akordiĝi, se la ideo tion postulas :

La kuracisto estas la espero de l' malsanulo.
La kuracistoj estas la espero de siaj malsanuloj.
Parizo kaj Londono estas grandaj urboj.

125. Kiam subjekto estas de ina genro, la predikato-substantivo ankaŭ povas preni virinan sufikson, sed oni, nur laŭvole akordigas ilin genre :

Tiu ĉi sinjorino estas pentrist(in)o.
*Fraŭlino X*** estas elektita sekretariino de nia grupo.*

126. Kiam predikato estas adjektivo aŭ participo, ĝi akordiĝas nur nombre kun la subjekto (79 kaj sekvantaj.)

III. **Rekta komplemento** (51).

127. Substantivo aŭ pronomo, kiu estas rekta komplemento de verbo (51), estas en akuzativo sen prepozicio :

Mi amas mian patron.
Mi bone aŭdas vin.

128. Unu verbo havas ordinare nur unu rektan komplementon. La aliaj komplementoj estas uzataj nerekte pere de prepozicio :

Li instruis min pri lingvo germana, aŭ *li instruis germanan lingvon al mi* (ne : *li instruis min lingvon germanan).*
Li demandis min pri tio (ne : *li demandis min tion).*

Rim. 1. Kompreneble unu komplemento povas konsisti el kelkaj vortoj aŭ terminoj; en tia okazo ĉiuj terminoj estas en akuzativo, se ili ne estas regataj de prepozicio (52) : *Li manĝis supon kaj panon.*

2. Akuzativo montranta almovon, tempon, daŭron, k. t. p. ne signifas ke la vorto estas rekta komplemento; tial oni renkontas en tiaj okazoj plurajn komplementojn en akuzativo: unu estas rekta, aliaj estas cirkonstancaj: *Li metis la ĉapelon sur sian kapon* (158).

129. Kiam infinitivo estas komplemento de verbo (aŭ de alia vorto), oni neniam uzas prepozicion antaŭ ĝi. Escepto estas farita por prepozicioj *por, antaŭ ol, anstataŭ, krom* (186) :

Mi ordonis al li helpi sian fraton.
Mi lernas rajdi.
Mi iras (por) helpi lin.
Antaŭ ol foriri, li bruligis ĉiujn paperojn.
Anstataŭ lerni, li petolas.

130. Kiam rekta komplemento havas mem infinitivon kiel komplementon, tiam oni povas uzi participon anstataŭ infinitivo, se oni volas montri la daŭron de l' ago :

Mi vidis lin mortigantan homon (dum li mortigas).

Rim. 1. *Mi vidis lin mortigi homon* estas ankaŭ bona. Tia uzo estas tre klara, simpla kaj praktika, kvankam ĝis nun malpli renkontata ol la supra. Jen kion diras pri tiu formo Z: « Kiel ni diras *mi vidis lin sana* (= ke li estas sana), — tiel laŭ mia opinio ni povas ankaŭ diri *mi vidis lin kuri* (= ke li kuras), *mi aŭdis lin paroli* (= li parolas) ». — El tio ni povas konkludi, ke post verboj de perceptado: *vidi, aŭdi, senti* kiel ankaŭ post: *fari, igi* kaj *lasi* oni povas uzi la infinitivon.

2. Kiam oni ne celas montri daŭron de ago, tiam oni uzas simplan infinitivon: *Li devigas lin meti la ĉapelon sur la kapon* (Haml. V. 2).

IV. **Nerekta komplemento** (52).

131. Nerekta komplemento estas montrata de konvena prepozicio kaj restas en nominativo, kiam ne ekzistas almovo al ĝi (135) :

Mi donas akvon al la birdoj.
Mi enuas je la hejmo.
Mi batalas kontraŭ li.

132. Kiam ne ekzistas alia akuzativo en sama propozicio, oni povas meti nerektan komplementon en akuzativon senprepozician (t. e. igi ĝin rekta komplemento), se tio ne difektas klaron de la frazo (53, 195).

Obei la patron, anstataŭ : obei al la patro. (Z.)
Enui la patrujon, anstataŭ : enui je la patrujo. (Z.)
Pardoni malamikon, anstataŭ : pardoni al malamiko. (Z.)

Rim. 1. Sed oni diras devige: *pardoni al malamiko liajn ofendojn* (Z.). (128).

2. Per reciproka uzo de supra regulo oni trovas ofte uzon de prepozicio kun nominativo anstataŭ sola akuzativo: *Mi helpas al la patro. Mordi al brako.*

133. Komplemento de verbo pasiva estas ordinare en nominativo kun prepozicio *de* por montri aganton, kun prepozicio *per* por montri ilon :

Mi estas amata de mia patro.
La domo estas kovrita per ardezoj.
La infano estas batata de viro per bastono.
La letero estas skribita de li per krajono.

V. **Cirkonstancaj komplementoj** (19). **Loko.**

134. Por montri lokon, je kiu oni estas, oni uzas nominativon kun unu el la lokaj prepozicioj *en, ekster, sur, sub,* k. t. p. (213) :

Mi estas, iras, promenas, kuras en la ĝardeno.

135. Por montri lokon al kiu oni iras, oni uzas solan akuzativon aŭ kun prepozicio :

Mi iras Parizon. Mi iras en la ĝardenon.
La hirundo flugis trans la riveron, ĉar trans la rivero sin trovis aliaj hirundoj. (Z.)
Morgaŭ mi petos permeson veni antaŭ viajn reĝajn okulojn. (Haml. IV. 7.)

Rim. 1. Tiu ĉi regulo rilatas ankaŭ moralan movon (54).
2. Lokaj adverboj ankaŭ devas alpreni *n.* : *Pri tio, kien metis li la korpon, ne povis ni sciiĝi.* (Haml. IV. 3.) — *Kien vi iras? En la ĝardenon.* (Z.)
3. Post substantivo montranta almovon, oni ankaŭ devas uzi akuzativon : *Mi gratulas vian Princan Moŝton je la reveno Danujon.* (Haml. V. 2.)
4. La verbo povas esti ne esprimita. Tiam akuzativo sola sufiĉas por montri almovon : *Stelistojn neniu lasas en sian domon.* (Z.)

136. Kiam almovo estas sufiĉe montrata de prepozicio aŭ de antaŭa frazo, tiam oni povas neuzi finaĵon *n*. Tio ĉi okazas plej ofte kun prepozicioj *al* kaj *ĝis* :

Mi venas de la avo, kaj mi iras nun al la onklo. (Z.)
Miaj fratoj eliris kun la gastoj kaj akompanis ilin ĝis ilia domo. (Z.)
Kien ili iras? Kontraŭ Polujo. (Haml. IV. 4.)

Rim. La prepozicioj *al* kaj *ĝis* jam per sia signifo enhavas la ideon de almovo kaj sekve ili ne havas komplementon *en akuzativo*.

137. Kiam, en frazo montranta almovon, oni celas nur rezulton de la movo kaj ne ĝian fariĝon mem, tiam oni povas uzi nominativon. Tio ĉi okazas precipe kun verboj en tempo pasinta :

La malfeliĉa infano forkuris kaj kaŝis sin en la plej proksima arbaro. (Z.) — (Rezulto : nominativo.)
Mi ne pendigis mian ĉapon sur tiu ĉi arbeto ; sed la vento forblovis de mia kapo la ĉapon, kaj ĝi, flugante, pendiĝis sur la brančoj. (Z.)
Oni metis antaŭ mi manĝilaron, kiu konsistis... (Z.)
Mi dissiris la leteron kaj disĵetis ĝiajn pecetojn en ĉiujn angulojn de la ĉambro. (Z.) — (Akuzativo, por montri f a r i ĝ o n de la movo.)

138. Por montri lokon de kiu oni venas, oni uzas nominativon kun konvena prepozicio : *de*, se oni simple deiras de tie ; *el*, se oni volas montri eliron ; *for, for de*, se oni volas montri energian aŭ grandan malproksimiĝon :

Li venas de Parizo kaj iras nun al Berlino.
La violono falis el la violonujo.
For! For de tie ĉi! Iru for, sentaŭgulo!
Li forflankiĝis de la vojo.

VI. Cirkonstancaj komplementoj. Tempo.

139. Por montri tempon, oni uzas nominativon kun konvena prepozicio laŭ postaj reguloj. Tre ofte kiam tio ĉi ne enkondukas konfuzon, oni ankaŭ uzas akuzativon senprepozician, aŭ formon adverban (93) :

En printempo floroj aperas. (aŭ : *printempon floroj aperas ;* aŭ : *printempe floroj aperas.)*
Dum la tuta tago li restis sola. (aŭ : *la tutan tagon...)*
Li estas nur unu jaron en la servado.
Hodiaŭ vespere mi estas sana, sed hieraŭ matene mi suferis.

140. Por montri, kiam okazos io, oni uzas *post* (kun nominativo) :

Li revenos post tri semajnoj.
Post 14 tagoj granda festo!

141. Por montri, kiam okazis io, oni uzas *antaŭ* (219) :

Antaŭ tri semajnoj mi fariĝis malsana, sed nun mi resaniĝis.

142. Por montri de kiam afero estas farata aŭ okazas, oni uzas *de*. (Oni montras komencon de afero, kiu daŭras ankoraŭ) :

De tri semajnoj mi estas malsana, (aŭ : *mi estas malsana tri semajnojn, kaj ne scias kiam* (aŭ : *post kiom da tempo) mi resaniĝos.*

143. Por montri ne precize tempon, je kiu okazas io, oni uzas *ĉe*, laŭ jena ekzemplo :

Ĉe mia alveno la hundo ekbojis.

144. Por montri tempon necesan por io, aŭ uzatan por io, oni uzas *en* :

Tiu ĉi libro havas sesdek paĝojn ; tial se mi legos en ĉiu tago po dek-kvin paĝoj, mi finos la tutan libron en kvar tagoj. (Z.)

Rim.. La saman ideon oni povas esprimi adverbe: *ĉiutage*. (Kp. 146)

145. Por montri ekstreman limon da tempo, oni uzas unu el la

esprimoj : *ĝis, ne pli (ol), ne malpli (ol), almenaŭ...* k. t. p. (223, Rim. 2) :

Ĝi povas kuŝi ok ĝis naŭ jarojn. (Haml. V. 1.)
Li mortis antaŭ 10 jaroj, ne pli.
La kontrakto finiĝos post almenaŭ kvin jaroj.

Rim. *Ok ĝis naŭ jarojn*, diras Zamenhof. *Jarojn* estas en akuzativo, ĉar *ĝis* estas ja tie ĉi nur simpla ero en tuta esprimo *8—9 jaroj*. Tial oni povus diri: *kuŝi dum ok ĝis naŭ jaroj*.

146. Por montri daŭron, oni uzas *dum* (aŭ : *en la daŭro de*) :

Dum kvar tagoj mi restis tie.
En la daŭro de kelke da minutoj mi aŭdis du pafojn. (Z.)

147. Ripeton oni montras per vortoj *foje, unufoje, dufoje...* aŭ *fojon, unu fojon, du fojojn, tri fojojn...* aŭ *en la unua fojo, por unua fojo* :

Dufoje li batis min.
Li venis tri fojojn.
Por la unua fojo mi ricevis premion.

148. Tempaj adverboj estas : *iam, tiam, kiam, neniam, ĉiam.* Ili ofte sufiĉas por montri tempon pasintan aŭ estontan, kiam verbo estas mem en pasinto aŭ estonto. — *Kiam* oni uzas post *tiam* kaj post iu ajn vorto aŭ esprimo montranta tempon :

Unutage kiam ; tagon, kiam ; tuj kiam ; ĝuste kiam ; samtempe, kiam ; de l' tempo, kiam ; post kiam, k. t. p.

Rim. 1. Nur post *antaŭ* oni uzas *ol* en tempa senco: *antaŭ ol li fariĝis riĉa, li...* Tio ĉi estas bedaŭrinda escepto, ĉar oni ne komprenas, kial diri *post kiam li fariĝis riĉa* kaj *antaŭ ol...* Eble pli bone estus uzi ĉiam: *antaŭ kiam li fariĝis riĉa...*
2. Por tagoj, horoj, k. c. vidu §§ 92 kaj 94.

VII. Cirkonstancaj komplementoj. Kaŭzo.

149. Por montri kaŭzon, oni uzas prepozicion *pro*. (Iafoje *de*, kiam konfuziĝas kun deveno) :

Li agas pro ĵaluzemo.
Li mortis pro malsato (aŭ : *de malsato*).
Li eksaltis de surprizo. (Z.)

150. Por montri celon, oni uzas prepozicion *por* :

Li sin kuracas por resaniĝi.

151. Por montri devenon, difinon aŭ uzadon de objekto, oni uzas prepozicion *de* (63) :

Tio venis de lia unua eraro.
Li estas doktoro de medicino, profesoro de historio.
De la patro mi ricevis libron. (Z.)
Donu al mi alian glason de vino, ĉar tiu ĉi estas malpura. (Z.)

Rim. *Da vino* oni uzus, se oni volus montri ian kvanton da vino, sed ne glason uzatan por vino (62).

152. Eliro, materialo el kiu oni tiris ion, estas montrata per *el* (65).

Mi estas el Parizo.
Tiu ringo estas el oro.

153. Instrumenta kaŭzo, ilo per kiu oni faras ion, estas montrata per prepozicio *per* :

Li mortigis lin per glavo.
Mi manĝas per la buŝo kaj flaras per la nazo. (Z.)
Tion mi sciiĝis per mia frato (*de* oni povus ankaŭ uzi en tiu ekzemplo).

154. Kaŭzon ĝeneralan, motivon, k. c. oni montras per adverba serio *ial, tial, kial, ĉial, nenial*, kaj devenaj esprimoj *tial... ĉar ; tial... ke ; pro tio, ke* ; k. t. p. :

Kiam tiu bela knabino venis domen, ŝia patrino insultis ŝin, kial ŝi revenis tiel malfrue de la fonto. (Z.)

VIII. Cirkonstancaj komplementoj. Maniero.

155. Por montri manieron laŭ kiu io okazas, oni uzas adverban formon aŭ prepozicion konvenan :

Li mensogis plej senhonte !
Li parolas plej saĝe (aŭ : *laŭ plej saĝa maniero ; aŭ : kun plej granda saĝo.*).
La pli juna estis la plena portreto de sia patro laŭ sia boneco kaj honesteco. (Z.)
Li venis al ni tute ne atendite. (Vidu § 194.)

156. Por montri parton je kiu oni tenas ion, oni uzas prepozicion *je* (aŭ : *apud, ĉirkaŭ, ĉe*, k. a. laŭ okazo) :

Li tenadis lin je la kolo per ambaŭ manoj.
Li prenis sian edzinon ĉirkaŭ la talio.

157. Prezon, valoron, k. t. p. de io oni montras per akuzativo sola aŭ per nominativo kun konvena prepozicio :

Mi aĉetis tiun domon je dek mil frankoj.
Tio kostas ok frankojn.
Donu al mi por dudek-kvin centimoj da tabako.
Por mlaj kvar infanoj mi aĉetis dekdu pomojn, kaj al ĉiu el ili mi donis po tri pomoj. (Z.)

Rim. *Po* havas sencon disdonan; ne uzu ĝin anstataŭ *por*, ekzemple kiel en frazo *donu al mi po dek centimoj da tabako*. Tio signifus, ke oni aĉetas ian nombron da paketoj enhavantaj ĉiu por dek centimoj da tabako. Plie oni ne forgesu, ke *po* estas prepozicio kaj tial regas nominativon.

IX. Akuzativo post netransitivaj verboj.

158. Kiel ni jam vidis (128, R. 2) de regulo de almovo kaj de eblo anstataŭi prepozicion per akuzativo devenas en Esperanto renkonto de komplementoj en akuzativo (kiuj ne estas veraj rektaj komplementoj) post verboj, kiuj ne havas rektan komplementon. (Netransivitaj verboj, eĉ verbo *est*) :

Enui la patrujon. (Z.)
Aleksandro turniĝis en polvon. (Haml. V. 1.)
Mi jam tri jarojn estas tombisto. (Haml. V. 1.)
Ni sciiĝis tiun novaĵon (*anstataŭ* : pri tiu novaĵo).

X. Modoj kaj tempoj.

159. Propozicio (15), rilate al realeco de afero eldirata, estas elparolata kaj esprimata diversmaniere de parolanto. La ideo povas esti eldirata, kiel reala, okazanta fakto : *Petro kuras ;* aŭ kiel volo, deziro de parolanto :*Petro kuru !* aŭ kiel simpla opinio, kompreno, k. t. p. : *Petro kuras por varmiĝi.* (Oni ne diras, ke Petro estas varma, sed lia varmiĝo estas rigardata kaj esprimata, kiel celo de lia kuro).

Diversa maniero, laŭ kiu propozicio estas komprenata, estas esprimata en Esperanto per tri modoj : *indikativa, ordona, kondiĉa,* — kaj iafoje per *infinitivo*.

Rilato inter ĉefa kaj dependa propozicio (229) estas esprimata plej ofte per konjunkcio. Konjunkcioj ne ordonas difinitan modon, ĉar en Esperanto modo uzota dependas nur de ideo esprimota. (236.)

160. Kion oni diras, tio povas rilati simple al unu el tri tempoj : ***estinta, estanta, estonta*** (simplaj tempoj) ; aŭ rilati ian momenton ***pasintan, estantan*** aŭ ***okazontan,*** jam estantan en ***estinteco, estanteco*** aŭ ***estonteco,*** rilate al tiu momento (malsimplaj tempoj).

XI. Indikativo.

161. Indikativo estas modo, per kiu oni eldiras simple ion, kiel veran, jese, nee aŭ demande :

Patro venas. Kiam patro venos, ni foriros.
Kvankam tio estas konata, tamen oni devas rememorigi pri ĝi.
Se li estas malsana, mi senkulpigas lin.

XII. Indikativo. Tempoj simplaj.

162. Per estinta tempo *(is)* oni esprimas tion, kio pasis :

Li venis antaŭ du horoj. Pluvis hieraŭ. Se li estis malsana, li ne povis veni.
Kiam tiu bela knabino venis domen, ŝia patrino insultis ŝin. (Z.)

163. Per estanta tempo *(as)* oni esprimas tion, kio okazas en momento, kiam oni parolas, kio okazas kutime aŭ en ĉia tempo, aŭ kio estas komprenata, kiel nuna. (Ekz. : pensoj enhavataj en libroj ankoraŭ nun posedataj, k. t. p.) :

Mi kuras. La vero ĉiam venkas. (Z.)
La aŭtoro diras en sia verko, ke...

164. En vivaj rakontoj ofte faktoj pasintaj aŭ okazontaj estas esprimataj per estanta tempo :

Mi haltis, perdante la spiron, sur la rando de l' monto, kaj, min apoginte al angulo de dometo, mi komencis rigardi la pentrindan ĉirkaŭaĵon, kiam subite mi aŭdas post mi konatan voĉon : « Peĉorin ! ĉu jam longe tie ĉi ? » Mi min turnas : Grušnicki ! Ni nin ĉirkaŭprenis.
La princino, ŝajne, estas el tiuj virinoj, kiuj volas, ke oni ilin plezurigu ; se daŭre du minutoj apud vi ŝi enuos, vi estas perdita nerevenebleble.

165. Oni uzas ankaŭ estantan tempon por montri tion, kio daŭras ankoraŭ :

Li estas en Parizo jam de tri jaroj.

Rim. Kompreneble, ke se la tuta afero jam pasis, oni uzas estinton: *Li estis jam de tri jaroj en Romo, kiam alvenis lia patro.*

166. Per estonta tempo *(os)* oni esprimas tion, kio okazos :

La patro venos post du tagoj.
Tiam la floro malfermiĝos.
Se pluvos, li ne venos.

XIII. Indikativo. Tempoj malsimplaj.

167. Estintan tempon en pasinto (1) oni uzas por montri, ke, je momento pasinta, io jam antaŭe finiĝis :

Feliĉe mi jam estis skribinta mian leteron, kiam la leteristo alvenis.

168. Estantan tempon en pasinto oni uzas, kiam oni metas sin pense en pasinta momento kaj priskribas tion, kio okazis en tiu sama momento :

Mi estis skribanta leteron, kiam okazis tertremo.

169. Estontan tempon en pasinto oni uzas por montri, ke, dum epoko jam pasinta, io estis ankoraŭ okazonta ; aŭ ke oni jam decidis ion fari :

En la jaro 1886 la lingvo Esperanto estis ankoraŭ aperonta.

Rim. Por montri, ke la afero estis plej baldaŭ okazonta, oni ofte uzas vorton *tuj*. Ekz.: *Ni estis tuj elirontaj, kiam ekpluvis.* (En la momento mem de l'eliro pluvo ekfalis.)

170. Estintan tempon en estanto oni uzas por montri staton devenantan de ago pasinta:

Li estas alveninta de du horoj.
Jam longe ili estas mortintaj.

171. Estantan tempon en estanto oni uzas por montri staton aŭ agon daŭrantan, okazantan en la momento mem :

Lasu min trankvila, ĉar mi estas laboranta serioze.
Li estas vojaĝanta.

Rim. Frazo *li vojaĝas* povus signifi: li vojaĝas kutime, sed eble nun ne estas en vojaĝo. Tiun formon malsimplan oni uzas nur, se malklarajo estas timinda (176.)

(1) En tiu ĉi ĉapitro, *estanta, estinta, estonta = participo en anta, participo en inta, participo en onta. — Pasinto, estanto, estonto = tempo de helpa verbo.*

172. Estontan tempon en estanto oni uzas por montri, ke oni jam decidis fari ion, kvankam en ne deviga, ne certa maniero, aŭ ke io tuj okazos :

Mi estas vojaĝonta Madridon en proksima vintro (kredeble mi vojaĝos ; mi intencas vojaĝi) .
Kiam abeloj estas forflugontaj, ili zumas forte.

Rim. Per aldono de *tuj baldaŭ* k. s. oni alproksimigas la estonton : *mi estas tuj elironta, tial rapidu realporti respondon.*

173. Estintan tempon en estonto oni uzas por montri, ke kiam alvenos ia momento, afero estos jam finita :

Kiam vi venos al mi, li estos dirinta al mi la veron. (Z.)

174. Estantan tempon en estonto oni uzas por montri, ke ia afero okazos samtempe kun alia, kiu ne ekzistas ankoraŭ :

Mi timas, ke la respondo alvenos, dum mi estos promenanta.

175. Estontan tempon en estonto oni uzas por montri, ke ia afero okazos antaŭ alia, kiu mem ankaŭ estas okazonta.

Ni aŭskultigos nian aŭdantaron, se ni montros al ĝi, ke la aferoj, pri kiuj ni estos parolantaj, estas grandaj, novaj, nekredeblaj.

Rim. Tiu formo estas neofte uzata. Oni pli volonte (kaj pli simple) diras: *aferoj pri kiuj ni estas parolontaj*, aŭ: *pri kiuj ni parolos.*

176. Malsimplajn tempojn oni uzas nur malofte en Esperanto, Kiam oni volas nepre precizigi ideon, kaj se ĉirkaŭaj frazoj ne igas ĝin sufiĉe klara :

Kiam tiu bela knabino venis domen, ŝia patrino insultis ŝin (Z.) — anstataŭ : *estis veninta domen.*
Kiam ŝi parolis tiujn ĉi vortojn, elsaltis el ŝia buŝo tri rozoj (Z.) — anstataŭ : *dum ŝi estis parolanta...*
La malfeliĉa infano rakontis al li naive ĉion, kio okazis al ŝi (Z.) — anstataŭ : *estis okazinta...*
Kiam malriĉa virino petos de vi trinki, vi donos ĝin al ŝi gentile (Z.) — anstataŭ : *estos petinta de vi trinki.*
Li ne evitos jam la morton, kiun la bato via eble ne alportis (Haml. IV. 7), — anstataŭ : *ne estos alportinta.*

177. Tempo uzota, simpla aŭ malsimpla, estas ĉiam montrata de ideo esprimota, kaj neniel dependas de aliaj kaŭzoj (konjunkcioj, aliaj verboj, k. c.) :

La filo de la reĝo demandis ŝin, kion ŝi faras tie ĉi (Z.). — *Faris* povus montri ion jam pasintan.
Ili trovis, ke ni parolas sensencaĵon, tamen efektive neniu el ili diris ion pli saĝan.
La princedzino diris, ke via vizaĝo estas al ŝi konata.
Adiaŭ! Mi esperis, ke vi estos edzino kara de Hamleto mia. (Haml. V. 1.)

178. Resume, tempojn malsimplajn oni uzas plej malofte. Se oni uzas ilin, tiam :

A. Por diri, ke ago *estis, estas,* aŭ *estos* farata en la momento mem, pri kiu oni parolas, oni uzas verbon *esti* kun *estanta participo* de verbo esprimanta tiun agon.

B. Por diri, ke ago *estis, estas,* aŭ *estos* finita en la momento, pri kiu oni parolas, oni uzas *esti* kun *pasinta (estinta) participo* de verbo esprimanta tiun agon.

C. Por diri, ke ago *estis, estas,* aŭ *estos* nekomencita ankoraŭ, sed tamen okazos, oni uzas *esti* kun estonta participo de verbo montranta la agon.

XIV. Ordona modo. (Imperativo.)

179. En ĉefaj propozicioj imperativo montras ordonon de parolanto :

Venu tien ĉi! (Mi volas, ordonas.)

180. En dependaj propozicioj, imperativo montras ordonon, volon, deziron, peton, devon, konvenon, neceson, timon, k. t. p. :

Mi deziras, ke li venu.
Estas necese, ke li venu.
Mi petas, ke vi ne faru tion
Mi timas, ke li venu.

Rim. La frazoj kun *timi* esprimas volon: *mi timas, ke li ne venu* (174, 236 Rim. 2.)

181. Por tempoj malsimplaj de imperativo oni agas kiel por indikativo. (Estu amanta, aminta, amonta.)

XV. Kondiĉa modo. (Kondicionalo.)

182. Kondicionalo montras, ke afero dependas de supozo, t. e. de alia afero (kondiĉo), kiu ne estas vera, ne estas certa, ne ekzistas efektive en momento, kiam oni parolas :

Se li estus riĉa, li havus multajn amikojn. (Sed li ne estas riĉa, li do ne havas multajn amikojn.
Se mi tion scius, mi ĝin dirus. (Sed tion mi ne scias.)

Rim. 1. Kiam oni volas montri per vorto *se,* ke kondiĉa rilato ekzistas inter du propozicioj, sed neniel celas realecon de enhavo de ambaŭ propozicioj, tiam oni uzas simple indikativon:
Se vi ne faris alian aferon, vi estas sufiĉe rekompencita.

2. Kondicionalo povas iafoje montri deziron, timon, minacon, k. c. kiam efektivigo de l' kondiĉo eldirata ŝajnas preskaŭ neebla: *Se mi povus lin venki! — Se iam vi mokus min!...*

3. Oni iafoje uzas kondicionalon eĉ kiam afero estas reala, por montri (pro ĝentileco aŭ alia kaŭzo) malpli da forto en la senco. En tia okazo (kiel en supra) oni alpensas alian frazon kondiĉan: *Mi ne volus tion fari* (se tio okazus). — *Mi estus feliĉa ricevi vian verkon* (se vi havus la afablecon ĝin sendi al mi...)

183. Por tempoj malsimplaj de kondicionalo, oni agas kiel por indikativo :

Mi ne farus la eraron, se li estus dirinta al mi la veron. (Z.)

XVI. Infinitivo

184. Infinitivo esprimas ideon verban en ĝenerala maniero. Oni uzas ĝin :

a) Subjekte, kiam ago estas montrata ĝenerale ; b) komplemente, por klarigi ideon :

Bone pensi kaj bone agi sufiĉas por vivi bone kaj feliĉe.
Vivi estas agi : kiu ne agas, ne vivas.
Li ĉesis kuri.

Rim. 1. Infinitivo uzata subjekte estas vera substantivo, sed neniam akceptas artikolon antaŭ si. Plie adjektivo, uzata kiel ĝia predikato, estas en formo adverba (39, 84). Oni povas ĉiam ŝanĝi tian infinitivon en substantivon, ŝanĝante *i* en *o* aŭ *ado.* Tiam oni povas uzi artikolon kaj meti adjektivon en ordinaran formon *a*: *Scii estas utile. La scio estas utila.*

2. Por participoj uzataj en tempoj malsimplaj, oni ofte uzas formon *a,* eĉ kiam la participo rilatas infinitivon aŭ enhavon de tuta propozicio: *Pli bone estas honorinde vivadi, ol esti honorinde naskita.*

185. Adjektivo aŭ substantivo rilatanta al unu el tiaj ĝeneralaj infinitivoj (subjektoj) restas ordinare en nominativo. (Pro verbo *esti*) :

Promeni estas agrabla okupo.

186. Infinitivon oni povas uzi komplemente post verbo, adjektivo aŭ substantivo ; prepozicion oni ne antaŭmetas, esceptinte *por, antaŭ, ol, anstataŭ.* (129) :

Malbonaj infanoj amas turmenti bestojn. (Z.)
Mi volis ŝlosi la pordon. (Z.)
Mi estas preta juri. (Haml. IV. 7.)
Morgaŭ mi petos la permeson veni antaŭ viajn reĝajn okulojn. (Haml. IV. 7.)
Por venki oni devas batali.

187. Kiam subjekto de infinitivo estas substantivo aŭ pronomo en akuzativo, kaj se ekzistas samtempe komplemento de tiu infinitivo, tiam preferinde estas uzi alian modon kun konvena konjunkcio (ke...) Se la komplemento estas ankaŭ en akuzativo, tiam oni *devas* fari tiun ŝanĝon por eviti malklarecon :

Mi kredas lin esti bona (... ke li estas bona.)
Mi kredas lin ami sian edzinon (... ke li amas sian edzinon.)

188. Simile tempoj malsimplaj de infinitivo estas maloftaj. (Esti amanta, aminta, amonta.) Oni uzas pli volonte konjunkcion kun alia modo.

XVII. Participoj.

189. Participoj adjektivaj akordiĝas kiel ordinaraj adjektivoj : *nombre kaj kaze,* se ili estas apudmetitaj ; *nur nombre,* se ili estas uzataj predikate. *(79, 80) :*

Mi ne amas infanojn bruantajn.
Ni estas lacigataj de la bruado.
Ni trovis ilin (estantajn) *mortintaj.*

Rim. Pri uzado de participoj en tempoj malsimplaj, vidu XIII.

190. Estonta participo ne montras per si mem devon. Tiel *la konstruota domo* ne signifas la domon, kiun oni devas konstrui, sed nur domon, kiun oni konstruos.

Rim. Por esprimi la devon oni uzas la ne ankoraŭ oficialan sufikson *-end : domo konstruenda.*

191. Kiam participo montras cirkonstancan komplementon kaj rilatas subjekton de frazo, tiam oni plej ofte metas ĝin en adverban formon :

Promenante sur la strato, mi falis. (Z.)
Trovinte pomon, mi ĝin manĝis. (Z.)
Li venis al mi tute ne atendite. (Z.)

Rim. 1. Tio okazas plej ofte por montri manieron (155) laŭ kelkaj uzoj de latina gerundivo ablativa, ĉu por montri samtempecon aŭ malsamtempecon de fakto kun alia.

2. Se la participo ne rilatas la subjekton de la frazo, tiam oni uzas modan formon kun konjunkcio, adverbo, k. c. aŭ oni ŝanĝas la konstruon de la frazo por ĉion rilatigi al la subjekto: *Post kiam la malamikoj forkuris, ni transiris la ponton.* Oni ne diras: *la malamikoj forkuris, ni transiris la ponton. — (Turnante) la okulojn al la ĉielo, li preĝis fervore,* sed ne: *la okuloj turnite al la ĉielo, li...*

3. Kiam participo rilatas rekte subjekton (aŭ komplementon) t. e. estas uzata kiel apudmetita adjektivo, kompreneble ĝi ne prenas tiun gerundivan formon, sed akordiĝas kiel simpla adjektivo: *Al homo pekinta senintence Dio facile pardonas.* (Z.) — *La tempo pasinta jam neniam revenos ; la tempon venontan neniu ankoraŭ konas.* (Z.)

XVIII. Pasivaj verboj.

192. Pasivaj verboj, estante formataj per kunligo de verbo *esti* kun pasivaj participoj, havas nur malsimplajn tempojn.

193. Pasivaj participoj sekvas regulojn de aktivaj. Iliaj komplementoj estas signataj per *de* aŭ *per.* (162.)

193². Oni devas atenti, por ke oni ne uzu estantan pasivan participon anstataŭ estinta, kaj reciproke. Participo *ata* montras, ke ago daŭras en priparolata momento, aŭ ke oni konsideras ĝian daŭradon ; participo *ita* montras finitecon de ago :

La pordo estas fermita. (Oni ĝin fermis.)
La pordo estas fermata. (Oni ĝin fermas nun.)
Pasero kaptita estas pli bona ol aglo kaptota. (Z.)
Mono havata estas pli grava ol havita. (Z.)

XIX. Refleksivaj verboj.

194. Refleksiva verbo montras agon de subjekto sur sin mem ; ĝia rekta komplemento estas do la sama pronomo, kiu estas uzata kiel subjekto, sed kompreneble en la akuzativo ; por la tria persono, la komplemento estas la pronomo *sin* (90) :

Li batis sin. Mi lavas min. Li sidigis sin.

Rim. Oni do uzas ilin nur kiam subjekto vere agas sur sin mem, kaj ne, kiel en naciaj lingvoj, en multaj aliaj okazoj. Por esti certa, ke oni povas

tiel ripeti la personan pronomon, oni povas demandi kaj respondi jese: *ĉu mi povus fari tiun agon sur alian personon?* : *Mi lavas min* (mi povus lavi alian).

195. Kiam subjekto fariĝas ia, oni povas uzi sufikson *iĝi* anstataŭ ripeti pronomon personan :

Li sidiĝis (aŭ : *li sidigis sin*). (Z.)
Li montriĝis (aŭ : *li montris sin.*)

196. Se ekzistas subjekto en pluralo kaj oni volas montri, ke ago iras de unu al alia de tiuj subjektoj, oni uzas vorton *reciproke* aŭ esprimon *unu la alian* :

Ili batas sin reciproke (aŭ : *ili batas unu la alian.*)

XX. Aparta uzado de kelkaj verboj.

197. *Esti* estas sola helpa verbo. Neniam oni uzas *havi* kun participo predikateca :

Mi estas alveninta. Mi estis manĝinta.

198. Plej ofte (176, 178) oni uzas simplajn tempojn anstataŭ verbo *esti* kun participo aktiva :

Mi venis, vidis, venkis.
Li alvenis antaŭ du horoj.

199. Kiam oni havas kelkajn participojn rilatantajn al la sama subjekto kaj kiam la helpa verbo estas en la sama tempo por ĉiu el ili, tiam oni povas ne ripeti *esti* antaŭ ĉiuj participoj :

Li estis subite alveninta kaj ekkaptinta lian kruron.

200. *Igi, iĝi* estas ofte uzataj memstare. Kompreneble oni tiam ne trovas post ili predikaton adjektivan en akuzativo (80) :

Mi igis lin bona. La ĉielo iĝis luma.

201. *Devi* oni ne konfuzu kun *ŝuldi*. Tiu ĉi lasta esprimas nur, ke oni estas debitoro de iu ĉu mone ĉu dankeme, k. c. *Devi* kontraŭe montras moralan devon, neceson. Iafoje *devi* egalas *necese estas* :

Mi ŝuldas al vi tri mil frankojn.
Ni ŝuldas tiun verkon al lia genio.
Mi devas vin forlasi, ĉar oni atendas min.

Oni devas ami siajn gepatrojn.
Oni devas (necese estas) *zorgi pri sia eksterajo, se oni volas sukcesi en la mondo.*

Rim. Oni ne uzas *devi* por montri, ke eble oni faros ion, aŭ ke oni jam decidis ion fari. En tia okazo oni uzas *estonton en estanto* (172).

202. *Kuŝi* estas uzata ne nur en senco *esti en lito* aŭ por montri ripozadon, sed ankaŭ por esprimi ĉian ajn malstaran staton :

La krajono kuŝas sur la libro. (Z.)

203. *Lasi* estas uzita de Zamenhof en Hamleto anstataŭ *igi* (krom ĝia ordinara senco). Tio ĉi estas germanismo ne imitinda.

Mi lasis lin alveni kaj la korpon mi lasis serĉi (Haml. 1V. 3) anstataŭ : *mi alvenigis, mi serĉigis.*

204. *Meti* estas elasta verbo *(Zamenhof. Letero pri deveno de Esperanto)*, kiun oni uzas por multaj esprimoj :

Mi metis la manon sur la tablon. (Z.)
Vortoj kunmetitaj estas kreataj per simpla kunligado de vortoj. (Z.)
Oni metis antaŭ mi manĝilaron (Z.)
Se oni volus kunmeti plenan registron de liaj bonaj ecoj. (Haml. V. 2.)
Metu vian ĉapelon sur ĝian lokon. (Haml. V. 2.)
Neniam vi kunmetu viajn manojn en tia formo... (Haml. I. 1.)
La krimulo jam estos elmetita al la meritita puno.
Multaj personoj estis metitaj en malliberejon.
Li metis sian atenton sur la belan Raĥelon.
La malnoblulo metis ian reton por ŝia patro.
Mi certe almetos ĉiujn penojn por plenumi vian komision.

205. *Sidi* krom senco *sidi sur seĝo* estas uzata ankaŭ en senco *esti en sia difinita loko* :

La kuiristo sidas en la kuirejo. (Z.)
La urbo sidas sur monteto.
En la kandelingo sidis brulanta kandelo. (Z.)

206. Por esprimi staton (de l' korpo, de l'animo, k. c.), oni plej ofte uzas verbon *esti* kun adjektivo :

Mi estas varma, malvarma, malsata, sesjara, prava, malprava, k. t. p. — *Miaj manoj estas malvarmaj, sed miaj piedoj estas varmaj.*

Rim. 1. Kelkaj aŭtoroj uzas verbon devenantan el tiuj adjektivoj. Tiu uzado fariĝis pli ofta en la lasta tempo: *mi soifas, malsatas, malsanas.*

2. Neniam oni diras: *mi havas varmon,* k. c.

X

PREPOZICIO

I. Esploro ĝenerala.

207. **Prepozicio** esprimas rilaton inter vortoj; plej ofte ĝi montras nerektan aŭ cirkonstancan komplementon de verbo, komplementon de substantivo aŭ adjektivo, k. t. p. ; ĝi anstataŭas kazojn deklinaciajn.

Prepozicio en Esperanto ordinare havas sian komplementon en nominativo. Oni uzas akuzativon post prepozicio nur se tiu ĉi kazo estas postulata de alia kaŭzo. (Z.) [*almovo.*] (52 Rim. 2 ; 145 Rim.) :

La libro estas sur la tablo, kaj la krajono kuŝas sur la fenestro. (Z.)
Mi trinkis teon kun kuko kaj konfitaĵo. (Z.)
Mi vivas kun li en granda amikeco. (Z.)

208. Prepozicio estas ordinare memstara vorto ; tamen kelkaj estas ankaŭ adverboj (227) aŭ konsistas el tuta esprimo :

Kaŭze de tio (= pro tiu kaŭzo).
Laŭlonge de la rivero ni promenis.
Li staris meze de malamikoj.

209. Prepozicioj estas ofte uzataj kiel prefiksoj aŭ por formi kunmetitajn vortojn. Kiam tio ĉi okazas por verbo, oni tre ofte ripetas antaŭ nerekta komplemento de la verbo la prepozicion, per kiu oni formis tiun verbon :

Tio estis senutila. Mi eliris el la korto.

210. En Esperanto ĉiu prepozicio havas sencon bone difinitan. Se la senco de frazo ne montras klare, kian prepozicion oni devas

uzi, tiam oni povas uzi la komunan prepozicion *je*. Sed estas bone uzi la vorton *je* kiel eble plej malofte. (Z.) :

Mi ridas je lia naiveco. (Z.)
Je la lasta fojo mi vidas lin ĉe vi. (Z.)

211. Anstataŭ la vorto *je* oni povas ankaŭ **uzi akuzativon sen** prepozicio. Sed oni ne uzas akuzativon tiam, kiam la klaro de la senco tion ĉi malpermesas. (Z.) (53, 132) :

Mi ridas lian naivecon. (Z.)
Li malsanas okulojn.

212. Rilatoj plej ofte esprimataj de prepozicioj povas ordiĝi laŭ jena tabelo :

Loko. (134-139.) Mi loĝas en Parizo. Li estas apud la pordo.
Tempo. (139-149.) Mi venos post tri tagoj.
Celo. (150.) Mi manĝas por vivi.
Kaŭzo. (149-155.) Rabi pro malsato. Morti de febro.
Maniero. (155-156.) Paroli pri io. Agi laŭ sia opinio. Flari per nazo.
Deveno. (63, 155), *dependo.* Mi ricevis leteron el Parizo. Tiu libro estas verkita de mia frato. La birdo deflugis de la arbo.
Posedo (ofte : genitivo). Tio estas la libro de mia frato.
Aparteno, aldono (ofte : dativo). La rozo apartenas al Teodoro. Donu vestojn al la malriĉuloj.
Kunigo, akompano. Venu kun mi. Li estas bona, kaj, krom tio, riĉa. Li prenis teon kun sukero.
Disigo, forigo. Metu vian manon for de mia kolo. Apartigu pajlon de fojno. Li restis sen mono. Tri rozoj elsaltis el ŝia buŝo.
Proksimigo. Li venis al ni. Kien ili iras? Kontraŭ Polujon. Iru ĝis la rivero.
Kontraŭigo. Voĉdonu por aŭ kontraŭ la propono. Li sukcesis malgraŭ la malhelpoj. Anstataŭ li oni sendis lian fraton. Li estas preskaŭ kuracisto, kvazaŭ reĝo.

II. Lokaj prepozicioj (134—139).

Antaŭ, apud, ĉe, ĉirkaŭ, ekster, en, for (de), ĝis, inter, je, kontraŭ post, preter, sub, super, sur, tra, trans...

213. Plej multaj lokaj prepozicioj povas havi sian komplementon en akuzativo, kiam oni volas montri movon al ĝi. (134-139.)

214. *For* (de) estas ofte uzata en senco mala de *apud*, kvankam ĝia ordinara senco estas *disigo* :

Li estas for de tie ĉi (aŭ : *forestas de tie ĉi*).

215. *Ekster* estas malo de *en* :

Li iris en la domon, sed mi mem restis ekster ĝi.
Starante ekstere, li povis vidi nur la eksteran flankon de nia domo. (Z.)
Li loĝas ekster la urbo (Z.)

Rim. 1. Malo de *en* povas esti *el*, nur kiam oni celas movon eniran aŭ eliran.

2. En devenaĵoj ofte radiko *intern'* estas uzata kiel malo de *ekster* : *La ekstero de tiu ĉi homo estas pli bona ol lia interno* (Z.) — *Mi staras ekster la domo, kaj li estas interne.* (Z.)

216. *Inter* diferencas de *en* per tio, ke ĝi montras staton de io rilate al kelkaj aferoj, en kiuj oni ne estas, sed en kies aro oni troviĝas. *En* supozas, ke oni estas en interno de io ; *inter* montras, ke oni restas ekster iu objekto konsiderata aparte :

Inter Britlando kaj Francujo estas la maro.

217. *Preter* diferencas de *trans* en tio, ke ĝi montras movon de io, kio pasas antaŭ alia afero. *Trans* signifas, ke io sin trovas sur alia flanko de limo ekzistanta inter du aferoj :

La hirundo flugis trans la riveron, ĉar trans la rivero sin trovis aliaj hirundoj. (Z.)
En tiu ĉi minuto iris preter ni du sinjorinoj.
Silente mi iris sur la bulvardo preter la fenestroj de l'domo, kie sin kaŝis nia belulino.
La vortoj duonsvene forsonis preter liaj oreloj. (Z.)

Rim. 1. Derivaĵoj : *preteriri, preterlasi, preterdoni. Transiri, transdoni, transskribi*, k. t. p.

2. Malo de *trans* estas eble *ĝis* (latine: cis) kiun oni tiel uzas en senco loka (krom ĝia tempa) : *Miaj fratoj akompanis la gastojn ĝis ilia domo* (Z.). — *Tion ni povos fari ĝis dek tagoj* (147).

218. *Sur* diferencas de *super* en tio, ke ĝi montras ordinare tuŝadon de objektoj dum *super* montras, ne tuŝadon aŭ altan amasiĝon ; *super* montras ankaŭ pli altan gradon.

Mi metis la manon sur la tablo. (Z.)
Sur lia vizaĝo mi vidis ĝojan rideton. (Z.)
Super la tero sin trovas aero. (Z.)
Super mia kapo preterflugis birdo.
Li jetis ŝtonon super la muron, sed li ne havis sufiĉe da forto kaj la ŝtono falis sur la muron.
Kolonelo estas super kapitano.

Rim. 1. Derivajoj: *Suriri, suresti, surmeti, surpremi,* k. t. p. *Superi, supera, supereco, malsupera, malsuperi, malsupereco.*

2. Adverbe oni uzas pli volonte *supre* ol *sure*: *Li staras supre sur la monto.* (Z.) *Supre* montras tamen ideon apartan de alto. (Komparu kun: *venu kune kun via amiko.* (Z.)

3. Malo de *sur* kaj ankaŭ de *super* estas *sub.*

4. Malo de *supre* estas *malsupre,* kiun oni uzas ofte anstataŭ *sube*: *Li rigardas malsupren sur la kampon.* (Z.) *Li rapide malsupreniris.*

III. Tempaj prepozicioj. (139—149).

Ankoraŭ, antaŭ, apenaŭ, ĉe, ĉirkaŭ, de, dum, en, ĝis, je, post, k. c.

219. Pro komuna uzado de *antaŭ, post* en senco tempa kaj loka, oni devas atenti, ke oni konstruu sian frazon tiamaniere, por ke ne ekzistu malklarajo :

La gefiancoj renkontiĝis antaŭ la gepatroj (je ĉeesto de...)

La gefiancoj renkontiĝis antaŭ ol la gepatroj (alvenis).

IV. Aliaj prepozicioj.

220. *Krom* montras ideon apartigan. Iafoje tiu ideo povas kompreniĝi, kiel escepto, alifoje kiel aldono :

Tie estis ĉiuj miaj fratoj, krom Petro (Z.) (escepto : Petro ne estis tie).

Krom Petro tie estis ankaŭ ĉiuj aliaj miaj fratoj (Z.) (aldono : Petro estis tie kaj ankaŭ miaj aliaj fratoj).

Rim. Oni vidas, laŭ la supraj ekzemploj de Zamenhof, ke la vorto *krom* estas tre ofte konfuziga kaj bezonas esti klarigata per la kunteksto. Estas konsilinde uzi ĝin nur en la senco de aldono, kaj anstataŭigi ĝin en la senco de escepto, per aliaj esprimoj: *ekster, esceptinte* aŭ *kun escepto de.* En la senco aldona, oni ankaŭ povas uzi la esprimon *ne sole, sed ankaŭ* anstataŭ *krom.*

221. *Laŭ* montras rilaton de konformeco al iu afero :

Tiu vazo estas farita laŭ modelo el nia muzeo.

Laŭ mia opinio...

La pli juna filino estis la plena portreto de sia patro laŭ sia boneco. (Z.)

222. *Da* post ia vorto montras, ke tiu ĉi vorto havas signifon de mezuro. (Z.) Ĝia komplemento estas ĉiam en nominativo. (62) :

En la ĉambro sidis nur kelke da homoj. (Z.)

Sur la arbo sin trovis multo da birdoj. (Z.)

Mi aĉetis dekon da ovoj. (Z.)

Ni trovis sufiĉe da helpantoj.

Rento da cent frankoj.

Rim. En *Lingvaj Respondoj* Zamenhof diris: « Estas diferenco inter *multaj homoj* kaj *multe da homoj; multaj homoj* = diversaj homoj (ĉiu aparte) *multe da homoj* = granda nombro da homoj (kune). Tiu diferenco ne ĉiam estas atentata: ofte oni uzas *multe da* anstataŭ *multaj* nur por eviti serion da multenombraj akuzativoj. (259).

223. *Po* estas disdona prepozicio, kiun oni uzas ordinare nur antaŭ nombra nomo. Tiu prepozicio montras, ke iu persono aŭ ĉiu objekto havas saman nombron da aferoj. Oni ĉiam uzas nominativon post ĝi. (159 Rim.) :

Por miaj kvar infanoj mi aĉetis dekdu pomojn, kaj al ĉiu el la infanoj mi donis po tri pomoj.

XI

ADVERBO

224. **Adverbo** estas vorto esprimanta manieron, lokon, tempon, kaŭzon, kvanton kaj direkton : *saĝe, hejme, vespere, tial, multe, flanken.*

225. Adverbo valoras prepozicion akompanatan de komplemento : *paroli saĝe* = paroli kun saĝeco.
En Esperanto oni uzas tre ofte adverbojn, ĉar oni povas ĉiam ricevi adverbon de iu ajn radiko per aldono de finaĵo e.

226. Laŭ supra difino adverbo diferencas de prepozicio **en tio**, ke ĝi ne havas ĝenerale post si komplementon substantivan aŭ pronoman. Se do oni deziras uzi prepozicion sen aldono de komplemento, oni devas igi ĝin adverbo per aldono de finaĵo e :

Mi staras apud li. Li staras apude.

Rim. Tamen adverboj participaj estas ofte uzataj prepozicie (kun komplemento substantiva) kiel *koncerne, tuŝante, ne ofendante, supozinte.* Ili tiam regas akuzativon, ĉar ili devenas de transitivaj verboj *koncerni, tuŝi, supozi, ofendi, escepti.* Tiuj adverboj prepozicioj havas do kiel rektan komplementon la nomon aŭ pronomon, kiu sekvas ilin. Cetere ili estas veraj gerundivoj, tio estas apartaj formoj de l' verbo kaj havas de adverboj nur ŝajnon (191).

227. Vortoj finiĝantaj je *aŭ* estas samtempe adverboj kaj prepozicioj, kaj tial uzataj indiferente en ambaŭ okazoj. Tamen *kontraŭ, malgraŭ, kvazaŭ, anstataŭ, ĉirkaŭ* estas pli ofte uzataj prepozicie :

Mi havas almenaŭ dek mil frankojn.
Mi havas dek mil frankojn almenaŭ.
Mi havas ĉirkaŭ mil frankoj (aŭ : frankojn).
Mi havas mil frankojn ĉirkaŭ (aŭ : ĉirkaŭe).

Por tempaj, lokaj, manieraj adverboj, vidu en « Circonstancaj komplementoj de verbo ».

XII

KONJUNKCIO

I. Esploro ĝenerala.

228. **Konjunkcio** estas nešanĝebla vorto, kiu kunligas vortojn aŭ frazojn : *kaj, se, ĉar, ke...*

229. Propozicio (15, 157) estas ĉefa, kiam ĝi estas simpla eldiro sufiĉanta per si mem : *Petro kuras ;* aŭ dependa, kiam ĝi ne estas dirata por si mem, sed por plenigi alian propozicion : *Petro kuras, por varmiĝi.*

230. Unu ĉefa propozicio povas havi kelkajn propoziciojn dependajn : *ĉar malamikoj proksimiĝis, oni detruis la ponton, por malhelpi ilian transiron.* Al unu helpa propozicio povas rilati ankaŭ dua subhelpa : *oni devas labori dum juneco, por, kiam alvenos maljuneco, honeste ripozadi.*

231. Unu ĉefa propozicio, akompanata de sia (aŭ de siaj) dependa propozicio, formas kunmetitan propozicion, kiu enhavas plenan penson, je kiu parolado povas halti.

232. Dependaj propozicioj estas ligataj kun ĉefa : aŭ per konjunkcio : *tion mi scias, ĉar tie mi estis ;* aŭ per pronomo rilata : *ĉiuj, kiuj tie estis, konas tion ;* aŭ per demanda vorto : *mi demandas, kie vi sciiĝis tion? — ĉu vi venos baldaŭ,* aŭ *ĉu vi ne venos, respondu !*

233. Kelkaj propozicioj povas, ne estante unuigataj kiel ĉefa kaj dependa, interligiĝi per konjunkcioj, eĉ iafoje sen konjunkcio per simpla aldono : *Via projekto plaĉas al mi, kaj mia patro ĝin aprobas. — Via projekto plaĉas al mi, sed mia patro ĝin malaprobas. — Mi komprenas nek kial vi tiel aprobas tiun projekton, nek kial via patro tiel malaprobas ĝin.*

234. Konjunkcio estas nomata diversmaniere, laŭ rilato, kiun ĝi metas inter ĉefa kaj dependa propozicio. Tiel oni distingas : konjunkciojn klarigajn (ke...), disigajn (aŭ...), kunigajn (kaj...), kontraŭigajn (sed, kvankam...), k. t. p.

235. Konjunkcio povas konsisti el tuta esprimo : *por ke, tiamaniere ke, ĉu... aŭ,* k. t. p.

236. Konjunkcio esperanta ne postulas post si difinitan modon verban (159.) La modo uzota estas ĉiam montrata nur de ideo esprimota : ion certan oni esprimas per indikativo ; kondiĉon duban per kondicionalo ; ordonon, deziron, volon, k. t. p. per imperativo (vidu tiujn modojn en *Verbo).* Tial oni renkontas plej diversajn modojn por la sama konjunkcio :

Li staris, kvazaŭ li vidus teruraĵon.
...Kaj kvazaŭ malaperis subite la historio kaj la tradicioj. (Haml. IV. 5.)
...Li kvazaŭ mem alkreskis al la selo. (Haml. IV. 7.)
...Mi timas, ke vi faras kun mi ŝercojn. (Haml. V. 2.)

Rim. 1. Sekvas de tio ĉi, ke *Subjunktivo* ne ekzistas en Esperanto. Tiu modo estas ja difinita: *modo regata de konjunkcioj.* Kelkaj aŭtoroj nomas *subjunktivo* formon imperativan akompanatan de *ke* (ekz.: *ke mi amu*); sed tie ĉi oni havas simplan imperativon en dependa propozicio, kies ĉefa ne estas esprimita. (Ekz.: *mi volas, deziras, ... ke mi amu.*) Se oni ne konsentas tion ĉi, tiam formo *ke mi amu* estas nur nacia apartaĵo, kiun oni neniel bezonas en lingvo internacia, ĉar simpla imperativo *mi amu* esprimas tiel bone la saman penson.

2. Kompreneble, ke, ĉar iuj konjunkcioj estas pli ofte uzataj por esprimi unu ideon, tial oni renkontas ilin pli ofte kun la responda modo. Tiel ekzemple kun *por ke* oni renkontas nature imperativon: *Mi kuras, por ke mi varmiĝu.*

3. Post konjunkcio oni uzas infinitivon, nur kiam tiu ĉi estas mem subjekto de dependa propozicio (ĝenerala infinitivo, 184), sed neniam, kiam ĝi estas komplemento. Ekz.: *mi diras, ke riĉiĝi estas agrable.* — Sed oni ne diras *ni agas, por ke fariĝi riĉaj* aŭ *tiamaniere, ke fariĝi riĉaj;* oni devas en tia okazo uzi personan modon: *por ke ni fariĝu riĉaj* aŭ se oni volas uzi infinitivon, forigi la konjunkcion: *ni agas, por fariĝi riĉaj.*

II. Apartaj konjunkcioj.

237. *Kaj* (kuniga konjunkcio) unuigas du propoziciojn, du subjektojn, du komplementojn, k. t. p. Oni povas ĝin forigi kaj anstataŭi per komo en rapidaj rakontoj, kiam tio ĉi ne difektas la klaron :

Tie staris viroj, virinoj, infanoj.

238. Reciproke oni povas ripetadi *kaj* por pli forte insisti :

Mi vidis kaj lin, kaj lian fraton.

239. *Aŭ* (disiga konjunkcio) montras diferencon inter du propozicioj aŭ aferoj :

Li ploras aŭ ridas : oni ne bone scias.

240. Ripetante disigan konjunkcion, oni ricevas pli fortan apartigon : *aŭ...aŭ ; ĉu...ĉu ; ĉu...aŭ :*

Aŭ vi forlasis la postenon, aŭ vi ne forlasis ĝin, sed tiam malzorgis averti. En ambaŭ okazoj, ĉu vi forlasis, ĉu vi malzorgis, vi estas kulpa.

241. *Ke* estas nur konjunkcio ; ĝi montras, ke sekvanta propozicio klarigas la unuan, k. t. p. Oni ofte uzas ĝin (kun persona modo) anstataŭ infinitivo. (187.)

242. *Se* (kondiĉa konjunkcio) esprimas, ke ia afero estas farata nur se alia ekzistas, k. c. Neniam ĝi montras demandon. (116, 182.)

243. Komparaj esprimoj estas *kia...tia ; kiom...tiom ; tiel...kiel ; pli...ol ; laŭ ; kiel ekzemple ; kvazaŭ,* k. t. p. (83, 114 Rim. 1). Por montri sekvon, rezulton komparan, oni uzas *ju pli...des pli :*

Ju pli bona, des pli amata vi estos.
Ju pli ni laboros, des pli ni havos rajton ripozi.

Rim. 1. Prefere oni alproksimigas vorton, sur kiun falas ideo. Tiel *ju pli bona* estas preferinde ol *ju pli vi estos bona.*

2. Ofte la unua termino ne estas esprimata. Tiam oni uzas *tiom pli* kaj ne *des pli.* Ekz.: *mi devas averti vin, ke li eble ne estos hejme. — Tiom pli bone.— Mi tute ne deziras lin vidi.*

3. *Ju malpli* oni uzas por montri disigan rezulton.

244. Gradigo estas montrata de *ne nur, ne sole... sed, sed ankaŭ, sed plie :*

Ne nur li ŝtelis, sed li mortigis ankaŭ !
Nia gazeto servas ne sole al la disvastigado de nia lingvo, sed ankaŭ al internaciaj ideoj.

Rim. Se gradigo estas nea, oni enkondukas nean vorton, ekz. *ne: Ne nur mi ne incitigas kontraŭ vi, sed eĉ mi ne malaprobas vian konduton.*

245. Forlaso, forkonsento, kontraŭigo estas montrataj de *kvankam.* Oni ofte uzas *tamen* en la dua frazo, se la konsenta propozicio estas la unua :

Kvankam li estas riĉa, tamen li ne estas feliĉa.
Kvankam mi konsentas vian opinion, tamen mi ne povas akordiĝi kun vi.

Rim. Iafoje oni uzas *kvankam* en senco de *eĉ* : *Sinjorino Anneto nur kun granda malfacilo, povis kompreni, kvankam malmulte, tiun ĉi mirindan produktaĵon de la genia aŭtoro.*

246. *Jen...jen* montras kontraŭigon tempan aŭ manieran :

Jen li kuras forte, jen li haltas.

Rim. Tiu signifo estas tiom pli rimarkinda, ke *jen* sola montras ion proksiman en la spaco aŭ la tempo: *Jen la libro, kiun vi serĉas.*

III. Jeso kaj neo.

247. Por jese respondi demandon oni uzas *jes*. Oni povas aldoni *ja, certe, tamen*, k. t. p. aŭ ripeti la verbon demandan, por pli forte insisti, rebati, k. c. :

Ĉu vi faris tion? — Jes! Jes, mi faris!
Ĉu vi ne faris tion? — Jes, mi faris! Jes, ja! Certe mi faris! Sed ja, mi faris!

248. Kiel oni vidas, oni simple eldiras verbon en respondo, ne esprimante la komplementon :

Ĉu vi deziras kafon? Jes! Mi deziras! aŭ : *ne! mi jam havas.*

249. Por nei simple en frazo aŭ respondo oni uzas *ne* :

Ĉu vi faris tion? Ne!
Mi ne povis manĝi pro dentsufero.

250. Oni uzas neon nur kiam senco de frazo estas vere nea :

Mi timas, ke mia frato venos. (Mi esperas, ke li ne venos.)
Mi timas, ke mia frato ne venos. (Mi deziras, ke li venu.)
Li parolas pli bone ol li skribas (ol li ne estus nekomprenebla).
Kiel ofte mi tremis! (mi ne tremis havus tute alian sencon).

251. Oni ordinare lasas *ne* antaŭ la verbo, kiun ĝi difinas :

Mi esperas, ke li ne venos. (Mi deziras, ke li ne venu.)

Rim. Se oni dirus: *mi ne esperas, ke li venos*, tio ĉi signifus: *mi deziras ke li venu, tamen ne kuraĝas esperi, ke li venos, ĉar kredeble li ne povos veni.*

252. Kiam ekzistas jam en frazo vorto nea per si mem, tiam ordinare oni ne uzas duan neon, ĉar tiel oni povus ricevi jesan sencon. Tio ĉi okazas plej ofte kun *neniu, nenia, neniam, nenio*, k. t. p. *sen*, (kaj derivaĵoj de *sen*), *nek*, k. c. :

Neniu konfesos, ke... (neniu ne konfesos = ĉiu konfesos).
Sen helpo de iu, sen ia dubo.
Neniu homo estas pli bona ol li.
Mi renkontis nek lin, nek lian fraton. (Z.)

Rim. 1. Tamen oni trovas iafoje duoblan neon en senco de pli forta neo: *... metu viajn manojn denove sur la glavon kaj ripetu, ke vi neniam al neniu diros pri la apero de la nokto.* (Haml. I. 5.)

2. Iafoje kun *nek* oni uzas duoblan neon, kiam la dua neo ripetas la unuan en aparta frazero, kaj estas nur disvolvo *de la ĝenerala* unua neo : *Mi ne scias la francan lingvon, nek anglan, nek turkan. — Nenio estas al mi pli kara nek dolĉa ol vi. — Mi ne renkontis lin nek lian fraton.* (Z.)

3. Kompreneble, kiam du neoj rilatas du malsamajn verbojn (esprimitajn aŭ ne esprimitajn), tio ĉi ne estas duobla neo: *Mi ne povis ne skribi. — Ne nur ne malamiko, sed kunbatalanto li estis.*

XIII

STILO

253. **La stilo** estas aparta formo, kiun oni donas al esprimo de sia penso.

254. La vera stilo esperanta estas nek slava, nek germana, nek romana, ĝi estas — aŭ almenaŭ devas esti — nur stilo simpla kaj logika (Z.)

Rim. La stilo esperanta ne imitas blinde la stilojn de aliaj lingvoj, sed havas sian karakteron tute *specialan* kaj *memstaran*, kiu ellaboriĝis en la daŭro de longa praktika uzado de la lingvo kaj pensado en tiu ĉi lingvo antaŭ ol la lingvo estis publikigita.

I. Ordigo de vortoj.

255. Frazon oni aranĝas laŭvole en Esperanto, pro nekonfuzeblo inter subjekto kaj komplemento.

256. Oni aranĝas propoziciojn kaj vortojn tiamaniere, ke ideo estu plej klare esprimita kaj belsoneco plej granda.

257. Sur la unuan lokon oni metas plej gravan vorton aŭ prepozicion. Iafoje sur la lastan, se tie atento estas pli facile altirebla (109 Rim.) :

Lin mi renkontis, ne ŝin.
Unu aferon ni scias, ke ni konas nenion.

258. Laŭ eblo oni alproksimigas vortojn rilatantajn unu al la alia. (Ekz. : adverbo estas apud verbo, prepozicio apud komplemento, rilata pronomo apud rilatanto, k. t. p.) :

Li tre ŝatas kuradi.
Per letero, kiun mi konservis, li sciigis al mi kaj al mia frato, ke li ŝuldas ankoraŭ mil frankojn.

Rim. La supra regulo malhelpas ofte skribi neklarajn frazojn. Se ne tro malbona estus frazo *li sciigis al mi kaj al mia frato per letero, kiun mi konservis, ke* ... kontraŭe oni tuj vidas, ke en jenaj frazoj senco estus tre duba: *Salomono, filo de Davido, kiu konstruigis Templon, ricevis viziton de reĝino. — Li amas multe kuradi.* Oni do devas skribi: *Filo de Davido, Salomono, kiu konstruigis* ... kaj *li multe amas kuradi* aŭ: *li amas kuradi multe.*

259. Ripetadon de pluralaj akuzativoj oni laŭ eblo evitas ; aŭ almenaŭ oni klopodas por meti ilin antaŭ vorton, kiu komencas per vokalo. Por eviti akuzativon, oni povas uzi esprimojn *kelke da, multe da* anstataŭ *kelkaj, multaj,* aŭ prepozicion *al,* k. t. p. (222. R.):

Mi havas multe da hundoj, bovoj, ĉevaloj.
Mi renkontis ilin akompanantajn iliajn amikinojn (aŭ : *kiam ili akompanis iliajn amikinojn).*

II. Interpunkcio.

260. **La interpunkcio** estas arto distingigi per specialaj signoj la propoziciojn aŭ ĝiajn partojn.

La plej uzataj interpunkciaj signoj estas jenaj : *komo* (,), *punkto* (.), *punktokomo* (;), *dupunkto* (:), *ekkriopunkto* (!), *demandosigno* (?), *interrompaj punktoj* (...), *streketo* (—), *kuniga streketo* (-), *krampetoj* (« »), *krampoj* ([ ]), *parentezoj* ( ), *steleto* (*).

261. **Komo** (,) estas uzata por apartigi subjektojn, atributojn, verbojn, propoziciojn :

Leono, tigro, ĉevalo estas bestoj.
La hundo estas milda, bona, fidela,
Oni dancas, drinkas, dibočas.
La libro estas sur la tablo, kaj la krajono kuŝas sur la fenestro (Z.)

Komo estas ankaŭ uzata por apartigi la apoziciojn, komplementajn propoziciojn, ĉiujn enplektitajn frazetojn kaj antaŭ rilata pronomo :

Johano, estu pli bona por via patrino.
Budrys, forta kaj sana, maljunulo litvana, sur la korton alvokas tri filojn.
En ĉiu regiono, kiun vi vizitas, vi trovas ion admirindan.
La paco, diras iuj, venkos la militon.
Mi sentas, ke la morto baldaŭ min vokos (Z.)
Al ĉiuj anoncu, por ke ĉiuj sciu (Z.)
Ĉiuj diris al li la veron tiel, ke li ekkomprenis.

Rim. Generale oni ne metas komon inter du vortoj aŭ du propozicioj kunigitaj per konjunkcioj: *kaj, aŭ, nek-nek.*

262. **Punkto** (.) estas uzata ĉe la fino de frazo : *Mia onklo loĝas en Berlino.*

Ĝi estas ankaŭ uzata ĉe mallongigoj : *t. e., k. a., ekz.*

263. **Punktokomo** (;) estas uzata por disigi la frazojn, kiuj kvankam gramatike apartaj, estas tamen en logika rilato, kaj kie

komo estus tro malforta kaj punkto tro forta apartigilo : *Nun mi legas, vi legas kaj li legas ; ni ĉiuj legas.* (Z.)

264. **Dupunkto** (:) estas uzata ĝenerale : antaŭ citaĵo : *Esperantistoj diris : « Ni fosu nian sulkon »*, citataj vortoj : *Jen la kvin partoj de nia tero : Afriko, Ameriko, Aŭstralio, Azio kaj Eŭropo.*

265. **Ekkriopunkto** (!) estas uzata ĉe la fino de frazo, kiu distingiĝas per surprizo, teruro, ĝojo, admiro k. s. : *Kia bruo !*

266. **Demandosigno** (?) estas uzata ĉe la fino de frazo post rektaj demandaj frazoj : *Kien vi iras ?*

267. **Interrompaj punktoj** (...) montras la intencan forsilenton, interrompon : *Kaj ili komencis diskuti...*

268. **Streketo** (—) estas metata por anstataŭi vorton, kiu aliel estus ripetota : *Ni marŝis kune ; ŝi — ankaŭ,* kaj en dialogoj por montri la ŝanĝon de interparolanto :

— *Ĉu vi amas min, Eva ?*
— *Vi scias ja bone...*
— *Ĉu vi amos min ĉiam ?*
— *Vi scias ja bone...*

269. **Kuniga streketo** (-) estas uzata ĉe divida transporto de vorto el unu linio al la alia kaj ĉe diversaj vortkunigoj (70, 71). Jen kion Zamenhof diris pri transportado de vortoj en la jaro 1893 :

» Transportante la vortojn el unu linio en la sekvantan, ni ordinare dividas ilin per iliaj partoj gramatikaj, ĉar ĉiu parto gramatika en nia lingvo prezentas apartan vorton. Tiel ni ekzemple dividas : *Esper-anto, ricev-ita,* k. t. p. Sed tio ĉi tute ne estas deviga regulo ; ni faras ĝin nur por ne rompi subite kun la kutimoj de aliaj lingvoj ; efektive tiu ĉi maniero havas nenian celon kaj signifon, ĉar la transportado de la vortoj estas afero pure papera, havanta nenion komunan kun la leĝoj de la lingvo, ni konsilas al vi per nenio vin ĝeni en la dividado de la vortoj kaj fari ĝin tute tiel, kiel en la donita okazo estos al vi pli oportune. Eĉ se vi dividos ekzemple *aparteni-s*, ni vidus en tio ĉi nenion malregulan, kvankam la aliaj lingvoj (tute sen ia logika kaŭzo) ne permesas tian dividadon. «

Ni opinias, ke pli racie estas dividi la vortojn laŭ ilia natura elparola silabigo. Ni sekvas tiun metodon en tiu ĉi verko (Vd 1-12).

270. **Krampetoj** (« ») estas uzataj ĉe komenco kaj fino de citata vorto aŭ frazo, ofte eĉ komence de ĉiu linio aŭ de ĉiu verso de la citata teksto ; ofte ankaŭ por substreki iun vorton.

271. **Parentezoj** ( ) estas uzataj por apartigi vortojn aŭ priklarigajn frazojn, gramatike kun la ĉefa frazo neligitajn.

272. **Steleto** (*) estas uzata por montri la malsupre de la paĝo lokatajn alnotojn.

XIV

VERSFARADO

273. **La versfarado** estas arto aŭ maniero fari versojn.

274. **La perfekta versfarado** sin bazas sur triobla harmonio : mezura, akcenta kaj rima.

275. **La blanka versfarado** sin bazas nur sur duobla harmonio : mezura kaj akcenta.

276. **Verso** nomiĝas serio da vortoj ritme (harmonie) ordigitaj.

277. **Lama verso** nomiĝas verso, kiu pekas kontraŭ la reguloj de la ritma harmonio.

278. **Strofo** estas harmonia aro da versoj kunigita en unu ritman tuton.

279. **Mezuro** nomiĝas la difinita nombro de silaboj, el kiuj konsistas verso.

I. Akcento.

280. **Akcento** estas plilaŭtigo, plifortigo de la voĉo sur unu silabo de la vorto. Ĉiu vorto konsistas el akcentoj *ĉefaj* kaj *flankaj* (aŭ duonakcentoj).

281. **La ĉefa akcento** estas la regula gramatika akcento : *pa-tro.*

282. **La flanka akcento** estas la akcento, kiun ricevas la aliaj silaboj depende de la ĉefa akcento kaj je interspaco de unu aŭ du silaboj : *sono*rado (— ⏑ — ⏑), *mi*litistaro (— ⏑ ⏑ — ⏑ aŭ ⏑ — ⏑ — ⏑).

Unusilabaj vortetoj estas konsiderataj kiel neŭtraj silaboj kaj ricevas, aŭ ne, la duonakcenton :

Ja *nun* kun *vi* kaj *nur* por *vi* mi vivas. (Z.)

II. Ritmo.

283. **Ritmo** nomiĝas harmonia, perioda sinsekvo de akcentitaj aŭ neakcentitaj silaboj.

Laŭritme ni distingas du ĝeneralajn formojn de la verso : du-kaj trisilabajn ritmojn.

III. Dusilabaj ritmoj.

284. **Dusilaba ritmo** estas ritmo konsistanta el dusilaba versomezuro.

285. **Troĥeo** (‒ ⏑). Dusilaba versomezuro konsistanta el unu akcentita kaj unu neakcentita silabo :

Ĉe malnova || samovaro
sidas ruso || kaj hungaro
dum la akvo || zume bolas
la amikoj || ekparolas.

BAGHY

Alte super la abismo
Roko kun ruino pendas.
Raŭkaj korvoj ĉirkaŭgrakas,
kaj en fendoj vento plendas.

Teo JUNG.

286. **Jambo** (⏑ ‒). Dusilaba versomezuro konsistanta el unu neakcentita kaj unu akcentita silabo :

Ho, mia kor', ne batu maltrankvile,
el mia brusto nun ne saltu for ;
jam teni min ne povas mi facile,
ho, mia kor'...

ZAMENHOF.

Alterne ĉiam venas kaj defluas
la ondoj de la vivo en la kor',
simile al la maro ili bruas
kaj, rokojn atakinte, rampas for.

N. HOHLOV.

IV. Trisilabaj ritmoj.

287. **Trisilaba ritmo** estas ritmo konsistanta el trisilaba versomezuro :

288. **Amfibrako** (⏑ ‒ ⏑). Trisilaba versomezuro konsistanta el unu akcentita inter du neakcentitaj silaboj :

Saluton, heroldo matena, tro frue, tro frue vi krias,
ankoraŭ forestas la lumo, eĉ vin radio ne strias ;
ripozas, en dolĉa sonĝado dronante, la paca vilaĝo
kaj sternas la roson krepusko tra tuta herbeja vizaĝo.

N. HOHLOV.

Ekludu !...
La kordoj eksonu solene,
kaj kanto ekfluu tra l' mond' senrevene,
ektremu la koro,
ektremu sentanta,
kaj forton de l' ploro
la koron ŝiranta
per kanto vi sendu al mond' senrevene.

ELSKI.

289. **Anapesto** (⏑ ⏑ ‒). Trisilaba versomezuro konsistanta el du neakcentitaj kaj unu akcentita silabo :

Vento flavajn foliojn deŝiras,
ilin ĵetas kolere al ter'.
Falas pluv'... Mia koro sopiras ;
ree venas al ĝi malesper'.

DEŜKIN.

En dezert' senigita de herb' kaj arbar',
bruligita de suna radio,
kvazaŭ ia minaca rabisto, Ankaŭ'
sola staras en muta rabio.

SOLOVJEV.

290. **Daktilo** (‒ ⏑ ⏑). Trisilaba versomezuro konsistanta el unu akcentita kaj du neakcentitaj silaboj :

Brilas okuloj, plenplenaj || de ama larm'
pro dolĉatendo, ekstazo || kaj rav' ;
tamen en koro sentiĝas || de dram' alarm'...

E. MIĤALSKI.

Armojn mi kantas kaj viron, || unua el bordoj
[Trojanaj,
kiu alvenis, || fatale puŝita, || kaj ĝis Lavinlando,
lando itala, || longtempe tra tero || kaj maro vagadis,
dia de volo ; || ĉar lin persekutis || Junona kolero.

VALIENNE.

V. Cezuro.

291. **Cezuro** estas la paŭzo, kiu regulas la kadencon en verso. Ĝenerale ĝi dividas la plimulton de longaj versoj kaj troviĝas :

a) Ĉu post la ĉiam sama nombro de silaboj :

Dolĉa ripozo, || kviete silenta
regas denove || en mia kor'
kaj la doloro || kruele turmenta
pro via amo || jam flugis for.

BAGHY.

La feliĉo || ne en amo...
am' nur revo, || iluzi'
Venas ĝi nur || kiel flamo
Kaj doloras || sen konsci'

GRENKAMP.

b) Ĉu post ŝanĝebla nombro de silaboj :

(4) *En la mondon || venis nova sento*
(4) *Tra la mondo || iras forta voko*
.....
(6) *Nia diligenta || kolegaro*
.....
(6) *Inter la popoloj || dividitaj.*

ZAMENHOF.

Rim. Ĉe imitado de heksametra verso la cezuro falas post la silabo, kiu sekvas la trian ĉefan akcenton, se ne, la duan kaj la kvaran. (Vidu la ekzemplojn ĉe *daktilo.*)

VI. Rimo.

292. **Rimo** nomiĝas samsona finaĵo en minimume du versoj. Ekzistas rimo *ina* kaj *vira*.

293. **Ina rimo** estas tiam, kiam la samsona finaĵo konsistas el du silaboj aŭ pli ĝuste el du vokaloj, kies unua estas akcenta :

Unu belon || havas homo
dum la vivo || tiu tera :
amikeco || ĝia nomo,
amikeco || kora, vera.

ESKA.

En la mondon venis nova sento,
tra la mondo iras forta voko ;
per flugiloj de facila vento
nun de loko flugu ĝi al loko.

ZAMENHOF.

294. **Vira rimo** estas tiam, kiam la samsona finaĵo konsistas el unu akcenta silabo, aŭ unusilaba aŭ apostrofita vorto :

Tiom da larmoj kaj dolor'
ne estas en infer',
kiom mi portas en la kor'
vivante en mizer'

BAGHY.

Krome renkontiĝas en nia poezio jenaj rimoj :

295. **Rimo enklitika,** transira inter la vira kaj ina rimoj, en kiu la lasta unusilaba vorteto perdas sian akcenton. La iniciatinto de tiu rimo estis nia poezia majstro Grabowski :

Senrima kanto estas por mi
flor' sekigita, sen odor' ;
aŭtun-arbar' iĝanta dormi —
la muzikistoj flugis for.

296. **Rimo ekzotika,** en kiu la esperanta finaĵo de unu verso rimas kun fremda vorto de la alia :

Dukorda lir' ne igas fini
la kanton, se nur en lernej'
de l' granda majstro Paganini,
ni studis diligente plej.

Mi eĉ demandis ridetante,
ĉu ne aperos ankaŭ sen
ornama rim', l'estrin' de Dante
vestita en hiton' aŭ ĥlen'.

GRABOWSKI.

Esperanto - rondo
Vyškov, Školní 4

297. **Asonanco** estas neperfekta rimo, kiu sin bazas nur sur similsoneco kaj ne sur la samsoneco :

Kie estas deziroj ribelaj?
Kien iris florinta animʼ?
Ĉu la frato jam vidas anĝelojn?
Ĉu li estas libera, sen limʼ?

MIĤAJLOVA.

298. Ofte rimo estas renkontata ne nur fine de versoj, sed ankaŭ interne de la verso ; jen kiel cezura vorto :

Budrys forta kaj sana || *maljunulo* litvana
.....
Iru tuj en la stalojn || *selu bone* ĉevalojn.

GRABOWSKI.

jen interplektita laŭ gusto de poeto :

Ĉio vendas sin sen veo *el la ora* areneo,
Kaj pereo *jam ne estas atendata time finʼ*

N. HOHLOV.

Ĉu mi vin amis || *tion mi ne* scias,
sed ŝajne tamen || *iom por vi* flamis
Ĝi sonĝo estis, || *tion vi* konscias...
El sonĝʼ maldorma || *jam nenio* restis.

GRENKAMP.

299. Tro facila kaj tro ofte renkontata rimado nomiĝas **adasista rimado.** Al tiu kategorio apartenas antaŭ ĉio rimoj kun la trouzo de sufiksoj :

Kuŝas somero la varma
sur via rozeta vangeto,
Kuŝas la vintro malvarma
en via malgranda koreto.

*
* *

Via koro por amado,
frunto por kroneťʼ.
Buŝo via por kisado,
por kareśʼ, maneťʼ...

300. **Aliteracio** estas intenca aŭ neintenca ripetado de samaj aŭ similsonaj literoj aŭ silaboj :

Vokas voĉʼ de Veinemoinen,
vibras vokʼ en vaga vento,
kaj ĝin muĝas malproksimaj
montoj, maroj murmurantaj.

KALOCSAY.

Mia voĉo, voĉ, la voĉo
Vibras, saltas, fluas, kuras,
tiklas, hurlas aŭ murmuras...

GRENKAMP.

Vortfarado en Esperanto

UNUA PARTO

GENERALA ESPLORO DE LA DERIVADO

DIFINOJ. — Per la vorto *derivado* en Esperanto ni celas la formadon de vortoj per unu radiko kaj unu aŭ kelkaj afiksoj :

varm + igi = varmigi.
varm + ig + ado = varmigado.

Per la vorto *kunmetado* ni komprenas la formadon de vortoj per kombino de du aŭ kelkaj radikoj :

vapor + ŝipo = vaporŝipo.

Ambaŭ sistemoj povas esti uzataj samtempe :

varm + ban + ej + o = varmbanejo.

ORDIGO DE LA RADIKOJ. — En Esperanto, ĉiuj radikoj povas esti ordigataj laŭ du ĉefaj klasoj :

1° radikoj esprimantaj ideojn *(hom, varm, kur)* ;

2° radikoj esprimantaj rilatojn inter ideoj *(kaj, krom, kun, kiam, tre)*.

Por plifaciligi la komprenon kaj la elparoladon, oni kutime ne uzas la radikojn « ideajn » sen aldono de etiketo montranta pli klare ilian naturon kaj gramatikan rolon *(o, a, i, e, as,* k. c.) La « rilatajn » radikojn oni kontraŭe uzas plej ofte sen ia ajn aldono.

En la sekvanta studo, ni okupos nin nur pri la « ideaj » radikoj.

IDEAJ RADIKOJ. — La ideaj radikoj, eĉ sen iu aldono, havas per si mem naturan fundamentan signifon. Oni povas ekzemple kompreni facile, kvankam laŭ iom nepreciza maniero, ke *bel, hund* kaj *kur* ne esprimas samspecajn ideojn. Tute nature, *bel* elvokas ideon de kvalito, *hund* elvokas ideon de estaĵo, *kur* elvokas ideon

de agado. Tio ĉi pravigas la ordigon de ĉiuj ideaj radikoj laŭ tri klasoj :

a) **kvalitoj :** adjektivo *(bel, varm, kuraĝ)* ;
b) **estaĵoj :** substantivoj *(hom, hund, dom)* ;
c) **agadoj :** verboj *(est* (1), *kur, am, sid)*.

Kiel ni ĵus vidis, por la uzado oni aldonas al tiuj radikoj :
A por adjektivoj : *bela, varma, kuraĝa* ;
O por substantivoj : *homo, hundo, domo* ;
I por verboj : *esti, kuri, ami, sidi* (laŭ tempoj kaj modoj, *as, is, os, us, u)* (2).

SIMPLA DERIVADO. — Ĉiu tia radiko povas naski vortojn derivitajn, ĉu samklasajn, ĉu aliklasajn, per uzado de taŭgaj afiksoj. Alivorte, ĉiu adjektivo povas naski adjektivojn, substantivojn, verbojn ; ĉiu substantivo povas naski substantivojn, adjektivojn, verbojn ; ĉiu verbo povas naski verbojn, substantivojn, adjektivojn. **Tio ĉi estas la derivado de la vortoj.**

Ekzemple, por fari substantivon el adjektiva radiko, oni aldonas al ĝi la substantivan finaĵon o : *varma, varmo ; bela, belo ; kuraĝa, kuraĝo*, k. t. p.

Simile, por fari adjektivon el substantiva radiko, oni aldonas la adjektivan finaĵon *a : patro, patra ; domo, doma ; hundo, hunda*.

Kaj simile per *i* kaj e.

Tio ĉi estas la plej simpla, plej ĝenerala kaj plej ofte uzata sistemo de derivado : **ĉiufoje, kiam la simpla interŝanĝo de « o », « a », « i », ĉe la radikoj sufiĉas por klare esprimi la penson,** ĉu per si mem, ĉu per helpo de la kunteksto, **oni devas kontentigi sin per ĝi** kaj ne superflue longigi kaj komplikigi la vorton per uzo de pluaj nuancigaj afiksoj.

Kiel ni vidos iom poste, la simpla interŝanĝo de o, *a, i* ĉe la radikoj liveras vortojn larĝsencajn, facile uzeblajn kaj kompreneblajn sen teda analizado de la nuancetoj de la penso kaj de la gramatika interrilato de la vortoj. En la granda plimulto de l'okazoj, estas superflue uzi precizegajn vortojn por komprenigi sin. Kiam, ekzemple, ni parolas pri *pluvo*, ni ordinare ne scias, ĉu ni celas aparte la *pluvadon*, la *pluvaĵon* aŭ la *pluvecon* ; se ni devus nepre

(1) *Estado* estas agado, el la filozofia vidpunkto, kvankam ĝi montras staton. Sed ĉar la « stataj » vortoj esprimas ideon tre proksiman al kvalito, oni kelkafoje povas embarasiĝi por trovi la ĝustan klason al kiuj apartenas tiaj vortoj. Tio ĉi klarigas, kial kelkaj tiaj vortoj estas uzataj jen adjektivece, jen verbece, kvankam tio estas malofta.

(2) Adverboj povas esti konsiderataj, kiel subkategorio de adjektivoj : verbaj adjektivoj.

elekti unu el ĉi tiuj lastaj formoj, ni ofte estus tre ĝenataj. Ni do preferas esprimi per unu ĝenerala vorto samtempe la tri ideojn entenatajn en *pluvaĵo, pluvado, pluveco*, kaj ni uzas preskaŭ ĉiam nur tiun larĝsencan, sed sufiĉe klaran kaj multe pli oportunan vorton *pluvo*.

Simile, se ni deziras uzi adjektive la substantivan radikon *patro*, ni diros *patra*, kaj per tiu ĉi sola *patra* ni tradukos, laŭokaze, kaj indiferente, jen « kiu apartenas al la patro » (ekz. : *jen estas la patra ĉapelo)*, jen « kiu estas verkita de la patro » (ekz. : *ĉu vi deziras vidi la lastan patran pentraĵon ?)*, jen « kiu havas econ de patro » (ekz. : *kiam vi havos infanojn, vi vidos, ke la patra idealo estas tute alia, ol vi nun pensas)* ; la simpla vorto *patra* tradukas jen *patraĵa*, jen *patreca*, kaj multon da aliaj nuancetoj de tiu ĉi ideo, kiujn ni estus tre embarasataj ĝuste difini, **se ni devus elekti inter amaso da specialaj sufiksoj, sed kiujn ni tre bone komprenas per nia simpla adjektiva sufikso « a ».**

Simile ankaŭ : se mi estas malsana, mi diros tre simple kaj senpripense : *mi estas malsana, mi malsanas, mia malsano longe daŭris ;* se vi estas kuracisto, vi diros, ekzemple : *multaj malsanoj estas nun en la urbo*. Neniu embarasiĝos, kaj vi esprimos multe pli oportune vian penson, ol se vi devus nepre diri jen *malsano*, jen *malsanado*, jen *malsaneco*, jen *malsanaĵo*, jen *malsanulo*, k. t. p.

La ĉefa derivado en Esperanto estas do la simpla derivado ; ĉiu esperantisto uzas ĝin kvazaŭ instinkte kaj senpene, kaj komprenas per si mem, ĉu li parolas klare aŭ ne.

Se tamen tro konfuza estas la frazo, aŭ se oni nepre bezonas esprimi la nuancojn de l'adjektivaj, substantivaj aŭ verbaj ideoj, tiaokaze oni uzas pli altan gradon de derivado, per la helpo de aliaj afiksoj ol o, *a, i* ; en tio ĉi konsistas la *malsimpla derivado*, kiun ni tuj esploros.

Tiun malsimplan derivadon oni devas do uzi nur, kiam la simpla ne sufiĉas.

MALSIMPLA DERIVADO. — Ni ĵus vidis, ke la malsimpla derivado konsistas el formado de vortoj per la helpo de la diversaj afiksoj, aliaj ol o, *a, i, e*, tio estas per la afiksoj montrataj en ĉiuj gramatikoj : *in, ig, ul, ec, mal, re*, k. t. p.

Tiuj ĉi afiksoj dividiĝas en *prefiksoj*, kiujn oni metas antaŭ la radikon *(mal, ge re)*, kaj *sufiksoj*, kiujn oni uzas post la radiko *(in, ul, ec)*. Sed tiu divido estas nur ekstera, fizika, kaj neniel sufiĉas por ordigi la afiksojn laŭ ilia gramatika rolo kaj naturo.

Oni ankaŭ povas ilin ordigi laŭ du manieroj :

a) *laŭ la speco de vortoj, kiujn ili naskas* : afiksoj naskantaj

adjektivojn *(em, ebl, ind)*, substantivojn *(aj, ec, ul)* aŭ verbojn *(ig, iĝ)* :

b) *laŭ la radikoj*, al kiuj ili prefere algluiĝas : afiksoj uzataj kun ĉiuspecaj radikoj kaj ordinare modifantaj ilin nur grade aŭ direkte *(et, eg, mal)*, kaj afiksoj uzataj nur kun unu aŭ du klasoj de radikoj. Tion oni vidos laŭ la tabeloj troveblaj sur la sekvantaj paĝoj.

Sed multe pli praktike estas kompari la klason de la vorto liverita de l'afiksoj kun la klaso de l'radiko ; *ĉiu radiko povas ja naski, ĉu samspecajn vortojn ĉu alispecajn*. Tio signifas, ke adjektiva radiko povas liveri diversajn adjektivojn, substantivojn aŭ verbojn ; ĉiu substantiva radiko povas liveri, substantivojn, adjektivojn aŭ verbojn ; ĉiu verba radiko povas liveri verbojn, substantivojn aŭ adjektivojn.

Ekzemple, *varm*, adjektiva radiko, liveras adjektivojn *varmet, varmeg, malvarm, malvarmet, nevarm*, k. t. p. ; ĉiuj ĉi vortoj estas **samklasaj ;** ili ĉiuj estas adjektivoj, kiel ilia komuna radiko, kaj ili diferencas inter si nur grade aŭ direkte *(et, eg,* ŝanĝas la gradon : *mal, ne,* ŝanĝas la direkton kaj el radiko pozitiva *varm* liveras negativan *malvarm*, nulan *nevarm)*. Sed *varm* povas liveri ankaŭ **aliklasajn** vortojn, kiuj ne estas adjektivoj : substantivojn, kiel *varmec, varmaĵ, varmul ;* verbojn kiel *varmig, varmiĝ*, k. t. p.

Simile, la substantiva radiko *patr* liveras samklasajn vortojn, substantivojn *patrin, bopatr, patret, prapatr ;* kaj aliklasajn vortojn : adjektivojn *(senpatr)* kaj verbojn *(patriĝ)*. La verba radiko *am* liveras samklasajn vortojn, verbojn *ameg, malam*, kaj aliklasajn vortojn, substantivojn *(amad)* kaj adjektivojn *(amem, amind)*.

En la praktika uzado de la lingvo, estas evidente, ke oni bezonas precipe scii, kiamaniere oni povas formi, el difinita radiko, ĉu samklasan, ĉu aliklasan vorton. Kiam ni parolas, se ni volas esprimi ekzemple la ideon *bel* — la sola afero utila estas scii, kiamaniere ni povas tiri el tiu radiko laŭvole adjektivon, substantivon aŭ verbon. Tial ni ne komparos pli longe la afikson inter si el la vidpunkto de iliaj abstraktaj rilatoj, sed ni tuj konsideros la derivadon de aliklasaj kaj samklasaj vortoj kompare je la fundamenta radikvorto (1).

(1) Tiu ĉi sistemo kondukas nin al konsiderado de diversaj vortoj, kiel afiksoj ; prepozicioj, eĉ adverboj, havas tre ofte rolon de prefiksoj, kiel ankaŭ diversaj afiksoj povas esti uzataj radike. Ekzemple, la adverboj *ne pli, malpli*, la prepozicioj *sen, kun, de* k. t. p., estas ekstreme ofte uzataj prefikse ; la afiksoj *in, ul, mal*, k. t. p., estas ofte uzataj radike *(ino, ulo, malo)*. Aliparte, kunmetita vorto povas fariĝi siavice duagrada radiko (ekz. : *arbo, senarbigi, arbaro, rearbarigi)*. Ni do ne povas starigi fundamentan diferencon inter la afiksoj kaj la aliaj radikoj esperantaj : ĉiuj estas kvazaŭ memstataj radikoj, kaj la derivado de vortoj, laŭ tiu kompreno, povus esti rigardata, *kiel simpla kunmetado de radikoj*. Sed, pro la ofteco de diversaj difinitaj okazoj, estas bone konservadi en la praktiko la ordinaran nomaron de niaj lingvoj, kvankam ĝi ne tute taŭgas por aglutinativa lingvo, kiel Esperanto.

ALIKLASA DERIVADO

La radiko povas esti :

	ADJEKTIVA	SUBSTANTIVA	VERBA
	—	—	—
kaj naski	substantivojn	adjektivojn	substantivojn
	verbojn	verbojn	adjektivojn

ALIKLASA DERIVADO. — I. Verboj naskataj de adjektivaj radikoj. — Ĉiuj adjektivaj radikoj esprimas ideon de kvalito. La devenantaj verboj esprimas unu el la tri jenaj agoj :

a) Estado. Oni aldonas simple *i (as, is, os...)* al la radiko : *sana, sani ; utila, utili ; furioza, furiozi ;* **kuraĝa,** *kuraĝi*. Pli ofte oni uzas analizan formon per la helpo de verbo *esti* kaj la simpla adjektivo : *esti varma, esti bela, esti sana, esti utila, esti kuraĝa, esti furioza*, k. t. p.

b) Farado, meto en staton... Oni uzas la sufikson *ig : sanigi, utiligi, varmigi, furiozigi, beligi, kuraĝigi*, k. t. p. Malofte, oni uzas analizan formon per la helpo de verbo *igi* aŭ de verbo *fari* kaj la simpla adjektivo : *igi* aŭ *fari bela, kuraĝa*, k. t. p.

c) Fariĝado, veno en staton... Oni uzas la sufikson *iĝ : saniĝi, utiliĝi, furioziĝi, kuraĝiĝi, varmiĝi, beliĝi*. Oni kelkafoje ankaŭ uzas analizan formon per la helpo de la verbo *fariĝi* kaj la simpla adjektivo : *iĝi* aŭ *fariĝi varma, bela, sana, utila, furioza*, k. t. p.

ALIKLASA DERIVADO. — II. Verboj naskataj de substantivaj radikoj. — Ĉiuj substantivaj radikoj montras estaĵon vivantan aŭ nevivantan : *hom, patr, hund, dom, ŝton*. La devenantaj verboj esprimas unu el la jenaj agoj :

a) Estado. *Oni ĉiam uzas analizan formon* per la helpa verbo *esti* kaj la simpla substantiva radiko : *esti patro, esti homo, esti hundo*. (Sekve oni ordinare ne diras sinteze : *patri, homi, hundi.)*

b) Farado, meto en staton... Oni uzas la sufikson *ig : patrigi, edzinigi*, aŭ la analizan formon : *igi* aŭ *fari patro, edzino* (1).

(1) Rimarku la nominativecon de tiu ĉi substantivo, kiu estas vera predikato.

c) Fariĝado, veno en staton... Oni uzas la sufikson *iĝ : patriĝi, bestiĝi.* Kelkafoje oni ankaŭ uzas la analizan formon : *iĝi* aŭ *fariĝi patro, besto.*

d) Uzado de, agado per... Oni uzas la sufikson *um : martelumi, kronumi, telefonumi, florumi, orumi.* Se nenia malklaro estas timinda, oni povas mallongigi la vorton, forlasante la sufikson *um* kaj uzante simplan *i (as, is, os...) : marteli, brosi, kroni, telefoni, disbuki, ĉirkaŭbraki, flori, sangi, sali,* k. t. p. (2). Oni vidas, kiom grava estas la natura kaj fundamenta ordigo de la radikoj laŭ adjektivoj, substantivoj kaj verboj. **Ĉar la sama verbigilo « i » signifas kun adjektivaj radikoj esti, kaj kun substantivaj radikoj ĝi signifas « agi per »...**

ALIKLASA DERIVADO. — III. Substantivoj naskataj de adjektivaj radikoj. — La substantivoj naskataj de adjektivaj radikoj esprimas unu el la jenaj objektoj : estaĵo vivanta, estaĵo nevivanta, estaĵo morala aŭ kvalito.

a) Estaĵo vivanta. Oni uzas la sufikson *ul : sanulo, varmulo, belulo, kuraĝulo,* k. t. p.

b) Estaĵo nevivanta. Oni uzas la sufikson *aĵ : belaĵo, varmaĵo, kuraĝaĵo,* k. t. p. *Âĵ* kaj *ul* montras do konkretajn estaĵojn.

c) Estaĵo morala aŭ abstrakta, kvalito. Oni uzas la sufikson *ec : saĝeco, varmeco, kuraĝeco, beleco, saneco,* k. t. p.

Kiam nenia malklaro estas timinda, aŭ kiam oni deziras tute ĝeneralan substantivon, oni povas forlasi la sufikson *ul, aĵ, ec,* kaj uzi la simplan : *o : bluo, bono, belo, vero, grando, varmo, kuraĝo, sano, la nigroj kaj la blankoj,* k. t. p.

ALIKLASA DERIVADO. — IV. Substantivoj naskataj de verbaj radikoj. — Ĉiuj verbaj radikoj esprimas agon : *esti, vivi, dormi, ami.* La devenantaj substantivoj montras unu el la jenaj aferoj :

a) Fariĝo de l'ago (verba substantivo). Oni uzas la sufikson *ad : amado, kurado, estado,* k. t. p. Kiam la ideo

(1) Kompreneble, tiuj mallongigitaj vortoj povas, kiel ĉiuj aliaj verboj, alpreni la sufikson *ad*, ĉu por montri pli longan daŭron de l'agado, ĉu por naski derivantan substantivon (vid. *ad*) ; en tiu ĉi lasta okazo, *ad* evitas konfuzon inter la simpla objekto montrata de la radiko *(martelo)* kaj la uzado montrata de l' substantivo verba *(martelado).* Tio ĉi klarigas la formojn *kroni, kronumi, kronadi, kronumadi, kronado, kronumado,* kiuj estas absolute egalvaloraj.

estas tre ĝenerala, aŭ se oni timas nenian malklaron oni forlasas la *ad* kaj uzas la simplan *o : amo, kuro, dormo,* k. t. p. La uzo de la sufikso *ad* difinas pli klare la agan ideon, sekve plifortigas ĝin. Tial, oni kutimas diri, ke la sufikso *ad* esprimas daŭron de ago.

b) La rimedo, per kiu estas farata la ago. Oni uzas la sufikson *il : kudrilo, skribilo, trancilo,* k. t. p. La vorto tiel formita estas tre ĝenerala, kaj specialaj radikoj aŭ kunmetitaj vortoj estas necesaj en kelkaj okazoj por pli precize nomi la objektojn ; sed la *il*-vortoj estas tre oportunaj en la komuna uzado de la lingvo.

c) La aganto, la faranto de l'ago. Oni uzas unu el la aktivaj participaj sufiksoj *int, ant, ont,* laŭ la tempo, kun la substantiva sufikso *o : savanto, kreinto, venonto* (1), aŭ laŭokaze la metian sufikson *ist : kuracisto.*

d) La agato, la objekto aŭ celo de l'ago ; tiu sur kiun oni agas. Oni uzas unu el la pasivaj participaj sufiksoj *it, at, ot,* laŭ la tempo, kun la substantiva sufikso *o : savito, amato,* k. t. p. Iafoje ankaŭ, kiam la ideo estas tre ĝenerala, la simpla *o* estas uzebla : *skribo, pluvo,* k. t. p.

e) La loko, kie fariĝas la ago. Oni uzas la sufikson *ej : preĝejo, kuirejo.*

ALIKLASA DERIVADO. — V. Adjektivoj naskataj de substantivoj. — Kiam nenia malklaro estas timinda, aŭ kiam ĝi estas negrava, **oni kutime ne difinas precize la rilaton ekzistantan inter la adjektivo kaj la ĝin naskinta substantiva radiko;** oni do formas plej ofte ĝeneralan, elastan, larĝsignifan vorton per la simpla adjektiva *a : homa agado, ĝardena pordo, kuraĝa faro, ŝtona vojo, mona virino,* k. t. p.

En la sekvanta tabelo oni trovos diversajn ekzemplojn, el kiuj oni vidos, ke la vorto formita per simpla *a,* kvankam ĝi estas la plej facile farata kaj la plej mallonga, estas ankaŭ ofte la malplej klara. La sama rimarko valoras por la kunmetitaj vortoj (sintezaj formoj) de la tria kolono.

Se oni bezonas plipreciziĝi la rilaton, tiaokaze oni uzas kunmetitan vorton aŭ prepozicion uzatan prefikse.

(1) Estus eble pli ĝuste, konsideri la participajn sufiksojn, kiel verbajn adjektivojn. La formoj *anto, ato,* k. c. estus, en tia kompreno, mallongigoj de *antulo, antaĵo,* k. t. p. Ni preferas tiun ĉi lastan komprenon, sed prezentis la aferon iom malsame, por ne komplikigi nian teorion, kiun ni deziras fari plej praktika

TABELO UNUA

ADJEKTIVOJ NASKATAJ DE SUBSTANTIVOJ

Ĝenerala sufikso : a.

RILATO	ANALIZA FORMO	SINTEZA FORMO
Kiu rilatas al, apartenas al	ĝardena pordo ĝardenfermanta pordo	ĝardenpordo
	homa ago homeca ago laŭhoma ago	homagado
	doma elspezo domrilata elspezo pridoma, prodoma elsp.	domelspezo
Kiu posedas, estas riĉa je, plena je, provizita per	ŝtona vojo ŝtonplena vojo kunŝtona vojo multŝtona vojo	ŝtonvojo
	mona virino monriĉa virino monhavanta virino multmona virino	monvirino
	herba kampo herboriĉa kampo multherba kampo	herbokampo
Kiu amas, deziras, celas	mona virino monam(ant)a virino moncelanta virino	monvirino
Kiu ne havas	senmona virino senŝtona vojo	
Kiu estas en	entera trezoro	

Kaj tiel plu, laŭ la diversaj rilatoj esprimitaj de la prepozicioj, kiujn oni uzas prefikse kun la konvenaj radikoj.

ALIKLASA DERIVADO. — VI. Adjektivoj naskataj de verbaj radikoj. — Same, kiel ĉe substantivaj radikoj, oni plej ofte uzas la ĝeneralan, elastan adjektivon formitan per simpla *a* : *ama vorto, frapa gesto, mova ŝtono, helpa verbo.*

Se oni volas aŭ devas pli precizigi la rilaton, oni uzas, aŭ sufikson, aŭ kunmetitan vorton.

Jen kelkaj ekzemploj pri la plej ofte renkontataj tiaj rilatoj (*R* montras la verban radikon) :

TABELO DUA

ADJEKTIVOJ NASKATAJ DE VERBOJ

Ĝenerala sufikso : **a.**

RILATO	SUFIKSO	ANALIZA FORMO	SINTEZA FORMO
Kiu faras agon: pasintan / nunan / venontan	inta / anta / onta	kiu en certa momento estas, estis, estos : R + inta / R + anta / R + onta (esti aminta)	
Kiu suferas agon: pasintan / nunan / venontan	ita / ata / ota	estas, estis, estos : R + ita / R + ata / R + ota (esti amata)	
Kiu povas agi	iv (1)	(esti) kapabla ami / esti kapabla nutri (nutriva)	R + kapabla (amkapabla) / R + pova (nutropova)
Kiu povas suferi agon	ebl	esti R + ebla (amebla)	
Kiu inklinas fari agon	em	esti R + ema (amema)	
Kiu meritas suferi agon	ind	esti R + inda (aminda)	
Kiu devas suferi agon	end (1)	esti devige, nepre, necese, R + ota (amenda) devi + R + iĝ (devi amiĝi)	

(1) Neoficialaj sufiksoj.

SAMKLASA DERIVADO. — Kiel ni jam diris, per « samklasa derivado » ni celas la formadon de adjektivoj el adjektivaj radikoj, de substantivoj el substantivaj radikoj, de verboj el verbaj radikoj. La afiksoj uzataj por tio ŝanĝas jen la gradon, jen la direkton, jen la kvanton ; unuj taŭgas por ĉiuspecaj radikoj, aliaj nur por unu aŭ du kategorioj.

Tion oni vidos laŭ la sekvantaj tabeloj :

Esperanto - rondo Vyškov, Školní 4

TABELO TRIA

Ĉefaj afiksoj uzeblaj kun adjektivaj radikoj por formi novajn adjektivojn.

RILATO	PREFIKSOJ	SUFIKSOJ	EKZEMPLOJ
Kontraŭeco	Mal		malvarma
Nuligo	Ne		nevarma
Grandigo		eg	varmega
Malgrandigo, moderigo		et	varmeta
Malbonigo		aĉ	verdaĉa

Rimarku, ke la tri lastaj sufiksoj naskas ankaŭ substantivojn. — La prepozicioj ne estas uzataj prefikse kun adjektivaj radikoj (laŭ uzado de Zamenhof kaj klasikaj aŭtoroj). — Kelkaj radikoj estas laŭvole konsidereblaj, jen kiel verbaj aŭ substantivaj, jen kiel verbaj aŭ adjektivaj ; ekzemple *intenc, util, kuraĝ,* kvankam, logike, la unua estas substantivo kaj ambaŭ lastaj estas adjektivoj. Tamen, tio ĉi klarigas kelkajn « duoblaĵojn » kiel *senutila* kaj *neutila ; nekuraĝa* kaj *senkuraĝa,* k. t. p.

TABELO KVARA

Ĉefaj afiksoj uzeblaj kun substantivaj radikoj por formi novajn substantivojn.

RILATO	PRE-FIKSOJ	SUFIKSOJ	EKZEMPLOJ
Parenceco	bo		bopatro
Ambaŭsekseco	ge		gepatroj
Ĉeso	eks		eksoficiro
Grandigo		eg	domego, kortego
Malgrandigo (fizika), kareso		et	dometo, korteto
Ekstera, fizika malŝato		aĉ	domaĉo
Morala malŝato	fi		fidomo
Multeco		ar	arbaro
Unueco, diseco		er	monero
Vireco	vir		virbovo
Virineco		in	patrino, bovino
Infaneco, fileco		id	bovido, Izraelido
Produktaĵo		aĵ	infanaĵo, fruktaĵo
Esenco, kvalito		ec	homeco, patreco
Estaĵo vivanta		ul	bienulo
Loko (speciala)		ej	soldatejo
Parta enhavanto		ing	kandelingo
Plena enhavanto		uj	sukerujo
Loĝanto, partiano		an	parizano, kristano

Krom tio, lokaj kaj tempaj prepozicioj povas esti uzataj prefikse kun substantivaj radikoj : ekzemple *ĉirkaŭ, antaŭ (ĉirkaŭmano, antaŭurbo)*, k. t. p.

TABELO KVINA

Ĉefaj afiksoj uzeblaj kun verbaj radikoj por formi novajn verbojn.

RILATO	PRE-FIKSOJ	SUFIKSOJ	EKZEMPLOJ
Komenco de ago	ek		eksidi, ekkanti, ekstari
Ĝisfina plenumo de l'ago	el, fin. tra		elprovi, ellerni, finlegi, tralegi, eltrinki
Ripeto de ago	re	ad	rediri, rekonstrui, pafadi
Daŭro de ago		ad	laboradi
Nedaŭro de ago	ek		ekkrii, ekbrili
Kontraŭeco de ago	mal		malfermi, malami
Nuligo de ago	ne		neami
Unuigo de ago	kun		kunmeti, kunveni
Disigo de ago	dis		disiri, dismeti
Grandigo de ago		eg	amegi
Malgrandigo, moderigo de ago		et	ameti, kanteti, ripoĉeti
Malbonigo de ago	sub	aĉ	kantaĉi, subaĉeti, subdiri
Aliro, proksimigo	al, apud, kun		alveni, apudiri, kunveni
Returneniro Denova veno al la loko de kiu oni foriris	re returnen		reveni, resendi returneniri
Eliro Direkto de l'interno eksteren	el, for		elpeli, forĵeti
Eniro Direkto de l'ekstero internen	en inter		enmeti intermeti
Deiro	de		demeti, delasi
Foriro	for, el		forkuri
Trairo	tra		trabori
Transiro	trans		transĵeti
Subiro	sub		subĵeti

k. t. p. kun ĉiuj prepozicioj uzataj prefikse.

DERIVITAJ RADIKOJ. — La vortoj formitaj per la ĵus analizita sistemo estas mem substantivoj, adjektivoj aŭ verboj, kaj povas siavice naski novajn vortojn laŭ tute sama maniero. Oni simple devas konsideri tiujn vortojn, kiel memstarajn radikojn, kaj oni agas kun ili, kiel kun la fundamentaj. Ekzemple, la derivita verbo *varmiĝi* liveras substantivon *varmiĝ(ad)o*, adjektivon *varmiĝ(em)a*, tute kvazaŭ la radiko *varmiĝ* estus fundamenta kaj nedisigebla.

MULTSUFIKSAJ VORTOJ. — La ĵus vidita paragrafo kondukas nin al uzado de multsufiksaj vortoj. La vico, laŭ kiu oni gluigas kelkajn sufiksojn ĉe unu sama radiko, ne estas indiferenta, ĉar ĉiu nove algluigita sufikso « agas » sur la ĵus antaŭa radiko (primitiva aŭ derivita). Oni do havas sinsekve diversajn radikojn, kvazaŭ oni skribus :

$$R + S = R' \qquad R' + S' = R'' \qquad R'' + S'' = R''' \text{ k. t. p.}$$

Tiel ekzemple, *kred'i, kredem'a, kredemul'o, kredemulin'o ; arb'o, arbeg'o, arbegar'o, arbegaret'o*, k. t. p. (Estas klare, ke *arbegareto* estas alia ol *arbetarego ;* same *beletulino* estas alia ol *belulineto*, k. t. p.). Laŭeble, estas preferinde eviti tiajn amasojn de sufiksoj kaj diri ekzemple : *malgranda belulino* (aŭ *eta belulino*).

Precipe en tiaj okazoj estas rekomendinda la uzado de mallongigoj *o, a, i,* k. t. p. anstataŭ *ado, eco, aĵo, umi,* k. t. p. por eviti vortojn tro longajn kaj malsimplajn. **Ju pli mallonga estas vorto, se ĝi estas klara, des pli bona ĝi estas.**

RESUMO. — El praktika vidpunkto, ni do povas diri resume :

Adjektiva radiko naskas substantivojn per o *(ulo, aĵo, eco)* ; verbojn per *i (igi, iĝi)*.

Substantiva radiko naskas verbojn per *i (umi), igi, iĝi ;* adjektivojn per *a* (aŭ prefiksa prepozicio).

Verba radiko naskas substantivojn per o *(ado, anto, into, onto ; ato, ito, oto), ist, il, ej ;* adjektivojn per *a (anta, inta, onta ; ata, ita, ota), ebl, em, ind.*

DUA PARTO

APARTA ESPLORADO DE L'AFIKSOJ

En tiu ĉi parto, ni studos ĉiun afikson aparte kaj lernos ĝian signifon kaj uzadon ĉefe el la ekzemploj troveblaj ĉu en la *Ekzercaro* ĉu en aliaj verkoj de Zamenhof. Pro oportuneco de la serĉado, ni ordigis aparte la sufiksojn kaj la prefiksojn laŭalfabete.

Ĉapitro I-a. — SUFIKSOJ

AĈ

Tiu sufikso esprimas *eksteran* malŝatan komprenon de la ideo esprimata de la radiko kaj estas uzebla indiferente kun adjektivaj, substantivaj aŭ verbaj radikoj :

Domaĉo : malbela, mizera domo ;
Parolaĉi : malbone, mallerte paroli ;
Nigraĉa : malbela aŭ malfortika koloro nigra.

Aĉ estas do malgrandigilo, kiel *et*, sed esprimas fizikan, malŝatan vidpunkton, dum *et* rilatas al la fizika grandeco aŭ havas karesan signifon. La vorto *fi* uzata prefikse esprimas la *internan* valoron de la aĵo (persono aŭ besto), ago, propreco, k. t. p. Ĝia signifo estas precipe morala : *fiparoli* = maldece paroli.

La vortoj formitaj per *aĉ* estas samklasaj je la radiko ; ili kondutas, kiel tiu ĉi lasta por formi nove derivitajn vortojn : *bravaĉulo, pentraĉisto, pentraĉo, vivaĉi, infanaĉo,* k. t. p.

Radika uzado. — *aĉa, aĉe, aĉigi, aĉulo, aĉulino.*

AD

Tiu sufikso estas uzata : *a*) kun verbaj radikoj ; *b*) kun substantivaj radikoj.

Verbaj radikoj. — La sufikso *ad* uzata kun verba radiko servas jen por formi verbojn (samklasa derivado), jen por formi substantivojn (aliklasa derivado).

En la unua okazo, ĝi simple montras longan daŭron, seninterman kan daŭron, aŭ ripeton de l'ago :

Mi saltas tre lerte. — Mi saltadis la tutan tagon de loko al loko (F. 40).

La maljuna avino devis rakontadi (senĉese) *ĉion, kion ŝi sciis pri ŝipoj kaj urboj, homoj kaj bestoj* (K. 37.)

Unu promesis al la alia rakonti (simple diri), *kion ŝi vidis* (K. 37).

Ŝi vidis, kiel la fajraj fulmoj zigzage sin jetadis (tre ofte, ĉiumomente) *en la ŝaŭman maron* (K. 40).

Ofte la kvin fratinoj ĉirkaŭprenadis unu la alian kaj suprennaĝadis super la akvon (K. 40). (1)

En la dua okazo, la sufikso *ad* formas verban substantivon ; ĝi tiaokaze montras jen simplan fariĝon de l'ago esprimata de la verba radiko, jen longan, oftan aŭ konstantan, kvazaŭ profesian agadon. Plej ofte, ĝi estas anstataŭata aŭ anstataŭebla de simpla o.

Simpla fariĝo de l'ago :

Vortoj kunmetitaj estas kreataj per kunligado de vortoj (F. 27).

Mi volas montri, ke la ĝardeno kaj tablo ne estis loko de la flugado, sed nur la celo de la flugado (F. 28).

En la supraj ekzemploj oni povus tute egale forlasi la *ad*. Sed en la sekvantaj, la signifo ŝanĝiĝus, se oni ĝin ne uzus :

La uzado de l' artikolo estas tia sama, kiel en la aliaj lingvoj. La personoj, kiuj ne komprenas la uzadon de l'artikolo, povas en la unua tempo tute ne uzi la artikolon (F. 27), sed ili ne devas ĝin neuzadi. *Uzo* montras unu aŭ kelkajn fojojn ; *uzado* montras ĉiujn fojojn.

En la daŭro de kelke da minutoj, mi aŭdis du paĵojn (izolitajn). — *La paĵado daŭris tre longe* (F. 40).

Lia hieraŭa parolo estis tre bela, sed la tro multa parolado lacigas lin (F. 40).

Sekve de tiu kompreno, estas uzata la sufikso *ad* por nomi **artojn, sciencojn, kapablojn,** k. t. p. :

Li kantas tre belan kanton. — La kantado estas tre agrabla okupo (F. 40). Rimarku, ke *kantado* egalvaloras *kantarto*, kaj ke Zamenhof uzis *okupo*, ne *okupado*, ĉar la kantarto povas esti ne konstanta okupado.

Bastoneto, sur kiu oni tenas plumon por skribado, estas plumingo (F. 40).

Simile, oni diras *volado, aŭdado, flarado, vidado, legado,* k. t. p., por *kapablo voli, aŭdi, flari, vidi, legi,* k. t. p. En tiu senco, oni

(1) Ekzemploj cititaj de Aymonier *Grammaire complète d'Esperanto.*

povas ankaŭ uzi simplan o tre ofte : *lia penso estas akra, sed lia volo malforta,* aŭ *lia pensado...*

Por artoj, estas pli bone uzi kunmetitan vorton kun radiko *art : kantarto, pentrarto, kudrarto, fotografarto,* k. t. p.

Por sciencoj, *ad* taŭgas ne ĉiam kaj nur kun verbaj radikoj. Tial, por nomi la sciencojn ĉevenantajn de substantiva radiko, oni devas uzi longan kunmetitan vorton kun radiko *scienc : lingvoscienco, leĝoscienco,* k. t. p. En tiu okazo, la profesio estas montrata per la sufikso *ist,* metita senpere apud la determinanto : *lingvisto, leĝisto.* Se tamen oni volas absolutan precizecon, oni povas ankaŭ uzi la plenan (sed longan) formon *lingvoscienculo, lingvosciencisto,* k. t. p. (1)

La afikso kontraŭa al *ad* estas la prefikso *ek,* kiu montras komencon de ago aŭ agon nedaŭran.

Substantivaj radikoj. — Oni renkontas ofte verbojn aŭ substantivojn formitajn per substantiva radiko kaj la sufikso *ad.* Tiuj vortoj montras ĉiam uzadon de l'objekto radika, ĝian aperon aŭ disvolviĝon, kaj verŝajne estas mallongigo de *umadi, umado :*

Krono, kron(um)adi, kron(um)ado ;
Broso, bros(um)adi, bros(um)ado ;
Najlo, naj(um)adi, naj(um)ado ;
Martelo, martel(um)adi, martel(um)ado ;
Telefono, telefon(um)adi, telefon(um)ado ;
Floro, flor(um)adi, flor(um)ado ;
Sango, sang(um)adi, sang(um)ado, k. t. p.

Por la verbo oni povas tute indiferente uzi : *kroni, kronumi ; brosi, brosumi ; najli, najlumi ; marteli, martelumi,* k. t. p., sed kompreneble por la substantivo la simpla o naskus konfuzon kun la radika objekto, kaj tial oni devas uzi por montri la agon ĉu *umo,* ĉu *ado* (ĉar *umado* estas tro longa kaj ne pli klara). Tial oni renkontas ambaŭ formojn : *brosumo, brosado ; kronumo, kronado ; najlumo, najlado ; martelumo, martelado ; telefonumo, telefonado ; florumo, florado ; sangumo, sangado, k. t. p.* (1). Kompreneble oni povas ankaŭ, se oni preferas tion, uzi kunmetitan vorton : *telefonuzo, sangellaso, florapero,* sed tiaj vortoj estas plej ofte senutile longaj kaj maloportunaj.

(1) Por nomi la diversajn sciencojn, la teknikistoj proponis uzi ĝeneralan sufikson; unuj proponis la internacian sufikson *ik* (fiziko, matematiko, betetristiko k. t. p.), aliaj preferas la ne malpli internacian sufikson *i* (fiziologio, biologio, filozofio, k. t. p.), sed ĝis nun *adhuc sub judice lis est.*

(2) La formo *ad* estas nun preferata de la modernaj aŭtoroj.

Iafoje, precipe kiam oni volas montri la agon *agi per, ŝmiri per,* k. s., oni uzas la sufikson *ig,* sed malprave, se la radiko estas substantiva ; ekzemple, *saligi, elektrigi, origi,* ne estas konsilindaj : oni uzu prefere *salumi, saladi, sali, salumo, salado ; elektrumi, elektradi, elektri, elektrumo, elektrado ; orumi, oradi, ori, orumo, orado,* k. t. p. (1)

AĴ

Tiu sufikso formas nature substantivojn el adjektivaj radikoj. La formita substantivo ĉiam montras nevivantan, sed reale ekzistantan, konkretan estaĵon. Oni povas preskaŭ ĉiam dismeti :

Bona : bonaĵo = afero, io bona,
Mola : molaĵo = afero, io mola,
Bela : belaĵo = afero, io bela, k. t. p.

Per tio, ĝi diferencas de sufiksoj *ul,* kiu montras estaĵon vivantan, kaj *ec,* kiu montras kvaliton nekonkretan, sed abstraktan. *Belulo* estas homo (aŭ besto) bela ; *beleco* estas la kvalito kiun posedas belulo aŭ belaĵo : tio, kio faras, ke oni nomas ĝin bela.

Adjektivaj radikoj. — Oni renkontas la sufikson *aĵ* kun adjektivaj, substantivaj kaj verbaj radikoj. Ni ĵus esploris la unuan okazon ; jen kelkaj ekzemploj pri ĝi :

Akvo estas fluidaĵo (F. 35).
Mi ne volis trinki la vinon, ĉar ĝi enhavis en si ian suspektan malklaraĵon (F. 35).
Via vino estas nur ia abomena acidaĵo (F. 35). (2)
Tiu ĉi granda altaĵo ne estas natura monto (F. 35).
Vi parolas sensencaĵon, mia amiko (F. 35). (3)

Substantivaj radikoj. — Kun substantivaj radikoj, *aĵ* formas samklasajn vortojn, t. e. substantivojn, kaj servas por montri ian produktaĵon, kombinaĵon, ion faritan el...

Sur la tablo staris diversaj sukeraĵoj (F. 35).
Glaciaĵo estas dolĉa glaciigita frandaĵo (F. 35).

(1) Por kelkaj el tiuj diversaj signifoj de *ad* oni proponis enkonduki apartajn sufiksojn: ekzemple, *iz* por ŝmiro, provizo, *if* por produktado, faro *(salizi, orizi, florifi, sangifi).* Almenaŭ por verboj la simpla *i* ŝajnas tute sufiĉa kaj same klara, kaj por substantivoj la sufikso *ad* estas multe pli oportuna, ĉar ĝi estas multe pli ĝenerala kaj ne devigas analizi detale sian penson por sciiĝi ĉu oni devas uzi en tiu aŭ alia okazo tiun ĉi aŭ alian sufikson.

(2) Rimarku la uzon de *abomena* por *abomeninda.*

(3) Ekzemplo de derivita adjektivo: *senco, sen-senca,* liveranta derivitan substantivon *sen-senc-aĵo.*

Ĝin oni uzas por montri nedifinitan parton el ia tuto, precipe por nutraĵoj aŭ objektoj faritaj el iu materialo : *bovaĵo, bovidaĵo, ŝafaĵo* (neniu ja povas manĝi tutan bovon, nek postulas ĝin en restoracio). Sed oni diras simple *fiŝo, frukto,* k. t. p. ; *fruktaĵo* estas io farita el fruktoj kun aliaj nutraĵoj). Simile, *ligno* montras la ĝeneralan materialon, *lignaĵo* montras objekton faritan el ligno.

Iafoje, la signifo de la vorto estas iom specialigita :

Ĉemizojn, kolumojn, manumojn kaj ceterajn similajn objektojn ni nomas tolaĵo, kvankam ili ne ĉiam estas faritaj el tolo (F. 35).
Mi manĝis bongustan ovaĵon (F. 35).

Verbaj radikoj. — Kun verbaj radikoj *aĵ* signifas « ion, kio enhavas en si la ideon de la donita verbo ». Tia estas la difino donita de D-ro Zamenhof mem en la *Revuo* (1907, Aprilo). Sed ĉu la ideo estas aktiva aŭ pasiva ? Tion ĉi la sufikso *aĵ* tute ne montras per si mem. Ekzemple, kiam ni parolas pri *ŝmiraĵo,* ni povas esprimi per tiu sola vorto du ideojn : aktivan, *ŝmirantaĵo,* aŭ pasivan, *ŝmiritaĵo.* La ĝusta signifo estas ordinare liverata de la frazo, kaj ĉar el 100 verbaj vortoj kun *aĵ,* 99 estas tute klaraj, ni kutime uzadas la simplan, mallongigan formon *aĵo* anstataŭ la pli precizajn *antaĵo* aŭ *itaĵo* :

Kiam mi veturas, mi neniam prenas kun mi multon da pakaĵo (F. 35).

Tiu ĉi skribaĵo estas apenaŭ legebla.
Li sendis al mi tre belan pentraĵon.
Mi vidis lin tra la fendaĵo de la pordo.

Se ia malklaraĵo estas timinda pro la uzo de la mallongigita formo kaj pro ebla konfuzo inter la aktiva kaj la pasiva signifo de la *aĵ*-vorto, tiam **oni devas uzi la plenan formon** *antaĵo* aŭ *itaĵo,* aŭ kunmetitan vorton laŭbezone. Ekzemple, se oni volas apartigi en imitaĵo la objekton imitantan kaj la modelon imititan, oni diros *imitantaĵo, imititaĵo ;* simile, por diferencigi en *fendaĵo* la interspacon kaj la fenditan objekton, oni diros *fendospaco* kaj *fenditaĵo.* En la granda plimulto de l'okazoj, tia analizado ne estas necesa, sed oni vidas, ke oni povas ĝin fari laŭvole kaj tre oportune.

Iafoje, la *aĵ*-vorto ricevis iom apartigitan signifon :

La tuta supraĵo de la lago estis kovrita per naĝantaj folioj kaj diversaj aliaj kreskaĵoj (F. 35). (1)

(1) Rimarku tiun uzon de *per* post pasiva participo.

Radika uzado. — Oni renkontas nur la formon *aĵo,* kiu signifas afero, objekto :

Li prenis siajn aĵojn sur la ŝultron kaj eliris. (Z.)

Devenaĵoj de aĵ-vortoj. — La vortoj formitaj per *aĵ* ne estas ofte uzataj en adjektiva formo (derivita), ekster tiuj devenantaj de verba radiko. Ordinare ja la simpla radiko sen *aĵ* sufiĉas por klare esprimi per *a* la penson kaj *aĵ* estus superflua balasto. Ekzemple *lignaĵa tablo* kaj *ligna tablo* estas egalvaloraj (escepte, se oni volus montri, ke la tablo estas farita el *lignaĵo* jam konsistanta el diversaj pecetoj de ligno arte kunmetitaj), sed *ligna tablo* estas multe pli simpla kaj klara.

La samon oni povas diri pri *sukera gusto* kaj *sukeraĵa gusto :* la dua montras ja, ke la sukera gusto ne estas pura, sed enhavas ankaŭ guston de aliaj aĵoj ; sed tiaj nuancetoj estas tre maloftaj, kaj en preskaŭ ĉiuj okazoj oni sa ĝe agos, forlasante simple la *aĵ.*

Tio ĉi memorigas pri tio, kion ni diris en la unua parto de tiu ĉi libro, okaze de la simpla derivado : ni uzu la simplan o *(a, i)* kiel eble plej ofte : Preskaŭ ĉiam *varmo, skribo, pluvo, penso, vido,* k. t. p. estos same klaraj, kiel *pluvaĵo, vidaĵo, varmeco, pensado,* k. t. p., kaj multe pli oportunaj ol tiuj ĉi lastaj. Sed kompreneble, se ni dubas pri la kompreneblo de nia frazo, ni devas uzi la necesajn sufiksojn.

AN

Tiu sufikso formas nature substantivojn el substantivaj radikoj ; ĝi montras partianon de sistemo aŭ homo, membron de societo, loĝanton de urbo aŭ lando.

Loĝanteco. — Jen estas ekzemploj el la *Ekzercaro :*

La ŝipanoj devas obei la ŝipestron (F. 37).
Ĉiuj loĝantoj de regno estas regnanoj (F. 37).
Urbanoj estas ordinare pli ruzaj ol vilaĝanoj (F. 37).
La parizanoj estas gajaj homoj (F. 37).
Germanoj kaj francoj, kiuj loĝas en Rusujo, estas rusujanoj kvankam ili ne estas rusoj (F. 37).
Li estas nelerta kaj naiva provincano (F. 37).

En la « loĝa » senco de *an* estas rimarkinda la diferencigo de *ruso* kaj *rusujano, franco* kaj *francujano,* k. t. p. *An* montras do loĝanton, sed ne nacianon.

Partianeco, membreco. — Inter la « loĝa » signifo de *an* kaj ĝia « membra » senco, estas iafoje malfacile fari distingon : ekzemple, la ŝipanoj loĝas sur ŝipo kaj samtempe povas esti konsideritaj, kiel membroj de unu aparta grupo aŭ societo. Tio ĉi montras la rilaton ekzistantan inter ambaŭ signifoj de *an*.

Jen estas Fundamentaj ekzemploj, kaj kelkaj aliaj, pri la dua signifo de la sufikso :

Luteranoj kaj kalvinanoj estas kristanoj (F. 37).

La loĝantoj de unu regno estas samregnanoj, la loĝantoj de unu urbo estas samurbanoj, la konfesantoj de unu religio estas samreligianoj (F. 37).

Nia urbo havas bonajn policanojn, sed ne sufiĉe energian policestron (F. 37).

Oni kunvokis ĉiujn samgrupanojn.

Mi estas feliĉa, ke vi estas nun nia samideano.

Niaj samtempanoj mokas nin, sed niaj posteuloj nin benos.

Diferenco de ist. — En sia partiana senco, la sufikso *an* proksimiĝas iafoje al *ist*, sed ĝi diferencas de tiu ĉi lasta per tio, ke *an* montras simplan staton, memvolan aŭ senatentan, dum *ist* pruvas aktivan, propravolan okupiĝadon pri io, aŭ montras metion, profesion. Ekzemple, inter *esperantano kaj esperantisto* estas tiu diferenco. ke *esperantano* simple aprobas Esperanton, dum *esperantisto* okupas sin ofte kaj ageme pri la lingvo, ĝia lernado aŭ ĝia disvastigado. Simila diferenco ekzistas inter *socialano* kaj *socialisto, anarĥiano kaj anarĥisto*, k. t. p.

Radika uzado. — La sufikso *an* estas ofte uzata, kiel memstara radiko. La ĉefaj devenaĵoj estas : *ano*, por membro, *anaro, aniĝi, aneco, reaniĝi.*

Devenaĵoj de an-vortoj. — La substantivoj formitaj per *an* kondutas kiel ceteraj substantivaj radikoj kaj liveras devenaĵojn : *urbana, urbane, urbaneco*, k. t. p.

ANT

Tiu sufikso formas, el verbaj radikoj, la aktivan participon en tempo estanta (prezenco). La natura rolo de la formita vorto estas adjektiva : kiel ĉiuj adjektivoj, la participo akordiĝas nombre kaj kaze kun sia substantivo (aŭ pronomo), se ĝi estas epiteto, sed nur nombre, se ĝi estas predikato (t. e. se ĝi rilatas al la substantivo per la pero de verbo *esti*). (1)

(1) Pri akordiĝo de adjektivoj kaj participoj vidu Gramatikon.

Kune kun ambaŭ aliaj participoj aktivaj *(int, ont), ant* servas por formi ĉiujn malsimplajn tempojn aktivajn. Jen estas la *ant*-tempoj :

Esti amanta = *ami*
Estas amanta = *amas*
Estis amanta = *amis*
Estos amanta = *amos*
Estus amanta = *amus.*
Estu amanta = *amu.*

La kvazaŭ-sameco de la formoj simplaj kaj de la formoj malsimplaj formitaj per *ant* klarigas la tre maloftan uzon de tiuj ĉi lastaj.

Devenantaj substantivoj. — Kiel ceteraj adjektivoj, la participoj naskas tre facile substantivojn per sufikso *o, ulo, aĵo, eco, ado*. Sed pro la verbeco de la radiko, la signifo de la formita substantivo estas ĉiam aŭ preskaŭ ĉiam klara per simpla o kaj per si mem montras la aganton (por aktivaj participoj ; por pasivaj, la agaton). Nur en ekstreme maloftaj okazoj oni devas uzi *antaĵo, anteco* ; la formo *antulo* estas tute ne uzata de klasikaj aŭtoroj kaj ŝajnas esti senutila duoblaĵo de la simpla formo *anto*, kiu montras *preskaŭ ĉiam* personon, vivantan estaĵon (1).

Kiam oni formas tiun substantivon participan, ĉu aktivan, ĉu pasivan, oni devas ĉiam pripensi, ĉu la agado *fariĝis, fariĝas* aŭ *fariĝos* kompare je la momento de la rakonto, ĉar laŭ la okazo oni devas uzi la sufiksojn *int-it, ant-at, ont-ot :*

Kiam Nikodemo batas Jozefon, tiam Nikodemo estas la batanto kaj Jozefo la batato (F. 22).

Venu, ni atendas vin, Savonto de la mondo (F. 22).

Homo, kiun oni devas juĝi, estas juĝoto (F. 22).

La soldatoj kondukis la arestitojn tra la stratoj (F. 22).

Ĉiuj loĝantoj de regno estas regnanoj (F. 37).

La konfesantoj de unu religio estas samreligianoj (F. 37).

Anto kaj isto. — La diferenco inter substantivo formita per *ant* kaj substantivo formita per *ist* estas en tio, ke la unua montras okazan aŭ nemetian aganton, sed la dua montras

(1) D-ro Zamenhof eĉ konsideras, ke ĝi montras *ĉiam* vivantan aganton kaj konsilas uzi *antaĵo, anteco* en la aliaj okazoj. Tia li diris *(Lingvaj Respondoj*, 16) : « La vorto *estonto* laŭ mia opinio povas signifi nur « estonta persono », sed ĝi ne povas signifi « estonta tempo » aŭ « estonta afero », kiujn mi rekomendus traduki per la vortoj *estonteco* kaj *estontaĵo* ». Tiu kompreno estas iom pli severa, ol tiu de la plimulto de la ĝisnunaj aŭtoroj. Cetere la kunteksto ĉiam klarigas la penson.

kutiman metion aŭ profesion. Oni ofte uzas vorton formitan per *ant* por signi *artamanton* kaj apartigi ĝin de *profesiulo, metiulo,* montrata de vorto formita per *ist : fotografanto, fotografisto ; juĝanto, juĝisto ; muzikanto, muzikisto.* Iafoje, oni pli precizigas ankoraŭ la vorton uzante kunmete la radikon *am : fotografamanto, muzikamanto* (1).

Fine, oni devas ne forgesi, ke aganto povas ankaŭ esti virino ; tiaokaze, oni devas uzi *antino, ontino,* k. t. p.

Adverba formo. — La participoj en Esperanto estas tre ofte uzataj en adverba formo *(ante, ate ; inte, ite ; onte, ote),* ĉu kiam ili rilatas al tuta propozicio aŭ estas komplementoj de infinitivo, ĉu por traduki circonstancan komplementon manieran, kaŭzan aŭ tempan (2). Oni devas memori, ke Esperanto ne uzas parolturnon similan al la latina ablativo absoluta *(partibus factis, sic locutus est leo),* sed ke adverba participo ĉiam devas rilati la subjekton de la frazo :

Promenante sur la strato, mi falis (F. 22).
Li venis al mi tute ne atendite (F. 22).
La popoloj, timigite, sin retiris (F. 50).
Mia ĉapo, flugante, pendiĝis sur la arbo (F. 39) (3).
Trovinte pomon, mi ĝin manĝis (F. 24).

Sekve, oni devas diri : *Kiam la divido estis farita, li parolis,* aŭ *farinte la dividon, li parolis,* sed ne : *'a divido farite, li parolis,* ĉar en tiu ĉi lasta okazo la participo dependas de *divido,* ne de *li,* subjekto de la frazo.

Adverba participo kun nea vorto anstataŭas en Esperanto la propozicion *sen* uzatan en diversaj naciaj lingvoj antaŭ infinitivo ; simile, la participo *inte* anstataŭas *post* antaŭ infinitivo.

Li venis, ne manĝinte (= sen manĝo).
Fininte sian laboron, li venis (= post fino de sia laboro).

Mallongiga formo. — La participo *ant* estas ofte anstataŭata de simpla adjektivo per *a,* kiam oni ne timas konfuzon kaj precipe kiam oni celas montri *econ kutiman,* staton aŭ rolon ordinaran ;

(1) Oni proponis uzi — kaj renkontas kelkajn ekzemplojn — sufiksojn *or, ator,* anstataŭ la tri *int-, ant-, ont-,* por montri la funkcion, la « amatorecon », k. t. p. Tiel oni trovas *direktoro, administratoro, redaktoro,* k. t. p. kune kun *direktanto, direktisto, administranto, administristo, redaktanto, redaktisto.* Tion oni klarigas per la ordinara « internacieca » savilo. Kelkaj eĉ kombinas la sufiksojn *ad* kaj *or* por *ricevi* hispanecajn vortojn, kiel *administradoro* k. t. p.

(2) Vidu *Gramatikon,* paragrafojn : 81, 184, 191.

(3) Rimarku tiun nominativon ; vidu *Gramatikon.*

sed *se la ago estas nur momenta, okaza,* aŭ se la participo havas komplementon, *oni uzas* la participan sufikson :

Tie mi vidas homon kurantan al mi.
La signoj de mensogaj ŝiaj larmoj (Haml. I, 2).
La malvarmo estas tranĉa (Haml. I, 1).
Esperanto, helpa lingvo.
El la kaldrono, en kiu sin trovas bolanta akvo, eliras vaporo (F. 25.)

La sekvanta ekzemplo rememorigu pri la eblo uzi participon anstataŭ infinitivo post verboj *aŭdi, aŭskulti, vidi, rigardi, observi,* k. s. :

Ŝi aŭdis la sonon de la korno penetrantan al ŝi tra la akvo (Krest. p. 48) (1).

AR

Tiu sufikso formas substantivojn el substantivaj radikoj ; ĝi montras speciale difinitan kolekton, tuton de samspecaj objektoj esence ligitaj inter si.

Ekzemple, *vortaro* ne estas ia ajn kolekto da vortoj, sed io aparta simila al leksikono ; *vagonaro* ne estas ia ajn kolekto da vagonoj, sed nur tiu kolekto, kiu estas trenata de lokomotivo kaj estas ordinare uzata sur fervojoj ; *arbaro, homaro* havas tute specialan sencon, k. t. p.

Sekve, se oni volas esprimi nur okazan, disan percepton de samspecaj objektoj, kaj ne kolektivan objekton, tiam oni simple uzas aŭ *ar* radike aŭ serĉas alian ekvivalenton : *aro da, kelke da, kolekto da, grupo da, multe da,* k. t. p.

Ŝi vidis unu sinjorinon, kiu eliris el la arbaro (F. 19).
Mia skribilaro konsistas el inkujo, sablujo, kelke da plumoj, krajono kaj inksorbilo (F. 34).
Oni metis antaŭ mi manĝilaron, kiu konsistis el telero, kulero, tranĉilo, forko, glaseto por brando, glaso por vino, kaj telertuketo (F. 34).
Nia lando venkos, ĉar nia militistaro estas granda kaj brava. (F. 34).
Sur kruta ŝtuparo li levis sin al la tegmento de la domo (F. 34).
Mi ne scias la lingvon hispanan, sed per la helpo de vortaro hispano-germana mi tamen komprenis iom vian leteron (F. 34).

(1) Citita de Aymonier, *Grammaire complète d'Esperanto.*

Pro multo da arboj li arbaron ne vidas (Z.)
Aro da dehakitaj arboj.
Li ellernis aron da vortoj.

La sufikso kontraŭa al *ar* estas *er ;* la unua kolektas diversajn unuojn en unu individuon ; la dua dismetas kolekton en diversajn apartajn unuojn.

Radika uzado. — *Ar* estas uzata ankaŭ radike : *aro, are, arigi, ariĝi :*

Sur tiuj ĉi vastaj kaj herboriĉaj kampoj paŝtas sin grandaj brutaroj, precipe aroj da bellanaj ŝafoj (F. 34).

Devenaĵoj de ar-vortoj. — La vortoj formitaj per *ar* kondutas, kiel ceteraj substantivaj radikoj por liveri novajn devenaĵojn : *arbara rando, rearbarigi landon, stariĝi tendare, homar(an)o, homaranismo,* k. t. p.

AT

Tiu ĉi sufikso estas la pasiva respondanto de la aktiva participa sufikso *ant ;* ĉio dirita pri tiu ĉi lasta, taŭgas ankaŭ por *at* (kaj aliaj participaj sufiksoj) kaj sekve ni ne bezonas ĝin ripeti ĉi tie.

La solaj rimarkoj farindaj pri *at* koncernas la pasivan verbon.

Kiel la aktivaj, tiel ankaŭ la pasivaj verboj konsistas el tri participoj (estinta, estanta, estonta), kombinitaj kun verbo *esti :*

PASIVAJ TEMPOJ

AT	IT	OT
Esti amata	esti amita	esti amota.
Estis amata	estis amita	estis amota.
Estas amata	estas amita	estas amota.
Estos amata	estos amita	estos amota.
Estus amata	estus amita	estus amota.
Estu amata	estu amita	estu amota (1).

(1) La sintezajn formojn *amatas, amatis, amatos, amitas, amitis, amitos, amotas, amotis, amotos* oni ne uzas

Tiuj pasivaj tempoj respondas tute ĝuste al la aktivaj tempoj formitaj kun :

ANT	INT	ONT
Esti amanta (ami)	esti aminta	esti amonta.
Estis amanta (amis)	estis aminta	estis amonta
Estas amanta (amas)	estas aminta	estas amonta.
Estos amanta (amos)	estos aminta	estos amonta.
Estus amanta (amus)	estus aminta	estus amonta.
Estu amanta (amu)	estu aminta	estu amonta.

Sed, dum en la aktiva formo de l'verbo ni povas ofte sen malklaro uzi la ĝeneralan simplan formon *amis, amas, amos,* kiel ni vidis studante la sufikson *ant,* en la pasiva formo ni devas zorge difini la uzindan participon *(at, it, ot).* Oni starigis por tio praktikan regulon : Uzu participon *ant-at, int-it, ont-ot,* laŭ tio ĉu la ago okazas samtempe, antaŭe aŭ poste je la tempo montrata de la helpa verbo esti (1). Bona procedo ankaŭ konsistas en la provo de aktiva formo anstataŭ pasiva, por vidi, kiun tempon oni devas uzi. Ekzemple : la pasiva frazo : *la reĝo estas amata de la popolo* fariĝas aktive : *la popolo amas (estas amanta) la reĝon ;* la pasiva frazo : *la reĝo estas amita de la popolo* fariĝas aktive : *la popolo amis (estas aminta) la reĝon ;* la signifo estas tute alia.

La surtuto estas aĉetita de mi, sekve ĝi apartenas al mi (F. 25).

Kiam via domo estis konstruata, mia domo estis jam longe konstruita (F. 25).

Mi sciigas, ke de nun la ŝuldoj de mia filo ne estos pagataj de mi (F. 25).

Estu trankvila, mia tuta ŝuldo estos pagita al vi baldaŭ (F. 25).

Laŭ la projektoj de la inĝenieroj, tiu ĉi fervojo estas konstruota en la daŭro de du jaroj, sed mi pensas, ke ĝi estos konstruata pli ol tri jarojn (F. 25).

Pasero kaptita estas pli bona, ol aglo kaptota (F. 22).

At, it, ot. — La participo *at* estas uzata ofte ankaŭ, kiam oni parolas en ĝenerala maniero, por montri, ke iu ago fariĝas ofte aŭ ordinare. Ekzemple, oni diras en tiu ĝenerala maniero : *La verkoj de Platono estas ĉiam admirataj.*

(1) Aymonier, *Grammaire complète d'Esperanto.*

Kiam oni hezitas inter *it* kaj *at* kaj ne povas klare difini, kiun uzi (aŭ kiam oni povas tute egale ambaŭ uzi), tiam oni ofte uzas prefere *it* aŭ netransitivan formon per *iĝ* :

Viaj leteroj estas ĉiam skribitaj tute malbone (F. 41).

Viaj leteroj ĉiam skribiĝas malklare (moderna formo).

D-ro Zamenhof eĉ konsilas obei al la naciaj lingvaj kutimoj kaj uzi ĉiam prefere la formon *ita*, escepte kiam oni volas montri tute precize fariĝon de ago, kaj li citas ekzemple la verbon *okupi*, ĉe kiu li komprenas, ke la formo *mi estas okupita* signifas *mi estas en stato mallibera*, dum la formo *mi estas okupata* signifas *mi venas nun en staton malliberan* (mi jus estis libera, sed nun ĉesas esti libera por fariĝi mallibera). Tia kompreno estas ja kaŭzata de la dusenceco de la verbo *okupi*, kiu povas signifi laŭokaze *preni en posedon* kaj *tenadi en posedo*. — Tre certe la kvazaŭ-ĉiama uzado de *ita* estas tre oportuna por multaj personoj pro niaj nacilingvaj kutimoj, ĉar en multaj naciaj lingvoj ekzistas nur unu (pasinta) pasiva participo, kaj eĉ en tiuj lingvoj, kiuj havas du pasivajn participojn, oni pli ofte uzas la pasintan ol la nuntempan ; sed tion ĉi oni faras en tiaj lingvoj, ĉar oni povas montri la diferencon de tempo ankaŭ per aliaj rimedoj (ekz. diverseco de helpaj verboj), dum en Esperanto ni ne povas uzi tian rimedon. Tial, laŭ mia opinio, oni povas rekomendi la preferan uzadon de *ita* nur provizore kaj al tiuj personoj, kiuj estas embarasataj de la diferencigo de *ata* kaj *ita*, simile kiel oni diras, ke en la komenco la rusoj povas ne uzi la artikolon *la* se ĝi embarasas ilin. Sed la forlaso de *ata* estus tre bedaŭrinda se ĝi ĝeneraliĝus, ĉar ĝi rompus la harmonian simetrion, kiu ekzistas inter la formoj aktivaj kaj pasivaj de nia verbo kaj tio senigus nian lingvon de ŝatinda pensesprimilo. Cetere *ita* ne estas pli konfuzinda kun *ata*, ol *inta* kun *anta*, kaj komparante la aktivan formon respondantan al la pasiva, kiun oni volas uzi, oni ĉiam trovos klare, ĉu *ita* aŭ *ata* estas la pli ĝusta. Ni esploru ekzemple la signifon de la jenaj formoj :

PASIVE	AKTIVE
1. Mi estas amata de mia frato.	Mia frato estas amanta min.
2. Mi estis amata de mia frato.	Mia frato estis amanta min.
3. Mi estas amita de mia frato.	Mia frato estas aminta min.
4. Mi estis amita de mia frato.	Mia frato estis aminta min.

Ĉu io povas esti pli klara ol tiuj paralelaj formoj?

1. Mia frato amas min en la nuna momento
2. Mia frato estis amanta min tiam, en la momento kiam okazis tiu afero, kiun mi rakontas al vi, sed *nun* li jam ne amas min; la ĉefa afero estas, ke li amis min *tiam*.
3. Antaŭe mia frato amis min; nun li verŝajne ne amas min, sed la grava fakto al kiu mi tiras vian atenton estas, ke li amis min *iam*.
4. Mia frato amis min iam, sed li jam ĉesis min ami tiam, en la momento, kiam okazis la dirita aventuro; la grava afero estas, ke min ami li *jam ĉesis tiam*.

Resume: 1. kaj 2., *amata*, tiras la atenton al la daŭro de l'amo en momento nuna (1) aŭ forpasinta, antaŭa (2).

La formoj 3. kaj 4., *amita*, tiras la atenton al la ĉeso de l'amo en tempo nuna (3) aŭ antaŭa (4).

Se ni komparas same la diversajn formojn de la verbo *okupi*, ni devas apartigi la du sencojn de la verbo kaj ni trovas, ke la signifo de la esprimo *mi estas okupita* ŝanĝiĝas laŭ tio, ĉu oni konsideras la verbon kiel signifanta *preni en posedon* aŭ *tenadi en posedo*; alivorte, *mi estas okupita* (kun signifo de *okupi* = preni en posedon) estas egalvalora al *mi estas okupata* (kun signifo de *okupi* = tenadi en posedo); oni do povas uzi ambaŭ formojn indiferente kaj tial oni ne povas tiri el la ekzemplo *mi estas okupita* ĝeneralan regulon por la uzado de *ata* kaj *ita*.

Kiel mi diris supre, oni povas uzi *ita* en neprecizaj frazoj, ĉar la kunteksto ofte montras tre bone tion, kion ni volas diri; simile ni uzas la neprecizan formon aktivan *mi amis* anstataŭ *mi estis amanta* kaj *mi estas aminta*, k. t. p., sed tia uzado, kvankam tre oportuna ordinare, ne estas ĉiam ebla kaj en kelkaj cirkonstancoj ni devas ankaŭ uzi la malsimplajn formojn. Ni agu same rilate al *ita* kaj *ata* ĝis la momento, kiam ni estos liberigintaj nin el la katenoj de la nacilingvaj kutimoj.

La uzado de *ot* estas malofta kaj malpli facile konfuzema.

Komplemento pasiva. — La komplemento de la pasiva participo estas signata per la prepozicio *de*, se oni parolas pri aganto ; *per*, se oni parolas pri ilo, maniero ; *el*, se oni parolas pri materialo, k. t. p.

Tiu ĉi komercaĵo estas ĉiam volonte aĉetata de mi (F. 25).

La tuta supraĵo de la lago estis kovrita per naĝantaj folioj kaj diversaj aliaj kreskaĵoj (F. 35).

Tiu ĉi poŝhorloĝo estas farita el oro.

EBL

Tiu sufikso naskas nature adjektivojn el verba radiko ; ĝi montras *pasivan* kapablon, kion oni nomas latine *possibilitas ; iu amebla* estas tiu homo, kiu povas esti amata de aliaj, sed ne tiu homo, kiu povas ami la aliajn *(amema)*.

Via parolo estas tute ne komprenebla kaj viaj leteroj estas ĉiam skribitaj tute nelegeble (F. 41).

Li rakontis al mi historion tute ne kredeblan (F. 47).

Apartaj uzoj. — La vortoj formitaj per *ebl* ne respondas ĉiam tute ĝuste la naciajn latinidajn vortojn finiĝantajn per *able, ible*. Aliaj vortoj ankaŭ ricevis iom apartigitan signifon. Tion montros la sekvantaj ekzemploj :

Vitro estas travidebla (F. 47). — La logika signifo de tiu frazo estas, ke oni povas vidi vitron tra alia objekto. La komuna uzado tamen donis al *travidebla*, konforme al la supra ekzemplo, la signifon de la latina radiko *transpar*.

Ŝtalo estas fleksebla, sed fero ne estas fleksebla (F. 41). — D-ro Zamenhof celas evidente per *fleksebleco* la econ, la kapablon, kiun, havas ŝtalo, repreni propramove sian antaŭan rektan formon post momenta fleksiĝo ; tio ĉi apartigas *kurbigebla* de *fleksebla : kurbigebla* montras ion, kio ne povas repreni propramove sian antaŭan formon post fleksiĝo, sed restas definitive kurba ; *fleksebleco* estas do samsenca kun *risorteco.*

Ne ĉiuj kreskaĵoj estas manĝeblaj (F. 41) kaj ni povas aldoni : *ne ĉiu fluidaĵo estas trinkebla.* — La signifo de tiuj ĉi ambaŭ *ebl*-vortoj estas preciza nur dank' al la kunteksto ; ĝi estas ja meza inter la pura *ebl*-signifo kaj la *ind*-signifo : vidu *ind.*

La tablo staras malrekte kaj kredeble baldaŭ renversiĝos (F. 33). — Tiu ĉi *kredeble* montras ne nur ion, kio povas okazi, sed ion, kio verŝajne okazos ; france oni dirus, ke la afero estas ne nur *possible,* sed *probable :* tiu lasta signifo estas preskaŭ ĉiam la signifo de *kredeble : Mi kredeble ne povos veni hodiaŭ* (F. 14). Oni vidas, ke tie ĉi *kredeble* egalvaloras *verŝajne.*

Ĉu vi amas vian patron? Kia demando! Kompreneble, ke mi lin amas! (F. 41). — Tiu ĉi lasta ekzemplo montras al ni signifon oftan de *kompreneble,* kiu egalvaloras tie ĉi *nature.* Estas rimarkinde, ke la vorto *nekompreneble* ne havas la signifon *de nenature,* sed nur sian radikan signifon de « en maniero, kiun oni ne povas kompreni ».

Radika uzado. — *Ebl* estas ofte uzata radike : *ebla, ebleco, eblaĵo, ebligi, ebliĝi, neebla, neebleco,* k. t. p., precipe en sia adverba formo *eble, neeble.*

Eble tradukas ofte la francan *peut-être,* la anglan *perhaps,* la germanan *vielleicht ;* oni plendis, ke la samtempa uzado de *ebla* kun la signifo de la latina *possibilis,* germana *möglich,* povas naski embarason. Mi konfesas, ke persone mi neniam ankoraŭ suferis tian embarasiĝon ; cetere ni devas ne forgesi, ke ni povas uzi ankaŭ vortojn, kiel *verŝajna, verŝajne, verŝajneco, okaza, okaze, laŭokaze, povas esti,* k. t. p., kiuj liveras al ni riĉan materialon por esprimi tiujn tre proksimajn nuancetojn de nia penso.

Kunlige kun *kiel,* la vorto *eble* liveras oftuzajn esprimojn *kiel eble pli, kiel eble plej :*

Estas bone uzadi la vorton « je » kiel eble pli malofte (F. 29). — La komuna uzado enkondukis la esprimon *kiel eble plej,* kiu estas multe pli ofte renkontata ol *kiel eble pli,* kvankam ĝia signifo ne estas tute sama.

Pro sia pasiveco, *ebl* ligiĝas ordinare bone nur kun transitivaj verbaj radikoj ; kun la netransivitaj oni uzas prefere *em.*

Devenaĵoj de ebl-vortoj. — La adjektivoj formitaj per *ebl* kondutas kiel ceteraj adjektivaj radikoj por liveri novajn devenaĵojn : *kredebla, kredeblaĵo, kredebleco, kredeblulo, kredebligi,* k. t. p. Kiel por ceteraj adjektivoj, oni povas uzi ankaŭ la ĝeneralajn « neŭtralajn » formojn per la simpla sufikso o ; tiel oni diras *la kredeblo, la nekredeblo,* same bone kiel *la mirindo, la sindonemo, la varmo,* k. t. p.

EC

Tiu sufikso naskas nature substantivojn el adjektivaj radikoj ; ĝi montras abstraktan kvaliton, nevivantan, ne reale ekzistantan estaĵon, kvazaŭ moralan personon. (Pri ĝia komparo kun *aĵ* kaj *ul* vidu tiujn ĉi ambaŭ sufiksojn).

Kiel ambaŭ ĵus nomitaj sufiksoj, *ec* estas renkontata ankaŭ kun substantivaj kaj verbaj radikoj, pro eligo de la meza adjektiva aŭ adjektiv-participa signo ; ĝi mem ankaŭ ofte estas anstataŭata de simpla o *(vidu aĵ).*

Jen estas kelkaj ekzemploj pri ĉi tiuj diversaj okazoj :

La acideco de tiu ĉi vinagro estas tre malforta (F. 35).

La alteco de tiu ĉi monto ne estas tre granda (F. 35).

La riĉeco de tiu ĉi homo estas granda, sed lia malsaĝeco estas ankoraŭ pli granda (F. 35).

Li amas tiun ĉi knabinon pro ŝia (1) *beleco kaj boneco* (F. 35).

Lia heroeco tre plaĉis al mi (F. 35).

Mi vivas kun li en granda amikeco (F. 35).

La erareco de via argumentado estas malfacile difinebla.

Tiu ĉi krimulo vere perdis la homecon.

Li havas bonan eduk(it)econ.

Radika uzado. — Radike oni trovas *eco, eca,* por kvalito, kvalita ; *aliecigi* = ŝanĝi la esencon, la kvaliton.

Devenaĵoj de ec-vortoj. — La vortoj formitaj per *ec* estas veraj novaj substantivaj radikoj kaj kondutas, kiel la ceteraj sub-

(1) Rimarku tiun ĉi uzon de *ŝia,* kiu restas en singularo kvankam ĝi rilatas du substantivojn.

stantivaj radikoj por liveri novajn devenaĵojn : *ligna* aŭ *lignaja papero* estas papero farita el ligno, aŭ entenanta lignajn pecetojn ; *ligneca papero* estas papero tre malmola, rigida, kiu havas ecojn de ligno, kvankam ĝi povas esti farita el tute alia materialo, ekzemple el pajlo. Simile, *graseca ŝmiraĵo* estas ŝmiraĵo, kiu havas ecojn de grasaĵo, sed ne estas grasaĵo, kiel ekzemple grafito.

EDZ

Edz estas montrata, kiel sufikso, en diversaj lernolibroj, sed ĝi pli ĝuste estas konsiderinda kiel simpla radiko substantiva, kiu liveras oftuzajn kunmetitajn vortojn Pro la signifo speciala de tiu ĉi vorto, oni ne devas forgesi, ke ĝi liveras du paralelajn seriojn da vortoj, unu virseksan, alian virinseksan, kaj eĉ trian « ambaŭseksan » kun *ge :*

VIRSEKSA	VINRINSEKSA	AMBAŬSEKSA
Edzo	Edzino	Geedzoj
Edza	Edzina	Geedza
Edzeco	Edzineco	Geedzeco
Edzeca	Edzineca	Geedzeca
Edziĝi (al, je, kun)	Edziniĝi	Ge-dziĝi
Edzigi	Edzinigi (ŝin)	Geedzigi

Reĝedzino, reĝinedzo, lavistinedzo, k. t. p.

Sinjoro Petro kaj lia edzino tre amas miajn infanojn (F. 18).

La edzino de mia patro estas mia patrino (F. 33).

Mi gratulis telegrafe la junajn geedzojn (F. 36).

La patro de mia edzino estas mia bopatro (F. 36).

Virino, kiu kuracas estas kuracistino ; edzino de kuracisto estas kuracistedzino (F. 36).

Li ne estas lavisto, li estas lavistinedzo (F. 36).

La reĝido... edziĝis je ŝi (F. 23).

Li fianĉiĝis kun fraŭlino Berto ; post tri monatoj estos la edziĝo ; la edziĝa soleno estos en la nova preĝejo kaj la edziĝa festo estos en la domo de liaj estontaj bogepatroj (F. 39).

Ŝi edziniĝis kun sia kuzo, kvankam ŝiaj gepatroj volis ŝin edzinigi kun alia persono (F. 39).

EG

Tiu sufikso estas uzata indiferente kun adjektivaj, substantivaj kaj verbaj radikoj, kiujn ĝi aliigas grade ; ĝi plifortigas, pligrandigas la ideon, samtempe iom specialigante, eĉ krudigante ĝin, simile kiel la sufikso *et* ĝin malplifortigas kaj ofte dolĉigas.

Eg ne estas simpla sinonimo de adverbo *tre* kaj ne povas servi por simpla anstataŭado de la adjektivo *granda ;* ĝi kreas vorton apartan, *novan,* kun senco *speciala ;* la postaj ekzemploj montros ĝin.

Adjektivaj radikoj. — « *Kion mi vidas !* » *diris ŝia patrino kun grandega miro* (F. 17).

Tiu ĉi patrino varmege amis sian pli maljunan filinon (F. 13).

La fera bastono... estas nun brule varmega (F. 31).

En varmega tago mi amas promeni en arbaro (F. 34).

Substantivaj radikoj. — *Antaŭ nia milistaro staris granda serio da pafilegoj* (F. 38).

Grandega hundo metis sur min sian antaŭan piedegon kaj mi de teruro ne sciis, kion fari (F. 38) (1).

Kun bruo oni malfermis la pordegon kaj la kaleŝo eniris en la korton (pordego = pordo speciala por veturiloj, ne nur simpla granda pordo) (F. 38).

Tio ĉi estis jam ne simpla pluvo, sed pluvego (F. 38).

Simile *korto* kaj *kortego* (reĝa).

Verbaj radikoj. — *Ridegi, ploregi, amegi,* k. t. p.

Eg estas uzebla nur kun vortoj, kiuj povas ricevi gradan aliigon ; ekzemple : *veterego, mortegi,* nenion signifus.

---

(1) Rimarku pri tiu ĉi ekzemplo, ke oni ne estas devigata en Esperanto uzi ĉiam *eg* (aŭ similan sufikson) por membroj de bestoj ; en Esperanto oni ne devas uzi malŝatigan vorton por bestoj sed oni uzas ordinare vorton kiel por homoj. Tie ĉi, d-ro Zamenhof diras *piedego* ĉar li parolas pri hundo grandega, same kiel li dirus *piedeto* se li parolus pri hundeto. Estas do eraro, laŭ nia opinio, diri ĉiam ekzemple *buŝego, piedego,* por bestoj, eĉ por malgrandaj bestetoj, kiel faras diversaj lernolibroj, ĉar tio entenas malŝatan ideon, kaj logike oni devus uzi jen *eg,* jen *et,* laŭ la grandeco de la besto. Multe pli simple estas diri *piedo, buŝo,* por bestoj egale kiel por homoj, kaj konservi *piedego* kaj *buŝego* nur por eksterordinare grandaj bestoj (kompare kun la ordinara kresko de la dirita besto) kaj *piedeto, buŝeto,* por la malgrandaj bestoj (eĉ *et* ofte havas karesan signifon)

Pri komparo de *eg* kun *et* kaj *mal,* jen estas fundamenta ekzemplo :

Tuj post la hejto la forno estis varmega ; post unu horo ĝi estis jam nur varma, post du horoj ĝi estis nur iom varmeta, kaj post tri horoj ĝi estis jam tute malvarma (F. 38).

TABELO DE GRADOJ DE VARMO

iom varmeta	iom nevarma
varmeta	nevarma
iom varma	malvarmeta
varma	iom malvarma
varmegeta	malvarma
iom varmega	malvarmegeta
varmega	iom malvarmega
tre, ekstreme varmega	malvarmega
k. t. p.	tre, ekstreme malvarmega
	k. t. p.

Radika uzo. — *Egeco, ega, ege, treege,* k. t. p.

Devenaĵoj de eg-vortoj. — La vortoj formitaj per *eg* kondutas, kiel adjektivaj, substantivaj aŭ verbaj radikoj por liveri novajn devenaĵojn, laŭ tio, ĉu ili estas tiritaj el adjektivaj, substantivaj aŭ verbaj primitivaj radikoj.

EJ

Tiu sufikso naskas nature substantivojn el substantivaj aŭ verbaj radikoj. Ĝi montras lokon (ĉambron, domon, konstruaĵon, spacon) speciale rezervitan por io aŭ dediĉitan al io :

La domo, en kiu oni lernas, estas lernejo, kaj la domo, en kiu oni preĝas, estas preĝejo (F. 40).
La kuiristo sidas en la kuirejo (F. 40).
La kuracisto konsilis al mi iri en ŝvitbanejon (F. 40)
La soldatoj loĝas en la soldatejo.

Diferenco inter « ej », « uj » kaj « ing ». — La Fundamento diras :

Magazeno, en kiu oni vendas cigarojn, aŭ ĉambro, en kiu oni tenas cigarojn, estas cigarejo ; skatoleto aŭ alia objekto, en kiu oni tenas cigarojn, estas cigarujo ; tubeto en kiu oni metas cigaron, kiam oni ĝin fumas, estas cigaringo (F. 40).

Ej, kiel similaj porsubstantivaj sufiksoj, liveras vortojn iom neprecizajn ; ekzemple : *cigarejo,* laŭ la difino de l'Fundamento, estas magazeno, en kiu oni vendas, aŭ ĉambro, en kiu oni konservas cigarojn. Praktike, tia senclarĝeco estas tre oportuna ; se, iaokaze, oni bezonas pli mallarĝsencan vorton, tiaokaze oni uzas kunmetitan vorton, ekz. *cigarvendejo, cigarkonservejo ;* sed ordinare la ĉirkaŭa teksto sufiĉas por klare komprenigi la penson.

Radika uzado. — Malofta ; oni renkontas *ejo* por loko rezervita al societo, sidejo de grupo, k. t. p.

Devenaĵoj de ej-vortoj. — Ili kondutas, kiel ceteraj substantivaj radikoj : *preĝejisto, preĝejaĵo, juĝeja tegmento, tabakejisto,* k. t. p.

EM

Tiu sufikso formas nature adjektivojn el verbaj radikoj. Ĝi montras inklinon, aktivan kutimon ; oni povus ĝin traduki per la ĉirkaŭfrazo : *inklina* (kutiminta) *al...*
Ekzemploj Fundamentaj :

Lia edzino estas tre laborema kaj ŝparema, sed ŝi estas ankaŭ tre babilema kaj kriema (F. 41).
Li estas tre ekkolerema kaj ekscitiĝas ofte ĉe la plej malgranda bagatelo, tamen li estas tre pardonema, ĉar li ne portas longe la koleron kaj li tute ne estas venĝema (F. 41).

Regule, *em* ordinare ne algluiĝas do sempere al substantiva aŭ adjektiva radiko. La perilo plej ofte uzata por tio estas *ig* aŭ *iĝ : entuziasmiĝema, beliĝema, alkaliĝema,* k. t. p. Tamen, D-ro Zamenhof montras en la Ekzercaro ekzemplon de mallongigo simila je mallongigo de *eco, aĵo* per o *simpla :*

Li estas tre purema, kaj eĉ unu polveron vi ne trovos sur lia vesto (F. 41) (1).

Radika uzado. — Oni renkontas *emo, emeco* por inklino ; *ema* por *inklina :*

Li emas al melankolio.

(1) Laŭ la komuna uzado, oni preferas uzi, kun adjektivaj kaj substantivaj radikoj, kunmetitan vorton kun radiko *am : glorama, belama, varmama* (*varmema,* signifas pli ĝuste *varmiĝema*).

Devenaĵoj de em-vortoj. — La adjektivoj formitaj per *em* kondutas, kiel ceteraj adjektivaj radikoj por liveri novajn devenaĵojn : substantivojn kaj verbojn : *vengemeco, mallaboremulo, pardonemigi.* Tio signifas, ke oni algluas la necesajn sufiksojn *ec, aĵ, iĝ,* k. t. p. nur laŭbezone, por ne trolongigi la vorton. Tiu rimarko utilas precipe por kvalitaj (ecaj) substantivoj, ĉar iam disputo naskiĝis por sciiĝi, ĉu oni devas diri, ekz., *mallaboremo* aŭ *mallaboremeco.* Laŭ nia vidpunkto, ni komprenas, ke oni povas ambaŭ formojn uzi egale bone, kvankam, en pli multaj okazoj, la unua estas preferinda, ĉar ĝi estas pli simpla kaj malpli longa.

Nun, en tiaj devenaĵoj, precipe kun *ul,* oni forlasas *em : obstinulo* anstataŭ *obstinemulo, timulo,* anstataŭ *timemulo,* k. t. p.

END

Tiu sufikso ne estas oficiala, sed ofte uzata, ĝi formas adjektivojn el transivitaj verbaj radikoj kaj signifas : *kiu devas, devus esti... ita,* kaj sekve donas ĉiam sencon pasivan al la formita adjektivo. *Skribenda letero* estas letero, kiu nepre devas aŭ devus esti skribita ; dum *letero skribota* estas letero, kiun oni simple intencas skribi estontece ; komparu ankaŭ *letero skribebla,* letero, kiun oni povas skribi aŭ ne, kaj *letero skribinda,* letero, kiu meritas esti skribata. (Vidu *ebl, ind) :*

Tiu tasko estas farenda.
La impostoj estas pagendaj.

Radike kaj prefikse neuzata.

ER

Tiu sufikso estas unu el la plej malofte uzataj. Ĝi formas nature substantivojn el substantivaj radikoj, dispecigante la ideon kaj simpligante ĝin ĝis la unuo. *Er* estas « malkolektiga » sufikso, kontraŭa al sufikso *ar,* kaj montras la unuon, el kies kolekto konsistas iu amaso ; aŭ fragmenton, pecon el iu objekto (1) (tre malofte en tiu ĉi lasta senco ; oni prefere uzas vorton kunmetitan kun *pec) :*

Sablero enfalis en mian okulon (F. 41).
Unu fajrero estas sufiĉa por eksplodigi pulvon (F. 41).
Eĉ ne unu polveron vi trovos sur lia vesto (F. 41)).

(1) Ekz. *botelero, botelpeco.*

Similaj vortoj estas : *hajlero, grenero, glaciero, neĝero, ĉenero, monero, polvero,* k. t. p.

Radika uzado. — Oni renkontas *ero, era, erigi.*

ESTR

Tiu radiko, montrata kiel sufikso de kelkaj aŭtoroj, estas komparebla kun *edzo* kaj povas esti pli ĝuste konsiderata kiel simpla radiko substantiva. Ĝi formas simplajn vortojn *estro* (vidu *ĉefo), estraro, estrarano, estri, estriĝi,* kaj multajn kunmetitajn : *ŝipestro, landestro, batalionestro,* k. t. p. :

Mi restas tie ĉi laŭ ordono de mia estro (F. 26).
La ŝipanoj devas obei la ŝipestron (F. 37).
La regnestro de nia lando estas bona kaj saĝa reĝo (F. 37).
Nia provincestro estas severa, sed justa (F. 37).
Nia urbo havas bonajn policanojn, sed ne sufiĉe energian policestron (F. 37).
Nia regimentestro estas por siaj soldatoj kiel bona patro (F. 37).
Mi faris ilin estroj super vi, milestroj kaj centestroj kaj kvindekestroj kaj dekestroj (Z.)

ET

Tiu sufikso estas kontraŭa al *eg ;* ĝi montras malgrandigon de la ideo kaj ĝia uzado estas tute simila al tiu de *eg* (vidu ĉi tiun sufikson). Ni montras ĉi sube nur la Fundamentajn ekzemplojn ne presitajn ĉe *eg :*

Mi aĉetis por la infanoj tableton kaj kelke da seĝetoj (F. 38).
En nia lando sin ne trovas montoj, sed nur montetoj (F. 38).
En somero ni trovas malvarmeton en densaj arbaroj (F. 38).
Li sidas apud la tablo kaj dormetas (F. 38).
Mallarĝa vojeto kondukas tra tiu ĉi kampo al nia domo (F. 38).
Sur lia vizaĝo, mi vidis ĝojan rideton (F. 38).

Et estas kelkafoje uzata kun karesa signifo ; en tiu ĉi senco oni trovas *eta* anstataŭ *malgranda (eta mano, eta piedo) ; ete, etulo, etulino.*

ID

Tiu sufikso servas por formi substantivojn el substantivaj radikoj :

1-e, por nomi la junajn bestojn ; 2-e, por nomi la homojn apartenantajn al unu sama familio aŭ raso iniciatita de fama viro.

1-e. **Junaj bestoj :** *koko, kokido ; bovo, bovido ; leporo, leporido*, k. t. p. La novaj vortoj povas kompreneble alpreni ankaŭ la finaĵon *in : kokidino, bovidino*, k. t. p.

Id-vortoj ne devas esti konfuzataj kun *et*-vortoj : ili montras ne malgrandan, sed nur ankoraŭ junan, ne plenkreskintan beston.

2-e. **Familia aŭ popola raso** : *Izraelidoj, Napoleonidoj, latinidaj lingvoj*, k. t. p. En tiu dua kategorio, estas ankaŭ kelkaj *id*-vortoj formitaj per komunaj nomoj de altrangaj personoj : *reĝido, princido, reĝinido*, k. t. p.

Radika uzado. — *Ido, ida, idaro, geidoj.*

IG

Tiu sufikso servas por formi nature verbojn el adjektivaj (kaj substantivaj) radikoj, same kiel *iĝ*. Ĝia signifo estas *fari...-a* (aŭ *fari...-o)*, meti en staton montratan de la radiko. Ekzemple : *pura, purigi* (meti en staton puran...) ; *maljuna, maljunigi ; bela, beligi ; fiaĉo, fiaĉigi ; edzino, edzinigi.*

Mi prenis broson kaj purigis la veston (F. 39).
Ŝi edziniĝis kun sia kuzo kvankam ŝiaj gepatroj volis edzinigi ŝin kun alia persono (F. 39).

Uzado kun verbaj radikoj. — Kun adjektivaj aŭ substantivaj radikoj, la uzo de *ig* estas ĉiam klara. Sed oni ne povas diri la samon pri ĝia uzo kun verbaj radikoj.

La stato en verboj estas montrata de l'adjektiva participo, sed plej ofte oni ne esprimas tiun ĉi lastan, por plimallongigi la vorton, kaj oni gluas *ig* senpere al la radiko :

Venigu la kuraciston (venantigu, igu venanta), *ĉar mi estas malsana.*

Li venigis al si el Berlino multajn librojn (F. 39).
Mia onklo ne mortigis sin mem kaj ankaŭ estis mortigita de neniu (F. 39).
Mi ne pendigis mian ĉapon sur tiu ĉi arbeto (F. 39).
Sidigu vin (aŭ sidiĝu), Sinjoro (F. 39).

Ĉiuj Fundamentaj ekzemploj rilatas netransitivajn verbojn, t. e. verbojn, kiuj havas nur unu klason de participoj *(anta, inta, onta)*. Sekve, en ĉi tiuj ekzemploj, la kompreno de la vorto estas senduba.

Sed en la komuna uzado, oni tre ofte uzas ankaŭ *ig* kun transitivaj verbaj radikoj, kiuj posedas ankaŭ participojn pasivajn *(ata, ita, ota)*. En tiu ĉi lasta okazo, la verbo, formita per *ig* estas dusenca. Ekzemple, la frazo *mi manĝigis mian ĉevalon* povas laŭvole signifi (1) *mi manĝatigis mian ĉevalon* (mi donis mian ĉevalon, kiel nutraĵon) aŭ *mi manĝantigis mian ĉevalon* (mi donis nutraĵon al mia ĉevalo).

Plej ofte, la kunteksto, la ĝenerala enhavo de la rakonto, montras klare la signifon de la verbo.

Kiam ekzistas — aŭ povas ekzisti — vere evitinda dubo, la plej bona rimedo konsistas : *ŝanĝi la frazon* (kiel en la supra ekzemplo : *mi donis nutraĵon al mia ĉevalo)* kaj ne sklave restadi ĉe laŭvorta traduko de nacia verbo.

Alia rimedo, sed pli multepeza estas : uzi la plenan formon per *ig* kun la konvena participo, sinteze aŭ analize :

1-e, *Mi manĝatigis mian ĉevalon*, aŭ *mi igis mian ĉevalon manĝata ;*

2-e, *Mi manĝantigis mian ĉevalon*, aŭ *mi igis mian ĉevalon manĝanta* (2).

Kun transivitaj verbradikoj, la plej ofta senco de *ig*-verbo estas la pasiva *(igi...-ata)*.

Tamen la supraj ekzemploj montras, ke tiu ĉi regulo ne estas absoluta.

---

(1) Kiel france: *J'ai fait manger mon cheval.* Sama dusencaĵo.

(2) Oni povus ankaŭ diri: *mi igis mian ĉevalon manĝi*, sed la dusencaĵo restus sama. Aliparte en franca lernolibro, oni donas jenan regulon: « Kiam la komplemento estas antaŭ la verbo, ĝi estas la aganto; kiam ĝi estas post la verbo, ĝi estas la agato ». Ekz., la frazo *la generalo igis manĝi la ĉevalojn* signifus, ke oni manĝis la ĉevalojn, ĉar *ĉevalojn* estas post la verbo; kontraŭe, la frazo: *la generalo igis la ĉevalojn manĝi*, signifus, ke la ĉevaloj manĝis, ĉar *ĉevalojn* estas antaŭ la verbo. Tia diferencigo de senco per konstruo de frazo estas absolute kontraŭa al la principoj de Esperanto kaj klara... eble nur por francoj

Ni donas ĉi sube liston de la ĉefaj netransitivaj verbradikoj, kun kiuj *ig* valoras ĉiam *igi ...-anta :*

agi
akuŝi
alterni
aparteni
aperi
argumenti

babili
balbuti
barakti
bleki
boji
boli
brili
bruı
bruli

ĉesi

danci
daŭri
degeli
degeneri
deĵori
deliri
dibuĉi
diferenci
dormi
droni

efiki
eksplodi
ekzisti
enui
erari
esti (1)

fali
fanfaroni
farti
fasti
flirti
flori
flui

gliti
grinci

ĝemi
ĝoji
ĝui

haladzi
halti
hipokriti
honti

indigni
influi
intenci
iri

ĵongli

kapitulaci
kartavi
koleri
komerci
konscii
konsenti
konsisti
konspiri
konveni
kosti
kraki
kreski
krevi
krozi
kuri
kuŝi

labori

marŝi
mediti
migri
militi
miri
morti
muĝi
murmuri

naĝi

odori
okazi

paradi
pasi
paŝi
peki
peni
pendi
pensi
pepi
perei
persisti
pezi
plaĉi
plaŭdi
plendi
profiti
promeni
prosperi
rampi
remi
ribeli
rifuĝi
ripozi

salti
sibli
sidi
signifi
singulti
skermi
soni
sonori
stari
stertori
strabi
sveni

ŝajni
ŝimi
ŝpruci
ŝveli

tamburi
taŭgi
terni
tinti
tremi
troti
tusi

vagi
velki
veni
vojaĝi

zumi

(1) Kaj ĉiuj verboj formitaj per *esti* aŭ *i = esti* (kun substantivoj) ekzemple: *bonodori.*

Uzado kun prepozicioj, adverboj, k. t. p. — Iafoje ankaŭ *ig* estas uzata kun prepozicioj, adverboj, kaj aliaj similaj vortoj. Tiaokaze, oni povas konsideri, ke tiuj ĉi radikoj estas komprenataj adjektive :

Forigu vian fraton, ĉar li malhelpas al ni (F. 39). Forigu = igu fora.

Radika uzado. — Radike, *ig* estas tre ofte uzata kun *i* por formi verbon *igi*, kies senco estas proksimume tiu de *fari* en ĝia signifo *meti en staton...*, sed ne en ĝia signifo *fabriki : mi igis lin riĉa*, aŭ *mi faris lin riĉa.* Sed oni povas diri : *mi igis mian laboron* anstataŭ *mi faris mian laboron.*

IĜ

Tiu sufikso servas nature por formi verbojn el adjektivaj (kaj substantivaj radikoj ; ĝi signifas, ke oni venas aŭ *estas metata en staton* montratan de la radiko : *paliĝi* signifas, ke de stato nepala (ekz. ruĝa) oni venas en staton palan ; *edziĝi* signifas, ke de stato fraŭla oni venas en staton edzan, k. t. p. ; **ĝi do havas signifon pasivan,** kvankam tiu ŝanĝiĝo povas esti memvola, kontraŭe al *ig*, kiu havas ĉiam aktivan signifon : *mi paligas vin* signifas : *mi metas vin en staton palan ; mi paliĝas* signifas : *mi venas en staton palan* (pro via agado kontraŭ mi aŭ pro ia interna kaŭzo).

La sufikso *iĝ* estas uzata same kiel *ig*, t. e. kun radikoj adjektivaj, substantivaj, verbaj, prepoziciaj, k. t. p.

Adjektivaj kaj substantivaj radikoj. — Ambaŭ uzoj prezentas nenian malfacilaĵon.

Jen estas Fundamentaj ekzemploj :

En la kota vetero, mia vesto forte malpuriĝis ; tial, mi prenis broŝon kaj purigis mian veston (F. 39).

Li paliĝis de timo kaj poste li ruĝiĝis de honto (F. 39) (1).

En la printempo, la glacio kaj la neĝo fluidiĝas (F. 39).

Tiu ĉi maljunulo tute malsaĝiĝis kaj infaniĝis (F. 39).

Ŝi edziniĝis kun sia kuzo (F. 39).

Verbaj radikoj. — Kun verbaj radikoj, la stato estas montrata de la participo ; la demando estas do : kiu participo, aktiva aŭ pasiva, ligiĝas nature kun *iĝ ?*

(1) Rimarku tiun *de* anstataŭ *pro* : ĝi montras la pasivecon de la verbo.

La pasiveco de la formita verbo tuj montras al ni, ke se ekzistas du participoj (t. e. kun transitivaj verboj), la taŭga participo estas la pasiva. En tia okazo, *iĝ* gluigita al verba radiko transitiva, signifas do *iĝi -ata :*

Kiam vi ekparolis, ni atendis ion novan, sed baldaŭ ni vidis, ke ni trompiĝis (ke ni estis trompataj de ni aŭ de vi) (F. 40).

Kontraŭe, **kun netransitivaj** verbradikoj, ĉar ekzistas nur unu speco de participo (aktiva), la demando ne povas stariĝi, kaj necese en tia okazo *iĝ* signifas *iĝi -anta, veni en la staton -antan :*

Mi ne pendiĝis mian ĉapon sur tiu ĉi arbeto, sed la vento forblovis de mia kapo la ĉapon kaj ĝi, flugante, pendiĝis sur la branĉoj de la arbeto (F. 39) (pendiĝis = iĝis pendanta).

Sidigu vin (aŭ sidiĝu), sinjoro! (F. 39) (sidiĝu = iĝu sidanta).

Simile, *kuŝiĝi = iĝi kuŝanta ; dormiĝi = iĝi dormanta ; stariĝi = iĝi staranta ; estiĝi = iĝi estanta,* k. t. p.

Oni devas tre zorge atenti, ke *iĝi,* por esti ĝuste uzata kun netransitivaj verbradikoj, **devas ĉiam signifi** *veni en la staton -antan ;* ĝi do devas ĉiam montri **ŝanĝiĝon de stato.** Por esprimi simplan estadon en la stato, oni uzas la solan verbradikon sen *iĝ* (kun aŭ sen *ad*) :

Mi pentas pro mia kulpo = mi estas nun pentanta ; eble mi jam pentis pli frue, sed tio ĉi estas indiferenta.

Pro via ripročado, mi sentas, ke mi pentiĝas = mi venas en staton de pentado ; mi ne pentis pli frue, antaŭ via ripročado, sed nun mi **komencas penti ; tiu ŝanĝiĝo** estas la grava afero.

Simile D-ro Zamenhof diras en la Fundamento :

Mia onklo ne mortis per natura morto, sed li tamen ne mortigis sin kaj ankaŭ estis mortigita de neniu ; unu tagon, promenante apud la reloj de fervojo, li falis sub la radojn de veturanta vagonaro kaj mortiĝis (F. 39).

Kiam la netransitiva verbo jam per si mem havas signifon de *fariĝo, iĝ* plej ofte estas superflua kaj oni nur eksterordinare bezonas ĝin uzi (kiel *mortiĝi* en la supra ekzemplo) ; tial plej ofte oni uzas simple *veni, morti,* k. t. p. Praktika maniero solvi la problemon, estas provi la uzadon de ambaŭ substantivoj, unu formita el la verbradiko sola kaj dua formita de la vortradiko kun *iĝ : pento* kaj *pentiĝo ; dormo* kaj *dormiĝo ; staro* kaj *stariĝo,* k. t. p. Oni tiamaniere multe pli klare komprenas la ĝustan signifon de la verbo.

Iĝ kaj ek. — Kun netransivitaj verbradikoj, la signifo de *iĝ* (veno en staton...) estas tre proksima al tiu de *ek* (komenco de ago). Tial ofte oni povas uzi unu aŭ la alian indiferente : *ekstari, stariĝi ; eksidi, sidiĝi ; ekveni, ekdormi, ekpenti,* k. t. p. Sed oni devas atenti, ke *ek* ne signifas nur komencon de ago, sed ĝi montras ankaŭ ĝian nedaŭrecon ; tial oni devas uzi *ek* nur se dusenceco ne estas timinda. Ekzemple, se mi diras : *ĉe la eniro de mia patrino, la sinjoro, ekstaris,* tio povas signifi, ke la sinjoro starigis sin momente kaj tuj residigis sin ; sed se mi uzas *stariĝis,* la sama kompreno ne estas ebla. La okazo kaj la kunteksto montras, ĉu oni povas sendanĝere uzi *ek* anstataŭ *iĝ.* Oni povas ankaŭ, kiel supre, provi la substantivojn formitajn el verboj kun *ek* kaj kun *iĝ : ekstaro* kaj *stariĝo ; ekpento* kaj *pentiĝo ; ekesto* kaj *estiĝo,* k. t. p.

Diferenco inter iĝi kaj la ordinara simpla pasivo. — Kun transivitaj verbradikoj, ni vidis, ke *iĝi* montras venon en staton pasivan : *rompiĝi = esti rompata.* Tamen, oni ne devas konsideri ambaŭ formojn kiel egalvaloraj. La ordinara pasiva formo (per *esti* kaj la pasiva participo) montras precipe la pasivecon : *la glaso estas rompita* signifas pli speciale, ke iu rompis la glason ; la frazo : *la glaso rompiĝis* celas tiri la atenton al la nuna stato (rompeco) de la glaso, ne difinante speciale ĉu iu rompis la glason aŭ ĉu ĝi rompiĝis pro ia okaza aŭ interna kaŭzo ; la pasiveco estas do pli forte montrata per *esti -ata ;* **la rezultato de l' agado** estas la ĉefa celo de *iĝ.*

Refleksiva uzado de iĝ. — Oni ofte uzas *iĝ* kun transitivaj verbradikoj uzataj absolute por montri, ke la subjekto estas en stato pasiva : *la tero turniĝas en la spaco, la rivero ruliĝas sur ŝtonoj.* Tia uzado ŝajnas iom stranga, se oni konsideras, ke *iĝ* montras esence ŝanĝiĝon de stato ; oni povas kompreni tiujn vortojn, nur klarigante, ke oni konsideras la turniĝadon de la tero, ekzemple, kel senĉesan kaj renoviĝantan moviĝadon, pro agado de iu forto. Tamen, en tiaj okazoj, estas preferinde korekti la mankon per sufikso *ad* kaj diri : *la tero turniĝadas, la rivero ruliĝadas.* En kelkaj okazoj, oni povas uzi ankaŭ la verbradikon solan (sen *iĝ*) kun *sin ; li troviĝis* aŭ *li trovis sin antaŭ la malamikoj ; la tero turn(ad)as sin en la spaco ; la rivero rul(ad)as sin sur ŝtonoj.* La dua formo ŝajnas al ni preferinda (1).

(1) *Fariĝi* signifas, ke la nova stato estas kaŭzata de io **ekstera**, dum *iĝi* signifas, ke la ŝanĝiĝo venas de la subjekto mem: *mi iĝas pli maljuna* = pli-maljuniĝas ĉiutage; *s-o Merchant fariĝis prezidanto de ICK.*

Prepoziciaj, k. t. p. radikoj. — Kiel *ig*, la sufikso *iĝ* estas iafoje uzata kun prepoziciaj aŭ adverbaj radikoj (uzataj adjektive) por formi verbojn : *kuniĝi, aliĝi, foriĝi*, k. t. p. :

La junulo aliĝis al nia militistaro kaj kuraĝe batalis kune kun ni kontraŭ niaj malamikoj (F. 39).

Radika uzado. — Oni renkontas iafoje, sed malofte, *iĝi, iĝo*.

Devenaĵoj de iĝ-vortoj. — De la verboj formitaj per *igi, iĝi*, devenas substantivoj kaj aliaj vortoj laŭ la ĝenerala maniero. Pri substantivoj, oni devas atenti, ne konfuzi substantivojn formitajn per *ig* kaj tiujn formitajn per *iĝ*, same kiel oni apartigas ambaŭ specojn de verboj : *mortigo, mortiĝo*, k. t. p.

IL

Substantivojn formas nature ĉi tiu sufikso el verbaj radikoj (transitivaj) ; ĝi montras ĝenerale la instrumenton per kiu oni faras la agon esprimitan de la verbo : *tranĉi, tranĉilo ; kudri, kudrilo*.

La tranĉilo estis tiel malakra, ke mi ne povis tranĉi la viandon kaj mi devis uzi mian poŝan tranĉilon (F. 34).

Ĉu vi havas korktirilon, por malŝtopi la botelon? (F. 34).

Mi volis ŝlosi la pordon, sed mi perdis la ŝlosilon (F. 34).

Ŝi kombas al si la harojn per arĝenta kombilo (F. 34).

En somero ni veturas per diversaj veturiloj kaj en vintro ni veturas per glitveturilo (F. 34).

Hodiaŭ estas bela frosta vetero, tial mi prenos miajn glitilojn kaj iros gliti (F. 34).

Per hakilo ni hakas, per segilo si segas, per fosilo ni fosas, per kudrilo ni kudras, per tondilo ni tondas, per sonorilo ni sonoras, per fajfilo ni fajfas (F. 34).

Mia skribilaro konsistas el inkujo, sablujo, kelke da plumoj, krajono kaj inkosorbilo (F. 34).

Oni metis antaŭ mi manĝilaron, kiu konsistis el telero, kulero, tranĉilo, forko, glaseto por brando, glaso por vino, kaj telertuketo (F. 34).

La supraj ekzemploj montras al ni, ke :

1-e. La transitivaj verbradikoj povas formi nur unu substantivon per *il : tranĉi, tranĉilo*, k. t. p. La netransitivaj radikoj devus ĉiam alpreni *ig : faligilo*. Sed oni ofte forlasas tiun ĉi sufikson kaj mallongige gluigas *il* senpere al la radiko ; la vortoj formitaj per *il* kaj *igil* kun netransitivaj verbradikoj estas proksimume samsencaj ; tial oni renkontas : *dormilo, dormigilo ; irilo, irigilo* (1) ; *glitilo, glitigilo*. Sed, kun transitivaj verbradikoj, la vortoj per *igilo* estas maloftaj kaj tre diferencas de la vortoj per *ilo : tranĉilo, tranĉigilo ; manĝilo, manĝigilo*.

2-e. Du aŭ pli multaj verboj povas iafoje formi diversajn *il*-substantivojn proksimume samsencajn. Tiel, en la dua supra ekzemplo, oni povus diri, anstataŭ *korktirilo*, ankaŭ *malŝtopilo*.

3-e. La *il*-substantivo, kiel ĉiuj substantivoj simile formitaj de specialaj sufiksoj *uj, ej, ar*, k. t. p., havas tre larĝan signifon kaj montras pli ĝustasence klason de objektoj ol ian precizan apartan ilon mem (2).

En la plej multaj okazoj, la *il*-substantivoj oportune montras tion, kion oni bezonas diri kaj kion la ĉirkaŭanta frazo aŭ gesto klare difinas : *tranĉilo* povas esti ĉio, kio servas par tranĉi ; *kudrilo*, ĉio, kio servas por kudri, k. t. p. Tamen, praktike, ni neniam hezitas kompreni, kion oni diras.

Se, iafoje, oni bezonas pli precizan nomon, ekz. por specialistoj, katalogoj, k. t. p., tiam oni povas uzi ĉu kunmetitan vorton, ĉu novan apartan radikon : ekzemple, *poŝtranĉilo, kutelo ; kudrilo, kudromaŝino, nadlo ; presilo, presmaŝino ; pikilo ; pikbastono*, k. t. p. (3).

Fine, oni devas ne forgesi, ke multaj naciaj nomoj de iloj, pro longuzadaj sanĝiĝoj kaj komparoj, servas por nomi plej diversfunkciajn objektojn ; kompreneble, oni ne devas ilin laŭvorte traduki en Esperanton, sed oni devas elekti la ĝustan radikvorton. Ekzemple : la franca vorto *aiguille (kudrilo)* devas tradukiĝi laŭokaze per *montrilo* (horloĝa), *pintfolio* (abia), *relŝanĝilo* (fervoja), k. t. p.

(1) En tiu ĉi ekzemplo oni tamen povas apartigi *irilo* (france: *échasse)* de irigilo, morala aŭ fizika, instigilo iradi

(2) En tio sidas io speciala, kiun oni akre riproĉis al Esperanto, sed kiu, laŭ nia opinio, estas tre oportuna. Principo de nia lingvo estas, ke vorto estas des pli faciluzebla, ju pli larĝsenca ĝi estas, sed ĝia facilkompreneblo estas inverse proporcia: ekzemple, ju pli la vorto franca *chose* estas larĝsenca, des pli oportuna por ni ĝi estas, kiam ni volas paroli; des pli maloportuna, kiam ni bezonas kompreni, kion oni precize diris al mi. Kiel ĉiam, la vero estas en la meza vojo: ni devas eviti tro mallarĝsencajn sufiksojn, kies uzo estas tre komplika (kvankam kompreno facila) kaj ankaŭ tro multsignifajn vortojn. Ekzemplo de la malfaciluzeblo de tro precizaj sufiksoj estas, en Esperanto, la ĝusta uzado (por francoj almenaŭ) de participoj *ata* kaj *ita;* de substantivoj per *eco, aĵo, ado*, kiujn oni inklinas, kiel eble plej multe, anstataŭi per ĝenerala *o*, k. t. p.

(3) La praktika uzado iafoje specialigas ofte uzatajn vortojn, rezervante nur unu signifon el multaj al la *il*-vortoj: *tranĉilo* havas unu signifon preskaŭ specialan; *ŝlosilo* povus esti la nomo de *seruro*, sed neniam havas tiun lastan signifon.

Radika uzado. — Ilo, ilaro.

Devenaĵoj de il-vortoj. — Ili prezentas nenian malfacilaĵon kaj kondutas, kiel ordinaraj substantivaj radikoj : *trančilfaristo, hakilingo, kudrilujo, pafilegisto*, k. t. p.

IN

Tiu ĉi sufikso formas nature substantivojn el substantivaj radikoj. Ĝi montras la virinan sekson kaj kompreneble povas esti uzata nur kun radikoj montrantaj sekshavantan estaĵon. La uzado de *in* prezentas nenian malfacilaĵon.

La edzino de mia patro estas mia patrino kaj la avino de miaj infanoj (F. 33).

Sur la korto staras koko kun tri kokinoj (F. 35).

Por montri *inon* de *ido*, oni metas *in* post *id* ; tiel oni diras : *kokidino, bovidino*, kaj ne *kokinido, bovinido*, kio estus alisenca. Oni devas ne forgesi, ke *in*-vorto postulas pronomojn *ŝi, ŝia*.

Radika uzo. — *Ino, ina, inseksa* aŭ *virinseksa*, k. t. p.

IND

Tiu sufikso formas nature adjektivojn el (transitivaj) verbaj radikoj. Ĝi signifas : *kiu meritas esti... -ata*, kaj sekve donas ĉiam sencon pasivan al la formita adjektivo. *Laŭdinda homo* estas homo, kiu meritas esti laŭdata ; *aminda virino*, virino, kiu meritas esti amata. Por ĝuste uzi la sufikson *ind*, oni devas ĉiam povi anstataŭigi la *ind*-adjektivon per la supra ĉirkaŭfrazo. (Vidu *ebl, em, end*).

Fundamentaj ekzemploj (41) :

Li estas homo ne kredinda.

Via ago estas tre laŭdinda.

Tiu ĉi grava tago restos por mi ĉiam memorinda.

Li estas tre kredema : eĉ la plej nekredeblajn aferojn, kiujn rakontas al li la plej nekredindaj homoj, li tuj kredas.

Radika uzado. — *Indo* (merito), *inda, inde, indeco, indigi ; malinda ; senindeco.*

La reĝido konsideris, ke tia kapablo havas pli grandan indon, ol ĉio, kion oni povus doni dote al alia fraŭlino (F. 23).

Devenaĵoj de ind-vortoj. — Ili kondutas, kiel primitivaj radikoj substantivaj : *amindulo, kredindaĵo*, k. t. p. Kiel ĉe *em*, oni ofte forlasas *ec* post *ind* : *mirindo, mirindeco ; indo, indeco*, k. t. p.

ING

Tiu ĉi sufikso formas nature substantivojn el substantivaj radikoj. Ĝi montras ilon, en kiu oni fiksas aŭ enŝovas ian objekton por ĝin uzi :

Tubeto en kiu oni metas cigaron, kiam oni ĝin fumas, estas cigaringo (F. 40).

Bastoneto, sur kiu oni tenas plumon por skribado, estas plumingo (F. 40).

En la kandelingo sidis brulanta kandelo (F. 40).

La ĉefa diferenco inter *ujo* kaj *ingo* estas, ke la *uj*-vorto montras objekton, kiu entenas tute unu aŭ, ordinare, *kelkajn* aliajn objektojn kaj servas por ilin konservadi ; plej ofte la entenataj objektoj kuŝas libere en la ujo (ekz. *plumujo, sukerujo*).

Kontraŭe la *ing*-vorto montras ilon, kiu servas tenadi unu objekton kaj firme fiksas ĝin ĉe unu ekstremaĵo, sed ne entenas ĝin tute.

Devenaĵoj de ing-vortoj. — Ili liveras devenaĵojn, kiel ordinaraj substantivaj radikoj, sed malofte : *plumingo-faristo, kandelingejo*, k. t. p.

Radika uzado. — *Ingo*, mallarĝa fortika tegaĵo, en kiun oni enŝovas objekton.

INT kaj IT

Aktiva kaj pasiva verbsufiksoj por la pasinto. Pri ĉiuj reguloj, vidu *ant* kaj *at*.

Jen estas la devenantaj tempoj :

Esti aminta	Esti amita
Estas aminta	Estas amita
Estis aminta	Estis amita
Estos aminta	Estos amita
Estus aminta	Estus amita
Estu aminta	Estu amita.

ISM

Tiu sufikso formas substantivojn el substantivaj kaj adjektivaj radikoj. **Ĝi** montras doktrinon, sistemon, teorion, kulton, ian **kutiman pens-** aŭ agmanieron : ***absolutismo, alkoholismo, despotismo, katolikismo, komunismo, realismo, vegetarismo*** (1).

Radika uzo. — *ismo.*

IST

Tiu sufikso formas nature substantivojn el substantivaj aŭ **verbaj (transitivaj)** radikoj. Ĝi montras la profesion, metion kaj eĉ **simple** ordinaran, preferatan aktivan aŭ apartigantan okupiĝadon.

Kiu okupas sin je meĥaniko, estas meĥanikisto ; kaj kiu okupas *sin je ĥemio, estas ĥemiisto* (F. 32).
La fotografisto fotografis min, kaj mi sendis mian fotografajon al mia patro (F. 32).
Botisto faras botojn kaj ŝuojn (F. 32).
Ŝteliston neniu enlasas en sian domon (F. 37).
La kuraĝa maristo dronis en la maro (F. 37).
Mi havas diversajn servantojn (2), *kuiriston, ĉambristinon, infanistinon kaj veturigiston* (F. 37).
Li estas mensogisto (3) *kaj malnoblulo* (F. 37).

Ĉar la *ist*-vorto estas ofte iom tro larĝsenca (kiel vortoj formitaj per *il, ar, ej,* k. t. p.), oni devas iafoje uzi kunmetitan radikon por pli precizigi la profesion :

La lignisto vendas lignon, kaj la lignajisto faras tablojn, seĝojn kaj aliajn lignajn objektojn (F. 37).

(1) Vortoj kiel *bolŝevism, menŝevism, atavism, arkaism, imperialism, monoteism* estas memstaraj radikoj.
(2) Rimarku : *servantoj, servistoj.*
(3) Rimarku : *mensogisto, mensogulo.*

Aŭ oni uzas specialan radikon : *kelnero, tajloro.*

Por kelkaj rangaj aŭ sciencaj titoloj aŭ nemetiaj profesioj, oni ofte uzas internacian radikon sen *ist : direktoro, sociologo, redaktoro, doktoro, profesoro,* k. t. p.

Diplomatiiston oni povas ankaŭ nomi diplomato, sed fizikiston oni ne povus nomi fiziko, ĉar fiziko estas la nomo de la scienco mem (F. 32).

Por artamantoj kaj ne profesiuloj, oni uzas *ant, amant, an* (Vidu ĉi tiujn vortojn) :

Teatramanto ofte vizitas la teatron... (F. 32).

Radika uzado. — Tre malofta : *Je kio vi istas* (profesias) ? *Ĉu vi laboras iste aŭ nur okaze ?*

Devenaĵoj de ist-vortoj. — Ili prezentas nenion aparte notindan kaj kondutas, kiel ĉiuj substantivaj radikoj.

IV

Tiu neoficiala sufikso estas ĉefe renkontata en la teknika lingvo kaj estas proponata ankaŭ por la komuna lingvo, kie oni povas ĝin renkonti ; ĝi esprimas la aktivan kapablon : *kiu povas agi,* kaj estas preskaŭ ĉiam anstataŭebla per sufikse uzataj radikoj *kapabl, pov. :* Ekzemple : *nutriva* = nutropova ; *amiva* = amkapabla ; *produktiva* = produktopova, k. t. p.

NJ kaj ĈJ

Tiuj ambaŭ sufiksoj estas uzataj nur kun personaj, propraj nomoj ; ili liveras karesformojn de la propraj nomoj. *Nj* servas por virinaj nomoj ; *ĉj* por viraj. Laŭ la diversaj propraj nomoj, la sufiksoj estas uzataj post la 2-a—5-a litero de la nomo ; diversaj formoj povas tiel esti ricevataj ĉe unu sola nomo : *Petro, Peĉjo ; Mario, Manjo, Marinjo ; Margareto, Marganjo,* k. t. p.

La radiko *patr* estas iafoje uzita kun tiuj sufiksoj por formi karesan nomon de *patro, patrino : paĉjo, panjo.* Oni ankaŭ malofte renkontas *enjo* por *edzino, kanjo* por *katino ;* tiaj vortoj estas malklaraj kaj ne multigindaj.

OBL, ON, OP

Tiuj ĉi tri sufiksoj estas uzataj plej ofte kun nombraj (1) radikoj, laŭ la subaj ekzemploj :

Por ĉiu tago mi ricevas 5 frankojn, sed por la hodiaŭa tago mi ricevis duoblan pagon, t. e. 10 frankojn (F. 14).

Kvinoble sep estas tridek kvin, $5 \times 7 = 35$ (F. 14).

Tri estas duono de ses, $3 = \left(\frac{1}{2}\right) 6$ (F. 14).

Ok estas kvar kvinonoj de dek, $8 = \left(\frac{4}{5}\right)$ 10 (F. 14).

Kvar metroj de tiu ĉi ŝtofo kostas naŭ frankojn, tial du metroj kostas kvar kaj duonon frankojn (aŭ : da frankoj).

Unu tago estas tricent-sesdek-kvinono $\left(\frac{1}{365}\right)$ *aŭ tricent-sesdek-sesono* $\left(\frac{1}{366}\right)$ *de jaro* (F. 14).

Tiuj ĉi du amikoj promenas ĉiam duope (F. 14).

Kvinope ili sin jetis sur min, sed mi venkis ĉiujn kvin atakantojn (F. 14).

Oni vidas, ke en malsimplaj nombroj, la sufikso aldoniĝas nur al la lasta.

Ĉiu vorto formita per tiuj sufiksoj liveras, kiel la ceteraj radikoj, devenajn substantivojn, adjektivojn, verbojn, adverbojn per aldono de konvenaj sufiksoj : *Duobla, duoble, duoblo, duobligi. Duona, duono, duone, duonigi. Duopa, duopo, duope, duopigi,* k. t. p.

Radike ilia uzado estas malofta : *ono, onajo, onigi, oniganto, onigilo, onigato, ope, opa, oble,* k. t. p.

ONT kaj OT

Tiuj ĉi sufiksoj estas la respondantoj de *ant* kaj *at* por futuro. Jen la devenantaj tempoj :

Esti amonta	Esti amota
Estas amonta	Estas amota
Estis amonta	Estis amota
Estos amonta	Estos amota
Estus amonta	Estus amota
Estu amonta	Estu amota

Ilia uzado estas simila je l' uzado de *ant* kaj *at*, sed ili servas multe malpli ofte.

(1) Ili estas uzataj ankaŭ kun *mult, plur, kelk; multobligi, malmultobligi; plurope, kelkope.*

UJ

Tiu ĉi sufikso formas nature substantivojn el aliaj substantivoj. Ĝi estas uzata por formi tri diversajn klasojn de nomoj :

1-e. Ĝi servas por montri la skatolon, sakon, keston, vazon, kruĉon, k. s. speciale dediĉitan al konservado de certaj objektoj aŭ fluidaĵoj (vidu *ing*) :

Skatoleto, aŭ alia objekto, en kiu oni tenas cigarojn, estas cigarujo (F. 40).

Skatolo en kiu oni tenas plumojn, estas plumujo (F. 40).

En la poŝo de mia pantalono mi portas monujon kaj en la poŝo de mia surtuto mi portas paperujon. Pli grandan paperujon mi portas sub la brako (F. 40).

2-e. Ĝi montras la nomon de arboj kaj diversaj kreskaĵoj : *pomo, pomujo* (Universala Vortaro) ; *rozo, rozujo ; pizo, pizujo.* Por la arboj, oni povas ankaŭ anstataŭgi *uj* per *arb : pomarbo, pirarbo ;* simile por arbetoj : *rozarbeto.*

Nomo de kelkaj kreskaĵoj, precipe grenaĵoj, estas formata laŭ kontraŭa maniero per *er : greno, grenero ; tritiko, tritikero, aveno, avenero,* k. t. p.

3-e. Fine, *uj* estas uzata por formi landnomojn, sed ne ĉiujn. Oni diras ekzemple *Egiptujo, Francujo, Grekujo, Germanujo,* sed *Usono, Kanado.* Jen estas, laŭ Zamenhof (Lingvaj Respondoj, 1925, p. 36) kiel oni povas klarigi tiun ofte disputitan demandon :

Oni devas apartigi la malnovajn landojn kaj la novajn. La *malnovaj landoj* estas tiuj pli-malpli antikvaj landoj okupitaj de iu speciala gento, kiu nomis la landon sia speciala genta proprajo kaj konsideradis ĉiujn aligentajn loĝantojn, kiel « fremduloj ». Tiu gento donis al la lando sian propran nomon en la historio. Ekzemple, la gento *egipta* posedis *Egiptujon ; la* vorto *egipto* montras do la popolon, kaj la vorto *Egiptujo* la landon poseditan de la egiptoj. En *Egiptujo,* krom la *egiptoj,* loĝadis ankaŭ hebreoj, kiuj ne estis egiptoj, ne havis samajn rajtojn kiel la egiptoj, sed estis *egiptujanoj,* loĝantoj de Egiptujo.

Kontraŭe en la *novaj landoj,* kiel ekzemple en la amerikaj, loĝas, nove enmigrintaj gentoj, kiuj ne donis sian nomon al la lando, sed ricevis ĝin de tiu ĉi lasta. En tiu okazo, la radiko montras la landon *(Ameriko, Kanado)* kaj la nomo de la loĝantoj estas formita per *an (amerikano, kanadano).*

Laŭ tiu regulo, ĉiuj nomoj de landoj de l' malnova kontinento devus formiĝi per *uj* kaj ĉiuj nomoj de la novaj kontinentoj esti radikoj. Sed en la praktiko konfuzoj povas okazi. Ekzemple, se ni diras *Meksiko*, oni ne scias ĉu ni parolas pri la lando aŭ la ĉefurbo ; ni aliparte ne devas diri *Meksikujo*, tial Zamenhof konsilas nomi la landon *Meksikio* (kiel Alĝero-Alĝerio, Tuniso-Tunisio, k. t. p.) kaj la loĝantojn *Meksikianoj (Meksikano* estus do loĝanto de la urbo *Meksiko)*.

Pri la landoj eŭropaj, Zamenhof konkludas : « Pli aŭ malpli frue venos eble la tempo, kiam ĉiuj eŭropaj landoj ricevos nomojn neŭtrale geografiajn, sed tiel longe kiel ni uzas por ili nomojn de gentoj ni devas ĉiam uzi tiujn nomojn kun la sufikso *uj* ».

Anstataŭ *ujo* oni povas uzi kunmetitan vorton kun *lando ;* la vortoj tiel formitaj estas ofte multepezaj, sed iafoje oportunaj : *Ruslando, Britlando, Svislando.*

Krome oni ofte renkontas ankaŭ nomojn de landoj formatajn per la proponata sufikso *i* kiel ekz. : Aŭstrio, Germanio, Italio. Tiu sufikso ne estas ĝis nun aprobita de la Esperantista Akademio.

Jen tabelo de plej ofte renkontataj landnomoj :

MALNOVA MONDO
(kun uj-formo)

Gento	Lando	Gento	Lando
Angl-o	-ujo	Ital-o	-ujo
Aŭstr-o	»	Japan-o	»
Bavar-o	»	Jugoslav-o	»
Belg-o	»	Latv-o	»
Brit-o	»	Litov-o	»
Bulgar-o	»	Norveg-o	»
Ĉeĥoslovak-o	»	Pers-o	»
Dan-o	»	Pol-o	»
Egipto	»	Portugal-o	»
Eston-o	»	Prus-o	»
Fin(n)-o	»	Ruman-o	»
Franc-o	»	Rus-o	»
German-o	»	Saks-o	»
Grek-o	»	Skot-o	»
Hind-o	»	Sved-o	»
Hispan-o	»	Svis-o	»
Hungar-o	»	Turk-o	»
Ŝin-o	»	k. t. p.	

ALIAJ NOMOJ

Holando aŭ Nederlando, Irlando, Islando, Sovetlando, sekve la regnana nomo : Holandano, Irlandano, k. t. p.

NOVA MONDO

Lando	Regnano	Lando	Regnano
Alĝeri-o	-ano	Marok-o	-ano
Argentin-o	»	Meksiki-o	»
Aŭstrali-o	»	Nov-Zeland-o	»
Bolivi-o	»	Peru-o	»
Brazil-o	»	Tunizi-o	»
Ĉil-o	»	Urugvaj-o	»
Kanad-o	»	Uson-o	»
Kapland-o	»	Venezuel-o	»
Kolombi-o	»	k. t. p.	

Por la nomoj de provincoj kaj urboj oni uzas esperantan radikon kun finaĵo o *: Brandenburgo, Silezio, Provenco,* — aŭ se ne eble, la nacian nomon senŝanĝe : *Loiret, Essex.* La nomo de loĝantoj formiĝas per aldono de *an : Sileziano.*

Kelkaj nomoj de gravaj urboj esperantiĝis : Parizo, Ĝenevo, Kopenhago. — Aliaj simple alprenas la finaĵon o *: Londono, Berlino* aŭ estas uzataj senŝanĝe : *Breslaŭ, Versailles.*

Kiel ĉiuj similaj substantivoj formitaj per *er, ar, il,* k. t. p. la *uj*-vortoj estas iafoje malprecizaj ; la uzado, la ĉirkaŭfrazo aŭ kunmetita vorto, faciligas la komprenon. Ekzemple *teujo, kafujo,* povas signifi arbon, aŭ kruĉon, aŭ skatolon por teni teon kaj kafon, k. t. p. Tial oni diras prefere : *tearbo, teskatolo, temaŝino ;* ekzistas ankoraŭ *tekruĉo, tebotelo, tekonservujo, tevazo,* k. t. p.

Radika uzado. — *Ujo* = konservujo, entenilo, konserva kesto, sako, skatolo, k. t. p.

Devenaĵoj de uj-vortoj. — Ili liveras devenaĵojn, kiel la ceteraj substantivaj radikoj : *sukerujisto, supujkovrilo,* k. t. p. Por landnomoj, oni vidu *an* pri la diferenco inter, ekz., *Franco* kaj *Francujano.*

UL

Tiu ĉi sufikso servas por formi nature substantivojn el adjektivaj radikoj. Ĝi estas por la vivaj estaĵoj (homoj aŭ bestoj) ; la respondanto de *aj* por objektoj kaj de *ec* por kvalitoj (1). Oni ĝin aldonas al ĉiuj adjektivaj radikoj por montri la homon (aŭ beston), kiu posedas la kvaliton difinitan per la adjektiva radiko : *belulo, belulino* estas *belaj* kaj, sekve, havas *belecon*.

La riĉulo havas multe da mono (F. 37).
Malsaĝulon ĉiu batas (F. 37.)
Li estas mensogisto kaj malnoblulo (F. 37).
Preĝu al la Sankta Virgulino (F. 37).

Verbaj radikoj. — Kun verbaj radikoj, *ul* estas iafoje uzata. Oni povas konsideri, en tia okazo, ke la verba radiko estas uzata participe aŭ adjektive, sed sen la participa aŭ adjektiviga sufikso, pro mallongigo :

Timulo timas eĉ sian propran ombron (= timemulo aŭ timantulo) (F. 37).

Kun participoj, oni ordinare ne uzas *ul* pro mallongigo : *amanto, aganto*, anstataŭ *amantulo, agantulo*.

Eĉ kun simplaj adjektivoj oni povas iafoje forigi *ul* por mallongigi la vorton, kiam konfuzo ne estas ebla, tio ĉi okazas precipe kun virinaj nomoj :

Blankoj kaj negroj atakis sin furioze.
Siaj virginaj okuloj forte tiris la admiron.

Radika uzado. — *Ulo, ulino* (= vivanta estaĵo, individuo).

Devenaĵoj de ul-vortoj. — Ili kondutas, kiel ceteraj substantivaj radikoj : *malsanulejo, sendomulejo*, k. t. p.

UM

Tiu ĉi sufikso estas la « ĉiosignifa » vortfarilo, simile kiel la prepozicio *je* estas la ĝenerala prepozicio en Esperanto, diras la lernolibroj. Tio ĉi estas vera, sed ne absolute, ĉar *um* estas —

(1) Poezie, oni uzas ankaŭ *ul* por personigitaj objektoj : *trimastulo* (trimasta ŝipo).

kaj devas esti — tre malofte uzata, kaj nur por pli kaj pli difiniĝema serio da vortoj. Jen kion pri ĝi diras la *Ekzercaro* :

« *La sufikso « um » ne havas difinitan signifon, kaj tial la (tre malmultajn) vortojn kun « um » oni devas lerni, kiel simplajn vortojn. Ekzemple : plenumi, kolumo, manumo.* »

Mi volonte plenumis lian deziron (F. 42).
En malbona vetero oni povas facile malvarmumiĝi.

Oni emas uzi *um* kun substantivaj radikoj por montri *agadon per, ŝmiradon*, k. t. p. : *elektrumi, orumi* ; ofte oni ankaŭ mallongigas *umi*, per *i* aŭ *adi* : *elektradi, ori, oradi*. Teknikistoj ankaŭ skribas : *elektrizi, orizi*.

Tiu sufikso estas oportuna, sed devas esti uzata nur kiam oni ne povas esprimi la deziratan ideon per alia afikso aŭ kunmeto de vortoj.

La plej ofte renkontataj *um*-vortoj : *amindumi, butonumi, buŝumo, kalkanumo, kolumo, komunumo, krucumi, manumo, malvarmumo, nazumo, ventumi, ventumilo*, k. t. p.

Esperanto - rondo
Vyškov, Školní 4

Ĉapitro II-a. — PREFIKSOJ kaj PREPOZICIOJ

En tiu ĉi ĉapitro ni studos la prefiksojn kaj tiujn prepoziciojn (aŭ adverbojn), kiuj ofte ludas rolon de prefiksoj kaj estas malfacile apartigeblaj de ili.

Tiuj ĉi prepozicioj montras precipe la lokon kaj tempon.

AL

Prepozicio montranta :

1-e, la apartenon al, la nerektan komplementon de verbo (dativo) : *La rozo apartenas al Teodoro.*

2-e, la celon de movo : *Mi venas de la avo kaj mi iras nun al la onklo.*

Neniam oni uzas akuzativon kun *al*, ĉar oni konsideras, ke ĝi jam sufiĉe per si mem montras la movon ; ĝi eĉ povas sola, sen verbo, montri almoviĝon :

Se li jam venis, petu lin al mi (F. 26).
Ni staras sur la vojo al Parizo.

La kontraŭa prepozicio estas *de*.

Radika uzado. — *Aligi, aliĝo, aliĝilo.* Ne konfuzu kun *aliiĝo.*

Prefiksa uzado. — *Al* estas ekstreme ofte uzata prefikse :

1-e. Kun verbaj radikoj : *aliri, alporti.*

2-e. Kun substantivaj radikoj, kune kun sufiksoj *igi, iĝi,* k. t. p. formi novan verbon : *albordiĝi.*

La komplemento de verbo kunmetita kun *al* estas uzata akuzative, aŭ nominative kun ripeto de *al* (1).

Mi alnaĝis la bordon aŭ *al la bordo.*

Inter la ĉefaj *al-vortoj* kelkaj havas signifon iom specialan : *Aldoni, almeti, almezuri, alfari* (2).

ANSTATAŬ

Prepozicio signifanta : en la loko de, plenumante la rolon, taskon, devon de, okupante la lokon de. Ĝi postulas per si mem ĉiam la nominativon :

Ne servas larmo anstataŭ armo. (Z.)
Anstataŭ spado li prenis bastonon.
Vi dormas anstataŭ labori.

« Oni tamen ofte trovas post *anstataŭ* la akuzativon, sed tiu ĉi lasta estas uzita ne pro la prepozicio, sed pro aliaj cirkonstancoj. Ekzemple, en la frazo : *Petro batis Paŭlon anstataŭ Vilhelmon,* la lasta parto de la frazo prezentas nur mallongigon (= anstataŭ bati Vilhelmon), kaj la akuzativo forigas ĉiun dubon pri tio, ke anstataŭigita estis ne la batanto, sed la batato. » (Z.)

Radika uzado. — *Anstataŭ, anstataŭigi, anstataŭ(aj)o, anstataŭanto, neanstataŭebla,* k. t. p.

ANTAŬ

Prepozicio montranta :

1-e, ke du objektoj aŭ personoj estas unu post la alia rilate al tria punkto (loko) ;

2-e, ke du aferoj ne okazas samtempe (tempo).

Loko. — La uzado de *antaŭ* en ĝia loka signifo ne prezentas malfacilaĵojn.

Antaŭ la domo staras arbo (F. 8).
La nokto estas tiel malluma, ke ni nenion povis vidi eĉ antaŭ nia nazo (F. 33).

(1) Pri la ĝenerala regulo koncernanta tiun uzadon, vidu *Gramatikon* §§ 131, 132, 209.
(2) *Aldoni* = krom-doni, krom-liveri — *Almeti* = meti kontraŭ, sur. — *Almezuri* = laŭmezuri. — *Alfari* = laŭĝustigi, laŭtaŭgigi.

Antaŭ nia militistaro staris granda serio da pafilegoj (F. 38).
Akuzativon, se bezone, oni uzas kun *antaŭ* por montri la movon :
Li kuris antaŭ lin (li estis post li kaj iris antaŭen).
Li kuris antaŭ li (li estis jam antaŭ li kaj restis antaŭe).
Oni metis antaŭ mi manĝilaron (F. 34) (1).

Malo de *antaŭ* estas *post* ; kelkaj aŭtoroj uzas ankaŭ *malantaŭ*, sed ĉiam en signifo *loka*.

Tempo. — En sia tempa, *antaŭ* estas ankaŭ ordinare facile uzebla kaj klara. Oni devas tamen atenti, ke ordinare, kiam ĝi regas verbon, eĉ infinitivan, ĝi estas uzata kun *ol* pro komparativa ideo (oni diras ankaŭ *antaŭ kiam)* :

La pastro, kiu mortis antaŭ nelonge (aŭ antaŭ nelonga tempo) loĝis longe en nia urbo (F. 25).
Antaŭ ol vi venos al mi, li diros al mi la veron (F. 24).
Antaŭ ol foriri, li manĝis.

La tempa signifo de *antaŭ* rilatas plej ofte pasintan tempon :

Antaŭ tri tagoj mi vizitis vian kuzon kaj mia vizito faris al li plezuron (F. 20).

Kelkaj aŭtoroj uzas *antaŭ* en estonta signifo, por diri, ekzemple, ke iu afero devas esti finita post difinita nombro da tagoj : *Vi devas pagi al mi vian ŝuldon antaŭ tri tagoj*. En tia okazo, oni ankaŭ povas uzi *en*, se en ĉiu tago estas farata iom el la pago ; aŭ *ĝis*, se tri tagoj estas simpla templimo.

Konfuzeblo de loko kaj tempo. — En kelkaj tre maloftaj okazoj, oni povas dubi, ĉu *antaŭ* estas uzata loke aŭ tempe. Tiaokaze, oni povas ĝin anstataŭi per la esprimo *pli frue ol* aŭ la kunmetita verbo *antaŭ(en)iri* (aŭ io simila). Ekz. :

Li alvenis antaŭ mi povas signifi : 1-e, li alvenis pli frue ol mi ; li alvenis, antaŭirante min.

Radika uzado. — *Antaŭ* estas tre ofte uzata kun diversaj sufiksoj ; ĝi konservas sian duoblan tempan kaj lokan signifon, sed tiaokaze la formitaj verboj limigas sin mem tre ofte.

(1) Vidu pri tiu uzado, *Gramatikon* § 137.

Antaŭa : *Grandega hundo metis sur min sian antaŭan piedegon* (F. 38).

En la antaŭa tago, li estis jam aĉetinta ĉion necesan.

Anstataŭiloj estas : *plifrua, antaŭiranta.*

Antaŭe : En tempa signifo, *antaŭe* anstataŭas ofte malsimplan tempon de verbo :

Kiam vi vidis nin en la salono, li jam antaŭe diris al mi la veron (F. 24) (= li jam estis dirinta...).

Kiam mia patro venos, diru al mi antaŭe la veron (F. 24) (1).

Mi ne farus la eraron, se li antaŭe dirus al mi la veron (aŭ : se *li estus dirinta al mi la veron)* (F. 14).

La birdo sin ne trovis antaŭe en la ĝardeno (F. 28).

Glaso de vino estas glaso, en kiu antaŭe sin trovis vino (F. 32).

Antaŭe, en loka signifo, estas pli malofta. Sed ĝi renkontiĝas tre ofte kun movideo sub formo *antaŭen :*

Mi ne kuraĝis restarigi vin, ĉar la malamikoj trovis sin antaŭe.

Antaŭen ! por Esperanto ! Iru antaŭen !

Radika uzado. — *Antaŭo, antaŭaĵo, antaŭulo, antaŭigi, antaŭeco*, k. t. p. La devenaĵoj de *antaŭ* havas ankaŭ la duoblan signifon tempan kaj lokan.

Prefiksa uzado. — *Antaŭ* servas ofte, kiel prefikso por substantivaj aŭ verbaj radikoj. Kun substantivaj radikoj, ĝi havas ordinare (sed ne ĉiam) lokan signifon :

Loko. — *Antaŭbrako, antaŭarmeo, antaŭtuko, antaŭiri, antaŭstari*, k. t. p.

Tempo. — *Antaŭdiri, antaŭvidi, antaŭjuĝi, antaŭsciigi, antaŭjuĝo, antaŭdiro, antaŭzorgo, antaŭtempa, antaŭdiluvo*, k. t. p.

(1) Al tiu frazo egalvaloras la jena : *Diru al mi la veron antaŭ kiam (aŭ ol) mia patro venos.*

APUD

Loka prepozicio montranta la proksimecon de io kompare al alio : *La filo staras apud la patro* (F. 8).

En tiu tago, kiam ŝi estis apud tiu fonto, venis al ŝi malriĉa virino (F. 15).

Tra la fenestro, kiu sin trovas apud la pordo, la vaporo iras sur la korton (F. 25).

Li staris tutan horon apud la fenestro (F. 26).

La gefiančoj staris apud la altaro (F. 36).

Li sidas apud la tablo kaj dormetas (F. 38).

Promenante apud la reloj de fervojo, li falis (F. 39).

Apud povas esti sekvata de akuzativo, kvankam tio ĉi estas malofte necesa. *Iru apud la fonto* (restu tie) ; *iru apud la fonton, plenigu la sitelon kaj realportu ĝin* (oni diras prefere : *iru al* aŭ *iru ĝis*).

La kontraŭa prepozicio de *apud* estas : *malproksime de* aŭ *for de* ; nur tre malofte oni renkontas *malapud*.

La tempa respondanto de *apud* estas *ĉirkaŭ*.

Diferenco inter *apud* kaj *kontraŭ* estas, ke *apud* montras simplan proksimecon, kaj *kontraŭ* montras tuŝecon, apogecon (vidu *kontraŭ*).

Radika uzado. — *Apuda, apude, apudi, apudigi, apudiĝi, apudaĵo, apudeco*, k. t. p.

Prefiksa uzado. — *Apud*, uzata prefikse, liveras kelkajn malmultajn verbojn el verbaj radikoj : *apudesti, apudiri*, k. t. p. Tute malofte oni renkontas : *apudĉambro, apudmetita*.

BO

Prefikso uzata precipe kun personaj nomoj kaj montranta parencecon venanta de edzeco :

La patro de mia edzino estas mia bopatro, mi estas lia bofilo, kaj mia patro estas la bopatro de mia edzino (F. 36).

Ĉiuj parencoj de mia edzino estas miaj boparencoj, sekve ŝia frato estas mia bofrato, ŝia fratino estas mia bofratino, mia (1) *frato kaj fratino (gefratoj) estas la bogefratoj de mia edzino* (F. 36).

La edzino de mia nevo kaj la nevino de mia edzino estas miaj bonevinoj (F. 36).

La edziĝa festo estos en la domo de liaj estontaj bogepatroj (F. 39).

Bo ne estas uzata radike.

ĈE

Prepozicio, iom malpreciza, montranta estadon de io apud alio, kaj iafoje, sed tre malofte, okaziĝon de io en difinita momento.

Li staras ĉe la pordo (= apud la pordo, aŭ kontraŭ la pordo, sur la sojlo aŭ en la najbaraĵo de ĝi).

Kie estas la krajono ? Mi havas ĝin ĉe mi (= en mia poŝo).

Kiam li estis ĉe mi (= en mia hejmo) *li staris tutan horon apud la fenestro* (F. 26) (2).

Je la lasta fojo mi vidas lin ĉe vi (= en via domo) (F. 29).

Ĉe ĉiu vorto, kiun vi diros (= kun aŭ post ĉiu vorto) *el via buŝo eliros floro* (F. 15).

Li ekscitiĝas ofte ĉe la plej malgranda bagatelo (= pro la plej...) (F. 41).

En sia loka senco ĉe montras, ke oni estas en la celata loko aŭ tre proksime de ĝi, tial oni uzas ĝin plej ofte kun nominativo por montri restadon, haltadon : *sidi ĉe la tablo, resti koro ĉe koro*, dum la movon oni prefere esprimas per *al : iri al la tablo*. Tamen kelkaj uzas ĉe kun akuzativo por montri, ke oni atingis la celon : *iri ĉe la najbaron*, dum *al* montras simplan direkton.

Respondanto de ĉe por tempo estas *je : je la kvina horo ;* oni tamen uzas ankaŭ ĉe kun tiu sana signifo : *ĉe ĉiu vorto, li ektremis*.

Prefiksa uzado. — Ĉe ne estas uzata radike, sed ofte prefikse kun *esti* por formi verbojn, kiuj montras estadon, haltadon : *ĉeesti, ĉeestanto, ĉeestantaro*, k. t. p.

---

(1) Rimarku tiun ĉi anglan uzadon de *mia* en la singularo.

(2) Kelkaj esperantistoj, uzas *ĉe mi* anstataŭ *kun mi*. Ekzemple, ili diras : *Mi ne havas krajonon ĉe mi*, kun la signifo, ke ili nehavas krajonon en sia poŝo. Tia parolturno ŝajnas al ni ne imitinda

CEF

Substantiva radiko, kiu ofte ludas rolon de prefikso ; ĝi formas substantivojn el substantivaj radikoj kaj montras la unuarangecon, la superecon de iu... persono aŭ objekto kompare al aliaj samspecaj : *ĉefstrato, ĉefministro, ĉefurbo, ĉefredaktoro*, k. t. p.

ĈIRKAŬ

Prepozicio loka kaj tempa montranta : 1-e, ke io enfermas alion en larĝa rondo ; 2-e, ke io okazas proksimume en difinita tempo ; 3-e, ke kvanto, tempo estas nepreciza.

1-e. — *Alta muro staras ĉirkaŭ la urbo.* — *La buboj tenis sin mano ĉe mano kaj dancadis ĉirkaŭ la maljuna virino.*

2-e. — *Mi vizitos vin ĉirkaŭ la dekunua.* — *Mi kalkulas, ke mi povos fini la tutan laboron en ĉirkaŭ dek tagoj.*

3.-e. — *Kiom da pomoj vi volas? ĉirkaŭ dek (pomojn)* (1). — *La koncerto daŭris ĉirkaŭ du horojn kaj finiĝis ĉirkaŭ la noktomezo.* — *La vesto kostis ĉirkaŭ cent frankojn.* — *Li alportis ĉirkaŭ dek funtojn da pomoj.*

Radika uzado. — *Ĉirkaŭe, ĉirkaŭo, ĉirkaŭaĵo, ĉirkaŭi* (esto), *ĉirkaŭigi* (meto), *ĉirkaŭeco, ĉirkaŭulo*, k. t. p.

Prefiksa uzado. — Tre ofta : 1-e, kun verbaj radikoj, substantivoj, por montri agon fariĝantan ronde ĉirkaŭ ia centro, en nepreciza aŭ neĝusta loko, en nerekta maniero : *ĉirkaŭiri, ĉirkaŭmeti, ĉirkaŭversi, ĉirkaŭpreni, ĉirkaŭdiri, ĉirkaŭskribi*, k. t. p. ; 2-e, kun substantivaj radikoj, por montri objekton kiu entenas alian zonume : *ĉirkaŭmano, ĉirkaŭkolo, ĉirkaŭbrako, cirkaŭurbo*, k. t. p.

DA

Prepozicio tre ofte uzata en Esperanto. (Vd. *Gramatikon* § 222.)

1-e *post substantivaj numeraloj* kiel ekz. : deko, duono, cento, milo :

Mi aĉetis dekon da ovoj. (Z.)
Multe da laboro estas farebla en deko da horoj.
Atendu kvaronon da horo.

(1) Francoj uzas ofte substantivon: *deko* anstataŭ *ĉirkaŭ dek;* tio ĉi estas francismo.

2-e post vortoj, kiuj esprimas neprecizan kvanton, mezuron, nombron, pezon :

Sur la bordo de la maro staris amaso da homoj. (Z.)
Svarmo da veturiloj. (Z.)
La peco da drapo enhavas ĉirkaŭ kvindek metroj. (Z.)
Mi faros, ke da vidvinoj ĉe ili estos pli ol da sablo ĉe la maro (Z.)
Kvaronjaro estas parto da jaro (1).
Alportu al mi metron da nigra drapo (metro de drapo signifus metron, kiu kuŝis sur drapo, aŭ kiu estas uzata por drapo). (Z.)

3-e *post nedifinaj numeraloj* kiel ekz. : *iom, kelke, kiom, multe, pli :*

Post la fino de l'batalo estas multe da kuraĝuloj. (Z.)
Kiom da kapoj, tiom da ĉapoj.
Ju pli da flatemo, des pli da honoroj.
Tro da libero kondukas al mizero. (Z.)
Pli da bruo, ol da faro.
Malpli da mono, malpli da zorgoj.

DE

Prepozicio tre ofte uzata en Esperanto kaj montranta :

1-e. **Genitivon.** — *La libro de Petro* (apartenanta al Petro) ; *dentoj de leono* (apartenantaj al leono).

En tiu signifo, *de* estas anstataŭebla de adjektivo *(Petra libro, leona dento)* aŭ de kunmetita vorto *(Petrolibro, leondento).*

2-e. **Deiron, devenon** (fizikan, lokan) : *De la patro, mi ricevis plumon.* — *Mi venas de la avo kaj iras al la onklo.* — *Li*

(1) » La esprimo *dum la frua parto* da *la jaro* ŝajnas al mi nebona ; mi preferas : de *la jaro*, ĉar en la dirita frazo la vorto *parto* signifas ne mezuron, sed nur limigitan apartajon. Tiel ekzemple *monato* estas parto da tempo, ĉar ĝi esprimas simple mezuron, sed *januaro* estas parto *de* jaro, ĉar ĝi esprimas ne mezuron, sed difinitan limigitan apartajon ; *kvaronjaro* (= mezuro) estas parto *da* jaro, sed *printempo* (= speciale montrita parto) estas parto *de* jaro.
Oni devas memori, ke *parto, peco* ktp havas la sencon de mezuro *ofte*, sed ne *ĉiam*. Dum la vorto *da* (kiu enhavas kaŝite la sencon de *ia*) montras, ke ni parolas pri kvanto da ia ajo, sed ne pri ĝia individueco (ekzemple peco da viando = peco da ia viando), la artikolo *la* montras, ke ni parolas pri objekto individue *difinita* (aŭ pri ĉiuj objektoj de la sama speco), de kiu ni prenas parton (ekzemple *peco de la viando, kiun mi havas antaŭ mi)* ; tial ni povas diri, ke, kvankam *teorie* la kombinado estas uzebla nur en tre maloftaj okazoj, tiel malofte, ke ni eĉ povas simple konsili, ke oni *neniam* uzu *da* antaŭ *la* (krom la okazoj, en kiuj la senco tion ĉi nepre kaj tute senduba postulas). « (Z. en *Lingvaj Respondoj.*)

forkuris de mi. — Li petis de ŝi trinki. — Li ŝin forpelis de si. — Mi aĉetis de li pomon. — Flugu ĝi de loko al loko. — La vento forblovis de mia kapo la ĉapon.

3-e. **Agentecon, aŭtorecon, kaŭzon** (deiron, devenon moralan). En tiu senco ĝi montras ankaŭ la komplementon de pasiva verbo, t. e. duagrada deveneco : *La domo estas aĉetita* (1) *de mia patro. — Libro verkita de Petro. — Mi de teruro ne sciis kion fari. — Li paliĝis de timo. — Li eksaltis de surprizo.*

4-e. **Deiron, devenon, tempan :** *Mi estas malsana jam de longe. — De nun, mi ne pagos viajn ŝuldojn. — Mi loĝas en Parizo jam de tri jaroj.*

La multsignifeco de la prepozicio *de* povas okazigi iom konfuzajn esprimojn, kiam oni ne atentas uzi ĝustan prepozicion aŭ parolturnon, kiu evitas amasiĝon de *de*. Ekzemple, oni devas diri : *mordo* (de serpento) *al brako ; amo de Dio* (al homo) kaj *amo al Dio* (de homo) ; *akcepto de la urbestraro* (akceptanta) *al la grupo esperantista* (akceptata) aŭ *akcepto de la grupo per la urbestraro (Kp. kovrita per naĝantaj folioj,* F. 35) ; *libro de Petro* (= apartenanta al Petro) ; *libro verkita de Paŭlo,* k. t. p.

Plej ofte, la vastsenceco de *de* estas granda oportunaĵo, ĉar ĝi ebligas ne analizi tre precize la signifon de la nacia tradukota prepozicio. Nur en kelkaj okazoj, konfuzo estas ebla ; tiam, oni devas iom ŝanĝi la parolturnon, se la kunteksto ne estas jam per si mem sufiĉe klara.

Prefiksa uzado. — *De* estas tre ofte uzata prefikse, precipe kun verbaj radikoj, por formi deiran aŭ kaŭzan verbon. Ofte la prepozicio *de* estas uzata post tia verbo, kun la komplemento, sed ĵus ni vidis, ke oni devas zorge apartigi la aganton de la agato por elekti la ĝustan prepozicion *(amo al Dio, amo de Dio).*

Ekzemploj de prefiksa uzado :

Deiri, deveni, defali, delasi, denove, delogi, desegi, deteni, sindeteni, detranĉi, k. t. p.

(1) Pri komplementoj de pasiva verbo, vidu *Gramatikon* § 133, kaj pri diferenco de *de* kun *el* kaj *for* § 138.

DIS

Prefikso uzata kun verbaj radikoj (1) kaj liveranta verbojn, kiuj montras apartigon, malunuigon, dividon, foriĝon en diversajn direktojn :

Ni ĉiuj kunvenis por priparoli tre gravan aferon, sed ni ne povis atingi ian rezultaton kaj ni disiris (F. 42).
Mi disŝiris la leteron kaj disĵetis giajn pecetojn en ĉiujn angulojn de la ĉambro (F. 42).
Dis(ig) estas malo de *ar(ig)* kaj de *kun(ig).*

Kelkafoje ĝia senco estas proksima al *mal* aŭ *sen : disfaldi* (= malfaldi), *disreviĝi* (= senreviĝi).

Radika uzado. — *Dise, disa, diseco, disigi, disiĝi,* k. t. p.
Malfeliĉo ofte kunigas la homojn, kaj feliĉo ofte disigas ilin (F. 42).
Ni disiĝis kaj iris en diversajn flankojn : mi iris dekstren kaj li iris maldekstren (F. 28).

Prefiksa uzado. — Plej uzataj verboj estas : *disbati, disdoni, disblovi, disĵeti, diskuri, dismeti, dissendi, disiri, dissemi, disvastigi, disduigi, disporti, disetendi, disfali, distrumpeti, disdividi, disrompi.*

DUM

Prepozicio esprimanta : en la daŭro de, en la tempo de, en la tempo, kiam :

Fleksu arbon dum ĝia juneco. (Z.)
Dum ŝi parolis, elfalis el ŝia buŝo multego da diamantoj. (Z.)
Dum ni vivas, ni esperas.
Dum vi dormis, li venis.

Radika uzado. — Oni renkontas *dume :*

Ni dume lasu flanke tiun demandon. (Z.)
Oni preparas la vespermanĝon, ni dume babilu.

Prefiksa uzado. — Dumviva, dumtaga, dumnokta, k. t. p.

(1) La verba radiko, kiel jam dirite, povas esti primitiva, simpla *(iri blovi; disiri, disblovi)* aŭ malsimpla, jam konsistanta el kelkaj diversaj radikoj *(duigi, disduigi ; vastigi, disvastigi).*

EK

Prefikso montranta komencon de ago, kaj, konsekvence, ankaŭ iafoje ĝian nedaŭrecon. Ĝi liveras nature verbojn el verbaj radikoj :

Ho ĉielo ! ekkriis la patrino (F. 21).
Kiam vi ekparolis, ni atendis aŭdi ion novan, sed ni baldaŭ vidis, ke ni trompiĝis (F. 40).
Du ekbriloj de fulmo trakuris tra la malluma ĉielo (F. 41).

Oni forte kritikis tiun ĉi ambaŭsencecon de *ek* ; sed, kiel oni vidas per la supraj ekzemploj, tre ofte ambaŭ sencoj estas entenataj en la sama vorto kaj ne disigeblaj. Tamen oni devas ne tro uzi *ek* kaj prefere ĝin uzi en ĝia «komenca » signifo, kiam oni ne estas tre certa pri la klareco de la formita verbo.
Pri la diferenco inter *ek, ad* (ĝia kontraŭo) kaj la simpla verbo per *as, is, os,* ni trovis en la *Ekzercaro* jenan ekzemplon :

Mi eksaltis de surprizo. Mi saltas tre lerte. Mi saltadis la tutan tagon de loko al loko (F. 40).

Pri la formoj *sidiĝi, eksidi, stariĝi, ekstari,* vidu *iĝ.*
Plej ofte uzataj devenaĵoj de *ek* estas : *ekkrii, ekkanti, ekkomenci* (1) *ekkuri, ekbati, eksalti, ekŝpruci,* k. t. p.
Ni ne konsilas uzi la verbon *eki* por *komenci.*

EKS

Prefikso malofte uzata, signifanta la ĉeson de ofico, profesio, rilato : *eksoficiro, eksnotario, eksedzo, eksedziniĝi, eksedziĝi.*
Oni uzas : *eksigi, eksiĝi.*

EKSTER

Prepozicio signifanta staton de io, kiu sin trovas malinterne de alio. *Ekster* montras staton senmovan, neeliran ; *el* montras eliran movon ; ambaŭ respondas al unu sola kantraŭo : *en.*

La birdo flugas en la ĉambron (= ĝi estas ekster la ĉambro kaj flugas nun en ĝin) (F. 26)
Mi staras ekster la domo kaj li estas interne (F. 26).

(1) Pleonasmo.

Ekster tio, el la diritaj vortoj, ni povas ankoraŭ fari aliajn vortojn (F. 30).
Li loĝas ekster la urbo (F. 31).
Li baraktas kiel la fiŝo ekster la akvo (Z.).

Radika uzado. — *Ekstero, eksterajo, ekstere, ekstera, ekstereco,* k. t. p.

La ekstero de tiu ĉi homo estas pli bona ol lia interno (F. 31).
Starante ekstere (1) *li povis vidi nur la eksteran flankon de nia domo* (F. 31).

Prefiksa uzado. — Malofta : *eksterstari, eksterenpeli,* k. t. p.

EL

Prepozicio kaj prefikso ekstreme uzata kaj diverssignifa.

Prepozicia uzado. — Ĝi montras : 1-e, eliron (fizikan) ; 2-e, apartigon (= eliron moralan) :

1-e. *El la kaldrono... eliras vaporo* (F. 25) .
Multego da diamantoj elfalis el ŝia buŝo (F. 17).
Ne gutas mielo el la ĉielo (Z.).

Pro tiu elira fundamenta signifo, oni uzas *el* por montri la devenon de objektoj, kiuj estas fabrikitaj el ia materio :

Ĉemizojn, kolumojn... ni nomas tolaĵo, kvankam ili ne ĉiam estas faritaj el tolo (F. 35) (2).
Tablo el ligno ; monero el oro (aŭ ligna tablo, ora monero, lignotablo, ormonero).

2-e. En tiu signifo, ĝi estas precipe uzata en superlativo, kun *plej, malplej :*

El ĉiuj siaj fratoj, Antono estas la malplej saĝa (F. 10).
Si estis unu el la plej belaj knabinoj, kiujn oni povis trovi (F. 11).
Unu el ni stariĝis kaj diris...
El ili, ĉiu povas jam fari novajn vortojn (F. 30).

(1) Estas rimarkinde, ke la adverbo *ekstere* povas preni signifon eliran, almovan sub formo *eksteren* ; kaj ĝia kontraŭo estas : *interne, internen,* aŭ *ene, enen.*

(2) Tio ĉi estas nova ekzemplo montranta la neĝeneralecon de la regulo de l' fundamenta gramatiko laŭ kiu la komplemento de pasiva verbo estas signata per *de.* Ni konas jam *de, per, el* nur en *la Ekzercaro.*

El estas ofte uzata post verboj, kiam oni povas kompreni eliron ; ĝi, en tiaj okazoj, estas preskaŭ ĉiam anstataŭebla de alia prepozicio, *de, en,* k. t. p. :

El la dirita regulo sekvas... (F. 29).
Mia skibilaro konsistas el (en) inkujo... (F. 34).

El liveras ekzemplon de du prepozicioj regnantaj unu la alian :

El sub la kanapo la muso kuris sub la liton (F. 26).

Kompreneble, laŭ sia signifo mem, *el* ne povas regi akuzativon (1).

Prefiksa uzado. — Prefikse, ĝi estas uzata kun multaj verbaj radikoj kaj havas du apartajn signifojn, el kiuj unu estas germanismo. Ĝi 1-e konservas sian naturan sencon eliran ; 2-e montras iafoje ne eliron, sed plenan finiĝon de iu ago (2) (kontraŭe al *ek*).

Ni donas tie ĉi la ĉefajn verbojn formitajn per *el,* dividante ilin laŭ la du supre difinitaj klasoj.

Kelkaj verboj, kiel *elŝarĝi,* estas tute ne uzindaj. Oni devas ekzemple uzi jen *senŝarĝigi,* jen *plenŝarĝigi,* por eviti konfuzon.

Radike *el* ne estas ofte uzata krom *eligi, eliĝi.* (Vidu *ekster*).

Ĉefaj verboj formitaj per *el* kun ordinara signifo de *eliro, eltiro* :

elaperi	elkolekti	elmuĝi	elsalti
eldoni	elkoni	elnaĝi	elsavi
eletendi	elkonduki	elnaski	elsendi
elfali	elkonkludi	elpafi	elspiri
elflori	elkonstati	elpaki	elsputi
elflui	elkopii	elparoli	elsuĉi
elflugi	elkraĉi	elpaŝi	elŝajni
elfosi	elkreski	elpeli	elŝovi
elgalopi	elkrevi	elpensi	elŝviti
elgliti	elkrii	elpiki	elterigi
elĝermi	ellasi	elpoŝigi	eltiri
eliri	ellitiĝi	elpremi	eltreni
eljungi	elmarŝi	elpurigi	eltroti
eljeti	elmaŝinigi	elpeli	elvenigi
elkapti	elmemigi	elpendi	elverŝi
elkasigi	elmeti	elrukti	elvoki
elkatenigi	elmontri	elruli	elvomi

(1) Tio ĉi montras, ke ankaŭ en Esperanto oni povus ordigi la prepoziciojn laŭ la kazo, kiun ili regas.

(2) Tiu ĉi dua signifo devenas de la unua, sed en kelkaj vortoj ĝi estas malfacile rekonebla: *elĉerpita* estas bona kaj facila; *eluzita* malpli facila; *elŝarĝi* tute konfuza.

Ĉefaj verboj formitaj per *el* kun ordinara signifo de *finfaro, plenfaro* :

elaboreni	elforgesi	elmaturigi	elŝarĝi
elaĉeti	elfrakasi	elmelki	elsatigi
elakiri	elfrapi	elmiri	elspezi
elaprobi	elfuriozi	elnutri	elstreĉi
elataki	elĝemi	elofendi	elsuĉi
elbati	elĝui	elokupi	elŝiri
elbori	elinsulti	elornami	elŝuti
elbreĉi	eljuki	elpagi	eltedi
elĉagreni	elkalumnii	elperei	eltegi
elĉerpi	elkaresi	elpiki	elteni
eldanki	elkavigi	elpisti	eltikli
eldetrui	elkorekti	elplezurigi	eltondi
eldiboĉi	elkroĉi	elplugi	eltordi
eldifekti	elkudri	elpolurigi	eltranĉi
eleksciti	ellaborı	elporti	eltrovi
elekstermi	ellacigi	elpremi	elturni
elekzerci	ellavi	elprovi	eluzi
elestingi	ellegi	elpruvi	elvendi
eleviti	ellerni	elravi	elverki
elfandi	ellevi	elreviĝi	elverŝi
elfari	elligi	elrosti	elvipi
elfendi	elmaĉi	elruinigi	elviŝi
			elvolvi

Kiel oni vidas, kelkaj el tiuj devenaĵoj povas kompreniĝi jen unu-, jen alimaniere ; tial estas konsilinde, en tiaj okazoj, se oni timas konfuzon, uzi ne verbon formitan per *el,* sed alian parolturnon.

EN

Loka kaj tempa prepozicio, tre ofte uzata en Esperanto. Ĝi montras : 1-e ke io estas aŭ fariĝas interne de alia (loko) ; 2-e ke io okazas dum difinita tempo aŭ ĉe dirita momento.

1-e. **Loko.** — Per si mem *en* ne difinas ĉu la interna situacio estas jam ekzistinta aŭ estas nun fariĝanta ; ĝi do regas jen nominativon, jen akuzativon, laŭ la okazo :

La patro estas en la ĉambro (F. 8).
La birdo flugas en la ĉambron (ĝi estas ekster la ĉambro kaj flugas nun en ĝin) (F. 26).

La kontraŭo de *en* estas *ekster* por ĝia senmova (jam ekzistanta ekstereco) senco, kaj *el* por ĝia mova signifo (nun fariĝanta ekstereco).

2-e. **Tempo.** — Ĉiam kun nominativo :

Multaj birdoj flugas en la aŭtuno (tempo) *en pli varmajn landojn* (loko) (F. 32).

Tiu ĉi fervojo estas konstruita en la daŭro de du jaroj (F. 25).
Tiu ĉi libro havas sesdek paĝojn ; tial, se mi legos en ĉiu tago po dekkvin paĝoj, mi finos la tutan libron en kvar tagoj (F. 14).

Radika uzado. — Oni uzas nur *enigi, eniĝi.*

Prefiksa uzado. — *En* en sia loka senco (1), estas tre ofte uzata kun verbaj radikoj (2) por formi verbojn, kiuj montras preskaŭ ĉiam penetradon de io en alion : *eniri, enkonduki, enterigi, enpiki, enblovi, enpoŝigi, enlitiĝi, endoni* (3).

FI

Interjekcio esprimanta abomenon kaj kiu estas uzata kiel prefikso por esprimi moralan, internan malŝaton de la radika ideo ; ĝi estas uzebla kun adjektivaj, substantivaj aŭ verbaj radikoj :

Tio estas fiajo (Z.)
Venis fiinsektoj, pedikoj (Z.)

Fiĉevalo signifas do, ke la ĉevalo estas malbona (ekzemple ĝi mordas), sed ĝi povas esti bela. (Vidu la sufikson *aĉ*).

Radika uzo. — *Fi ! fia, fie, fii.*

FOR

Prepozicio uzata preskaŭ ĉiam kune kun *de*. Ĝi montras fortan malproksimiĝon ; ĝi estas kontraŭo de *apud* kaj *kontraŭ*. Kompreneble, ĝi ne povas regi akuzativon. Kiam oni trovas akuzativon post *for*, oni devas pensi, ke iu verbo estas neesprimita :

For la viandon ! (portu for [de mi] la viandon).
For la batalilojn ! (For kun la bataliloj !)

(1) Escepto : *enesti.*
(2) Aŭ kun nomaj radikoj + *igi, iĝi.*
(3) Oni renkontas strangan vorton : *enamiĝi.*

For de l'okuloj, for de la koro (Z.)
For de mi, vi, nigra fumanta sango (Z.)

Radika uzado. — *Fora, fore* (malproksime), *forigi, foriĝi.*

Prefiksa uzado. — Tre ofta kun verbaj radikoj. *For* montras precipe movon de malproksimiĝo, apartigo, depreno. Oni do ne uzas ordinare ĝin kun stataj verboj, ĉar ĝia senmova respondanto estas *malproksime de*. Tamen oni trovas *foresti*, kaj *forresti*, kiuj ŝajnas bonaj.

La vento forblovis de mia kapo la ĉapon (F. 39).
Li forkuris de mi (F. 18).
La reĝido forkondukis ŝin al la palaco (F. 23).
Mia patrino forpelis min el sia domo (F. 21).

Jen kelkaj aliaj ofte uzataj verboj : *forbalai, forbati, fordecidi, fordoni, forflankiĝi, forlasi, forflui, foriri, forpermesi, forporti, forrabi, forstreki, forsegi, forskrapi, fortranĉi*, k. t. p.

GE

Prefikso montranta, ke oni parolas samtempe pri viro kaj virino, virseksulo kaj ino. Tiu prefikso kompreneble servas nur por substantivaj radikoj, kiuj montras vivantajn estaĵojn. La formita vorto estas ordinare uzata en pluralo :

Petro, Anno kaj Elizabeto estas miaj gefratoj (F. 36) (1).
Mia frato kaj fratino (gefratoj) estas la bogefratoj de mia edzino (F. 36).

Komparu : *gepatroj, geavoj, gefiloj, gefianĉoj geedzoj, geonkloj*, k. t. p.

En la *Ekzercaro* ni trovas la vorton *gesinjoroj*, uzatan anstataŭ *geedzoj* :

Gesinjoroj N. hodiaŭ venos al ni (F. 36.)

Oni uzas tiun ĉi vorton tamen ne nur por *geedzoj*, sed ankaŭ, ekz., en publika parolado, kiam oni turnas sin al aŭskultantaro konsistanta el gehomoj : *Karaj gesinjoroj kaj gesamideanoj !*

(1) Rimarku la ortografion de *Anno.*

ĜIS

Prepozicio loka kaj tempa montranta plej ekstreman limon, kiun oni ne transiras ; *ĝis*, same kiel *al*, neniam estas sekvata de akuzativo.

1-e. **Loko.** — *Miaj fratoj eliris kun la gastoj el sia domo kaj akompanis ilin ĝis ilia domo* (F. 18).

Li vidas nur ĝis la pinto de sia nazo (Z.)
La vojo estas bona ĝis la rivero.

Kontraŭo de *ĝis* (loko) estas *trans*.

2-e. **Tempo.** — *Mi veturos ĝis morgaŭ matene.*

Li kuros ĝis li falos.

Vi devos pagi ĝis tri tagoj (en tri tagoj signifus, ke oni devas pagi po unu triono de la ŝuldo en ĉiu tago. Multaj francoj diras : *vi devos pagi antaŭ tri tagoj ;* tio ĉi ne estas ĝusta, sed simpla francismo ; vidu *antaŭ).*

Kontraŭo de *ĝis* (tempo) estas *post*.

Prefiksa uzado. — Malofta : *ĝisalpa, ĝisnuna, ĝisvivi, ĝishaŭte, ĝismorte.*

Ne ofte uzata radike. Oni komprenus tamen *ĝisa*, kiel oni uzas *transa, posta.*

INTER

Loka kaj tempa prepozicio montranta, ke iu aŭ io estas, iras aŭ okazas en la mezo de du aŭ pli multaj limoj, objektoj, personoj, horoj, k. t. p. En sia loka senco, *inter* diferencas de *en* per tio, ke ĝi montras staton de io rilate al kelkaj objektoj, en kiuj oni ne estas, sed en kies aro oni troviĝas.

En supozigas, ke oni estas interne de io; *inter* montras, ke oni estas ekster ĉiu objekto konsiderata aparte, kvankam oni estas en ilia aro.

Eĉ inter piuloj ne mankas pekuloj (Z.)

Inter aliaj aferoj, tiu ĉi malfeliĉa infano devis du fojojn ĉiutage iri ĉerpi akvon (F. 13).

Sur la kameno, inter du potoj, staras fera kaldrono (F. 25).
Inter Sovetio kaj Francujo estas Germanujo.
Li jetis sagon inter la malamikojn.
Inter lupoj kriu lupe (Z.)

Radika uzado. — *Intera, intere* (pli ofte : *meze), intereco, interiĝi, interulo* (oni diras prefere : *perulo, makleristo).*

Prefiksa uzado. — Tre ofta : *Internacia* (= kiu estas inter diversaj nacioj. — F. 27). — *Interligi, interbati, interbatiĝo, interalie, interakto, interspaco, intermuro* (vando), *interparoli, interkonsenti, interkomprenigilo, intertempe, interŝanĝi,* k. t. p.

JE

Jen kion diras Zamenhof pri tiu ĉi prepozicio en la *Ekzercaro* : « Se la senco de frazo ne montras klare, kian prepozicion oni devas uzi, tiam oni povas uzi la komunan prepozicion *je*. Sed estas bone uzi la vorton *je* kiel eble pli malofte. Anstataŭ la vorto *je*, oni povas ankaŭ uzi la akuzativon sen prepozicio. »

Enui je la patrujo ; enui la patrujon.
Mi ridas je lia naiveco ; mi ridas lian naivecon.
Je la lasta fojo mi vidas lin ĉe vi.

Jen kelkaj ekzemploj el Zamenhofaj tekstoj :

La reĝo vetis kun li je ses berberaj ĉevaloj (Z.)
Estus bone konsenti je tiu ĉi provo (Z.) aŭ *al tiu ĉi provo.*
Li disŝiris la vestojn je pecoj (Z.) aŭ *al pecoj, en pecojn.*
Fi, ĉu vi ne kompatas je maljuna servisto (Z.) aŭ *maljunan serviston.*
La okuloj estas plenaj je larmoj (Z.) aŭ *de larmoj.*

Sed oni ne uzas akuzativon tiam, kiam la klaro de la senco tion ĉi malpermesas, t. e. ordinare kiam ekzistas jam alia akuzativo en la sama propozicio. Oni povas diri tute egale : *pardoni je (al) la malamiko* kaj *pardoni la malamikon ;* sed oni devas diri ĉiam : *pardoni je (al) la malamiko lian kulpon.*

Kiam oni bone posedas la lingvon, tiam oni nur ekstreme malofte bezonas uzi *je*.

La precipe grava uzo de *je* estas por indikoj de tempo (horo, tago, dato) :

Li promesis reveni al ni akurate je la oka horo (Z.)
Ŝi forveturis je la kvara.
Je la dekdua mi tagmanĝos.

KONTRAŬ

Prepozicio esprimanta kaj montranta : 1-e lokon, kie estas unu persono aŭ objekto, apartigita per libera interspaco de alia persono aŭ objekto, kies vizaĝo aŭ antaŭaĵo estas turnita al la unua persono, objekto (1) :

La du mimikistoj sidiĝis unu kontraŭ la alia.
La junulo staris kontraŭ mi, ne deturnante sian rigardon.
Kontraŭ la teatro estas kafejo.

2-e apudecon tiel grandan, de ambaŭ personoj, objektoj, ke ili frontas kaj tuŝas unu la alian ; ofte oni uzas ankaŭ *ĉe*, *antaŭ* aŭ *sur* en tiu senco :

La balailo staras kontraŭ la fenestro.
Li forte apogis sian ŝultron kontraŭ la pordo kaj forrompis ĝin.
Dubo gardas kontraŭ risko (Z.)

3-e personon aŭ objekton al kiu estas direktata (ĉu fizike ĉu morale) malamikaĵo, opozicio, batalo :

Ŝi havis teruran malamon kontraŭ la pli juna (F. 13).
La junulo kuraĝe batalis kune kun ni kontraŭ niaj malamikoj (F. 39).
Ne batalu pot' el tero kontraŭ kaldrono el fero (Z.)
Eĉ kontraŭ pastra prediko troviĝas kritiko (Z.)
Tiu konduto estas kontraŭ nunaj moroj.

Oni ordinare ne uzas akuzativon post *kontraŭ* konsiderante, ke eĉ en la tria senco, la mova ideo estas jam per si mem sufiĉe klare esprimita. Tamen oni renkontas kelkafoje la akuzativon por plifortigi la direkton :

Ŝi levas la bastonon kontraŭ Klitandron (Z.)

Radika uzado. — *Kontraŭe, kontraŭa, kontraŭi, kontraŭiĝi, kontraŭo, kontraŭajo, kontraŭeco, kontraŭulo*, k. t. p.

Prefiksa uzado. — Tre ofta : *kontraŭagi, kontraŭparoli, kontraŭstari, kontraŭflue, kontraŭvizaĝe, kontraŭstarebla, kontraŭveneno*, k. t. p.

(1) Oni ofte nun renkontas la uzon de : *kontraŭe de, kontraŭe al, vid-alvide* anstataŭ *kontraŭ* en tiu senco.

KROM

Prepozicio havanta du signifojn, kiuj estas ofte tre najbaraj :

a) Unue ĝi ordinare montras aldonon al, *ne nur, sed ankaŭ* :

Per pruntedono ofte oni perdas krom sia havo ankaŭ la amikon (Z.)

La pli juna filino, kiu estis la plena portreto de sia patro laŭ sia boneco kaj honesteco, estis krom tio unu el la plej belaj knabinoj, kiujn oni povis trovi (F. 11).
Krom Petro tie estis ankaŭ ĉiuj aliaj miaj fratoj (Z.)

b) Due ĝi havas la signifon de esceptado :

En la salono estis neniu krom li kaj lia fianĉino (F. 26).
Rusoj, kiuj ne scias alian lingvon krom sia propra (F. 27).
Tiu libro, krom malsaĝaĵoj, enhavas ja nenion (Z.)
Mi diras al vi nenion alian, krom plej pura vero (Z.)

Se oni timas iun konfuzon inter ambaŭ signifoj estas konsilinde uzi laŭ la senco alian prepozicion aŭ esprimon ; ekzemple : *ekster, nekalkulante, kun escepto de, esceptinte ; ne nur, sed ankaŭ*, k. t. p.

Radika uzado. — *Krome, kroma.*

Prefiksa uzado. — *Kromedzino, kromsigno, kromkostoj, kromvirino, kromsenco, kromfolio.*

KUN

Prepozicio tre ofte uzata en Esperanto. Ĝi montras ĉiam akompanon, kaj estas ordinare sekvata de nominativo (1).

Resti kun leono estas danĝere (F. 7).
Oni ne povis vivi kun ili (F. 11).
Li promenas kun tri hundoj (F. 12).
« Kion mi vidas ! » diris ŝia patrino kun grandega miro (F. 17).
Niaj fratoj eliris kun la gastoj el sia domo (F. 18).

(1) Oni povas eble kompreni uzadon de akuzativo post *kun* : ekzemple : *se mi diras iru kun li* (= akompanu lin) kaj *iru kun lin* (= iru al li) ; sed, en la dua okazo, estas preferinde uzi la prepozicion *al* kaj la nominativon. Vidu *Gramatikon* § 137.

Anstataŭ kafo, li donis al mi teon kun sukero (F. 26) (1).
Mi neniam prenas kun mi multon da pakaĵo (F. 35).
Kun bruo oni malfermis la pordegon (F. 38).

Radika uzado. — *Kunè, kuna, kuneco, kunigi, kuniĝi, kunulo,* k. t. p. *Kune* estas ofte uzata samtempe kun *kun* por pli forte insisti.

Venu kune kun la patro (F. 8.)
Oni povas preni la tutan vorton, t. e. la radikon kune kun ĝia gramatika finiĝo (F. 27) (2).

Prefiksa uzado. — Tre ofta kaj facile uzebla ; ĝi estas uzata preskaŭ ĉiam kun radikaj verboj por liveri verbojn « akompanajn » aŭ « arigajn » : *kuniri, kunmeti, kungrupigi, kunligi, kunveni,* k. t. p.
En tiu uzado, ĝi estas kontraŭo de *dis.*

KVAZAŬ

Prepozicio esprimanta la sencon de : *kiel se :*

Li parolas kvazaŭ patro (= kvazaŭ li estus patro).
Ŝi kondutas, kvazaŭ (ŝi estus) infano.
Vi aspektis, kvazaŭ vi estus vidinta miraklon !

LAU

Prepozicio kun la senco *konforme al* montras la manieron, laŭ kiu iu afero fariĝas, okazas, fartas, k. t. p. ; ĝi ne prezentas malfacilaĵon. *Laŭ* estas ĉiam sekvata de nominativo.

La pli juna filino estis la plena portreto de sia patro laŭ sia boneco kaj honesteco (F. 11).
Laŭ la projekto de la inĝenieroj, tiu ĉi fervojo estas konstruota en la daŭro de du jaroj (F. 25).
Mi restas tie ĉi laŭ la ordono de mia estro (F. 26).
Laŭ estas iafoje uzata radike kaj ofte kunmete : *laŭa, laŭeco, laŭbezone, laŭekzemple, laŭsence, laŭvole, laŭmerite, laŭmode,* k. t. p. — (Vidu *al* ĉe la fino).

(1) Rimarku, ke oni uzas tie ĉi *sukero* nominative pro la prepozicieco de *kun;* sed oni devas uzi la akuzativon, se anstataŭ *kun,* oni dirus *kaj,* kiu ne estas prepozicio : *li donis al mi teon* kaj *sukeron.* Tiu ĉi ekzemplo montras la grandan proksimecon de *kaj* kaj *kun;* oni tamen ne povas ĉiam uzi indiferente unu aŭ alian; aparte por vortfarado, *kaj* ne estas uzebla.
(2) Nun prefere oni diras *finaĵo.*

MAL

Prefikso tre ofte uzata en Esperanto kaj montranta la sencon kontraŭan al tiu, kiu estas nature esprimata de la radiko, al kiu ĝi estas ligita. *Mal* ne povas esti uzata kun substantivaj radikoj, escepte kun tiuj substantivaj radikoj, kiuj montras veran agon, econ, kvaliton, k. t. p. (Ekz. : *amiko).*
Kompreneble, tio ĉi ne signifas, ke oni ne povas devenigi substantivojn de adjektivaj aŭ verbaj radikoj formitaj per *mal ;* ni celas nur la fundamentajn substantivajn radikojn (1).

Ekz. : *Bona, malbona, malbono.*
Agrabla, malagrabla, -o, -eco, -aĵo.
Ami, malami, malamo, k. t. p.

Mal **per si mem ne havas malŝatan, malbonigan ideon,** kvankam tio ĉi okazas ofte (la vortoj formitaj per *mal* estas kutime tiuj kiuj, havas tian « negativan » signifon), sed ĝi montras per si mem simple kontraŭan agon aŭ kvaliton :

Fermi, malfermi ; antaŭa, malantaŭa ; eĉ, kvankam ne tre imitinde : *fuŝi, malfuŝi ; falsa, malfalsa,* k. t. p.
Mal estas uzata radike : *mala, male* por *kontraŭa, -e,* k. t. p.

Oni ankaŭ ne devas konfuzi *mal* kun *ne* (aŭ *sen*) ; la unua estas negativa, la dua estas simple nea ; oni povas ilin reprezenti respektive per matematikaj signoj — kaj 0 :

POZITIVE	NULE	NEGATIVE
+	0	—
Ligi	Neligi	Malligi.
Multiĝi	Nemultiĝi	Malmultiĝi.
Progresi	Neprogresi	Malprogresi.
Kunrajta	Senrajta	Malrajta.
Utila	Neutila	Malutila.

La diferenco estas klare komprenebla laŭ tiuj ekzemploj.

(1) Oni memoru, ke per substantivaj, adjektivaj, verbaj radikoj ni celas la fundamentajn, leksikonajn, sengramatikfiniĝajn radikojn. Por ni, *am(o)* estas verbo, kaj *san(i)* adjektivo. Tamen, en la praktiko, la devenantaj substantivoj, verboj, adjektivoj, kondutas iafoje kvazaŭ ili estus tiaj nature ; tial oni povas diri ekz.; *senama* anstataŭ *neamanta.* Vidu *sen.*

MALGRAŬ

Prepozicio montranta, ke io okazas, kvankam ĝi ne fariĝus se iu kondiĉo estus obeata aŭ plenumita :

Malgraŭ mia ordono, li foriris.
Malgraŭ tiu perdo, li estas ankoraŭ riĉa.
Malgraŭ estas ofte anstataŭata de pli forta esprimo *spite, spite de.*
Malgraŭ (tio) ke ankaŭ anstataŭas ofte la konjunkcion *kvankam.*

Oni renkontas *malgraŭa :* prefikse ĝi ne estas uzata.

MIS

Prefikso esprimanta la signifon de *erare, malĝuste, malbone,* kaj neniel havanta la sencon de *mal ;* ĝi formas verbojn el verbaj radikoj :

Li misuzis mian nomon.
La vorto « miskompreno » servas ofte kiel defendo al kalumniantoj.

Radika uzado. — *Mise, misa.*

Prefiksa uzado. — *Miskonduki, misnaski, mispaŝi, misedziĝi, misplanti, misinformi, misaŭdi, misinstrui,* k. t. p.

PER

Prepozicio 1-e montranta ilon, rimedon, manieron, membron, organon, personon, kiun oni uzas por fari ion :

Mi manĝas per la buŝo kaj flaras per la nazo (F. 8.)
La pli maljuna filino estis simila al sia patrino per sia karaktero kaj vizaĝo (F. 11).
La amaso la malsaĝa juĝas per okulo, ne per kapo (Z.)
Li trafis du celojn per unu ŝtono (Z.)
Ni ĉiam povas per kurba vojo al rekta celo veni (Z.)
Kvitiĝas servo per reservo (Z.)
Ne ĉiam per aĝo mezuriĝas la saĝo (Z.)

2-e uzata post pasiva participo, por montri la sekvon de ago, la ilon de aganto :

La tuta suprajo de la lago estis kovrita per naĝantaj folioj kaj diversaj aliaj kreskaĵoj (F. 35).

Oni devas zorge eviti la konfuzon de *kun* (akompano) kaj *per* (ilo).

Francoj ofte konfuzas ankaŭ *per* kaj *ĉe :* ili diras ekzemple : *li ĉirkaŭprenis ŝin per la talio,* anstataŭ : *li prenis ŝin ĉe la talio* (per siaj brakoj).

Radika uzado. — *Pera, peri, perulo ; per la pero de.*

Prefiksa uzado. — Malofta : *perforti, peraĉeti, perlabori, perdanci, perludi.*

PO

Disdona prepozicio (ĉiam sekvata de nominativo).

Ĝi signifas, ke oni dividis ion en kelkajn partojn, kaj donis unu parton al ĉiu ricevanto.

Por miaj kvar infanoj mi aĉetis dek-du pomojn, kaj al ĉiu el la infanoj mi donis po tri pomoj (F. 14).
Tiu ĉi libro havas sesdek paĝojn, tial, se mi legos en ĉiu tago po dek-kvin paĝoj, mi finos la tutan libron en kvar tagoj (F. 14).

POR

Prepozicio montranta la celon de ago. Ĝi estas ĉiam sekvata de nominativo. *Por* kiel ankaŭ *antaŭ* *ol* kaj *krom* povas esti uzataj kun infinitivo.

Ĉu vi havas korktirilon por malŝtopi la botelon? (F. 34).
Mi aĉetis por la infanoj tableton kaj kelke da seĝetoj (F. 38).

Tiun ĉi prepozicion oni uzas ankaŭ por montri la difinon de objekto (celon de objekto) :

Glaso por vino, glaseto por brando (F. 34).

En kelkaj okazoj, ĝi estas malfacile diferencigebla de *pro,* kiu, eĉ, ŝajnas pli ĝusta. Uzado de *por* en tiaj okazoj ŝajnas esti simpla obeado al naciaj kutimoj :

Mi dankas vin por la prunto (la prunto estas ne la celo, tie ĉi, ĉar ĝi estas jam farita, sed la kaŭzo de la danko, kaj tial *pro* ĉi tie estas preferinda).

Por ĉiu tago, mi recevos kvin frankojn, sed por la hodiaŭa tago mi recevis duoblan pagon (F. 14).
Mi aĉetis viandon por tri frankoj.

Por estas ordinare ne uzata radike nek prefikse (eĉ en tiu ĉi lasta okazo, iafoje ĝi pro belsoneco ŝanĝiĝas en *pro* ; ekzemple : *problindula monoferado*).

Oni renkontas ofte la konjunkcian esprimon *por ke* (kun imperativa modo) :

Ŝi subtenis la kruĉon, por ke la virino povu trinki pli oportune (F. 15).

POST

Loka kaj tempa prepozicio, kiu montras ke io okazas, kiam alio estas finita (tempo) aŭ ke io estas malantaŭ alio (loko).

Loko. — En tiu loka signifo, *post* estas sekvata jen de nominativo jen de akuzativo, laŭ la ĝenerala regulo de l' movo :

La rabisto kaŝas sin post tiu arbo (li estas tie).
La leporo kuras post la ŝtonaron (direktas sin al).
Se ni, pri ia verbo, ne scias, ĉu ĝi postulas post si la akuzativon... (F. 29).
« *Da* » *post ia vorto montras, ke...* (F. 32).

Tempo. — En sia tempa signifo, *post* ĉiam postulas post si la nominativon :

Post la vespermanĝo niaj fratoj eliris kun la gastoj (F. 18).
Tuj post la hejto la forno estis varmega, post unu horo ĝi estis jam nur varma, post du horoj ĝi estis iom varmeta, post tri horoj ĝi estis jam tute malvarma (F. 38).

Kiam oni bezonas precize apartigi la lokan signifon de *post* de ĝia tempa senco, oni uzas alian parolturnon (vidu *antaŭ*), ekz. : *malantaŭ* por la loko, *pli malfrue ol* por la tempo : *li venis pli malfrue ol mi ; li venis malantaŭ mi.*

Radika uzado. — *Posta, poste, postajo, posteco, posteulo* (1), k. t. p.

Prefiksa uzado. — Precipe *postmorgaŭ ;* ĝi formas ankaŭ verbojn, kiel *postveni, postiri, postlasi, postrigardi,* k. t. p.

(1) *Posteulo*, el la adverbo *poste*, por eviti konfuzon kun la radiko *postul.*

PRA

Prefikso montranta malproksiman parencecon aŭ tre malnovan, antaŭhistorian okazon laŭ la jenaj ekzemploj :

La filoj, nepoj kaj pranepoj de reĝo estas reĝidoj (F. 36).
La patro de mia patro estas mia avo, kaj la patro de mia avo estas mia praavo.
Antaŭ kelkaj jarcentoj, niaj prapatroj mizere kulturadis la teron.
Nia vivo estas mallonga kaj plena de misteroj ; apenaŭ ni konas kion faris niaj prauloj kaj tute ne povas scii tion, kio okazos kun niaj posteuloj.
En la pratempo (aŭ prahistorio) Parizo ne ekzistis.
Ho ! tion mi forgesis ! ĝi estas praa okazo !

PRETER

Loka prepozicio montranta moviĝon de io pasanta antaŭ alio.

Silente ni iris sur la strato preter la fenestroj, kie sin kaŝis nia belulino.
En tiu ĉi minuto iris preter ni du sinjoroj.
La vortoj duonsvene forsonis preter liaj oreloj.
Traflugis anĝelo preter orelo (Z.)

Trans diferencas de *preter* per tio, ke ĝi celas limon, baraĵon, kiun oni superiras (aŭ subiras) aŭ post kiu estas la priparolata objekto. *Preter* montras nur flankan punkton, antaŭ kiu oni povas iri kaj reiri, aŭ kiun oni lasas flanken.

Radika uzado. — Malofta : *pretera, pretere.*

Prefiksa uzado. — *Preterlasi, preteriri, preterdoni,* k. t. p.

PRI

Prepozicio maniera montranta, kiun objekton koncernas la ago, faro, okazo, ekz. :

Mi parolas pri leono (F. 7).
Mi zorgas pri ŝi tiel, kiel mi zorgas pri mi mem (F. 18).
Pri sia fratino, mi povas dire ke... (F. 23).
La artikolo « la » estas uzata, kiam ni parolas pri personoj aŭ objektoj konataj (F. 27).
Se ni, pri ia verbo, ne scias, ĉu ĝi postulas akuzativon (F. 29).
Pri havo najbara oni estas malavara (Z.)

Radika uzado. — Malofta : *pria.*

Prefiksa uzado. — Tre ofta : *priparoli, pridiri, prilabori, priskribi, pripensi, prijuĝi, prijuri,* k. t. p. Antaŭ la komplemento de tiuj kunmetitaj *pri*-verboj, oni povas ripeti *pri* (kun la nominativo) aŭ preferinde uzi senperan akuzativon : *Mi priparolis pri la hieraŭa festo,* aŭ : *mi priparolis la hieraŭan feston.*

Laŭ la Zamenhofa uzado en la Biblio *pri* havas ankaŭ signifon en kelkaj kunmetitaj verboj de zorga, longdaŭra aŭ malfacila agado, farado : *pritranĉi arbon, prifosi teron, prikonstrui monton, prilumi vojon, prisemi teron,* k. t. p.

PRO

Prepozicio esprimanta motivon, kaŭzon ; *pro kio* = kial :

Li demandis ŝin, pro kio ŝi ploras (F. 21).
Li amas tiun ĉi knabinon pro ŝia beleco kaj boneco (F. 35).
Mi ridas pro lia naiveco (F. 29).

Kiel ni jam diris, studante la prepoziciojn *de* kaj *por*, oni ofte uzas *de, por* kaj *pro* unu anstataŭ la alia :

Morti pro la patrujo (aŭ por la patrujo) estas agrable (F. 20).
Li mortis de malsato (aŭ pro malsato).
Li dankis lin pro lia afableco (aŭ por lia afableco.)

Radike, ĝi ne estas ofte uzata.

RE

Prefikso montranta : 1-e, denovan faron, ripeton de ago : *ĉar li ne bone komprenis la klarigon, mi devis ĝin rediri al li ;* 2-e, revenon al la deira punkto : *la filo de la reĝo revenis de ĉaso.*

Ofte ambaŭ sencoj estas tiel proksimaj unu de la alia, ke oni ne povas facile ilin apartigi :

La tempo pasinta jam neniam revenos (F. 22).

Se oni volas precize diferencigi ambaŭ signifojn de *re,* oni uzas adverbon *denove* por la ripeto kaj adverbojn *returne, returnen,* por la reveno al la deira punkto : *li denove iris ; li returnen iris* (1).

(1) La proponita sufikso por tiu ĉi dua signifo, *retro (retroiri),* ŝajnas do neutila.

Plej ofte uzataj kunmetitaj verboj : *reiri, refari, rebrili, reinviti, resendi, remaĉi, rememori, repagi, reteni, retiri, reŝarĝi, reŝanĝi, revolvi, reveturi,* k. t. p.

Radike. — Oni renkontas *ree, rea.*

SEN

Prepozicio montranta mankon, foreston de io. Ĝi estas kontraŭo de *kun* kaj regas ĉiam la nominativon :

Anstataŭ kafo, li donis al mi teon kun sukero, sed sen kremo (F. 19).

Sen havas per si mem sencon nean : oni do ne povas ĝin uzi kun la serio da vortetoj *neniu, nenia, neniam...,* sed kun la serio *iu, ia, iam...* Ekz. : *sen helpo de iu, sen ia dubo* (kaj ne : *sen helpo de neniu).*

Sen estas uzata de kelkaj aŭtoroj antaŭ infinitivo : *li venis sen manĝi.* Tia uzado estas tute ne klasika en Esperanto ; en tiaj okazoj, oni kutime uzas, anstataŭ *sen,* la vorton *ne,* kun konvena participo, aŭ se oni nepre volas uzi *sen,* oni tiaokaze substantivigas la infinitivan verbon ;

Li venis, ne manĝinte, aŭ *li venis sen manĝo.*

Radika uzado. — Oni renkontas *senigi* (iun de io), *seniĝi, seneco.*

Prefiksa uzado. — La prefiksa rolo de *sen* estas grava en Esperanto, ĉar ĝi, kune kun *ne,* estas la nea, nuliga prefikso respondanta al la negativa prefikso *mal* (vidu tiun ĉi lastan). *Sen* povas prefiksiĝi regule **nur kun substantivaj radikoj,** por formi adjektivojn aŭ adverbojn ; kun adjektivaj kaj verbaj radikoj ĝi estas preskaŭ ĉiam malbona kaj devas esti anstataŭata per *ne :*

Vi parolas sensencaĵon, mia amiko (F. 35).
Senkapa, sensanga, senmova, senmona, sengusta, senĝene, senpova, senfine, senforta, sendube, sendanka, k. t. p.

Sed : *nebela* (= senbeleca), *nebona* (= senboneca), *nemarŝanta,* k. t. p.

Tamen oni trovas *sen* kun kelkaj verbaj au adjektivaj radikoj, kiam tiuj radikoj liveras substantivojn tiel forte apartigitajn de

l'verbo, ke ili estas kvazaŭ nedependaj aŭ kiam la radiko povas esti konsiderata indiferente jen kiel verbo aŭ adjektivo, jen kiel substantivo ; ekzemple :

Al homo pekinta senintence, Dio facile pardonas (F. 22).
Si devis laboradi senĉese (F. 13).
Fluanta akvo estas pli pura, ol akvo, staranta senmove (F. 22).

SUB

Loka prepozicio montranta, ke io estas pli malalta ol alio. Kiel ĉiuj lokaj prepozicioj, ĝi estas sekvata jen de nominativo, jen de akuzativo, laŭ la « mova » regulo de l' gramatiko.

Grandan paperujon mi portas sub la brako (F. 40).
El sub la kanapo la muso kuris sub la liton kaj nun ĝi kuras sub la lito (F. 26).
Li falis sub la radojn de vagonaro (F. 39).

Kiel oni vidas laŭ la supra difino, *sub* sola estas kontraŭo de du prepozicioj : *sur* kaj *super*, ĉar oni ne faras la saman diferencon por la malsupra situacio, kiun oni faras por la supra (vidu *sur*).

Radika uzado. — *Suba, sube, subigi, subiĝi, subulo*, k. t. p.

Prefiksa uzado. — Sufiĉe ofta : *subiri, subfali, subteni, subestro, subdirektoro, suboficiro, subridi* (1), *subaĉeti, subaŭskulti*, k. t. p.

SUPER

Prepozicio montranta, ke io estas supre de alio, sed ne kuŝas sur ĝi (2).

Super la domo flugas birdo.
La lampo pendas super la tablo.
Li jetis la ŝtonon super la muron.

Radika uzado. — *Supere* preskaŭ ĉiam estas anstataŭata de *supre*, kvankam ambaŭ ne havas tute saman sencon.

Supera, superi, supereco, superaĵo, superiĝi, malsupera, k. t. p.

(1) Ĉi tie *sub* esprimas ion sekretan, kaŝitan aŭ kasiĝan.
(2) Ambaŭ objektoj povas iafoje tuŝi unu la alian, sed tamen la supera estas ankaŭ tre alta super la malsupra; ekz.: *super la tero sin trovas aero* (F. 26).

Prefiksa uzado. — Ofta. Oni renkontas *supervesto, superjaro, superflua* (= troa), *superversi, supersuti, supersigno, superregi, superhoma, k. t. p.*

Li portas rozkoloran superveston (F. 31).

SUR

Loka prepozicio montranta, ke io estas supre de alio, mallarĝe ripozante sur ĝi. La diferenco inter *sur* kaj *super* konsistas precipe en tiu ripozado aŭ netuŝado.

Super montras ion, kio iafoje povas tuŝi la komparan punkton (ekz. : *aero tuŝas la teron*), sed kiu tiaokaze okupas larĝan spacon supran, aŭ ne estas mallarĝe gluita, ripozanta sur la portanto. Ekz. : inter ambaŭ vortoj *supervesto* kaj *surtuto*, ekzistas tiu diferenco, ke *supervesto* estas larĝa kitelo aŭ pluva kitelo flirtanta ĉirkaŭ la ceteraj vestoj, dum *surtuto* estas vesto ordinara, kiun oni tiras sur la aliajn kaj kiu mallarĝe ĉirkaŭas la korpon.

Sur estas sekvata de nominativo aŭ akuzativo laŭ la okazo (1) :

La libro estas sur la tablo kaj la krajono kuŝas su[illegible] fenestro (F. 6).
Kvinope, ili sin jetis sur min (F. 14).
Tra la fenestro, la vaporo iras sur la korton (F. 25).

Radika uzado. — Malofta. Adverbe oni uzas pli ofte *supre* ol *sure*, kvankam ilia signifo povas esti ne tute sama.

Prefiksa uzado. — Ĝi prezentas nenian malfacilaĵon : *surhavi, suriri, surmeti, surpreni, surskribi, surgrimpi, surskribo, surpapera*, k. t. p.

TRA

Prepozicio montranta, ke io eniris alion, ian baraĵon kaj eliris el ĝi ĉe ĝia alia, kontraŭa flanko. *Tra* estas sekvata de nominativo, kvankam oni povus ankaŭ kompreni post ĝi akuzativon, kiam ĝi esprimas la direkton ĝis la celo (2).

(1) Pri uzado de *sur, sub, super, malsupre, malsuper*, vidu *Gramatikon*.
(2) Ekzemple: *la pinglo restis tra la fingro. La ŝtelisto forkuris tra la fenestron.* Tia diferencigo estas ofte superflua, ĉar *tra* estas tute klara per si mem.

La soldatoj kondukis la arestitojn tra la stratoj (F. 22).
Li estas tiel dika, ke li ne povas trairi tra nia mallarĝa pordo (F. 33).
Mallarĝa vojeto kondukas tra tiu ĉi kampo al nia domo (F. 38).
Du ekbriloj de fulmo trakuris tra la malluma ĉielo (F. 40).
Pelu mizeron tra l'pordo, ĝi revenos tra l'fenestro (Z.)

Radika uzado. — *Trae, traen.*

Prefiksa uzado. — Ofte kun verboj : *trairi, trakuri, trabori, trapiki, traĵeti, travidebla,* k. t. p.

Lernolibron oni ne devas tralegi, sed tralerni (F. 31).
Vitro estas rompebla kaj travidebla (F. 41).

Tra diferencas de *trans* per tio, ke ĝi montras, ke oni iras en la barajon, dum *trans* signifas iron *sub* aŭ *super* la barajo.

TRANS

Loka kaj tempa prepozicio montranta : 1-e, ke oni estas sur la alia flanko de barajo aŭ limtempo ; 2-e, ke oni iras sur tiun alian flankon ; ĝi do estas sekvata de nominativo aŭ akuzativo laŭ la okazoj (1).

Hirundo flugis trans la riveron, ĉar trans la rivero sin trovis aliaj hirundoj (F. 26).
Pensoj iras trans limo sen pago kaj timo (Z.)
Tio estas belaj rakontoj el trans la montoj (Z.)

Radika uzado. — Ne ofta : *transa, transeco, transigi, transen.*

Prefiksa uzado. — Precipe kun verboj : *transalpa, transiri, transflugi, transdoni, transskribi, transloĝiĝi,* k. t. p.
Verkisto verkas librojn kaj transskribisto simple transskribas paperojn (F. 37).

VIR

Vir, kiel *ĉef* kaj *edz,* estas komuna substantiva radiko, kiu tamen, krom sia natura, ordinara signifo, iafoje ludas rolon de prefikso por montri la virseksecon de iu besto, kontraŭe al la sufikso *in,* kiu

(1) Pri diferencigo de *trans* kaj *tra, preter, ĝis,* vidu tiujn vortojn kaj *Gramatikon* § 217, Rim. 2.

montras la virinseksecon. Ekzemple, el la « neŭtrala » radiko *bov* ni ricevas *virbovo* kaj *bovino ;* el la radiko *kat, virkato* kaj *katino.* La uzado de *vir* ne estas pli malfacila, ol tiu de *in,* sed multe pli malofta, ĉar en la plimulto de l'okazoj, oni kontentiĝas per la simpla radiko « neŭtrala ».

Kelkaj aŭtoroj uzas *vir* sufikse : *bovoviro, katoviro.* Ni ne opinias, ke tiu sistemo estas ĝusta, ĉar la reguloj ordinaraj de la vortokunmetado postulas *virbovo (= vira bovo = virseksa bovo)* kaj ne *bovoviro (= bova viro = bovisto),* kaj ni ne vidas kaŭzon, ilin ŝanĝi tiuokaze.

ALDONO

Opiniante, ke ni plivalorigos nian verkon per aldono de plej gravaj Raportoj *de la Direktoro de la Sekcio pri Gramatiko, d-ro Walter Lippmann, ni represas ilin kun la afabla permeso de l'Esperantista Akademio.*

Pri la uzado de la refleksiva pronomo en Esperanto.

La sintakso en Esperanto pli kaj pli stabiliĝis. La unuaj instrulibroj estis malkompletaj ; la unuaj esperantistoj disponis pri malmulte da modela literaturo kaj trovis nur tre malofte okazon por interparoli kun alinacianoj. En la Esperanto-tekstoj de la unua epoko — eble ĝis 1909 — do ne mankas neegalaĵoj sintaksaj. Sed ili iom post iom preskaŭ tute malaperis, almenaŭ en la bona literaturo. En la pli novajn instrulibrojn pli kaj pli ensoviĝis novaj gramatikaj reguloj deduktitaj el la reganta lingvo-uzo de la imitindaj aŭtoroj. D-ro Zamenhof mem direktis ĉi tiun evoluon. Dum kelka tempo li uzis kvazaŭ prove plurajn formojn por la sama esprimo, poste li elektis unu el ili kaj forlasis la alian, montrante per tio, kiun li opinias preferinda. Ankaŭ el la konstato de tiaj preferoj naskiĝis kelkaj reguloj, kiuj ja ne estas tiel leĝfortaj kiel la reguloj de la Fundamenta Gramatiko, sed tamen estas ĝenerale atentataj kaj sekvataj. Dirado, ke ili ne estas fundamentaj, aŭ citado de la relative malmultaj frazoj, en kiuj D-ro Zamenhof iam ne sekvis ilin, nenion pruvas kontraŭ ilia ekzistrajto. Estus eble eĉ rekomendinde, sankcii ilin per oficialigo, por plifirmigi la unuecon de la lingvouzo. Tipa ekzemplo por tio estas la reguloj pri la refleksiva pronomo.

La Fundamenta Gramatiko ne enhavas regulon pri la uzado de *si* kaj *sia*, sed en la Fundamenta Ekzercaro oni trovas multajn ekzemplojn. El ili kaj el la cetera literaturo, precipe la klasika, oni povas eltiri jenajn ĉefregulojn :

La refleksiva formo por la pronomo de la tria persono en ĉiuj tri seksoj kaj ambaŭ nombroj estas « si » kaj « sia ».

Ĝi estas uzata, kiam la pronomo rilatas al la subjekto de la propozicio, sed en dependaj partoj de propozicio decidas la logika subjekto de la dependa parto, ne la gramatika subjekto de la dependiga.

Esperanto - fondo
Vyškov, Školní 4

I

La rilato al la tria persono.

La unua ĉefregulo estas konforma al la uzado de la refleksiva pronomo en la lingvoj latina, germana, franca kaj aliaj, sed en la slavaj lingvoj oni uzas la refleksivan formon ankaŭ por la unua kaj dua personoj. D-ro Zamenhof, deveninta el slavlingva medio, kompreneble dum la unua tempo sekvis la slavan kutimon en kelkaj malmultaj frazoj.

Ni sidis, tenante sin koro ĉe koro. (Unua Libro 1887 !!), sed : ni sidis, tenante nin koro ĉe koro (F. K. 326/17) ;

vi povos sin mallevi (La Esperantisto Sept. 1890, F. K. 50/11), sed : vi povos vin mallevi (Fabeloj de Andersen I, 61/14) ;

se ni povus porti ĉe sia flanko pafilegon (Haml., 1-a eld., 172/2), sed : ...ĉe nia flanko ... (Hamleto, postaj aldonoj, 163/30). Aliaj ekzemploj : Hamleto 155/4, Readmono XXX/20.

La malmulteco de ĉi tiuj neregulaĵoj kaj la posta videbla korektado de ilia plimulto supozigas, ke ili estis hazardaj plumeraroj. Ke D-ro Zamenhof ne volis la formojn *si* kaj *sia* por la unua kaj dua personoj, li apenaŭ povis pli klare montri ol per jenaj frazoj en la Fundamenta Ekzercaro (§ 18) :

Mi amas min mem, vi amas vin mem, li amas sin mem, kaj ĉiu homo amas sin mem. — Mi zorgas pri mi mem ; sed ŝi tute ne zorgas pri si. — Mi havas jam mian ĉapelon, nun serĉu vi vian. — Mi lavis min en mia ĉambro, kaj ŝi lavis sin en mia ĉambro.

La vortoj *iu, tiu, ĉiu, kiu, neniu* apartenas gramatike al la tria persono, ankaŭ kiam ili rilatas al la unua kaj dua (en Esperanto same kiel en naciaj lingvoj).

Ĉiu el ni ricevas sian porcion. — Neniu el vi evitos sian sorton. — Se ĉiu el vi... lasus deŝiri al ŝi... unu pecon da karno post alia ... (Rabistoj).

Kiam *sin* kaj *sia* estas partoj de unu kunmetita vorto, ili povas rilati ankaŭ al la unua aŭ dua persono.

Homo, kiu emas sin gardi, estas homo singardema ; ankaŭ mi estas (homo) singardema. — Via sinestimo devus reteni vin.

Aliaj tipaj vortoj estas : sindona, sinregema, sindetenema, sinkono, sinfido, sinoferemo, sinamo k. a., ankaŭ siatempe. Ĉe — *flanke* oni uzas *sia* — nur por la tria persono.

II

La rilato al la subjekto.

A) **En simplaj propozicioj** decidas pri la uzo de la refleksiva formo la subjekto. Tion konfirmas nenombreblaj ekzemploj en la Zamenhofa verkaro kaj la cetera literaturo en la Fundamenta Ekcercaro :

La vino enhavis en si malklarajon (§ 35). Hundo metis sur min sian piedegon (§ 38). Timulo timas eĉ sian propran ombron (§ 37). Li sentis sin malfeliĉa (§ 33). Ili vidas la suferojn de siaj najbaroj (§ 32). El ĉiuj siaj fratoj Antono estas la malplej saĝa (§ 10). La pli juna filino, kiu estis la plena portreto de sia patro laŭ sia boneco ... (§ 11). Kvinope ili sin ĵetis sur min (§ 14). ... la bona virino trankviligis sian soifon (§ 15). Se la lernanto scius bone sian lecionon, la instruanto lin ne punus (§ 20) k. t. p.

En propozicioj havantaj plurajn subjektojn unu subjekto ne influas la propoziciparton apartenantan al alia subjekto.

Petro kaj lia fratino ne povis kaŝi sian honton. — La bona arbaristo restos same en nia memoro kiel lia fidela hundo. Sinjorino N. aŭ ŝia servistino estas kulpa. — Ĉu Protagoras mem, ĉu nur lia doktrino erariĝis la junulon, ... — La lingvo ... neniam disfalos kaj ia facilanima paŝo de ĝiaj amikoj ... ne detruos — (Antaŭparolo al la Fundamenta Krestomatio V/3).

B) **En dependaj propozicipartoj** sen gramatika subjekto oni devas konstati, ĉu la (triapersona) pronomo apartenanta al la dependa parto rilatas al ties logika subjekto. Se jes, oni uzas *si* kaj *sia* sen konsidero al la gramatika subjekto de la dependiga parto.

La reganta vorto en la dependa parto estas plej ofte verbo en formo infinitiva aŭ participa, sed ankaŭ adjektivo, adverbo aŭ substantivo.

1. — INFINITIVO.

Kiam la pronomo rilatas al la subjekto de la ago esprimita per la infinitivo, oni uzas *si* kaj *sia*.

Kiam la infinitivo estas pasiva aŭ havas pasivan sencon (ofte post *lasi, igi*), decidas la subjekto de la pasiva ago (= la objekto de la aktiva ago).

a) Aktiva infinitivo.

La sinjoro ordonis al sia servisto vesti lin (= la sinjoron), vesti sin (= la serviston). — La juĝisto ordonis al la akuzito, sin defendi antaŭ li. — Ludi per sia violono, estas lia plej alta plezuro. — Tiaj ... estis la konsideroj, kiuj ... igis ... Wilkins eldoni sian ... pazigrafian provon (F. K. 257/23). — Estas ĉiam pli bone malbonigi al si la kubutojn ... (Batalo de l'Vivo 41/6). — Ili donadis al li okazon montri siajn novajn vestojn (F. K. 19/22). Sin mem mortigi kial malpermesis la Plejpotenca (Hamleto 14/26). Kabinetaj provoj, kiuj ne alportas al ĝi senkondiĉan utilon, sed kalkulas je ĝia preteco pionire oferi sian tempon (F. K. 244/2). Ni ... petas ĉiun el la aŭskultantoj noti al si, ke pri la utileco ... li ne dubas (F. K. 279/6). — Estas bele ... ĝui plezuron de ĉiuj siaj laboroj (Predikanto V/18). — La politiko povus ilin devigi plenumi sian vorton (Rabistoj 73/14). — La amikoj ... penis deteni lin de la publikado de sia sistemo (La Esperantisto, Septembro 1889). — Gravaj aferoj malhelpis lin plenumi sian deziron.

La imperiestro ... sendis voki lian kuraciston (La najtingalo en la Revuo, vol. II, 359/17). — Li min petis eniri en la kaverneton de lia lokomotivo (F. K. 139/9). — Li petis la kelneron alporti al li porcion da glaciaĵo (F. K. 168/13). — Stetten ... per ĝi invitis sian amikon fari kun li promenon (F. K. 151/5). — Jozef ordonis al siaj servantoj-kuracistoj balzami lian patron (Genezo, Revuo, Decembro 1910).

En letero al Richard Sharpe D-ro Zamenhof diris, ke en la frazoj : « Ili invitis min verpermanĝi (= ke mi vespermanĝu) en siaj domoj » kaj « Ŝi invitis min veturi en sia fiakro » li preferas « — en iliaj domoj » kaj « — en ŝia fiakro » (Lippmann, Dr Zamenhofs Sprachliche Gutachten 118).

b) Pasiva infinitivo.

La Romanoj esperis ne esti surprizataj en sia tendaro de la malamikoj. — Ŝi deziris matene ne esti ĝenata de siaj amikoj.

c) Pasivsenca infinitivo.

Karlo ne lasis sin bati (= esti batata) de sia fratino. Karlo ne lasis, lin (Paŭlon) bati (= esti batata) de sia (= de Paŭlo) fratino. — Sed : Karlo ne lasis sian fratinon, bati (akt.) lin (= Karlon aŭ Paŭlon). — Karlo ne lasis lin, bati (akt.) sian

(= de Paŭlo) fratinon. — Karlo ne lasis lin (Paŭlon), bati lian (= de Karlo) fratinon.

La aktivecon aŭ pasivecon de la infinitivo kaj la decidan subjekton oni facile ekkonas per formado de dependa propozicio kun *ke* (Karlo ne lasis, ke ...).

2. — PARTICIPO.

Kiam la pronomo rilatas al la subjekto de la ago esprimita per la participo, oni uzas *si* kaj *sia*. Ĉe pasiva participo decidas la subjekto de la pasiva (= objekto de la aktiva) ago.

a) Aktiva participo.

Li volis sin liberigi de la konscienciproĉoj lin turmentantaj. — Lia fratino malkovris al li la koron de la memvole sin forpelinta filino (Batalo de l'Vivo 85/3). — Ĉiu promenanto ... iru stari sur la punkto zodiaka respondanta al la tago de lia promenado (F.K. 236/7). — Ili ekvidadis la nubojn preterflugantajn profunde sub ili (F. K. 53/10). — Ŝi ekvidis starantan antaŭ ŝi sur genuoj ian nekonatan viron (F. K. 124/33). Li vidis sian fratinon ludanta(n) per sia (= de la fratino) pupo. Ŝi aŭdis sian amaton ludanta per ŝia violono. — Li ekvidis la anĝelon ... starantan sur la vojo kun glavo en sia mano (Nombroj XXII/31). — Li estos kiel arbo ... donanta sian frukton en sia tempo (Psalmo CIV/27). — Li donis valorajn donacojn al la soldatoj per tuta sia forto batalintaj por lia savo.

b) Pasiva participo.

Li sidigis sin sur la seĝon prezentitan al li. — Neniu envias homon riĉan, sed turmentatan de sia edzino. Li ne komprenas la francan lingvon parolatan de liaj lernantoj (Esperanto, Aprilo 1895).

La adverba participo ne prezentas ion specialan, ĉar ĝi mem nepre rilatas al la subjekto de la propozicio.

3. — ADJEKTIVO.

Kiam la pronomo rilatas al la persono aŭ aĵo, kiu havas la econ esprimitan per la adjektivo, oni uzas *si* kaj *sia*.

Li devas eviti ĉiajn trinkaĵojn por li tro akrajn. Mi konas kelkajn homojn nur por si kompatemajn. — Li kuracas per sia nova metodo eĉ la pesimistojn, la homojn al si mem malamikajn. — Ernesto baldaŭ ekkonis ilian al li malamikan celadon. — Ni ne hezitas nomi lin la plej bona el siaj gefratoj. La registaroj trovos la demandon de lingvo internacia ... inda je ilia enmiksiĝo (F. K. 285/27). — Emilo tuj uzis la okazon favoran al li. — Li faris sian laboron kun la precizemo propra al li.

4. — ADVERBO.

La adverbo ne influas la uzadon aŭ neuzadon de *si* kaj *sia* por (triapersona) pronomo apartenanta al ĝi.

Li perfektigis la konstruaĵon ekzakte laŭ sia plano. — Estas por li malfacile komenci sian taglaboron jam je la 7-a. — Li kantas bele por si, sed ne por ni.

Frederiko staris kontraŭe de sia patro. — Li povis esti savata nur pere de sia onklo, kiu estis amiko de la policestro. Li devis resti malproksime de sia hejmlando. — Oni ne liberigis lin spite de liaj protestoj. — Rilate al sia profesia agado li estis senriproĉa. — Li povis fari sian karieron nur helpe de sa influriĉa favoranto.

5. — SUBSTANTIVO.

Substantivoj ne esprimantaj agon ĝenerale ne influas la uzadon aŭ neuzadon de *si* kaj *sia* por (triapersona) pronomo apartenanta al ili.

Kiam la pronomo rilatas al la subjekto de ago esprimita per substantivo, oni uzas *si* kaj *sia*, sed la posesiva pronomo ne estas influata de tiu substantivo, kiam ĝi staras ĉe la nomita subjekto mem.

En apozicioj decidas la vorto, al kiu ili apartenas, pri la uzado aŭ neuzado de *si* kaj *sia*.

a) Substantivo ne esprimanta agon.

Savonarola ne vidis la popolamason ĉirkaŭ si. — La sinjorino prezentis al li la sidlokon apud si.

En tiaj frazoj oni povus ankaŭ pravigi la uzadon de la nereflek-

siva formo per alpensado de vortoj « estantan, starantan, troviĝantan » k. s. :

Ŝi prezentis al li la sidlokon (troviĝantan) apud ŝi. — Li pli kaj pli malproksimiĝis de la nuboj (estantaj) sub lia aeroplano.

Substantivo apartenanta al alia kiel ties esenca aŭ kutima atributo povas havi apud si la vorton *sia* (precipe post *kun, apud, ĉe)* ankaŭ, kiam la alia substantivo ne estas subjekto. La tuta esprimo estas kvazaŭ neinfluebla unuaĵo.

La reĝo kun sia krono. La fiŝkapto kun sia reto. La juĝisto en sia talaro. La laboristo ĉe sia maŝino. La pentristo antaŭ sia bildo. Do ankaŭ : Ŝi rimarkis ... la reĝon de la maro kun sia krono sur la kapo (F. K. 53/25). — Ĉiuj dormis, krom la direktilisto apud sia direktilo (F. K. 55/13).

En frazoj, en kiuj la rilato de la pronomo ne estas certa, oni prefere ne uzu tiun liberecon.

S-ro M. (kiu ĵus estis pentrinta bildon) trovis la faman pentriston antaŭ sia bildo (= bildo de M.); li povis apenaŭ atendi lian juĝon.

b) Substantivo esprimanta agon.

Paŭlo konis sian (= de P.) amon al ŝi (Marta). — Paŭlo konis sian (= de M.) amon al li (P.). — Paŭlo konis ŝian (= de M.) amon al si (M.) — Paŭlo konis sian (= de P.) amon al si (P.) — Karlo pravigis per sia braveco nian konfidon al li. — Vidinte liajn sukcesojn, ni komprenis lian konfidon al si. — Emilo renkontis la gesinjorojn H. dum babilado pri lia (= de Emilo) fianĉino. — ... pri sia (= de la gesinjoroj) lasta vojaĝo. — Aperos ... la timo de ĉiu nacio pro sia ekzistado (F. K. 298/30). — Nelerta esprimado de siaj pensoj pri religio povas konduki al eraro (Esp. Febr. 1895). — La ennovaĵoj estas farataj sub la persona respondeco de iliaj aŭtoroj (La Esp. Dec. 1890). — Nenio por homo estas pli malutila, ol nekonado de siaj propraj posedaĵoj (Marta 82/8). — Ŝi respondis, vive observante la enportadon de ŝiaj korboj (Bat. de l'Vivo 65/15). — La dukino ... atendis la reporton de ŝia braceleto (F. K. 144/20). — Ke tiu ... ricevu justan punon por lia krueleco kontraŭ mi! (Georgo Dandin (45/32). — Ŝi meditas pri la vortoj de la patrino de ŝia lernanto (Marta 47/17). — (« Vortoj » esprimas la agon « paroli »). — Maltrankvila fariĝis la bela Sara pro tiu spasme ŝprucanta gajeco de ŝia edzo (Rab. de Baĥaraĥ 13/14).

(Ĉi tiu « gajeco » estas karakterizita per siaj atributoj kiel aktiva ĝojado, babilado, ridado, k. t. p., do ankaŭ esprimas agon). — Li trovas en ili jesigon de liaj teoriaj supozoj (F. K. 95/31). — Li faras al K ... proponon — riĉiĝi ... per efektivigo de lia projekto (F. K. 99/36).

c) Posesiva pronomo ĉe la subjekto de ago esprimita per substantivo.

Gustavo povis fari sian vojaĝon nur per la subteno de sia riĉa amiko. (La amiko estas la subjekto de la ago esprimita per « subteno ») — Ŝi vivis el la ŝteladoj de sia fianĉo.

ĉ) Apozicio.

Sinjoron R., la plej altestimatan komerciston en sia urbo, ili ne kalumnios nepunote. — Ili forlasis la interligon de la Eternulo, la Dio de iliaj patroj (Readmono XXIX/25). — Tiam alportis la estroj de Izrael, la ĉefoj de siaj patraj domoj (Nombroj VII/2).

III

C) Specialaĵoj.

1. — VERBOJ KAŬZATIVAJ.

En la kaŭzativaj verboj, formitaj el verba radiko, estas analize du verboj kaj du subjektoj : la iganto kaj la igato. Ĝenerale la unua, sed kelkfoje ankaŭ la dua decidas pri la uzado aŭ neuzado de *si* kaj *sia*.

La abatino lernigis al ŝi sian novicinan preĝon (= la abatino igis ŝin lerni sian n. p.) — ... rimedon por interkomunikigi inter si la verajn amikojn de nia afero (= por igi la v. amikojn interkomuniki inter si). (La Esp. Okt. 1890). — Ili rigardas iliajn legantojn (= igas rigardi iliajn legantojn) (Dua Libro 11/5). — Tiuj amikoj de l'lingvo, kiuj malfortigus aŭ tute ĉesigus ilian laboradon (Aldono al la Dua Libro 4/26).

Ĉi tiu neordinara uzado estas ja konstatebla en la supraj (tre malnovaj) frazoj, sed ĝi estas apenaŭ rekomendinda.

2. — PREDIKATAJ PROPOZICIPARTOJ.

En predikataj propozicipartoj ankaŭ ties subjekto povas decidi pri la uzado aŭ neuzado de *si* kaj *sia*.

La reĝo nomis lin sia plej fidela vasalo. — Ili elektis lin sia gvidanto. — Sed ankaŭ : ... lia plej fidela vasalo ; ... ilia gvidanto. — Mia onklo opiniis ŝin la plej bona edukistino de siaj (propraj) infanoj. — Mia onklo opiniis ŝin la plej bona edukistino de liaj (= de la onklo) infanoj. — Ŝi devis iri sur ŝlimo, kiun la sorĉistino nomadis sia torfaĵo (F. K. 48/24). — Sed : La reĝido, kiu nomis la reĝidinon lia amata trovitino (F. K. 52/34).

Se en tiaj propozicioj oni uzas *kiel*, oni trovas la saman liberecon.

La kunvenintoj elektis lin kiel sian reprezentanton. — Li estis sindona al li kiel al sia edukinto kaj amiko. — Sed ankaŭ : Tiujn ... verkojn la aŭtoro de Esperanto rigardis ĉiam kiel leĝojn por li (Antaŭparolo al la Fundamento VI/11) (... leĝojn por si — povus havi ankaŭ la signifon : leĝojn por si solajn, apartajn. Eble tial D-ro Z. preferis *li*). — Li donis ilian landon kiel heredon al Lia popolo (Psalm. CXXXV/12, CXXXVI/22).

3. — SPECIALAJ KROMSIGNIFOJ DE « SIA » : « SIATEMPE »

Sia kelkfoje esprimas tre intiman ligaĵon kun la persono aŭ aĵo, al kiu ĝi rilatas. Tiel ekzemple en la frazoj : Ĉiu ricevos sian porcion; li maltrovis sian profesion ; ĉio devas kuŝi sur sia loko ; li ne vivas sian vivon ; — *sia* signifas : « sia propra », « por li (ĝi) konvena, destinita, taŭga », eĉ simple : « la ĝusta ». Ĉi tiun kromsignifon havas nur *sia*, neniu alia pronomo. *Sia* kun ĉi tiu kromsignifo tial estas uzata ankaŭ, kiam ĝi ne rilatas al subjekto gramatika aŭ logika, sed nur al iu alia vorto en la frazo.

Metu ĉion en sian lokon. — Faru ĝin en sia tempo (Nombroj IX/3). — Kial ni estu esceptataj, ke ni ne alportu la oferon al la Eternulo en sia tempo inter la Izraelidoj ? (Nombroj IX/7, same 13). — Li estos kiel arbo ... donanta sian frukton en sia tempo (Psalm. 1/3 ; simile CIV/27, CXIV/15). — Por ĉiu afero estas sia tempo kaj maniero (Predik. VIII/6). — Al ĉiu sia propra estas ĉarma kaj kara (Proverb. 347).

Se oni ne volas esprimi la kromsencon, oni uzas la regulan alian pronomon.

Mian oferon, mian panon, miajn fajroferojn, mian agrablan odoraĵon observu, por alportadi al mi en ilia tempo (Nombroj XXVIII/2).

En la vorto *siatempe* la pronomo *sia* preskaŭ tute perdis sian originan sencon. *Siatempe* (= germ. « seinerzeit ») ne signifas « en sia tempo », sed proksimume « en tiu (antaŭa, pasinta) tempo (ne precize indikata) ». Anstataŭ *siatempe* oni povas preskaŭ ĉiufoje diri « en tiu tempo », tiutempe » aŭ eĉ simple « tiam ». Konsekvence de tio *siatempe* tute ne sekvas la regulojn pri la uzado de *sia*. Pri *siatempe* legu la Lingvan Respondon I/43.

La grandan miron, kun kiu mi rigardis siatempe tiujn heroojn (Ifigenio 48/25). — Ĉion li kreis bela siatempe. (Pred. III/11). — Mi volis siatempe proponi komunan regulon (Lingv. Resp. I/36 kaj 43). — Per poŝta karto mi siatempe respondis al Vi je Via letero (La Esp. Nov. 1890).

Eble jam en la supra ekzemplo (Pred. III/11), kaj certe en jenaj frazoj D-ro Zamenhof uzis *siatempe* anstataŭ « en sia (= la ĝusta) tempo » :

Siatempe estas dirate al Jakob kaj al Izrael, kion faras Dio (Nombroj XXIII/23). — Tiam Mi donos al via lando pluvon siatempe (Readmono XI/14).

4. — PER SI MEM.

La esprimo *per si mem* havas specialan sencon ne elpreneblan nur el ĝiaj vortoj. Ĝi do ankaŭ ne sekvas la regulojn pri la uzado de *si*, sed estas uzata kiel unuvorta adverbo.

5. — PROVERBOJ.

En kelkaj proverboj *sia* estas uzata nekutime, ĉar proverbo bezonas koncizecon. *Sia* signifas ĉi tie proksimume « la propra havaĵo ».

Sia estas kara pli ol la najbara (Proverbaro 347). — Sia estas kara pli ol najbara (Prov. 765). — Ĉio sia estas plej ĉarma (Prov. 357).

6. — RECIPROKECO.

La refleksiva pronomo estas ofte uzata en reciproka senco anstataŭ « unu la alian, unu al alia », jen kun, jen sen aldono de la vorto « reciproke ». Anstataŭ « unu kun la alia » aŭ « la unuj kun la aliaj » oni ofte trovas « inter si ». Ĉar la reciprokeco ne povas esti esprimata per alia pronomo, ĉi tiu « inter si » restas ankaŭ, kiam ĝi ne rilatas al iu subjekto.

Du tute malsamaj objektoj, kiujn miksi inter si oni neniel devas (F.K. 275/23). — Rimedon por interkomunikiĝi inter si la verajn amikojn de nia afero (La Esp. Okt. 1890) (vidu ankaŭ F. K. 281/33).

La supraj konstatoj kaj reguloj estas prenitaj el la lingvo-uzo de D-ro Zamenhof kaj de aliaj bonaj aŭtoroj. Tamen ili ne regas absolute ekskluzive. Lingvo ne estas meĥanikaĵo — same ne kiel la parolanta kaj verkanta homo. La apliko de speciala formo de refleksiva pronomo estas diversa en ĉiuj eŭropaj lingvoj antikvaj kaj modernaj . En la Fundamento kaj en la unuaj instrulibroj mankis klaraj reguloj. Fine la uzado de *si* kaj *sia* pro ilia povo rilati al tri diversaj seksoj en ununombro kaj plurnombro kelkfoje ebligas erarkomprenojn. Oni do ne miru trovante en la granda Esperanto-literaturo, sed ĉefe en la malnova, kelkajn, relative tre malmultajn ekzemplojn de neregula uzado aŭ neuzado de *si* kaj *sia*. En kelkaj el tiuj ekzemploj ni povas supozi la kaŭzon de la neregulaĵo. Evidente la bezono esprimi kontraston igis D-ron Zamenhof uzi *ilia* en F. K. 258/4 :

La ĥino legas siajn ŝkribajn signojn ĉiam en sia dialekto, kaj la aliaj popoloj de Azio legas tiujn samajn signojn en ilia lingvo.

Pliajn ekzemplojn oni trovas en la Fundamenta Krestomatio 271/11, 312/18, 314/1, en Batalo de l'Vivo 52/27, 77/33, 85/6 kaj pli multajn en la plej antikva literaturo de Esperanto : la unua Esperantogazeto « La Esperantisto » (1889-1895), en la « Dua Libro » kaj ties « Aldono ». Unuopaj estas troveblaj supozeble en ĉiuj malnovaj Esperanto-verkoj.

El tiaj kontraŭekzemploj ni ne rajtas konkludi la nulecon de la supraj reguloj kaj sekve la plenan liberecon, uzi aŭ ne uzi laŭ bontrovo la formojn *si* kaj *sia*. Tia libereco — cetere de neniu serioze postulata — kondukus al stila ĥaoso ne tolerebla. Ĝuste diras Grabowski en sia respondo al demando de S-ro Hill en « Lingvo Internacia » 1909/365 « Pri la uzado de *lia* kaj *sia* » :

« Se ... plej bonaj verkistoj iafoje ne sekvas la regulon, ili aŭ faras eraron (errare humanum est ; eĉ klasikaj aŭtoroj eraras iafoje en

sia propra lingvo gepatra), aŭ ili penas atingi ankoraŭ pli altan gradon de klareco, kiu estas la plej supera regulo de na lingvo, ĉar ankaŭ la uzado de *sia* estis enkondukita en Esperanton nur pro tiu motivo de klareco ».

LA ADJEKTIVO ATRIBUTA KAJ LA ADJEKTIVO PREDIKATA (1)

La adjektivo atributa estas mem atributo. Sed la adjektivo predikata ne estas predikato, ĝi nur rilatas al la predikato. Oni tial povas nomi ĝi ankaŭ « adjektivo ĉepredikata » aŭ « alpredikata ». La nomo « adjektivo predikateca » (Fruictier) estas malpli rekomendinda, ĉar tia adjektivo ne havas « econ » de predikato.

La vorto « adjektivo » estas uzata ĉi tie en sia plej vasta senco : vorto kun la finaĵo « a ». Ĝi do ankaŭ ampleksas la adjektivajn participojn.

Atributo estas vorto aŭ esprimo depende aldonita al alia vorto (substantivo), por montri ties econ, staton, destinon, karakterizaĵon k. s.

Oni diferencigas atributojn substantivajn kaj adjektivajn. La unuaj ĉi tie ne interesas. Atributojn adjektivajn aŭ adjektivojn atributajn montras jenaj ekzemploj :

Alta domo. *Honesta* viro. Homo *senkaraktera*. *Holanda* fromaĝo. *Rostita* ansero. Knabo *ludanta*. *Vendotaj* komercaĵoj. Kaptito *malesperiĝinta*. *Duobla* eraro.

Estas indiferente ĉu la adjektivo atributa estas antaŭ aŭ post sia substativo. Ĝi ĉiam havas la saman kazon kiel ĉi tiu, do ankaŭ finiĝas per « n », kiam ĝia substantivo estas en akuzativo. Ekzemple :

Karlo pli ŝatas harojn *krispajn ol glatajn*. Ŝi flegis mian avon *malsanan*. Li konstruis *altan* domon. Ni perdis *nian* amikon plej *amatan*. Mi vidis la knabojn *ludantajn*. Metu la *malsekan* tolaĵon en la korbon *dekstran* kaj la *sekan* en la *maldekstran*.

Predikato estas tiu parto de propozicio, kiu diras kion la subjekto de la propozicio faras, aŭ ke la subjekto estas io aŭ ia. La

(1) Kelkaj gramatikistoj — precipe en Francujo — uzas preferinde la vorton épithète por « Atributo » kaj attribut por « Predikato ». Tion oni ne forgesu legante ĉi tiun disertacion.

predikato do estas verbo aŭ helpverbo (esti) kun substantivo aŭ adjektivo. Ekzemple :

Knabo *ludas*. La ansero *rostiĝis*. La kaptito *malesperas*. *Mario kombis* siajn harojn. Ŝi *flegis* mian avon. La knaboj *estas ludintaj*. Hundo *estas besto*. La avo *estis malsana*. La muro *estas flava*. *Mi vidis* la knabojn. *Li pentris* la atleton. Ne *trinku* vinon. (Subjekto neesprimita estas « vi »).

Adjektivoj povas rilati al la predikato en jenaj kazoj :

1) La adjektivo estas necesa komplemento de la helpverbo. Ĝi respondas la demandon : Kia estas la subjekto ? Ekzemple :

La avo estis *malsana*. La muro estas *flava*. La knaboj estas *ludintaj*. La patro estus lin *batinta*. La ansero estas *rostita*. La vino ne estos *trinkata*.

En ĉi tiu kazo la adjektivo kune kun la helpverbo mem formas la predikaton. Ĝi do kiel necesa parto de la predikato estas ĉi tie adjektivo predikata en la plej malvasta senco.

2) La adjektivo difinas la predikaton (= la verbon). Ĝi respondas la demandon : Kiel agas la subjekto ? aŭ Kia estas la ago de la subjekto ? (« Agas » kaj « ago » komprenataj en tiu vasta senco, en kiu oni nomas verbon vorto de agado, ampleksante per ĉi tiu esprimo ankaŭ la verbojn, kiu montras staton, la helpverbon kaj la pasivajn formojn). Ekzemple :

La virino dancas *bele*. Ŝi kombis siajn harojn *malrapide*. La knaboj ludas *laŭte*. Mi vidis la knabojn *bone*. La viando estas nur *malmulte* rostita. Li estas *majstre* pentrinta la bildon. La avo estas *grave* malsana.

(Bela estas la dancado. La kombado estis malrapida. La ludo de la knaboj estas laŭta. La vidado estis bona. La rostado estis malmulta. La pentrado estis majstra. La malsano estas grava.)

En ĉi tiu kazo la adjektivo iĝis adverbo, ĉar ĝi ne difinas substantivon, sed verbon aŭ alian adjektivon.

3) La adjektivo difinas la subjekton, sed ne kiel ĝia atributo, sed nur en rilato al la predikato. Ĝi respondas la demandon : Kia aŭ en kiu stato agas la subjekto ? Ekzemple :

a) La virino dancas *nuda*. Li staris tie *sola*. Ŝi iris *kontenta* hejmen.

b) La virino dancas *senvestigite*. Li staris tie *apogiĝante* al la roko. *Kontentigite* ŝi iris hejmen.

En ĉi tiu kazo ni vidas diferencon inter simplaj adjektivoj kaj participoj. La lastaj adverbiĝas pro la speciala regulo, ke participoj, kiam ili ne kiel atributoj rilatas al la subjekto de la propozicio, ricevas la finaĵon « e ». Kontraŭe por la simplaj adjektivoj ne ekzistas tia regulo. Tamen oni ofte trovas simplajn adjektivojn en ĉi tiu kazo kun la finaĵo « e », precipe kiam oni povas difini per tia adjektivo ne nur la subjekton (personon, substantivon), sed ankaŭ la predikaton (agon, verbon). Ekzemple :

La virino dancas *nude* (Ne nur la dancantino estas nuda, sed ankaŭ la danco havas karakteron nudan, ĝi estas nuddanco). La infanoj ludas *gaje* (Ankaŭ la ludo faras impreson de gajeco). Sokrato atendis *serene* sian vivofinon (Lia maniero de atendado, lia ĝenerala konduto dum la atendado estis serena).

Inverse oni trovas, kvankam malpli ofte, participojn tiel uzatajn kun la finaĵo « a ». Ekzemple :

Ŝi dancas *senvestigita*. Sepdekjara kaj de ĉiu *amata* li mortis en la urbo N. (Pravigita jam per la paraleleco kun « sepdekjara »). Ivano foriris profunde *enpensiĝinta*.

Se « li pentras ŝin *sidanta* », ŝi (ŝia portreto) en la bildo sidas. Se « li pentras ŝin *sidante* », li dum la pentrado mem sidas.

4) La adjektivo difinas la objekton, sed ne kiel ĝia atributo, sed nur en rilato al la predikato. La adjektivo montras tiun econ aŭ staton de la objekto, kiun la subjekto kaŭzas aŭ produktas (ekz. igas, faras, pentras), pensas (ekz. opinias, kredas, taksas), esprimas (ekz. nomas, deklaras), perceptas (ekz. vidas, aŭdas, sentas) k. t. p. laŭ la predikato. Ekzemple :

Ne la legado sola faras la homon *klera*. Ŝi kombis siajn harojn *glataj*. Mario flegis mian avon *sana*. Ni kredis lin *honesta*. La pretoro deklaris la sklavon *libera*. Pro sia ebrieco li vidis ĉion *duobla*. Liaj veremo kaj bonkoreco igis lin ĉie *amata* kaj *respektata*. La skulptisto prezentis la reĝon *rajdanta*. La skulptisto prezentis la reĝon *rajdanta* sur ĉevalo. Josefo aŭdis la trabegon *falanta*. Ne trinku la vinon tiel *malvarma*.

En ĉi tiu kazo la adjektivo — malsame ol la adjektivo atributa — restas ĉiam en nominativo.

Alian diferencon inter la tiel uzata adjektivo kaj la atributo oni

ofte trovas en tio, ke la atributa adjektivo montras la veran, nunan econ de la substantivo, dum la predikata montras tiun neveran aŭ nenunan (estontan) econ, kiun estigas la verbo predikata. Ekzemple :

Li koloris la grizan muron *flava* (« griza » : atributo, vera, nuna eco ; « flava » : predikata, estonta eco, estigota per la kolorado). Rigardante tra ruĝa vitro oni vidas blankajn objektojn ruĝaj (« blanka » : vera eco ; « ruĝa » : nevera, nur vidata eco). Ĉiuj opiniis la kasiston *fidinda* (eco ne vera, sed nur opiniata).

Sed ĉi tiu diferenco ne estas ĉiam konstatebla. Ofte ankaŭ la predikata eco estas la vera aŭ la vera aŭ nuna eco estas indiferenta kaj neesprimita. Ekzemple :

Mi vidas la knabojn *ludantaj* (Ili vere estas ludantaj). Ŝi trovis sian fraton tute *malesperiĝinta* (Li vere estis tia). La servistino donis al ni la fruktojn *nelavitaj* (kiaj ili efektive estis). Ili priskribis la viron *altkreskinta, blonda* kaj *bluokula* (Ĉu la priskribo estis ĝusta, ne estas dirate). Ne metu la tolaĵon *malseka* en la korbon (Eble ĝi nun estas ankoraŭ seka, eble jam lavita kaj tial malseka).

Pli certe oni ekkonas la gramatikan diferencon inter la atributa kaj la predikata uzo de la adjektivo per aliformigo de la propozicio en jena maniero : Atributan adjektivon oni povas ĉiam transskribi per relativa propozicio (« *kiu(j) estas* ... »). El la predikata adjektivo kun la objekto oni povas preskaŭ ĉiam fari propozicion kun, « *(tiel) ke ... estas* » aŭ «... *iĝas* » aŭ « *tiel, kiel se ... estus* » aŭ simila transskribo. Ekzemple :

Mi vidis la knabojn *ludantajn* = mi vidis la knabojn, kiuj ludis. Mi vidis la knabojn *ludantaj* = mi vidis, ke la knaboj ludas. — Li puŝis sian kubuton *vundan* = li puŝis sian kubuton, kiu (jam) estis vunda. Li puŝis sian kubuton *vunda* = li puŝis sian kubuton tiel, ke ĝi iĝis vunda. — Neniu nomis tiun viron *malhonestan* = neniu diris la nomon de tiu viro, kiu estis malhonesta. Neniu nomis tiun viron *malhonesta* = neniu diris, ke tiu viro estas malhonesta. — Mi volas havi la ovon *kuiritan* = mi volas havi la ovon, kiu estas kuirita. Mi volas havi la ovon *kuirita* = mi volas ke la ovo estu kuirita, kaj poste mi volas ĝin havi, kiam ĝi estos kuirita. — Li erare pentris la virinon *nigrokulan* = li erare pentris la virinon, kiu estis nigrokula, dum kontraŭe li devis pentri alian virinon kun alikoloraj okuloj. Li erare pentris la virinon *nigrokula* = li erare pentris la virinon tiel, kiel se ŝi estus nigrokula, sed efektive ŝiaj okuloj havis alian koloron. — Karlo amas nur virinon *junan* = li amas nur iun virinon kiu estas juna. Karlo amas nur virinon *juna* = li amas virinon nur, kiam ŝi estas juna.

Fine oni povas meti la atributan adjektivon ĉiam antaŭ sian substantivon kaj, kiam la substantivon antaŭas la artikolo aŭ adjektiva pronomo, inter artikolon aŭ pronomon kaj substantivon, kaj kiam esceptokaze — por pli forta akcentado — ĝi estas antaŭ sia substantivo, ĝi devas nepre interlasi la artikolon aŭ adjektivan pronomon. Ekzemple :

Mi vidas (la aŭ tiujn) knabojn *ludantajn* = mi vidis (la aŭ tiujn) *ludantajn* knabojn. Sed anstataŭ : Mi vidis la (aŭ tiujn) knabojn *ludantaj* oni ne povas diri : mi vidis la (aŭ tiujn) *ludantaj* knabojn. Ebla, kvankam nekutima estus : *Ludantaj* mi vidis la (aŭ tiujn) knabojn — aŭ : mi vidis *ludantaj* la (aŭ tiujn) knabojn.

Anstataŭ la predikata (ne la atributa) participo de la estanta tempo oni povas uzi post verboj de perceptado (vidi, aŭdi, senti) ankaŭ la infinitivon same kiel post fari iĝi kaj lasi. Ekzemple :

Ni lasu lin *kuŝi* (anstataŭ kuŝanta). Liaj vortoj faris (aŭ igis) ŝin *ruĝiĝi* (anstataŭ ruĝiĝanta). Mi aŭdis ŝin kanti (anstataŭ kantanta). — Mi vidis la knabojn *ludi* (anstataŭ ludantaj).

Kvankam ĉi tiu uzo de la infinitivo estas simpla kaj praktika neniel endanĝerigas la kompreneblecon de la frazo kaj eĉ staras konforma al la reguloj de gravaj naturaj lingvoj, oni tamen trovas ĝin nur malofte en la Esperanta literaturo. Kelkaj instrulibroj eĉ malpermesas ĝin. Ili ne atentas, kion D-ro Zamenhof instruis pri tio :

« *Kiel ni diras, mi vidis lin sana* » (= « *ke li estas sana* ») — *tiel laŭ mia opinio ni povas ankaŭ diri* « *mi vidis lin kuri* » (= « *ke li kuras* ») « *mi aŭdis lin paroli* » (=« *ke li parolas* »). (Lingvaj Respondoj, Respondoj Revuo Junio 1907, N° 20 ; nova eldono pĝ. 63. Komp. Lippmann, Dr Zamenhofs Spr. Gutachten 82/84 Noto b.)

ENHAVO

Mallongigoj 4
Antaŭparolo 5

Fundamenta Gramatiko de Esperanto

I. *Alfabeto* 6
II. *Ĝeneralaj reguloj* 6

Gramatiko de Esperanto

I. *Fonetiko* 9
1. Prononcado de silaboj 10
II. *Difinoj de vortoj* 12
III. *Artikolo* 14
1. Uzado ĝenerala 14
2. Uzoj apartaj 14
3. Propraj nomoj 15
4. Gradoj de komparo 16
5. Antaŭ adjektivo 16
6. Sezonoj, monatoj, tagoj, festoj 17
7. Aliaj okazoj 17
8. Elizio 17
9. Kvanto, eco, unu, iu, ia, certa, kelka 18
Tabelo pri difino de vorto per artikolo *la* 19
IV. *Substantivo* 20
1. Rilatoj kun verbo 20
2. Rilatoj kun aliaj substantivoj 22

V. *Adjektivo* 27
1. Apudmetita adjektivo 27
2. Predikateca adjektivo 28
3. Gradoj de komparo 29
4. Participoj-adjektivoj 29
5. Komplementoj de adjektivoj 30

VI. *Numeraloj* 31

VII. *Personaj pronomoj. Posesivoj* 34
1. Pronomoj 34
2. Posedaj adjektivoj (posesivoj) 35
3. Poseda genitivo 37

VIII. *Pronomoj-adjektivoj kaj aliaj vortoj* 38
1. Montraj vortoj (Demonstrativoj) 38
2. Rilataj vortoj (Relativoj) 39
3. Demandaj vortoj 40
4. Nedifinaj pronomoj 40
5. Pronomo aŭ adjektivo 41

Tabelo de korelativoj 42

IX. *Verbo* 43
1. Subjekto 43
2. Predikato 43
3. Rekta komplemento 44
4. Nerekta komplemento 45
5. Cirkonstancaj komplemetoj. Loko 45
6. Cirkonstancaj komplementoj. Tempo 47
7. Cirkonstancaj komplementoj. Kaŭzo 48
8. Cirkonstancaj komplementoj. Maniero 49
9. Akuzativo post netransitivaj verboj 50
10. Modoj kaj tempoj 50
11. Indikativo 51
12. Indikativo. Tempoj simplaj 51
13. Indikativo. Tempoj malsimplaj 52
14. Ordona modo (Imperativo) 54
15. Kondiĉa modo (Kondicionalo) 55
16. Infinitivo 55
17. Participoj 56
18. Pasivaj verboj 57
19. Refleksivaj verboj 57
20. Aparta uzo de kelkaj verboj 58

X. *Prepozicio* 61
1. Esploro ĝenerala 61
2. Lokaj prepozicioj 62
3. Tempaj prepozicioj 64
4. Aliaj prepozicioj 65

XI. *Adverbo* 66

XII. *Konjunkcio* 67
1. Esploro ĝenerala 67
2. Apartaj konjunkcioj 68
3. Jeso kaj neo 70

XIII. *Stilo* 72
1. Ordigo de vortoj 72
2. Interpunkcio 73

XIV. *Versfarado* 75
1. Akcento 75
2. Ritmo 76
3. Dusilabaj ritmoj 76
4. Trisilabaj ritmoj 77
5. Cezuro 78
6. Rimo 78

Vortfarado en Esperanto

UNUA PARTO

Ĝenerala esploro de la derivado

Difinoj 83
Ordigo de la radikoj 83
Ideaj radikoj 83
Simpla derivado 84
Malsimpla derivado 85
Aliklasa derivado 87
1. Verboj naskataj de adjektivaj radikoj 87
2. Verboj naskataj de substantivaj radikoj 87
3. Substantivoj naskataj de adjektivaj radikoj 88
4. Substantivoj naskataj de verbaj radikoj 88

5. Adjektivoj naskataj de substantivoj 89
Tabelo 90
6. Adjektivoj naskataj de verbaj radikoj 91
Tabelo 92

Samklasa derivado 93
Tabelo de ĉefaj afiksoj uzeblaj kun adjektivaj radikoj. 93
Tabelo de ĉefaj afiksoj uzeblaj kun substantivaj radikoj. 94
Tabelo de ĉefaj afiksoj uzeblaj kun verbaj radikoj ... 95

Derivitaj radikoj 96

Multsufiksaj vortoj 96

DUA PARTO

Aparta esplorado de l'afiksoj

Sufiksoj

aĉ 98
ad 98
aĵ 101
an 103
ant 104
ar 107
at 108
ebl 111
ĉj 131
ec 113
edz 114
eg 115
ej 116
em 117
end 118
er 118
estr 119
et 119
id 120
ig 120
iĝ 123
il 126
in 128
ind 128
ing 129
int 129
ism 130
ist 130
it 129
iv 131
nj 131
obl 132
on 132
ont 132
op 132
ot 132
uj 133
ul 136
um 136

Prefiksoj kaj Prepozicioj

al 138
anstataŭ 139
antaŭ 141
apud 142
bo 142
ĉe 143
ĉef 144
ĉirkaŭ 144
da 144
de 145
dis 147
dum 147
ek 148
eks 148
ekster 148
el 149
en 151
fi 152
for 152
ge 153
ĝis 154
inter 154
je 155
kontraŭ 156
krom 157
kun 157
kvazaŭ 158
laŭ 158
mal 159
malgraŭ 160
mis 160
per 160
po 161
por 161
post 162
pra 163
preter 163
pri 163
pro 164
re 164
sen 165
sub 166
super 166
sur 167
tra 167
trans 168
vir 168

Aldono

Aldono 171
1. Pri la uzado de la refleksiva pronomo en Esperanto 172
2. La adjektivo atributa kaj la adjektivo predikata 183

Anoncoj 194

Eldonejo " Esperantista Voĉo „

S. GRENKAMP-KORNFELD
JASLO (Pollando)

Poŝtĉeka konto : Krakovo N-ro 400-821
Bankkonto : Bankdomo Kornfeld, Jaslo
Ĝirokonto de U. E. A. (al kiu oni povas pagi per poŝtĉekoj en ĉiuj landoj, indikante por konto Grenkamp)

LIVERKONDIĈOJ

La livero okazas nur post **antaŭa** pago je la prezoj valorantaj **en la tago de la livero.** La **prezoj** estas montritaj en **svisaj frankoj.** El **eksterlando** oni pagu per bankĉekoj, **prefere** per bankbiletoj en rekomenditaj leteroj. Ni akceptas ĉiun alian valuton laŭ tagokurzo de alveno kaj la repondkuponojn de U. E. A. Al **konstantaj mendantoj** ni rekomendas malfermon de **konto** ĉe ni.

Por **sendkostoj** oni aldonu 10 % de la pagota sumo, minimume **15 ct.** Por rekomendata sendaĵo oni plie aldonu **30 ct.** Nerekomenditaj sendaĵoj je l'risko de l'ricevonto.

Libroj de ni forsenditaj restas nia proprajo ĝis kiam ili ne estas entute pagitaj. — **Ni liveras ankaŭ ĉiujn** aliajn en la katalogo **ne cititajn librojn.** — Livereblo kaj prezoŝanĝoj rezervitaj.

LERNOLIBROJ, LEGOLIBROJ kaj VERKOJ PRI ESPERANTO

* **Bastien,** Naŭlingva Etimologia Leksikono . . . . . 5.—
* **Cart,** Vortoj de Profesoro Cart, luksa eldono kun du portretoj (140 paĝoj) . . . . . 3.—
— eldono sur Madagaskara papero, kun aŭtografo. . . . Prezo je demando
* — Pri Landnomoj 0.40

BELETRISTIKO

Akita Ujaku, Danco de skeletoj. 1.25
Avsejenko, Fraŭlino Suzano (tr. Medem) . . . . . 1.—
* **Balzac,** La Firmo de la kato, kiu pilkludas . . . . . 1.—
* **Bach-Sisley.** Rakontoj al mia Bebulino (trad. Touchebeuf) . 1.25
* **Balucki,** Kuzeto (tr. Grenkamp) 0.25
* **Bossuet,** Funebra Parolado (tr. Bastien) . . . . . 1.—
Byron, Ĉielo kaj Tero (tr. D-ro Noel) 3.50
En Svislando, kvin rakontoj kun ilustraĵoj . . . . . 2.—
* **Florian,** Du biletoj (tr. Bulthuis). 0.60
* **Frenkel,** Verdaj Fajreroj . . . . . 1.—
* **Gogol.** Portreto (tr. Fišer) 1.50
* **Gordon.** Kara Panjo (tr. Gego) 0.75
* **Grenkamp,** Krioj de l'koro 0.25
* — Penseroj, II-a Kajero 0.40
* **Hebbel,** Gyges kaj lia ringo (tr. Benemann) bindita . . . 4.—
* **Lermontov,** Novaj Versaĵoj (tr. Bela Manto) 1.50
Lessing, Minna de Barnhelm 1.90
Meier, Kvin Noveloj, bind. . . . . 3.—
* **Mickiewicz.** Improvizacio de Konrad 0.25
* — Sinjoro Tadeo (tr. Grabowski) 6.50
* **Schulhof.** Per Espero al Despero 0.60
* **Sentis,** Urso — En Montoj 1.25
* **Stephenson,** Doktoro Jekyll kaj S-ro Hyde 1.25
* **Schmidt,** La amkonkurantoj 0.50
* — Gustav Vasa 1.90
* **Unterman,** En danĝero 2.50
* **Wiseman.** Fabiola (1-a eldono luksa papero) . . . . . 8.—
* **Wagner,** Estu Homo ! (tr. Meyer) 1.25
* **Wyslouch,** El la lando de ruinoj (tr. Grenkamp) 0.25

MALOFTAJOJ

(kelkafoje iom difektitaj)

Devjatnin, Plena Verkaro, 4-a vol. 3.50
D-ro Esperanto. Unua libro por Svedoj (1889) . . . . . 25.—
Esperantaj Prozaĵoj el kolekto aprobita de D-ro Zamenhof . . (246 paĝoj) 5.—
Grabowski, Kondukanto de l'interparolado kun Antologio Internacia (183 paĝoj) . . . . . 5.—
Kongreso Libro de la I-a Kongreso de Esperanto en Boulogne-sur-Mer (164 paĝoj) . . . . . 2.—

SCIENCAJ VERKOJ

* **Kolovrat,** Teorio pri evoluo de kono 0.50
* **Le Monnier.** Evolucio kaj evoluciismo 0.30
* **Scienca Revuo,** jarkolekto 1904 (sen. n-roj 3. 4, 12) . . . 8.—
— — — 1905 . . . . . 10.—
— — — 1906 . . . . . 10.—
Scienca Gazeto. jarkolekto 1912 . . . . . 8.—
— — — 1913 . . . . . 8.—
— — — 1914 . . . . . 5.—

* **Lingvo Internacia.** la plej modele redaktita esp-a gazeto, neelĉerpebla fonto de esp-a historio kaj literaturo . . fr. sv.

— jarkolekto 1896 (176 pĝ) . . . . . 25.—
— — 1900 (188 pĝ) . . . . . 20.—
— — 1902 (176 pĝ) . . . . . 22.—
— — 1905 dua volumo (288 pĝ) . . . . . 5.—
— — 1906 unua volumo (368 pĝ) . . . . . 5.—
— — 1907 (576 pĝ) . . . . . 10.—
— — 1908 (576 pĝ) . . . . . 10.—
— — 1909 (584 pĝ) . . . . . 8.—
— — 1910 (576 pĝ) . . . . . 7.—
— — 1911 (536 pĝ) . . . . . 5.—
— — 1912 (460 pĝ) . . . . . 5.—
— — 1914/20 (348 pĝ) . . . . . 4.—
— Dek diversaj n-roj de Lingvo Internacia (ĉ 400-500 pĝ) 2.—

* **Literatura Almanko,** de Lingvo Internacia 1909. Ĉiuj artikoloj estas originaloj de Akademianoj. kies portretoj sur ekstertekstaj folioj ornamas la libron. Krome trovigas ankaŭ iliaj karikaturoj faritaj de lerta mano . . . . . 2.—

* **Literatura Almanako,** de Lingvo Internacia 1910. Lukse ilustrita, tiu volumo, estos la ĝojo de ĉiu, kiu amas poetojn kaj ŝatas sin rifuĝi, dum kelka tempo, el la senĉesa akra vivbatalo sub la liberspiran, lazuran ĉielon de la esp-a poezio . . . . . 2.—

* **Kongresaj Raportoj,** bele broŝuritaj. Humore skribitaj prezentas la veran bildon pri ĉiu kongreso aparte . . . . fr. sv.

— Oficiala protokolaro de la Kongreso (84 pĝ) 0.40
— Raporto pri la Tria Kongreso (84 pĝ) . . . . . 1.—
— — pri la Kvara Kongreso (64 pĝ) . . . . . 1.—
— — pri la Kvina Kongreso (72 pĝ) . . . . . 1.—
— — pri la Sesa Kongreso (72 pĝ) . . . . . 1.—
— — pri la Sepa Kongreso (62 pĝ) . . . . . 1.—
— — pri la Oka Kongreso (99 pĝ) 1.50
— — pri la Naŭa Kongreso (94 pĝ) 1.50

DIVERSAJOJ

Gazetoj. diversaj esperantaj 10 ekz. 0.30
Poŝtkartoj. diversaj ilustritaj, 10 ekz. 0.30
Poŝtkartoj kun Esperanto-stelo. 100 ekz. 0.75
Ŝlosiloj diverslingvaj, 10 ekz. 0.50

Multaj jarkolektoj de aliaj esperantaj revuoj kiel ankaŭ serĉataj maloftaĵoj estas riceveblaj. Bonvolu ensendi vian mankoliston.

ATENTU !

KIU LERNAS ESPERANTON,

tiu bezonas gazeton interesan, literaturan, bonstilan, kun artikoloj kaj romanoj, seriozaj kaj amuzaj :

KIU LERNAS ANGLAN LINGVON,

tiu bezonas tekstojn malkarajn, pri aktualaĵoj :

KIU PROPAGANDAS ESPERANTON

tiu bezonas bonaspektan, bele presitan gazeton, kun lastatempa informo pri la Movado, kiu pruvos la seriozecon de nia afero. Resume :

ĈIU BEZONAS

INTERNATIONAL LANGUAGE

Monata gazeto en angla kaj esperanta lingvoj.

Jarabono 2 ŝ. 6 p. (3 frankoj svisaj).

Petu provekzempleron ĉe « International Language »
(G. K.)

142, HIGH HOLBORN,
LONDON, W. C. 1,
ANGLUJO

BELGA-ESPERANTO-INSTITUTO

Koopera Societo. Akto 2253. 13-3-1926
ANTVERPENO
Kleine Hondstraat, 11, rue du Petit Chien
Telefono 943.74 — Poŝtĉeko 1689.58
Telegraf-adreso: « Esperanto »

Presado — Eldonado — Librovendado
Fabrikado de insignoj — Propagando
Korespondaj kursoj.

Entreprenas ĉiajn preslaborojn. Petu prezojn por presado de Libroj, cirkuleroj, ilustritaj poŝtkartoj, muzikaĵoj, k.t.p.

Aĉetu: « BELGA ANTOLOGIO » (2 vol., 600 paĝoj), B. fr. 40.—
Abonu: BELGA ESPERANTISTO. Monata revuo, B. fr. 23. — jare.

AŬSTRIA ESPERANTISTO

oficiala organo de « Intern. Esperanto-Muzeo en Wien » kaj « Aŭstria Esperanto-Asocio », 12—16 paĝa, ilustr., jarabono komencebla ĉiumonate sv. fr. 4.25 afrankite. Provnumero senpage.

Redaktejo kaj administrejo:
Korneuburg ĉe Wien, Postfach.

INTERNACIA MEDICINA REVUO

Internacia ligilo de ĉiuj esperanto-parolantaj kuracistoj, apotekistoj kaj aliaj medicinaj fakuloj.

REDAKCIO kaj ADMINISTRACIO :
D-ro P. KEMPENEERS, 20, rue aux Laines,
Bruxelles (Belgujo)
Jarabono : 1 usona dolaro.
Oficiala organo de « Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio ».

Heroldo de Esperanto

la sendependa organo de la Esperanto-movado, aperas depost 1920 regule ĉiusemajne ; liveras ankaŭ ĉiajn Esperanto-librojn, presaĵojn, insignojn, k. t. p.

Petu senpagan specimenon kaj libro-katalogon de la eldonejo.

Heroldo de Esperanto

Brüsseler Str., 94, Köln, Germanlando.

La katolike interesenhava kaj riĉe ilustrita revuo

ESPERO KATOLIKA

eliras dusemajne sub arta kovrilo dukolora

Almenaŭ 16-paĝa. — Formato : 27 × 19 cm.

JARABONPREZO :

Por landoj kun rabata poŝttarifo ..... fr. fk. 25.—
Por aliaj landoj ..... fr. fk 30.—

ĜIAJ RUBRIKOJ :

Ĉefartikoloj. — La Katolika kaj Ĝenerala Esperanto-movadoj. — Vivo Katolika. — Tra la Gazetaro. — Literaturo. — Novaj Libroj. — Muzikaj paĝoj. — Humoraĵoj. — Virinaj Paĝoj. — K. t. p.

22, COURS ALBERT PREMIER, 22
PARIS-VIII

Gramofonaj Diskoj
EN
ESPERANTO
(FINDLAY - GREGG - SERIOJ)

kreita sub la direkto de prof. d-ro J. J. Findlay, kun la kunlaboro de la *Gregg Publishing Company, Ltd.*, kaj la *Colombia Graphophone Company, Ltd.*

DISKO N-ro 1 . . . . . 6/-
a) La Leterportisto *(Columbia, n-ro* S.T. 719) ;
b) Struvelpetro *(Columbia, n-ro* S.T. 720).

DISKO N-ro 2 . . . . . 6/-
a) Pri la Devено de l'Arta Muziko (Greka Fabelo) - *(Columbia, n-ro* S.T. 663) ;
b) Jen Silvio (Shakespeare ; muziko de Schubert) ; Jen mia Mano (Samideana Trinkkanto) - *(Columbia, n-ro* S.T. 662).

Esperanto-Lernolibro "ĜOJU NI„
de Prof. D-ro J.-J. Findlay

bazita sur la principoj de MODERN LANGUAGE LEARNING. Libro kun versoj kaj prozo en Esperanto, por komencantoj de ĉiu nacioj ; kun ĉapitro pri Gramatiko kaj Vortfarado. Enhavas la tekston de Findlay-Gregg'aj gramofonaj diskoj en Esperanto. 46 paĝoj ; tole bindita, 1/-

THE GREGG PUBLISHING COMPANY Ltd
36-38, Kingsway, LONDON W. C. 2

Laboristaj Radiistoj-Esperantistoj !

La sola esperanta organizo, kiu reprezentas viajn interesojn en la plenumo de praktikaj viaj bezonoj, estas

SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA (S. A. T.)

fondita en 1921, priservanta siajn membrojn per tri periodaj gazetoj, influanta per sia gazet-informservo la tutmondan proletan gazetaron, liveranta al siaj membroj senpagan *Jarlibron* tre ampleksan, en kies enciklopedia parto ankaŭ la *Laborista Radio-movado* estas pritraktita.
Pro aliĝo (jara kotizo sur la bazo de 2 g. mk.) turnu vin al sube citita adreso.

Nepre abonu, se vi serioze kaj objektive volas esti informata pri tutmonda laboristara vivo, al

SENNACIULO

oficiala organo de S. A. T., la unua *semajna* laborista gazeto en Esperanto, fondita en 1924, ĉiu numero 12-paĝa, kun senpaga monata aldono de

LA LERNANTO

facile legebla instrua kaj amuza gazeto por komencantoj ankaŭ aparte abonebla.
« Sennaciulo » raportas pri vivkondiĉoj kaj bataloj de l' tutmonda laboristaro, informas pri ĉiuj modernaj kultur-movadoj, ankaŭ la *Laborista Radio-movado* en siaj kolonoj.
Literatur-amantoj krome abonos al

LA NOVA EPOKO
32 paĝoj

Monata literatura revuo de S. A. T. kun specialaj scienc-teknikaj kaj pedagogiaj kajeroj. Aperigas pecojn plej valorajn el la proleta mondliteraturo.
Ĉiuj tri gazetoj estas redaktataj en pura, bonstila Zamenhofa lingvo.

Petu specimenon kaj preztarifon, ankaŭ katalogon pri Verkaro eldonita de S. A. T. ĉe

Administracio de SAT, Colmstr. 1, Leipzig 0.27, Germanio, aŭ ĉe Sidejo de SAT, 23, rue Boyer, Paris-20, Francio.

KSIĄŻNICA PODLASKA
im. Ludwika Górnickiego
Nr .....
FILIA Nr 14
w Białymstoku

Presejo de
Belga Esperanto-Instituto, K.S.
11, Kleine Hondstraat
ANTVERPENO
(Belgujo)

Książnica Podlaska
im. Łukasza Górnickiego w Białymstoku
000678342